

KATALUNA ESPERANTISTO

1921 2 20

MONATA ESPERANTA GAZETO

DUA EPOKO - JARO 1^a : JANUARO 1921

700.013-B

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

OFICIALA ORGANO DE "KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO"

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: CARME, 30 - BARCELONA

REDAKTOROJ

JAUME GRAU, ĈEF-REDAKTORO

S. ALBERICH JOFRÈ

ARTUR DOMÈNECH

ROMÀ GUARDIET

ĈIUJN VENDREDOJN, JE LA 10^a VESPERE, OKAZAS REDAKCIA KUNVENO.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administracio :
Carme, 30 : BARCELONA

Nia devizo: *Maro estas gutaro*



EN KATALUNA ESPERANTISTO aperas denove por veki ĉiujn katalunajn esperantistojn... Post tiom da tempo de dormado, ni rekomencas la laboron kun fervora espero ke niaj klopodoj instigos ĉiujn helpi nin, por atingi tre baldaŭ la antaŭan brilecon de la esperantista movado en Katalunujo.

Ni ne parolu pri la kaŭzoj de la lastatempa neago de la esperantistoj en nia lando kaj pretiĝu al tuja laboro por gajni la perditan tempon; ke ĉiuj samideanoj oferdonu sian kapablon kaj tiel ni povos plej rapide iri la vojon celitan...

Ni kore salutas la tutan samideanaron kaj esperantan gazetaron, ni antaŭdankas la ricevotan helpon kaj ni petas indulgan bonvolemon por la plenumo de nia tasko, al kiu ni nur povas oferi niajn junajn fervorojn.

LA REDAKCIO

Ĝenerala Kunveno de la Kataluna Esperantista Federacio

Barcelona : 10^{an} de Oktobro 1920^a



A 10^{an} de Oktobro, matene, okazis ĉe la sidejo de «Ateneu Enciclopèdic Popular» la Ĝenerala Kunveno de Kataluna Esperantista Federacio.

Oportune ĝi estis anoncita sur la Federacia Bulteno, kun peto ke ĉiuj samideanoj ĉeestu, kaj certe la nombro da ĉeestantoj estis kontentiga. Inter ili troviĝis reprezentantoj de diversaj Grupoj.

Okupis la prezidan lokon la Prezidanto S-ro. Enric Aguadé, akompanata de ĉiuj membroj de la Direkta Komitato.

S-ro. Aguadé malfermas la kunsidon kaj paroladas montrante la malfacilaĵojn renkontitajn de la Direkta Komitato, ĉefe tiujn kiuj malhelpis la okazigon de la IX Kongreso de la Federacio en la urbo Girona, laŭ la deziro esprimita de la lasta Kongreso en Manlleu. Li pravigas la okazon en Barcelono de la nuna ĝenerala kunveno, kaj diras ke la renkontitajn malfacilaĵojn pli detale konos la ĉeestantoj per la raporto legota de la Sekretario. Espe-
rinde estas ke oni klopodos eviti ilin en la estonteco.

La Sekretario, S-ro. Jaume Grau, starigas kaj legas la jenan raporton:

«Gefederacianoj :

Iom malĝoje mi plenumas la devon raporti al vi la bedaŭrinde senefikan agadon de la Direkta Komitato kiun vi elektis la pasintan jaron, dum nia Kongreso en Manlleu.

Vi ja scias ke tiu Kongreso okazis post longedaŭra epoko dum kiu la vivo de nia Federacio estis malforta, kaj ke la tiam farota tasko ŝajnis esti klopodado por atingi la tutan revigliĝon de la K. E. F., kies ekvekiĝon ni povis konstati per la brila sukceso de tiu rapide organizata Kongreso.

Kompreneble, la tasko kiu prezentigis antaŭ ni estis eksterordinara kaj sekve postulis eksterordinarajn fortojn; malgraŭ tio, la ĵus elektita Direkta Komitato rimarkis baldaŭ ke en ĝi ne sin trovis la postulataj kondiĉoj pro diversaj malfavoraj cirkonstancoj, kaj en sia unua periodo ĝi jam ne povis tute agi kiel estis dezirinde, post kio alvenis unu post la alia diversaj malfacilaĵoj.

Tuj de la komenco iĝis tre komplika la funkciado de tiu Direkta Komitato.

tato, pro tio ke la Prezidanto loĝis en Reus, la Direktoro de la Bulteno en Terrassa, la Administranto en Sabadell, la Sekretario en Barcelono, kaj la aliaj Komitatoj estis dislokitaj ankaŭ en Barcelono, Sarrià kaj Sabadell.

Tamen, ni pretigis al laborado tiel fervore kiel eble. Ni petis al la Grupoj «Studenta Juneco» kaj «Ĝerona Espero» el Ĝerono, ilian opinion pri la propono farita de Ĝerona samideano okazigi en tiu urbo la venontan Kongreson. Ricevinte la deziratajn informojn ni sciigis ke la propono estis farata sen oficiala karaktero kaj ni konvinkigis pri la tuta neebleco realigi tiun proponon.

Poste ni esploris la eblecon okazigi la Kongreson en la urbo Manresa ĉar aspektis iel facila ĝia organizo, sed tamen, pro la malgranda nombro de tieaj esperantistoj kaj manko de helpantoj, tiu provo ankaŭ ne prosperis.

Tiu sama manko de helpemo kaj krome nesufiĉeco de financaj rimedoj malpermesis la regulan aperadon de nia Bulteno, de post la januara monato ĝis nun. Ni pripensadis ofte kiamaniere solvi la problemon de la ĉiumonata aperado de la Bulteno sed tiun solvon ni ne povis ekvidi: estas necese postuli de la federaciaĵoj pli altan kotizon kaj pli proksiman kunlaboradon.

Krom tiaj aferoj — malfacilaĵoj kiujn ni ne sukcesis venki — altiris nian atenton la okazo en Barcelono de tiu nomata «Unua Diskutanta Kunveno de Esperantistoj de Iberiaj Landoj».

La 21^{an} de Januaro 1920^a la Prezidanto de K. E. F. ricevis de «Esperantanaro FAJRO» komunikacion sciigantan pri la organizo de tiu Unua Diskutanta Kunveno, kaj la Sekretario ricevis alian de la Grupo «La Metiisto» invitantan lin al la proksima kunveno de la organizantoj, kiu okazis la 25^{an} de la sama monato.

En tiu kunveno, kiun mi ĉeestis pro neebla ĉeesto de la Prezidanto kiel Sekretario de K. E. F., la organizantoj klarigis al mi la celon de la U. D. K. E. I. L. kaj petis la aliĝon de la K. E. F.

Mi respondis, farinte kelkajn konsiderojn, ke mi transdonos tiun peton al la Direkta Komitato kaj ke ĝi sciigos ilin oportune pri sia decido.

La morgaŭan tagon mi faris longan raporton pri la de mi ĉeestita kunveno kaj sendis ĝin al nia Prezidanto kaj al la Direktoro de la Bulteno, por ke ili konu detale la staton de la afero. Tiun raporton konis la organizantoj de U. D. K. E. I. L. kaj ĝi meritis ilian aprobon.

La Prezidanto kunvokis la Komitatojn al kunsido okazinta en Barcelono la 15^{an} de Februaro kaj ili ĉiuj sciigis pri la invito aliĝi la Udkeilon farita al la K. E. F. Oni unuanime decidis ne aliĝi al ĝi kaj komuniki tion al la organizantoj, aldonante ke la kaŭzoj de tia decido estos publikigataj sur la Bulteno de K. E. F. Tiujn decidojn partoprenis ankaŭ la Prezidanto, ne povinta ĉeesti pro bedaŭrinda subita morto de sia filo.

La deka komunikaĵo estis sendata kaj en alia Komitata kunsido oni decidis publikigi en la Bulteno kaj sendi al la organizantoj de U. D. K. E. I. L. la jenan noton:

«La KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO nepre devas vidi kun plezuro ĉies agadon por Esperanto kaj tial ĝi konsideras meritindaj la klopodojn de la organizantoj de la Unua Diskutanta Kunveno de Esperantistoj de Iberiaj Landoj; sed la K. E. F., kiel supera esperanta organizaĵo en Katalunujo, ne povas dece aliĝi kaj partopreni apartajn agadojn de apartaj esperantistoj, ĉar oni devas eviti la riskon treni ĝin al afero kies esperinda sukceso estas tamen malcerta.

Nur pro tio la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO ne aliĝas la Diskutantan Kunvenon, kvankam ĝi respektas ĝian agadon kaj lasas al siaj anoj plenan liberecon aliĝi individue.

La Direkta Komitato de la K. E. F. pravigos sian decidon dum la venonta Kongreso. Barcelono, la 13^{an} de Marto 1920^a».

En tiu noto estas klare esprimataj la kaŭzoj de nia decido kaj vi devas diri ĉu ni trafis.

Mi finos, rilate tiun aferon, dirante ke ni agis ĉiukaze tute korekte kaj ke ni ne kontraŭstaris nek malhelpis la arangon de la Unua Diskutanta Kunveno, restante pure kaj simple en la situacio de ne partoprenantoj.

Sed, karaj samideanoj: Nia Kataluna Federacio, kies briln historion atestas tiom da sukcesaj kaj fruktodonaj kongresoj, tiom da belaj literaturaj festoj kaj propagandaj solenaĵoj, tiom da kuraĝigaj kaj entuziasmaj vortoj aperintaj en la multvaloraj pagoj de ĝia presorgano; nia Federacio, kies lertan kaj efikan agadon montras tiom da esperantaj profesoroj, eminentaj pioniroj kaj fervoraj samideanoj kiuj formiĝis apud ĝi sub ĝia ama kaj atenta rigardo; nia Federacio, kies unuaj aliĝantoj estis la rikoltado de la kampo kulturita dum la Barcelona Mondkongreso; ĉu ĝi devas kviete kaj senenergie vivadi, rigardante kiel enlandaj samideanoj dise batalas ekster ĝi, ĝuste en la momento kiam estus preferinde ke la tutaj batalemaj fortoj estus forĝataj kaj ordigataj en ĝia interno?

Ĉu la Kataluna Federacio devas permesi, ne agente tiel kiel la momento postulas, ke estu samideanoj kiuj sin sentas malproksimaj de ĝi kaj pro tio estas pretaj senzorge kuradi post tro rapidemaj batalantoj, ne konsciante ke oni povas senintence malhelpi la movadon per tro altcelaj kaj nematuraj propagandoj?

Unuvorte, ĉu la Federacio povas ne daŭrigi sian altan laboradon de antaŭaj tempoj?

Mi ne respondas al tiuj demandoj, ĉar mi esperas ke vi faros tion hodiaŭ decidante per via sindonemo kaj fervoro kia estas la vojo kiu nin kondukos al la celo.

JAUME GRAU

Unuanime estas aprobata la Sekretaria raporto.

La Administristo, S-ro. Pere Casanovas, legas la bilancon kiu same meritas la ĝeneralan aprobon.

La Sekretario sciigas la aliĝon al la Kunveno de la jenaj societoj kaj samideanoj: «Esperanta Idealo» el Santa Coloma de Farnés, «Ĝeronprovinca Esperantista Ligo», S-roj. Pere Costa, el Santa Coloma, Pere Domènech, el Vilassar de Mar, Joan Campdelacreu, el Manlleu.

S-ro. Joan Gili, delegito de la Grupo «Barcelona Stelo», prezentas ses proponojn kiuj estas kune legataj kaj poste diskutataj unuope.

Unua propono: Ke ĉiuj membroj de la Direkta Komitato, aŭ almenaŭ la plejmulto, loĝu en unu sama urbo.

S-ro. Gili defendas la proponon klarigante ĝian celon atingi ke la D. K. havu la eblecon laboradi plej intense. S-ro. Serrat esprimas sian opinion ke la D. K. povas esti efike helpata, se necese, de la Konsulta Komitato konsistanta el la Prezidantoj de ĉiuj aliĝintaj Grupoj.

La Kunveno aprobas la proponon de «Barcelona Stelo» kaj konsideras konvena la reorganizon de la Konsulta Komitato, laŭ propono de S-ro. Serrat.

Pri urĝa afero petas permeson paroli S-roj. Alavedra kaj Serrat, kiuj anoncas ke post iom da tempo alvenos en Barcelonon ŝipo kondukanta kelkajn esperantistajn aŭstrajn infanojn, kaj, ĉar ili ambaŭ estas membroj de la Komitato «Pro Infanoj», ili devas forlasi la Kunvenon por iri akcepti la alvenontojn.

La Kunveno aklame petas al S-roj. Alavedra kaj Serrat ke ili salutu la infanojn nome de «Kataluna Esperantista Federacio».

Post tio, oni daŭrigas la Kunvenan taskon.

Dua propono: Ke la jarkotizo por federaciaĵoj plialtiĝu ĝis 5 pesetoj.

Post mallonga diskuto, kiun partoprenas S-roj. Ramón Vila, Pasqual Martínez kaj J. Canales, ĝi estas unuanime aprokata.

Tria propono: Ke estu permesate al la D. K., se tio montriĝus necesa, difini honorarion por la Redaktoroj de la oficiala presorgano de la Federacio.

La proponon defendas S-ro. Gili kaj aprobas la ĉeestantoj.

Kvara propono: Ke, anstataŭ la nuna simpla «Bulteno», aperu denove la fama gazeto «Kataluna Esperantisto» kiel Federacia presorgano.

Defendante tiun proponon parolas S-roj. Gili kaj Doktoro Bremón, post kio ĝi estas entuziasme aprokata.

Kvina propono: Ke la Redakcio kaj Administracio de la gazeto loĝu konstante en Barcelono, kvankam la Direkta Komitato troviĝos en alia urbo.

La propono celas ke la Redakcio estu en fiksa loko, ĉar eble prezentigis malhelpoj se ĝi varios ĉiujare.

Ankaŭ la nuna propono estas unuanime aprokata.

Sesa propono: Ke oni petu monsumojn de la sindonemaj samideanoj por helpi la efektivigon de la aprobitaj proponoj.

Pri tiu lasta kaj grava propono parolas S-roj. Gili, Bremón kaj Amades, kaj ĝi meritas la aprobon de ĉiuj ĉeestantoj.

Laŭ peto de la Prezidanto S-ro. Aguadé, la Kunveno esprimas sian dankon al la fervoraj samideanoj de la Grupo «Barce-

lona Stelo», pro la entuziasmo kaj laboremo montritaj per tiom da saĝaj proponoj.

Oni legas komunikaĵon de la Grupo «Nova Sento» enhavantan proponon, kiun la anoj de tiu societo decidas konsideri ne prezentita, post kelkaj klarigaj vortoj de la Direkta Komitato.

S-ro. Josep Ezquerra petas al la Kunveno, je la nomo de la esperantistaj blinduloj, ke oni akceptu ilin en la Federacio laŭ specialaj kondiĉoj. La Prezidanto respondas ke oni konsideros kaj solvos tiun aferon kun granda plezuro.

Antaŭ ol esti elektataj la novaj Komitatanoj, S-ro. Jaume Grau, Sekretario de la finanta Komitato, petas permeson paroladi por fari kelkajn konsiderojn rilate la elekton de la novaj Komitataj membroj.

Li komencas dirante ke li parolos klare kaj sincere. Estas evidente ke la Kataluna Esperantista Federacio ne agis lastatempe tiel intense kaj efike kiel estas necese; estas certe, ankaŭ, ke multaj valoraj esperantistoj troviĝas ankoraŭ ekster la Federacio; kial tiaj esperantistoj ne eniras en ĝin por replenigi ĝiajn malpliigintajn vicojn?; ĉu ne estus tio la plej bona rimedo por eviti tiun malmultan nesufiĉan laboradon kiun oni al la Federacio riproĉas? Estas necese ke ĉiuj enlandaj societoj kaj samideanoj partoprenu la taskojn de la K. E. F. kaj en ĝi sin sentu reprezentataj; ĉu estas io pli bona por tio ol ke ĉiuj diversaj rondoj da samideanoj donu al la elektota Direkta Komitato unu el siaj fervoruloj? Tiam estus garantio por ĉiuj ke la Komitato laboros kaj jen sendube la unua paŝo por atingi tiun deziratan unuecon, kiun plena sukceso de nia movado postulas. Tiam unuecon ni devas celi ĉar certe ĝi helpas akiri la necesan forton por starigi kaj subteni vivoplenajn organizaĵojn kaj disvolvi dece niajn energiojn. Sed nepra kondiĉo por tio estas ke ĉiuj aliĝu al nia Federacio, kaj ne nur aliĝu sed firme laboru, laŭ deklaro kaj rekomendo de la antaŭ ne multe okazinta «Unua Diskutanta Kunveno de Esperantistoj de Iberiaj Landoj»; aliĝante al ĝi, oni ankaŭ helpas la starigon de la Konfederacio Iberia; estas necese, do, ke ĉiuj Katalunaj esperantistoj estu pretaj akcepti postenon ĉe la Federacia Komitato kaj rekte partopreni ĝian laboron, anstataŭ sin teni kritike antaŭ ĝi. Ni kunigu ĉiujn fervorojn kaj tiam ni marŝos tra la bona vojo...

Oni aprobas per ĝenerala aplaŭdo la vortojn de S-ro. Grau.

Por faciligi interkonsenton interrompiĝas la kunsido dum dek minutoj kaj poste estas aklame elektata la jena Direkta Komitato:

Prezidanto : Joan Gili Norta; Joan Amades, S. Alberich Jofrè, Jaume Claramunt, Pere Navas, Jaume Pruna, Enric Adam, Josep Serrat, Jaume Vilaseca, Jaume Grau.

Post ol esti legataj la nomoj de la novaj Komitatanoj, la Prezidanto S-ro. Aguadé esprimas sian fidon ke ili senlace laboros por la bono de nia afero kaj la Kunveno finiĝas meze de granda entuziasmo.



Oficiala Parto



UNVOKITAJ de nia prezidanto S-ro. J. Gili, la novaj komitatanoj kunvenis la 17^{an} de oktobro en la sidejo de Ateneu Enciclopèdic Popular por studi la reorganizon de K. E. F. kaj sekve puŝi ĝin al plena sukceso.

La komitatajn rolojn oni disdonis jene:

Vicprezidanto: S-ro. Joan Amades.

Sekretario: S-ro. S. Alberich Jofrè.

Vicsekretario: S-ro. Jaume Claramunt.

Administristo: S-ro. Pere Navas.

Kasisto: S-ro. Jaume Pruna.

Voĉdonantoj: S-roj. Josep Serrat, Enric Adam, Jaume Vilaseca kaj Jaume Grau.

Kiel Redaktoron de «Kataluna Esperantisto» oni elektis S-ron. Jaume Grau, kiun helpos federacianoj S-roj. Artur Domènech, S. Alberich Jofrè kaj Romà Guardiet.

Pri tiu unua kunsido la komitatanoj konservas profundan, kuraĝigan impreson naskitan de l' fervora oferemo montrita de ĉiuj.

Estas plej kompreneble ke nia Federacio atingos sian antaŭan postenon, nur kiam ĝi povos aperigi sian organon regule kaj per ĝi ligi la rilatojn de ĉiuj samideanoj en Katalunujo, kie malgraŭ la grandaj perdoj kaŭzitaj de la militperiodo nia afero kalkulas multajn kaj valorajn adeptojn.

Por efektivi tiun nian plej grandan deziron ni decidis tuj entrepreni la vojon montritan de la ĝenerala kunsido; havigi al la kaso de K. E. F. kapitaleton, kiu sendanĝerigos la aperadon de «Kataluna Esperantisto» kaj malfermos al ni vastan kampon por frukta laborado.

Ke la alvoko estis aŭskultata, tion montras la sekvanta listo de mondonacintoj:

KAPITALO DE KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

UNUA LISTO

Joan Gili Norta	Ptoj.	100 —
Enric Adam Tous	»	25 —
J. Bremón Masgrau	»	100 —
Estanislau Pellicer	»	25 —
Delfi Dalmau	»	25 —
C. B.	»	25 —
Pere Navas.	»	10 —
J. M. Segura	»	5 —
Pere Lliteras	»	5 —
Josep Quatrecases	»	25 —
Enric Aguadé	»	20 —
Pastro Josep Casanovas.	»	10 —
Pastro Josep Planas	»	5 —
Josep Guixà	»	5 —
Grupo «Barcelona Stelo»	»	45 —
Artur Torné	»	25 —
Gustau Galceràn	»	25 —
Marià Solà	»	20 —

Sumo jam enkasita Ptoj. 500 —

Kun la certeco ke nia organo ne povos malaperi, ni tuj eldonis la manifeston kiun konas ĉiu federaciano, kaj jen de lokoj, kie laŭŝajne nia afero estis mortinta, venas novaj aliĝoj kaj kuraĝigaj leteroj de batalpretaj samcelanoj.

* * *

Tuj kiam ni sciigis pri la propono de Japanujo en la Ligo de Nacioj, enkonduki Esperanton kiel oficialan lingvon de tiu organizaĵo, ni sendis la jenajn telegramojn:

«Delegito Japanujo — Ligo Nacioj — Genève. — K. E. F. vin gratulas dezirante atingi triumfon propono alpreni Esperanton. Prezidanto, Gili-norta».

«Prezidanto Ligo Nacioj — Genève. — K. E. F. aliĝas dezirante triumfon propono Japanujo alprenante Esperanton lingvon tiu Ligo. Prez. G.»

«Delegito Hispanujo Ligo Nacioj — Genève. — K. E. F. rekomendas akceptu proponon Japanujo favoran alpreno Esperanto lingvo Ligo. Prez. G.»

«Universala Esperanto — Asocio, Genève. — K. E. F. esperas vi helpas delegiton Japanujo, Ligo Nacioj, triumfigi proponon favoran Esperanto. Prez. G.»

«Prezidanto Konsilantaro Ministroj, Madrid. — K. E. F. esperas ke Hispanujo akceptos proponon delegito Japanujo pri enkonduko lingvo internacia Esperanto kiel oficiala Ligo Nacioj. Prez. G.»

Bedaŭrinde, du tagojn poste la gazetaro neis la verecon de la telegramo, kiun ĝi publikigis antaŭe, kaj niaj telegramoj atingis la adresatojn ne sen veko de intereso kaj atentigo, ke nia lingvo havas ĉie partianojn enkonduki ĝin kiel oficialan en la Ligon.

* * *

Kun danko ni devas konstati ke la fama kaj ekskluzive kultura societo «Ateneu Enciclopèdic Popular», en kies interno disvolviĝas la Grupo Esperantista «Semo», malavare proponis al ni sian sidejon kaj ke ni akceptis kun ĝojo kaj plezuro tiel karan proponon.

* * *

Unu el niaj unuaj laboroj estis ankaŭ legitimigi nian Federacion, kiu lastatempe funkciadis eksterleĝe, kaj enskribigi nian novan sidejon, Carme, 30, Barcelona.

S. ALBERICH JOFRÈ, SEKRETARIO

ENLANDA MOVADO

Ni petas la Grupojn bonvolu sendi al ni raportetojn pri interesaj aferoj, kiujn ni publikigos kun plezuro sur paĝoj de Kataluna Esperantisto.

—Celante la rapidan vekigon de ĉiuj samideanoj en la tuta Katalunujo, ni entreprenis diversajn vizitojn al katalunaj urboj kaj vilaĝoj kaj ili atingis la plej grandan sukceson, dank' al la afableco de la vizititaj samideanoj kaj al la entuziasma laboremo de la vizitantoj. Dum la lastaj monatoj Novembro kaj Decembro okazis vizitoj al Sabadell, Reus, Terrassa, Vendrell, Mataró, Molins de Rei, Ripollet kaj Girona.

La vizitantoj estis S-roj. Gili, Grau, Domènech, Mendiri, Pellicer, Pruna, Alberich, k. a., kiuj samtempe aranĝis kelkajn aferojn rilatantajn la bonan funkciadon de nia Federacio. Rezultatojn de tiaj vizitoj oni vidos post ne longe.

EKSTERLANDA MOVADO



ESPERANTO ĉie triumfas kaj ĝia triumfo bruege resonas eĉ en la plej altaj ŝtataj rondoj kaj kleraj sferoj en ĉiuj landoj. Ĉio antaŭdiras proksiman definitivan venkon. Tial ni klopodos por ke tiu ĉi fako de K. E. estu unu el la plej interesaj por niaj legantoj, transdonante al ili ĉiujn plej ĵusajn interesindaĵojn okazintajn eksterlande, rilatantajn la triumfan antaŭeniradon de nia lingvo.

Tamen en tiu ĉi numero la legantoj sendube rimarkos mankon de freŝeco kaj eĉ malmultenombrecon en la sciigoj per kiuj ni inaŭguras tiun ĉi fakon; sed ili devas indulgi nin konsiderante ke, tial ke nia reapero ne estas antaŭanoncita eksterlande, al nia redakciejo ne alvenis ankoraŭ la alilandaj gazetoj el kiuj ni estas elĉerpontaj la disvastigotajn novaĵojn.

Ni danke ricevos mallongajn publikindajn raportetojn pri la agado de esperantaj grupoj kaj organizaĵoj en eksterlando kaj plezure ni akceptos intersanĝon kun la tutmonda esperanta gazetaro.

En Bruselo, ĉefurbo de Belgujo, okazis la 5 - 20 sept. Universala Kongreso de la Tutmonda Unuiĝo de Internaciaj Asocioj, en kiu estis reprezentataj 112 asocioj apartenantaj al ĉiuj landoj de la mondo. En ĝi plene venkis Esperanto kontraŭ ĉiuj aliaj lingvoj proponitaj kiel helplingvoj por la estontaj kongresoj, ĉar la kongresanoj, eĉ la reprezentantoj de Ido kaj Esperantido, voĉdonis unuanime por Esperanto.

—En Bologna, la 3 - 5 oktobro, plensukcesis la Kvina Kongreso de Italaj Esperantistoj. Kelkaj ministroj kaj episkopoj, per leteroj kaj telegramoj, esprimis siajn bondezirojn pri la esperanta ideo. Tre interesaj kaj fruktopromesaj estis la diskutoj pri la prezentitaj temoj kaj fine oni decidis ke la venonta kongreso okazu en Trento, tuj post la internacia en Praha.

—La Ministro de Instruo de Heslando (sudokcident-germana ŝtato Hessen) donis oficialan dekreton pri instruado de Esperanto en la Heslandaj lernejoj, per kiu li sin montras kiel fervora esperantisto. Tiu dekreto estas vere trafa pledo por nia celado, kiu ebenigas la vojon ne nur al esperantistoj en Hessen sed ankaŭ al tiuj de la aliaj landoj. Ni bedaŭras ke la manko de spaco malpermesas al ni publikigi tian belegan dokumenton.

—En Anglujo la esperanta movado bone progresas kaj ni sciigis pri multenombraj sukcesintaj kursoj en diversaj urboj. Rimarkinda fakto estas ke ĉe la komenco de tiu ĉi jaro oni komencis en taglernejo de Liverpool, kiel eksperimento, esperantan kurson tiel kontentigan ke la tiea Edukada Aŭtoritato sin sentis devigata ordoni ke la kurso estu pligrandigota dum la venonta vintra semestro.

—La Bohema Instru-Ministro dekretis, laŭ peto de niaj ĉeĥoslovakaj samideanoj, permesante instruadon de Esperanto, kiel fakultativa fako, en ĉiuj lernejoj, kie la instruistoj tion petos.

—Jen grava triumfo de Esperanto. En Breslau (ĉefurbo de Silezio, ĉirkaŭ 528.000 loĝantoj kaj 200 lernejoj) estas decidite de la lerneja konsilantaro enkonduki la instruadon de Esperanto en ĉiuj urbaj lernejoj.

—En Japanujo la afero esperanta tute bone sukcesas kaj la entuziasmo de la esperantistoj estas rimarkinda. VII.^a Kongreso de Japanaj Esperantistoj estas baldaŭ okazonta.

—En Francujo ankaŭ vekigas entuziasmo por la lernado de Esperanto. La francaj samideanoj vige propagandas kaj estas esperinde ke ilia propagando baldaŭ interesos ĉiujn iliajn sampa-trujanojn.

—Malgraŭ la malfavoraj cirkonstancoj nune travivataj de la hungaraj samideanoj, la propagando en Hungarujo bone sukcesas, kaj fruktoj de tiu propagando estas malfermo de kurso por policianoj en Budapeŝto, kiun ĉeestas la pliceŝtro kun siaj subuloj kaj fondiĝo de novaj grupoj, filioj de la Hungara Laborista Societo. La Budapeŝtaj skoltaj preparas starigon de presoficejo kaj internacia informejo por skoltaj aferoj.




Bibliografio

KATALUNA ESPERANTISTO malfermas ĉi tiun fakon en siaj paĝoj kun la peto al ĉiuj verkistoj kaj eldonistoj de esperantaj verkoj, bonvolu sendi al ni siajn librojn, por ke ni povu recenzi ilin kaj sciigi niajn legantojn pri ilia apero.


En ĝi ni sincere kaj senpartie kritikos la literaturan kaj lingvistikan meriton de tiuj verkoj el kiuj ni estos ricevintaj almenaŭ du ekzemplerojn.

Ni atentigas niajn legantojn pri la grava influo por triumfo de nia kara lingvo, entenata de la ĉiam plie kreskanta aperado de esperantaj verkoj kaj pri la perfektigo atingota en la kono de Esperanto, pere de la atenta kaj konstanta legado de bonaj zorge elektitaj literaturaĵoj.

KATONO



En la venonta numero aperos kelkaj literaturaĵoj kaj artikolo de S-ro Mariàn Solà, «Gastigo de Aŭstraj Infanoj», kiuj certe igos la enhavon pli interesa kaj alloga. Ni ne povis presi ilin en la nuna numero pro manko de spaco; por eviti tion, ni klopodos presi la tutan tekston per pli malgrandaj literoj.



Presejo J. Vinyals, Plaça Constitució, 6 : SARRIÀ

Por la bona arango de niaj aferoj,

NI DEZIRAS:

Interŝanĝi KATALUNA ESPERANTISTO kun la ceteraj esperantaj gazetoj.

Ricevi du ekzemplerojn de la novaj esperantaj verkoj por ilia recenzo.

Ĉiuspecajn interesajn informojn pri la disvastigo de Esperanto kaj graveco de la movado.

Mallongajn raportojn pri la agado de la enlandaj esperantaj grupoj kaj societoj.

Ĉefe ni bezonas Redakciajn kaj Administraciajn korespondantojn en urboj kaj vilaĝoj de Katalunujo.

Montriĝu la helpemaj samideanoj !

DEVO DE BONA SAMIDEANO ESTAS SUBTENI LA

ESPERANTAJN ORGANIZAĴOJN!

ALIĜU AL LA

“KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO”!

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

DUA EPOKO - JARO 1^a : FEBRUARO 1921

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

OFICIALA ORGANO DE "KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO"

JARKOTIZO: 5 PESETOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: CARMÉ, 30 - BARCELONA

REDAKTOROJ

JAUME GRAU, ĈEF-REDAKTORO

S. ALBERICH JOFRÉ

ARTUR DOMÈNECH

ROMÀ GUARDIET

ĈIUJN VENDREDOJN, JE LA 10^a VESPERE, OKAZAS REDAKCIA KUNVENO.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administracio :
Carme, 30 : BARCELONA

Nia devizo: *Maro estas gutaro*

Sukceso

Ni ne nin vantos parolante pri sukceso. Nur ni ĝoje konstatos ke la reapero de KATALUNA ESPERANTISTO, sekvo de la vasta reorganizado de Kataluna Esperantista Federacio, vekis simpatiojn kaj entuziasmon ĉe multaj samideanoj enlandaj kaj eksterlandaj. Certe la nombro da aliĝintoj estas pli grava ol ni pensis kaj promeso pri helpo venis al ni de ĉiuj flankoj.

Tio montras kiel prava estis nia opinio ke por la revekiĝo de la enlanda movado sufiĉis komence la kuraĝo de fervoraj entreprenantoj.

Oni klare vidas ke tiu celo estas jam parte atingita kaj ke ni marŝas rapide sur la vojo al plena revigliĝo.

Nun estas necese por la tuta sukceso de tiu kuraĝa tasko, ke ĉiuj samideanoj forigu ian dubon aŭ malkonfidon pri la plena efektivigo de niaj deziroj kaj pretiĝu al tuja helpo varme kaj entuziasme.

Niaflanke restas plenumitaj ĉiuj promesoj kaj de la samideanoj dependas nun la sukceso; ili havos la plej bonan rimedon por ĝin akceli kaj pligrandigi, ne prokrastante la pagon de la Federacia kotizaĵo. La laboro farita estas promeso kaj garantio de la laboro farota.

Gratulojn ni ricevas por la reapero de K. E. kaj tio nin kuraĝigas al la realigo de niaj revoj; sed ni devas diri ke tiujn gratulojn meritas, antaŭ ol ni, la eminentaj pioniroj zorgintaj antaŭe pri nia kara gazeto, de kiuj ni klopodos imiti la trafan lertecon kaj samideanan fervoron. — J. G.

Gastigo de Austraj infanoj



IAL ke dum tre longa tempo la presorgano de nia K. E. F. ne povis aperi, sendube multaj el niaj legantoj ne estas plene kaj ĝuste informitaj pri grava kaj konvinkiga apliko de Esperanto kiu, de la flanko de kelkaj sindonaj samideanoj enlandaj, estas entreprenita kaj parte jam kun sukceso efektivigita.

Pri tiu afero, de tempo al tempo, oni povis legi citaĵojn en la Barcelonaj ĵurnaloj, citaĵojn akompanatajn kelkafoje de bonvolaj laŭdoj; pli malofte de kritikoj kaj grumbloj. Ni aludas la alvenon de aŭstraj infanoj (el Stirio) kaj uŭujaran restadon en nia lando, bonfara verko kiun la hispanaj esperantistoj serioze ekprenis sur siajn ŝultrojn. En unu el la lastaj aperintaj numeroj de la «Bulteno de la K. E. F.» oni povis legi alvokon, cetere senditan ankaŭ al ĉiuj enlandaj esperantaj grupoj; tiu alvoko kiun subskribis la «Porinfana Helpkomitato» en Graz enhavis elokventan kaj kortuŝan pledon por helpi la mizeron de la orfaj kaj malriĉaj infanoj, rektaj, kvankam senkulpaj, viktimoj de la malbonoj el kiuj konsistas ĉiam la posttrenaĵo de milito. Tiu alvoko esperante redaktita, subskribita sole de aŭstraj samideanoj, estis, kiel ĉiu porhelpa pledo, tuj aŭskultita de niaj samideanoj; kaj tiel akorde kun ili formiĝis en Hispanujo Centra Komitato por helpado al aŭstraj infanoj, kiu sidis en Zaragoza, kaj kiu konsistis el ĉiuj enurbaj aŭtoritatoj preziditaj de tiu bonega samideano kaj bonkora viro, de ĉiuj katalunaj esperantistoj konata kiel afabla amiko, Sro. Emilio Gastón; veron ni diras kiam ni skribas ke al li persone oni ŝuldas ne malgravan parton de la efektivigo de tiu bonfara agado; krom tio en diversaj urboj kreiĝis ankaŭ lokaj komitatoj kiuj klopodis en siaj aranĝoj por la gastigo de la veturontaj infanoj; tiuj komitatoj estis kreitaj en Barcelono (S-ro. Serrat, prez.), Vic (S-ro. Comella), Terrassa (S-ro. Alavedra), Sabadell (S-ro. Uriach), Girona (Pastro Casanovas), Valencia, Gijón, kaj en aliaj urboj kiujn ni ne memoras en tiu ĉi momento.

La laboro kaj la malfacilaĵoj por la transporto de cirkaŭ 500 ĝeinfanoj kaj por ilia gastigado en nia lando estis tre komplika kaj certe tro longa; grava sukceso estis ke la organizantoj povis atingi de la ŝipfirmo Tayà ke tiu transportos senpage la infanojn de la haveno Genovo ĝis Barcelono.

Kiam ĉiuj preparoj estis jam finitaj oni zorgis jam pri la unua sendo kiu konsistis el 25 ĝeinfanoj, akompanataj de Sino. Hackl kaj S-ro. Bartel, sekretario de la Komitato en Graz; ili enŝipiĝis en Genovo en la lastaj tagoj de Septembro 1920.^a kaj alvenis post nelonge en Barcelono. Simpla kaj solena, vere kortuŝa estis tiu alveno; sur la kajo atendis reprezentantoj de la Barcelonaj aŭtoritatoj, membroj de la Centra Komitato kaj multaj samideanoj, kiuj malgraŭ la necerteco de la elŝipiĝo avidis saluti la malfeliĉajn infanojn, en la unua momento ektuŝi la hispanan landon. Kiam la ŝipo alprok-

simiĝis, esperantaj flagoj vidiĝis ondigantaj kaj ĉe albordigo la esperanta himno eksonis sur la ŝipo kaj kuniĝis la kanto kun tiu emocia de la samideanoj atendantaj; salutoj, aplaŭdoj, kortuŝaj, bonakceptaj vortoj sekvis unu la alian kaj multaj konservos el tiuj momentoj la nostalgion de emocia guo. El tiu unua ekspedicio kelkaj infanoj restis en Barcelono, la plej multaj veturis al Terrassa kie ili estis ankaŭ tiel bonkore kaj afable atenditaj, kaj ĝis hodiaŭ kaj por longa tempo ankoraŭ bonfare kaj familie gastigitaj.

Post ok tagoj alvenis Barcelonon nova ekspedicio kun ankaŭ 25 geinfanoj, kiuj estis senditaj al Zaragoza, kie oni gastigos ilin; en la vojaĝo ili estis bonvene salutataj de siaj memlandaj kunuloj en Sabadell kaj en Terrassa; en Manresa, kie la vagonaro haltas pli longan tempon, la urbestro kaj altrangaj personoj regalis la geinfanojn per agrabla kaj abunda vespermanĝo kaj la morgaŭon matene ili atingis la urbon de sia restado, kie oni de tiom longe ilin atendis senpacience.

Post dek-kvin tagoj alveturis tria ekspedicio, el kiuj unu parto veturis Valencion kaj alia al Terrassa; kaj la 19.^{an} de Novembro, kvara ekspedicio al kiu sendube, kiam tiu ĉi raporto aperos, estos sekvintaj la ceteraj kaj la tuta nombro de gastigitaj infanoj estos jam transveturigita en nian landon.

Multaj el tiuj infanoj konas iom da Esperanto, kaj eĉ kelkaj parolas ĝin sufiĉe flue kaj komprenas tre bone ĉion kion oni diras al ili; domaĝe ke la tempo por pretigado estis tro rapida kaj oni ne povis atingi de ĉiuj pli kompletan konon de nia internacia lingvo.

Ni ne plenumus nian devon se ni ne esprimus ĉi tie nian varman dankon al la organizantoj de tiu bonfara agado, kiu tiel honorigas ilin; ili montriĝis certe bonegaj esperantistoj; ili ne estas el tiuj kiuj teorie disludas la belecon de Esperanto, kaj papage kantas laŭdojn al ĝi, sed el tiuj kiuj praktike kaj pli taŭge laboras por ĝia disvastigo.

Kiam tiuj malfeliĉaj infanoj, en niaj enlandaj hejmoj gastigitaj, revenos al sia lando, ili certe rememoros ke al la homama sento de la esperantistoj ili precipe ŝuldas sian nunan bonstaton; kaj ili montriĝos dankaj kaj indaj de la ricevita favoro se ili tiel pensos kaj diros al siaj kunlandanoj.

Ne mankis, kompreneble, en tiu ĉi agado la nebonvola komentario de tiuj personoj kiuj en la elmontro de sia amo al la nacio, kaŝas plej ofte sian propran egoismon kaj sian nulan bonfaremon kaj ili kuraĝis plendi ke la esperantistoj zorgas pri fremdaj infanoj: Kvazaŭ ni devus forgesi ke ĉiuj esperantistoj, al kiu ajn lando ili apartenas, devas senti sin fratoj kaj kvazaŭ malatenti ke en ĉiu suferanto ni devas vidi nian kunpatrujanon. Feliĉe, tiu estis la sento de tre malmulta nombro da personoj, kaj la plejmulto volis montri ke ili konsentas kun ni kaj samtempe esprimi sian simpatian al tiuj karaj infanoj, akceptante ilin kun granda ĝojo kaj multnombro sin proponante por ilia gastigo.

Al amiko

Sub ombro freŝa de maljuna arbo,
sidante tere sur l' abunda herbo,
tie mi volus apud mi vin vidi,
amiko mia.

Tie, mizerojn mondajn forgesante
kiuj lacigas kaj tro frue lasas
blanka la kapon, pri l' nuntempo gaja
ni nur parolus;

pri, ĉu la nuboj super mont' starantaj
kaj trairantaj en ĉielo blua,
alportas pluvon al la ter' amika
aŭ sole varmon;

pri la trunkaroj de vinberoj nigraj
kiujn rigardas kamparan', pensante
kiam li premos ilin per piedoj
purpurigintaj;

pri hund' fidela, apud ni kuŝanta,
pri l' vent' movanta kanojn malkvietajn...
Poste tra la vojet' veni ni vidus
belan knabinon

kun kruĉo plena je kristala akvo;
kaj, je la peto nia por ĝin trinki,
ruĝkoloritaj ŝiaj dikaj vangoj,
«Trinku» ŝi dirus.

JOAN MARAGALL

El kataluna lingvo tradukis

JAUME GRAU

La Barcelona brokantejo



ASTIĜAS la Barcelona brokantejo tra la ĉirkaŭaĵoj de la Vendejo de Sankta Antonio, lokitaj la nefiksaj barakoj ĉe la angulo de grandaj muroj el fero; ĝi daŭras tra la ampleksaj kaj kotaj trotuaroj de la strato Urgell, montritaj la vendotaj komercaĵoj sur la malseka tero, kaj formas ĉe la angulo de la Ronds-tratoj rondon de kompaktaĵ kaj pentrindaj barakoj, sub la arboj de branĉoj maldikaj kaj plenaj de terkoloraj buloj, kiel paroĵ da birdoj tremantaj pro la frumatena malvarmo.

La dimanĉojn matene, kiam alvenas la tramoj plenaj de laboristoj irantaj al la urbo por fari siajn aĉetojn kaj amuziĝi; kiam la granda vendejo forĵetas el siaj grandaj buŝoj la servistinojn, kun la korboj tutplenaj kvazaŭ kornoj de la abundeco; kiam la stratoj Carme kaj Hospital estas du riveroj verŝantaj la popolamason en la foiron, estas belega spektaklo tiu abelejo sub la fajro de brilega suno: la iroj kaj revenoj kaj haltoj antaŭ la improvizitaj butikoj de ruinaĵoj; kaj prezentas la plej strangan kontraston tiu popolamaso festotage vestita, inter tiuj malriĉaĵoj kaj restaĵoj ĵetitaj teren per la plej hazarda nekohereco.

Neniel similas tiu ĉi foiro la festaĵn foirojn. En tiuj, kiu iras aĉeti iras tien por plenumi deziron: en tiu ĉi estas la mizero kiu vokas la malfeliĉajn. Tien oni iras por nove sin ornami: ĉi tien por sin vesti de malnovaĵoj. Tien oni iras kun la deziro ornamo la korpon: ĉi tien kun la urĝa bezono kaŝi ĝin je la malagraba vetero. En tiuj oni vendas iluziojn, kaj en ĉi tiu malrevaĵojn. La vendistoj ne laŭdas la artiklojn per krioj kiel en tiuj, kie ili devas batali kontraŭ la kaprico: ĉi tie ili antaŭscias ke estas la mizero kiu helpas la vendadon, kaj ili atendas kuŝantaj kaj dormemaj ke la malfeliĉo alportu aĉetantojn al ili.

Ne estas necese demandi kion ili serĉas kaj deziras alproksimiĝinte al la barako. Nudpiedaĵ ili prezentigas se ili bezonas ŝuojn; tremantaj de malvarmo se ili bezonas surtuton; sen io sur la kapo se ili bezonas ĉapon; kaj tie, el tio multa kaj malbona kion la mizero amasigas, ili ne elektas tion kio pli ornamas, sed kio pli varmigas, kaj ili trovas, en tiu mortintejo de objektoj, malriĉajn vestaĵojn aranĝitajn kaj rebonigitajn por ne morti de malvarmo kaj daŭrigi la vivon.

Tien fine venas tio kion ĵetis la mondo pro malsato aŭ enuo, kion donis la malsato garantio ĉe la pruntedonistoj de mono, kion elverŝis la lukso kaj malsatis la troa riĉeco. Ĉiuj kompatindaj restaĵoj kiujn la morto lasis sur la tero, ĉiuj rememoraĵoj forlasitaj de la tempo per la malvarmo de tuta forgeso, tien alvenas fine; tie ili kuŝas sen varmo sur la trotuaroj, dum la suno kun bela senkonscio lumigas ilin, igante tiun mizeran scenon brila kolo-

rigita scenejo, kie la ĉiela lumo, la vibrado de la atmosfero kaj la matena venteto invitas la homon al la vivo, al la forgeso de la doloroj kaj al la ĝuo de la bonaĵoj de la tero.

Tie, meze de malnovaĵoj, ofte oni trovas ion antikvan; kaj ĉiuj el ni kiuj sentas la amon por la restaĵoj de la estinteco; kiuj aŭskultas atente la parolon de la rememoro kun obstina fido; kiuj flaras en tiuj mizeraj amasoj ion rakontantan al ni altempajn sentojn, ĉiom da emociaj historioj ni povis diveni ĉe tiuj aroj da ruinaĵoj!

Ĉio rememorigas tie ion estintan kaj neniigitan; ĉiu ero konservas en sia ŝvitplena surfaco la premon de amika mano, la sigelon de iu iluzio aŭ la ungobaton de la elreviĝo; la froto de la vivo tremas en tiuj mizeraj restaĵoj, ankoraŭ varmetaj kaj korbataj; en muta, malgaja kvieto ili gardas sekretojn kies atestantoj ili estis; kaj ili aspektas hontemaj sin vidi senvestaj kaj mizeraj, antaŭ la ridetanta ĉielo kaj sub la okuloj de tiu mondo da scivolemuloj, kiuj ilin rigardadas avide.

SANTIAGO RUSIÑOL

El kataluna lingvo tradukis

RAMÓN PRADA



Arpeĝo

En la fundo de l' mar' naskiĝis perlo,
 Sur alta rok' la blua violet',
 En la nuboj el roso la guteto,
 Kaj vi en mia rev'.

Mortis la perl' en imperia krono,
 En bela vaz' velkinta la viol',
 En brilantaj vaporoj la rosguto,
 Kaj mi en via kor'.

EUSEBIO BLASCO

El hispana lingvo tradukis

VICENTE INGLADA

Grava sukceso de K. E. F. en nia II^a Specimena Foiro



ERTE niaj federacianoj kaj niaj legantoj kontentiĝos pro la grava sukceso kiun nia K. E. F. atingis.

En alia parto la Redakcio de K. E. jam anoncas la feliĉan sukceson kaj novan vekigon de nia kara Federacio. Ni jam ricevis kontentigan kvanton da novaj aliĝoj kaj ni esperas baldaŭ ricevi aliajn de tiuj skeptikuloj kiuj ankoraŭ ne enviciĝis. La vizitoj de ni faritaj estas por ni la plej valora elmontro ke nia samideanaro nur dormis kaj ke ĝi nur bezonis la veksinalon por denove laboradi; ni esperas ke la farotaj vizitoj ankaŭ donos al nia Federacio bonajn fruktojn.

Okaze de nia 1.^a Oficiala Specimena Foiro, kelkaj Barcelonaj Grupoj petis al ĝia Organiza Komitato ke nia lingvo estu enalkulata en la lingvoj pere de kiuj ili intencis propagandi la Foiro. Bedaŭrinde kaj eble ĉar la Grupoj ne reprezentis ian komunan nek fortan organizaĵon, ilia peto restis neaŭskultita.

Spite tiu antaŭa neo, mi vizitis en la nomo de K. E. F. la Komitaton kiu nun jam laboras por la organizado de nia II.^a Oficiala Specimena Foiro, baldaŭ okazonta, kaj certe ni atingis gravan venkon.

La citita Komitato plene akceptis Esperanton. Oni eldonos cirkulerojn, anoncetojn, grandajn murafiŝojn kaj ankaŭ, oni korespondos Esperante.

Kaj ne nur ni atingis tion kio per si mem jam estus grava sukceso, ni atingis ke en ĉiu dokumento, letero, k. t. p., kiujn la Komitato de la Foiro alsendos ĉu respondante peton, ĉu proponante helpon, oni enmetos folieton kie estos presitaj la plej citindaj venkoj de Esperanto de la komerca vidpunkto.

Por ke niaj amikoj povu kalkuli la gravecon de la propagando kiun ni faros pere de tiuj folietoj, ni povas diri ke dum la organizado de nia 1.^a Foiro, estis senditaj pli ol 5000 leteroj kaj propagandaj cirkuleroj kaj la organizantoj de la II.^a esperas ke en la nuna tiu nombro plialtiĝos ĝis 10000.

Pri la enhavo de tiuj propagandiloj kaj elspezoj de la presado zorgos la K. E. F.; kaj pro la rekomendo farita de la foira Komitato ili estas kastillingve verkitaj, ĉar precipe la propagando estas farata inter la hispanoj kaj hispanlingvanoj el Ameriko, tial ke la foiro estas nur nacia elmonro de niaj produktaĵoj.

Se kiam tiu ĉi numero de K. E. aperos la presisto jam finis la presadon de tiuj folietoj, ni kunsendos ekzempleron al ĉiuj legantoj por ke ili mem konstatu la gravecon de tia propagando kaj vidu kiel vere ni diris ke ni estas atingintaj gravan sukceson.

JOAN GILI NORTA



ENLANDA MOVADO

Ni denove kaj tre insiste petas la Grupojn bonvolu sendi al ni raporteojn pri interesaj aferoj kiujn ni publikigos sur paĝoj de Kataluna Esperantisto.

GIRONA.—La 12.^{an} de Decembro vizitis tiun urbon kelkaj anoj de la Direkta Komitato de K. E. F., por okazigi propagandan feston kaj proponi al la Grupo «Ĝirona Espero» la organizon de la venonta IX.^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio.

Matene ili estis akompanataj de samideanoj Pastro Casanovas, Doménech kaj Peris, kiuj montris al ili la mirindaĵn antikvaĵojn de la urbo. Ankaŭ estis vizitataj kelkaj Societoj kaj festosalonoj.

Je la 4.^a posttagmeze, en la sidejo de la Grupo, ĉe la Komerca Ĉambro, okazis la propaganda festo ĉeestata de multaj personoj, inter ili kelkaj urbaj eminentuloj.

Post afabla prezento farita de Pastro Casanovas, Prezidanto de la Grupo, paroladis kun entuziasmo S-roj. Grau kaj Gili rilate la nunan vekigon de nia kara movado en la tuta mondo kaj ĉefe en nia lando, kie ĝi estis jam atinginta specialan gravecon.

Estis proponata al la aŭskultantaro la okazigo en Girona de la venonta Kataluna kongreso kaj varma aplaudado kaj aprob-signo respondis tiun proponon.

Parolis fine Pastro Casanovas dirante ke la Grupo studos ĝin detale kaj komunikos oportune la tute eble favoran decidon.

Amaso da urbaj samideanoj akompanis la vizitintojn al la stacidomo, kie oni sin adiaŭis aklamante Esperanton kaj la Ĝeronan Kongreson.

Dum la kompostado de la nuna numero alvenis la sciigo ke la propono okazigi en Girona la venontan Kongreson estas entuziasme akceptata. Okazos nova vizito por detale pritrakti la aferon kaj en la venonta monato ni sciigos niajn legantojn pri nia IX.^a Kongreso.

TERRASSA.—En la Grupo «Lumon», la nokton 24.^{an} de Decembro, okazis intima kaj tre ĉarma festo de la Kristnaskarbo, kiu estis dediĉata al la aŭstraj geinfanoj gastigataj en la urbo kaj honorigata per la ĉeesto de la urbestro, kiu venis saluti ilin. Agrabligis la feston kantado kaj legado de poeziaĵoj kaj oni regalis la geinfanojn diversmaniere.

MANRESA.—Antaŭ nelonge faris propagandan paroladon en tiu urbo nia klara samideano S-ro. Albagés, el kiu rezultis arango de esperanta kurso gvidita de li mem, kun ĉeesto de multaj novaj samideanoj. Ili rapide fervoriĝis kaj baldaŭ estos fondita nova Grupo, per kiu certe Esperanto enradikiĝos en la Manresa urbo.

BARCELONA.—La grava kaj tre konata Barcelona societo «Paco kaj Amo» sciigis oficiale sian aliĝon al Kataluna Esperantista Federacio. Per tio ĝi oferas sian efikan helpon al la Federacia organizaĵo, kiu multe ŝatas kaj estimas la fervoron kaj agemon de la nova aliĝinta societo.

—En ĝia sidejo, la 16.^{an} de Januaro, S-ro. Delfi Dalmau esperante paroladis pri «la plej efika metodo lerni kaj lernigi Esperanton». Superflue laŭdi la stilon kaj belecon de parolado de nia amiko Dalmau kiu kun granda sukceso evidentigis trafilan metodon por instrui nian lingvon.

—En «Círculo de la Mujer del Porvenir», en kies interno Pa-

co kaj Amo malfermis kurson, S-ro. Dálmau ankaŭ paroladis pri nia movado kaj ĝiaj rilatoj kun feminismo.

—La Grupo «Barcelona Stelo» aranĝis por la 27.^{an} de Januaro ekzamenon pri Esperanto, kiun partoprenis la ĝelernantoj de la Grupo, kun vere sukcesa rezultato.

La 7.^{an} Februaro komenciĝos novaj unuagrada kaj duagrada kursoj de Esperanto.

EKSTERLANDA MOVADO

En nia unua numero ni sciigis niajn legantojn pri ia propono, de Japanujo al la Ligo de Nacioj, favora al Esperanto. La telegramon, el kiu ni elĉerpis la sensacian novaĵon, du tagojn poste, alia telegramo diris malvera. Tamen novajn gravajn okazintaĵojn ni devas raporti pri tiu ĉi sama afero.

NIA LINGVO ESTIS OFICIALE PRIPAROLATA ĉe la unua kunsido de la Ligo de Nacioj. Dekunu delegitoj prezentis la jenan tekston de rezolucio, kiu estis presigita kiel dokumento nro. 194 de la kunsido:

«La Ligo de Nacioj, konstatante la lingvajn malfacilaĵojn, kiuj malhelpas rektajn rilatojn inter la popoloj kaj la urĝan necescon forigi tiun baron por helpi al bona komprenigado inter nacioj,

Sekvas kun intereso la provojn je oficiala instruado de la internacia lingvo Esperanto en la publikaj lernejoj de kelkaj regnoj, anoj de la Ligo de Nacioj,

Esperas ke tiu instruado ĝeneraliĝos en la tuta mondo, por ke ĉiulandaj geknaboj sciu de nun almenaŭ du lingvojn, sian gepatran kaj facilan rimedon por internacia komunikado,

petas la ĝeneralan Sekretariaron, prepari por la venonta kunsido, detalan raporton pri la rezultatoj atingitaj en tiu fako».

Laŭ decido de la kunveno, tiu rezolucio estis pristudata de a komisiono nro. 2 (teknikaj aferoj) kiu, la 18.^{an} Decembro ĉe la lasta ĝenerala kunsido, prezentis tre favoran raporton rekomendante oficialan enketon pri la instruado de Esperanto. Bedaŭrinde pro la forta kontraŭstaro de la franca delegitaro kiu petis por la franca lingvo la internaciecan rajton, oni prokrastis la aferon

Ni tamen esperu ankoraŭ; la afero ne estas finita.

—En Polujo estas rimarkinda la disvastigado de nia ideo. Jen estas konvinkaj sciigoj: en Lodz la esperantistoj preterpasas jam la nombron 5000; en Bromberg-Bydgoszcz preskaŭ ĉiuj urbaj gazetoj skribas ofte pri Esperanto, kio estas vera signo pri la graveco de la Esperanta movado en tiu urbo; en Krakow la Komerca Ĉambro alprenis Esperanton por la eksterlanda korespondado; en Warszawa estas vicministro de la Saneco, nia fervora samideano S-ro. Alfons Wierzbiet; en Siedlce, en Czeslohova kaj en aliaj polaj urboj, sukcesajn kursojn, konferencojn, ĉiuspecajn propagandajn entreprenojn organizas la laboremuloj kun kontentiga rezultato.

La 18.^{an} Novembro, alveturis Varsovion hungara delegacio, en kiu troviĝis prelato Aleksandro Giesswein, malnova esperantisto. Por honori tiun eminentan gaston, estis kunvokita kunveno kiun ĉeestis S-ino. Zamenhof kaj D-ro. Leono Zamenhof kiu faris la akceptparoladon, responditan de la ŝatata gasto per transdono de saluto de la hungaraj samideanoj.

—Nuntempe en Britujo la movado estas ĝenerale tre vigla. Kunvenoj, kursoj, konferencoj, festoj okazis en Bath, Barry, Bedford, Birmingham, Brighton, Colne, Dunfermline, Edinburgh, Glasgow, Hastings, Southport, Leeds, Leith, Letchworth, Liverpool, Manchester, Newcastle, Portsmouth, Sheffield, k. t. p.

—En Ĉeĥoslovakujo nia afero atingas plej altajn suprojn. La ŝtata fervoja direkcio eldonis cirkuleron en Esperanto instigantan la fervojistojn lerni nian lingvon por la okazonta kongreso, kiu esperinde kaŭzos konsiderindan trafikon de fremlandanoj. La tutan aferon gvidas S-ro. Rebiček, fervojkonsilanto. Esperantaj kursoj jam komenciĝis en kelkaj grandaj stacidomoj, nome: Frijdek-Mistek, Prerov, M. Ostrava, Uh. Hradiste, kaj aliaj.

La XIII.^a Kongresa loka komitato en Praha energie kaj vigle laboradas.

—En Germanujo, la straro de la bankoficistoj de Wilhemshaven-Rüstringen rekomendas la eklernon de Esperanto. Multaj kursoj estas organizitaj en ĉiuj landpartoj, interalie en: Ane, Berlin, Braunschweig, Breslau, Deuben, Dobritz, Frankfurt, Hof, Koblenz, Leipzig, Mörs, München, Pforzheim, Radebeul, Stolberg, k. t. p. Fondiĝis novaj grupoj en Burgstädt, Harburg, Koblenz kaj Trebnitz.

XIII^a Universala Kongreso de Esperanto 1921 en Praha-Ĉeĥoslovakujo

Gesamideanoj!

Laŭ la decido de la XIIa en Haag la XIIIa Universala Kongreso de Esperanto okazos en aŭgusto 1921 en Praha.

Ĉeĥoslovakaj geesperantistoj ĝoje salutante tiun ĉi decidon plezurege faros ĉion eblan por la plena sukceso de la manifestacio de Esperanto en la Ĉeĥoslovaka respubliko.

La ĵus konstituiginta loka komitato jam komencis siajn preparajn laborojn, esperante ke ĝi trovos kunhelpon de la tutmonda esperantistaro por povi brile plenumi sian grandan honoran taskon.

Ni petas ĉiujn niajn geamikojn jam de nun fari ĉion necesan, por povi partopreni la XIIIan, kaj instigi la aliajn por kunesti. Disvastigu la konon pri la naturaj belaĵoj de nia venonta kongresurbo Praha kaj Ĉeĥoslovakujo, kie la esperantista movado estas de lonke tiel vigla.

Invitante Vin sincere en la belegan historian ĉefurbon de nia renovigita ŝtato ni esperas ke Vi grandnombre partoprenos la kongreson kaj estos kontentigitaj per nia laboro.

Ĝis la revido en Praha! — *Loka kongresa komitato.*

UNUA KOMUNIKO.

La 29an de septembro 1920 en la komitata kunveno de la Ĉeĥoslovaka Esperanto-Asocio, Esperantista klubo kaj Rondeto de Esperantistinoj oni elektis jenan *lokan porkongresan komitaton*:

Prezidanto: Eiselt, eksgimnaziestro; vicprez.: 1. Kraus, magistrata oficestro; 2. F-ino Šupichová, instruistino; ĝenerala sekretario: Pitlík, komercministeria komisario; sekretarino: F-ino Dlouhá, oficistino de ŝtataj fervojoj; kasisto: Novák, horlogisto. Por la «Verda Stelo» estis elektita Mudr. Bischitzky.

Sekciestroj: 1. Financa: Hromada, oficisto; 2. propaganda: Bouška, urba oficisto; 3. presa: Weiner, redaktoro; 4. loĝiga: F-ino Moudrá, instruistino; 5. por distraĵoj: F-ino Hlaváčová, instruistino; 6. aranga: Lukáš, studento de la universitato. Revizoroj: D-ro Kohout, landa ĉefkonsilanto kaj Vondruška, landa revizoro.

Ĉiun korespondadon kaj aliĝojn oni sendu (por respondo respondkuponon aŭ afrankon en naciaj poŝtmarkoj) al: *Augustin Pitlík, Praha III. — Nerudova ul. 40.*

Ni petas la samideanojn ke, por faciligi nian taskon, ili pagu sian kotizaĵon tuj post la ricevo de la nuna numero.

Ni kredas ke la sola reapero de «Kataluna Esperantisto» konvinkos ĉiujn pri la nova kaj longedaŭra vivo de nia Federacio kaj tial ili ne volos malhelpi ĝin.

En Barcelono ni prezentos la kvitancojn en la hejmo de niaj subtenantoj.

En la ceteraj lokoj zorgos pri tio niaj delegitoj, sed se ni ne sukcesas aranĝi tuj tiun aferon, ni dankos ke ĉiu sendu aparte la kotizon.

Se ĉiuj kunhelpas, la normala funkciado de K. E. F. kaj la regula aperado de K. E. estas jam de nun certigataj.

II^A OFICIALA FOIRO DE SPECIMENOJ BARCELONA



20 - 30 APRILO 1921

La sukceso de la 1.^a Foiro de Specimenoj, kiu okazis en Barcelo-
na la pasintan aŭtunon, aŭguras al la Foiro de Printempo certan pros-
peron tiel rilate al la multenombro da aliĝintaj Firmoj, kiel rilate al la
amaso da aĉetistoj, kiuj en ĝi sin donos rendevuon.

Vin turnu por la vojaĝo al nia Agento : COOK SONS & C.^o

Vin turnu por ĉiu informo al la Foira Oficejo :

PLAZA DE ANTONIO LÓPEZ, 15
APARTADO DE CORREOS, 769
BARCELONA

TELEGRAFA ADRESO : "FERIA - BARCELONA"

TELEGRAFAJ KODOJ :

A. B. C., 5.^a ELDONO - BENTLEY'S
WESTERN UNION - MARCONI INT. CODE

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

DUA EPOKO - JARO 1^a : MARTO 1921

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

OFICIALA ORGANO DE "KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO"

JARKOTIZO: 5 PESETOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: CARME, 30 - BARCELONA

REDAKTOROJ

JAUME GRAU, ĈEF-REDAKTORO

S. ALBERICH JOFRÈ

ARTUR DOMÈNECH

ROMÀ GUARDIET

ĈIUJN VENDREDOJN, JE LA 10^a VESPERE, OKAZAS REDAKCIA KUNVENO.



Nia devizo: *Maro estas guto*

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administracio:

Carme, 30 : BARCELONA

IX^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio

Girona : 15 - 16 - 17 Oktobro 1921.



DRUVO de nia plena revigligo estas la organizado de nia IX^a Kongreso, okazonta en la grava urbo Girona dum la tagoj 15^a, 16^a kaj 17^a de la venonta Oktobro.

Certe ĝi estos la signo ke ni estos reatingintaj la antaŭan vivoplenan epokon; kaj la Ĝeronaj samideanoj certe senlace klopodados por daŭrigi kaj eĉ superi en la nunjara Kongreso la brilecon de la pasintaj.

La nunjara Kongresurbo, pro sia graveco, pro siaj ravantaj historiaj kaj arĥeologiaj vidindaĵoj, pro la ĉarmo de siaj ĉirkaŭaĵoj kaj «Devesa» arbarego, pro la afableco de la enurbanoj kaj ĉefe pro la laboremo kaj fervoro de la tiea gesamideanaro, garantias al nia esperanta solenaĵo sukceson eksterordinaran, kiun pligrandigos amaso da katalunaj samideanoj jam de nun pretigantaj al ĝia ĉeesto.

Tutkoran dankon al la Ĝeronaj geamikoj, kiuj klare konsciis ke la IX^a Kongreso de nia Federacio kronos per hela maniero la intensan kaj revivigan poresperantan agadon kiun ni estas entreprenintaj.

Unueco



DE l' momento kiam la interhoma mortigado ĉesis kaj sur la sangokovritaj kampoj de Mezeŭropo la raŭkaj teruraj pafiloj fariĝis silentaj, nia verda standardo denove potencigante, purigante la mordsaturitan aeron, ekflagris tra la tuta mondo dum nia koro, plene apartenanta al la sankta esperantismo, malfermiĝis al espero kaj ree la estonton ni ekvidis nia.

Hardita, forĝita sur pura amboso, el plej valora ŝtalo ellaborita, nia komuna lingvo kun sukceso travivis la ventegon, kiu bedaŭrinde forprenis el nia rondo neanstataŭeblajn kunbatalantojn, kaj vekante ĉiujn fidelulojn instigis nin al la laboro.

Iom post iom ĉiu posteno akiris defendanton, ĉiu grupo, ĉiu esperantisto revigligis kaj ĝenerale la tuta afero fariĝis grava kiel dum la antaŭmilita periodo, dum kiu konstante novaj adeptoj estis varbataj al niaj vicoj, certe ne multnombraj, tamen atentindaj pro ilia morala kvalito.

Kiel ĉiuj organizaĵoj kun internaciaj celoj, nia Federacio pro la milita skuo ankaŭ suferis la rezultatojn de la tutmonda konfuzo kaj sekve tiel same fariĝis preskaŭ senmova. Sed la intensa klopodado ĉie videbliganta postulis unuecon kaj ni neniom hezitis restarigi la disfalintajn fundamentojn por havi konstruaĵon ĉirkaŭ kiu grupiĝos niaj espero, kiuj poste danke al plena kunlaborado fariĝos realaĵoj, atingeblaj per la forto de nia konvinko kaj obstino de nia senĉesa laborado.

Ke ĉiu samideano venu al ni, ke ĉiu kunbatalanto alportu sian sableron kaj ni estas certaj, ke ni grupigos grandan nombron da esperantistoj, el kies unueco nia movado en Katalunujo eltiros grandan profiton kaj progresos pli ol iam.

Duboj, supozoj aŭ opinioj ke K. E. F. ne iras traŭfan vojon, ke ĝi sin regas per arhaika regularo, malaperu el ni, kaj anstataŭe ni interligu niajn fortojn, ni kuniĝu laŭ federacia sistemo, kiun ni opinias plej taŭga, tamen ni ne atendu restante flanke de la organizaĵo ĝis tiu ĉi per si mem alkonformiĝos al nia privata opinio, sed tuj partoprenu ĝin por veki aktivecon kaj samtempe montru dum la kunagado ŝaŭgojn enkondukindajn kaj vojojn ne iritajn ankoraŭ.

Nia lando estis ĉiam la avangardo de esperantismo en Iberio kaj sekve ni kuraĝas aserti, ke nia nuntempa nombro da federacianoj, certe tre grava jam, tre facile kvinobligus, se nur iom da persona konstanteco en la propagando por absoluta unueco streĉiĝus pli kaj pli kaj antaŭjuĝoj estus forĵetitaj por ĉiam, oferante niajn energiojn por la sankta idealo, kiun la Majstro tiel trafe sciis vibrigi en la fibroj de nia koro.

Tre ampleksa estas la laboro farota kaj kun plezuro ni komencis ĝian plenumon por atingi maksimuman forton. Peza tasko estas tiu de la Direkta Komitato sed ĝi antaŭ ĉio bone zorgu vigligi ĉiun grupon ekzistantan, ĝi al-

portu sian helpon al ĉiu urbeto kaj vilaĝo, ĉar nur kiam la grupoj atingas rimarkindan antaŭeniron kaj libere povas disvolviĝadi la potenco de federacio, sub la sankcio de la aliĝintoj, fariĝas frapa kaj impona por entrepreni seriozajn problemojn, kiujn ne sukcesus gvidi iu aparta senfundamenta grupo de kelkaj personoj kun difinita celo sed sen efektiva valoro.

Ni volas havi ĉiujn ĉirkaŭ ni kaj ni reciproke devas esti apud ĉiuj por ke la baldaŭ okazontaj elmontroj de nia movado en Zaragoza kaj Girona estu brilaj, kuraĝigaj kaj fruktodonaj pruvoj, ke nia fervoreco estas neelĉerpebla.

Ni ne riskos malsukceson se oni ĝuste komprenos nian alvokon, kies esencon oni objektive konsciu kaj pesu larĝanime sen personaj konsideroj, antaŭ kiuj ni metu ĉiam nian edifan senmakulan celon.

S. ALBERICH JOFRÉ.



Dua Diskuta Kunveno de Esperantistoj de Iberiaj Landoj



UN la ĉefa celo starigi Iberian Esperantan Konfederacion, ĝi okazos en Zaragoza, de la 26^a ĝis la 29^a de Majo.

La Direkta Komitato de KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO decidis aliĝi al ĝi kaj rekomendas ankaŭ la individuon aliĝon al la federacianoj.

Estas nenecese diri kian gravan taskon tia Kunveno plenumos, se dum ĝi oni starigas organizaĵon ligantan ĉiujn Federaciojn en la Iberiaj Landoj.

Ni esperas ke la Kataluna federacio povos oferi grandegan forton al tiu celo kaj rekte partoprenos la laboron de la Diskuta Kunveno.

Kredeble estas ke multaj samideanoj ĉeestos ĝin kaj ĝuos la afablecon kaj gastamon de la entuziasmaj Zaragozanoj.

Hispanaj Madrigaloj

(EL GUTIERRE DE CETINA)

Klar-okuloj, serenaj,
kial, se vi, pro dolĉ-rigard' laŭditaj,
min alrigardas, vi — enkoleritaj?
Se ju pli kompatplenaj,
des pli belaj vi estas vid-apere,
ne rigardu kolere,
por ke vi ne ekŝajnu malpli belaj!
Ho, turmentoj kruelaj!
Klar-okuloj, serenaj,
eĉ se tiel, rigardu min almenaŭ!

Tradukis JOSEF GRAU

(EL FELICIANA ENRIQUEZ)

Diris Amor', sidante ĉe la bordo
de rivereto pura, en silento;
«Ne murmuretu, floroj,
pro la sopir' de la volupta vento,
ĉar se vekigos Galateo bela
kun ŝia bril' ĉiela,
post vido de l' koloroj
ne plu vi estos floroj,
nek mi Amoro, se okuloj plendas
Ĵar sagojn tiel dolĉajn ili sendas!

Tradukis MARIAN SOLÀ

VIII^a Internaciaj Floraj Ludoj

Al la esperantistaj verkistoj :

La Komitato de la VIII^a INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ vin salutas kaj invitas partopreni en la jenaj konkursoj.

ORDINARAJ TEMOJ

ORIGINALAJ TEKSTOJ

- I. Originala versaĵo kantanta *Amon*.
- II. Originala *Ama* verko en prozo.

TRADUKITAJ TEKSTOJ

- I. Traduko de la jena versaĵo :

EL MISTERI DE LA PRADA

Extesa vora el riu floreix la prada
sempre jove, frescal i envellutada...

A plè sol jo l'he vista
encesa de clarors, enlluernadora,
i també quan de nits se posa trista
perque la boira tot passant l'esflora.

La prada té un misteri;
només el sap que l'aigua, i perxò hi canta;
sota aquell tou de flors, què pot haver-hi
que tothom se la mira com a santa?

Fins la fada del riu, que en nits serenes
hi acotxa sa nuesa,
tot desfent-se les trenes
li pregunta el secret de sa bellesa.

Pro, eternament callada,
l'herba s'adorm, frescal i envellutada.

JOAN M. GUASCH

II. Traduko de la jena prozaĵo :

L'ESCARMENT

Deixa'm agafar aquell tramvia d'imperial. Estic arborat: necessito aire. Ja ha estat un bon escarment! No m'hi tornaran a pescar!

Feu plers a bèsties! Jo, que em feia tantes il·lusions, quan anava ajuntant els meus quatre sous! — Sortirem de la viu viu, — deia jo a la Quima — i farem les coses en gran. No consentiré que ningú pateixi a vora meu. Els meus amics, els meus coneguts, voldré que hi tinguin part, en la meva ufana, un cop estiguin negociades les terres que ens deixà l'oncle a en Graupera i a mi. Si us plau per força, he hagut de fer vida escanyada; però d'ara endavant tothom veurà que jo tenia el natural d'un príncep.

Bé s'escarrasava, la Quima:

— Lleó, pensa que en aquesta terra tot es genteta. No hi ha ningú amb un cor tan gran com el teu. Només colliràs que desenganys i disgustos. No hi ha cosa tan dolça i tan poc arriscada com és mirar per casa.

I jo... tabalot de mil... Fa quatre dies, com aquell qui diu, que tinc les coses en ordre: les tres quartes parts de mos cabals a casa el banquer, i tota una quarta part en cases de lloguer, per anar tirant i fer llargueses. Encegat pel meu somni de tota la vida, vinga convidar, dos dies la setmana, algun amic a pendre cafè; vinga donar qui sap les coses del parament vell de la saleta per a una tómbola; vinga pagar el tramvia a tots els coneguts; vinga fer un passament de vint duros l'any a la germana vídua de la meva dona, la que cus per altri; vinga regalar una caixa de cigars de contraban al notari, que no ens havia volgut cobrar res perquè som entre-parents.

I... té: avui ens veiem amb el cosí Graupera, amb el qual ens hem partit l'heretatge de l'oncle, per determinar què n'haviem de fer, de la tartana i l'animal que l'oncle tenia per anar a la vinya. El fet que, segons el testament, fos de tots dos, ens entrebancava a l'un i a l'altre, perquè cap dels dos podia disposar-ne a pler; i jo em pensava que ho podriem resoldre ben bé a les bones.

En Graupera ha comprat terres de conreu, de manera que la tartana li pot fer servei: a mi amb prou feines em va bé d'amprar-la per anar algun dia a Sant Medí o a les vores del Besòs, a fer una berenada. El profit que ell pot treure de la tartana (ben clar li he dit) és més de quatre vegades del que n'aconseguiria jo. Li ho he demostrat en blanc i en negre: ell no ha tingut més remei que confessar-ho.

I jo, aleshores, per donar un cop que enlluernés aquella ànima roïna, li he dit:—Doncs bé: encara que tu hauries d'oferir-ne quatre vegades més del que jo n'oferís, d'aquesta cosa que per a mi no és de cap servei i que per a tu és un fòtil de primera necessitat, et faig aquesta proposició: o bé jo et dono tres centes pessetes, i la tartana queda per meva, o bé tu m'en dones només que quatre centes, i queda per teva.

Ah, fillets! En lloc de badar la boca davant la meva magnificència, en Graupera me n'ha dit de totes! M'ha dit roí, m'ha dit gasiu, m'ha dit ranci, m'ha dit estafa.

Però ha estat una bona lliçó; ha estat un escarment. Sí, en bona refè! No m'hi atraparan mai més, a ésser generós! Perquè és allò que diu la Químa: a ésser generós *què s'hi guanya?*

JOSEP CARNER

Inspiron al çiuj por la gloro de nia Literaturo!

Eduard KÜNHL, *prezidanto*.—D-ro. Josep CASANOVAS.—Josep GRAU.—Teo JUNG.—Julio MANGADA.—Estanislau PELLICER, *sekretario*.

Barcelona, Marto 1921.

NOTOJ

I. La aŭtoro de la plej bona originala versaĵo (*originalaj tekstoj I*) ricevos la volumon pri «Albrecht Dürer» eldonitan de D-ro. Nuchter enhavantan 53 bildojn de la famkonata desegnisto. La aŭtoroj de la ceteraj premiitaj verkoj (*originalaj tekstoj II, tradukitaj tekstoj I, II*) ricevos binditan ekzempleron de la verko «Sinjoro Tadeo» pola epopeo de Adam Mickiewicz, majstre tradukita de Antoni Grabowski.

Krome estos donata al ĉiu jaŭreato bela atesta diplomo.

II.—Al la aŭtoro de la plej bona teksto (versaĵo aŭ prozaĵo) el la kvar ordinaraĵ premiitaj verkoj la Komitato aljuĝos la *Naturan Floron* kaj la rajton elekti Reĝinon de la Festo.

III.—La verkoj prezentotaj devas esti verkitaj en Esperanto.

IV.—La Festo de la VIII.^a Floraj Ludoj okazos en Girona dum la IX.^a Kongreso de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO la proksiman Oktobron.

V.—Al la manuskriptoj,—kiuj devas esti ricevitaĵ antaŭ la 15.^a de Aŭgusto 1921 de la Sekretario S-ro. Estanislau Pellicer en la sidejo de la K. E. F. (str. Carme, 30, Barcelona).—oni devas aldoni devizon, kaj sendi en koverto fermita, kiu portos la saman devizon, la nomon kaj adreson de la verkinto.

VI.—Manuskriptoj ne estos resendataj, eĉ se ili alvenis post la datolimo por akcepto de verkoj.

VII.—La membroj de la Juĝontaro partoprenos en neniuj konkurso.

VIII.—La Komitato publikigos la verdikton per KATALUNA ESPERANTISTO kaj per la esperantaj kaj enlandaj gazetoj kiuj bonvolos ĝin represigi.

* * *

En la sekvantaj numeroj de KATALUNA ESPERANTISTO aperados la listo de eksterordinaraj premioj kaj temoj.

Kelkaj opinioj

Tre ofte ni aŭdas inter la samideanaro plendojn pro la agadmaniero de kelkaj esperantaj organizaĵoj aŭ gazetoj. Kaj tro ofte ni rimarkas ke kelkaj esperantistoj ne konas bone kiom da malfacilaĵoj prezentigas ĉe la plej simpla laborado, nek ankaŭ konscias klare pri tio ke amika konsilo kaj konsekvenca helpemo kaj sinofero valoras praktike pli multe ol kritikema, plej ofte nefruktodona agado.

Por havigi al tiuj kiuj sin sentas reformemaj okazon esprimi klare kaj efike kion ili deziras, ni oferas nian gazeton. Sed, kompreneble, la esprimataj ideoj estas ekskluzive propraj de la opiniantoj kaj ilia apero sur paĝoj de K. E. neniel signifas ke ĝia Redakcio estas konforma je ili.

Inter ni



Estas niaj plej varmaj deziroj la dissemado kaj disvastigado de Esperanto, mi opinias ke la ĝisnuna maniero de ĝia propagando ne tute efikas nek tute elmontras la neceson de la lingvo.

Mi kredas ke ni nesufiĉe konsideras ke, krom esperantistoj aŭ intern-ideistoj, ni estas simple personoj uzantaj Esperanton; kaj mi rimarkis ke dum multaj sin dediĉis al literaturaj aferoj, malmultaj esperantistoj posedantaj specialajn konojn pri io necesa al la homa materia vivado okupis sin diri ion pri sia teknikaĵo.

Ni devas instigi ĉiujn al tiucela laborado por ke ni havu verkojn aŭ tradukaĵojn pri ĉia scienco, arto, metio, k. t. p. Eble tiamaniere ni pli facile altiros la skeptikulojn.

Inter ni bone konata estas la internacieca valoro de la lingvo, sed en la ekstero kelkaj personoj simple supozas kaj eĉ certigas ke ĝi nur estas ŝlosilo kiel multaj aliaj ekzistantaj. Oni diros ke tiuj ne konas nian lingvon nek iam sin okupis pri ĝi; sed ni devas preferi konvinki ilin per la apliko de Esperanto al plej praktikaj aferoj. Ni bone scias ke idistaro ankaŭ simile kriegas ke Esperanto ne taŭgas por sciencaj kaj teknikaj aplikoj, kaj persono vivanta ekster nia rondo kaj indiferenta je afero de lingvo internacia, blinde povas tion kredi.

Tial trudiĝas la neceso de agadŝanĝo por interesigi indiferen-

tulojn kaj oni povas uzi kiel bonajn rimedojn por tiu celo, tiujn de niaj samideanaj gazetoj La Progreso, Esperanto, La Esperantisto, Internacia Socia Revuo, k. t. p. el kies paĝoj estis tradukitaj en diversaj lingvoj kelkaj artikoloj frapantaj pro ne esperantista sed ĝenerala intereso, kaj pro tio ili povis esti publikigitaj sur paĝoj de naciaj ĵurnaloj.

Ĉu ne estus pli konvinka kaj multvalora tiu tasko, ol tiu de niaj gazetoj nur literaturaj?

Neniel per la supraj linioj mi intencis diri ke ni devas flanke delasi nian estimatan literaturon, nedisigebla parto de homa vivo, sed ni devas plej vaste laboradi en la esprimita direkto kaj, laŭ mia opinio, ni venkos tiun nigran kaj potencon ombron kontraŭan al ideo de internacia lingvo plene taŭga je ĉio.

JAUME CLARAMUNT



ENLANDA MOVADO

Girona.—En ĝenerala kunveno okazinta la 13^{an} de Januaro, la Grupo «Ĝerona Espero» elektis la jenan Direktan Komitaton: Prezidanto: Pastro Josep Casanovas; Vic-prezidanto: Casà Costal, direktoro de la «Escuela Normal de Maestros»; Kasisto: Josep Ferrer; Kalkulisto: Jesús Macià; Bibliotekistino: Carme Maymí; Sekretario: Ramón Casademont; Vic-sekretario: Francisco Hil; Voĉdonantoj: Francisca Bernades, Teresa Colls, Anita Coll, Gerónimo Boris, Amadeu Peris kaj Conrad Domènech.

Inter aliaj aferoj, estis pristudata la propono okazigi en Girona la IX^{an} Kongreson de K. E. F.; oni decidis akcepti ĝin kaj atendi la intervidiĝon kun komitatanoj de la Federacio por fine prilakti ĉiujn detalojn.

Tia intervidiĝo efektiviĝis la 2^{an} kaj 13^{an} de Februaro kaj en tiu lasta tago, post zorga pristudo de la afero, la Grupo «Ĝerona Espero» aklame akceptis definitive kaj oficiale la gravan proponon.

Kun ĝojo pro la plena interkonsento atingita, oni finis la kunsidon per kantado de la esperanta himno.

Palma de Mallorca.—La «Esperantista Klubo Palma» pretiĝas al denova laborado kaj elektis la jenan novan Direktan Komitaton: Prezidanto: Gabriel Alomar; Vic-prezidanto: Juan Mascarró; Sekretario: Juan Barceló; Vic-sekretario: Montserrat Vich; Kasisto: Francisco Barceló; Bibliotekisto: Antonio Ramis; Voĉdonantoj: Juan Aguiló, Bernardo Rabassa kaj Juan Urgellés.

EKSTERLANDA MOVADO

Britujo.—En London, ĉe «University College», okazis la Naŭa Konferenco de Edukaj Asocioj. La Brita Esperanto-Asocio organizis konferencon pri «Esperanto kiel faktoro pri edukado», kiu estis multnombre ĉeestata de la Konferencanoj.

Germanujo.—En Breslaŭ (Silezio), post enkonduko de la libervola instruo de Esperanto, anoncis sin 1.800 infanoj por lerni la internacian lingvon. En Chemnitz ankaŭ sin anoncis ĉirkaŭ 1.000 infanoj. Novaj kursoj komenciĝis en Neukölln, Horrem, Krefeld kaj Dobritz a: Dresden.

Italujo.—En Milano, dank' al la fervora subteno de la Urbestro, oni malfermis 25 esperantajn kursojn por geknaboj 10-12 jaraj.

Rusujo.—Gazeto «Izvestja» raportas ke oni enregistras ĉiujn esperantistojn loĝantajn en Moskvo. Poste okazos kunveno kaj oni reorganizos la Moskvan Esperantan Societon.

Francujo.—Estas aranĝitaj novaj sukcesplenaj kursoj de nia lingvo en Béziers, Bordeaux, Metz, Versailles, Toulon kaj Ivry-sur-Seine.

Japanujo.—Japanaj samideanoj propagandas Esperanton ĉe la Japana Asocio por la Ligo de Nacioj kaj la Prezidanto de la Asocio, princo Tokugaŭa, tre multe interesiĝis pri Esperanto. En Tokio, ĉe Uaseda Universitato formiĝis nova Grupo kaj okazas kursoj pri nia lingvo. En Ŝizuoka, ĉe la Urba Muzeo, estis aranĝata esperanta Ekspozicio, kiun ĉeestis pli ol 7.000 personaj dum kvin tagoj. En Taihoku (Formosa) estas speciala kurso por instruistoj.

Bulgarujo.—En la Blinda Instituto de Sofio estis malfermata speciala kurso de Esperanto por blinduloj. Ankaŭ oni lernas nian lingvon en Pleven kaj Kneŝa.

—Novaj kursoj estas ankoraŭ en New-York, Canton, Danzig (libera ŝtato), Kispet kaj Miskole (Hungarujo) kaj Siedlec (Polujo).

Nekrologio

Kapitanon Josep Domènech Alberich forrabis el niaj esperantistaj vicoj la senkompatema morto en liaj posedaĵoj ĉe Reus post longedaŭra malsano, la 29^{an} de lasta Novembro.

Dum multaj jaroj li trafe bataladis por la realigo de nia homara idealo. En Ĝerono, kie li pionire agadis altirante al si ĉies simpatio, pro sia afableco, li gvidadis multajn kursojn, rekrutinte kaj esperantiginte multenombrian membraron, ĉe la societoj «Amo kaj Espero» unue kaj «Ĝerona Espero» poste.

Li ĉeestis la internaciajn kongresojn de Anvers, Krakovo, Berlino kaj Parizo, saĝe raportante pri ĉiuj antaŭ siaj kunsocietanoj.

Niaj Ĝeronaj gesamideanoj plende kaj solene adiaŭis lin okaze de lia transloĝiĝo al Reus, per amikeca festeno, kaj nun ni ĉiuj bedaŭron profundan sentas pro lia eliĝo el la vivantoj.

Li pace ripozu.—C.

—Je la lasta Decembro mortis ankaŭ la juna kaj fervora samideano Vicens Caballé. Li estis ano de la grupo «Barcelona Stelo», kie li lernis la lingvon kun eksterordinara rapideco, kaj havis intensan korespondadon kun tutmondaĵ esperantistoj. Pace ripozu la juna mortinto!

Oficiala Parto



OFICIALE ni sciigis la komitaton de Dua Diskuta Kunveno de Esperantistoj de Iberaj Landoj en Zaragoza kaj ties subkomitaton de Barcelona, ke nia Federacio aliĝas al ĝi kaj ke la paĝoj de nia organo estas malfermitaj por ĝia propagando.

La 13^{an} de februaro ni triafoje vizitis la grupon Ĝerona Espero kaj ties laboremaj grupanoj akceptis la organizon de la kongreso nunjara, kiu okazos dum aŭtuno (15-17 de oktobro) pro tio ke printempe ni havos la kunvenon en Zaragoza, al kiu ni devas liveri nian tutan kunhelpon por plej granda sukceso.

Ni ricevis ankoraŭ subtenon de jenaj samideanoj :

KAPITALO DE KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

DUA LISTO

Antaŭa sumo	Ptoj. 500'—
2. ^a donaco de «Barcelona Stelo»	» 5'—
2. ^a » » Pastro J. Planas	» 5'—
S-ro. S. Ortega	» 10'—
» Josep Albagés	» 10'—
» Josep Ventura	» 10'—
Pastro Angel Garriga	» 10'—

Sumo Ptoj. 550'— (Daŭrigota).

Krom tio, Esperanta Societo Paco kaj Amo kaj Grupo Barcelona Stelo, donacis po 20 pesetoj por helpi la presigon de nia plej propagandfolioj, kiujn ni donis al la Oficiala Foiro de Specimenoj de Barcelona.—LA SEKRETARIO S. A. J.

Bibliografio

DEKLARACIO DE LA AKADEMIO (Decembro 1920).—Por ni, sincere kaj senkondiĉe disciplinemaj fundamentanoj, tiu oficiala dokumento de nia plej alta lingva institucio estas gajiga pruvo pri ties vigleco, post la baroj kaj malhelpoj de ĉiuj konataj. Ni esperas ke ĉiuj esperantistoj, post legado de tiu Deklaracio, konsentos pri la *difino kaj devoj de la Esperantistaro* kaj tute fidos al la Akademio kiu tiel majstre al ili prezentas la difinon kaj devojn de la Lingvaj Institutioj.

CINDRULINO kaj aliaj Teatraĵetoj por la infanoj, de Louise Briggs.—Jen areto da beletaj infanteatraĵoj kiun Brita Esperantista Asocio eldonis, riĉigante per ĝi la esperantan literaturon. Tial ke multaj el la katalunaj esperantistoj eble legis jam «*Belulino kaj la Besto*», premiita en niaj Internaciaj Floraj Ludoj kaj publikigita sur «Kataluna Esperantisto», mi povas min konsideri liberigata el la devo laŭdi la eldonaĵon, kaj nur mi diros ke ĉiuj verketoj konsistigantaj ĝin estas, de la lingva vidpunkto, same korektaj kaj rekomendindaj.

VIRINOJ VI KUNIGU VIN, MILITU KONTRAŭ MILITON.—Estas la subtitolo de arta, sentiga poŝtkarto, eldono de Esperanto-Oliecejo, Stuttgart. Ĝia aŭtoro sukcesis, per ĝi, grafike esprimi la militan malindecon trafe instigante la virinan malamon kontraŭ militon.—KATONO.

Korespondado

Gesinjoroj : Victor O. Allende, Bilbao; Louise Briggs, Armley; E. F. Cense, Paris; E. Grosjean-Maupin, Saint-Maurice; Pierre Corret, Versailles; P. Christaller, Stuttgart.

Ni estas tre dankaj al viaj gratuloj, kuraĝigoj kaj bonvolaj laŭdoj; ni klopodos ke nia gazeto meritu ĉiam vian estimon.

GRAVA AVIZO

La Administracio de K. E. F. rekomendas al tiuj ne paginta ankoraŭ la jarkotizon, ke ili ne prokrastu fari tion.

La izolitaj federacioj estas petataj bonvole sendi ĝin al nia sidejo, Carme, 30, pral.

Anoncetoj pri korespondado

(Por ĉiu anonceto oni devas sendi 0'50 ptojn. aŭ 2 respondkuponojn).

S-ro. Emeterio Ortega

str. Jaume Giralt, 33, tda.

Barcelona (Hispanujo)

deziras interŝanĝi il. pk kaj pm.

S-ro. Bernabé Mira

str. Diputacio, 18-4.^o-1.^a

Barcelona (Hispanujo)

ilustritajn pk. kaj pm.

S-ro. Kurt Luell

Nostiz-Wallwitz-Str. n.^o 6

Leipzig Gr. Zsch. (Germanujo)

ilustritajn pk. kaj esp. gazetojn.

Ni petas al la renaskiĝantaj Grupoj ke ili sciigu denove sian aliĝon al K. E. F.



Oni devas celi la restarigon de la antaŭaj Grupoj en nia lando!

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

DUA EPOKO - JARO 1^a : APRILO 1921

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

OFICIALA ORGANO DE "KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO"

JARKOTIZO: 5 PESETOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: CARME, 30 - BARCELONA

REDAKTOROJ

JAUME GRAU, ĈEF-REDAKTORO

S. ALBERICH JOFRÈ

ARTUR DOMÈNECH

ROMÀ GUARDIET

ĈIUN VENDREDOJN, JE LA 10^a VESPERE, OKAZAS REDAKCIA KUNVENO.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administracio :
Carme, 30 : BARCELONA

Nia devizo: *Maro estas guturo*

Esperantistaj Kunvenoj

NIAJ enlandaj samideanoj pretigas — ĉiu laŭ sia povo, kompreneble — al la ĉeesto de tri Esperantistaj kunvenoj: la Dua Diskuta Kunveno de Esperantistoj de Iberiaj Landoj, okazonta en Zaragoza la tagojn 26-27-28 Majo 1921, kiu celas la organizigon de ĉiuj Iberlandaj samideanoj; la XIII.^a Universala Kongreso de Esperanto, en Praha, dum venonta Aŭgusto; kaj la IX.^a Kongreso de Kataluna Esperantista Federacio en Girona, dum la tagoj 15-16-17 Oktobro 1921.

En la proksima numero ni dediĉos specialan atenton al tiaj okazontaĵoj, detale raportante pri ili; ĉefe ni pritraktos la celon de la Kunveno en Zaragoza, el kiu sendube eliros la granda Konfederacio kunliganta la esperantistojn el ĉiuj landoj de la Ibera duoninsulo.

Ni, katalunaj samideanoj, plej intense partoprenos la Zaragozan Kunvenon.

Problemo urĝe solvota



La rapida disvolviĝo de nia movado tra la tuta mondo en la nunaj tempoj prezentas (precipe en nia lando, kie la revigliĝo de esperantismo estas tiel ĵusa, sed ankaŭ tiel intensa kaj promesplena) kelkajn problemojn kies solvon urĝe devas entrepreni la esperantaj organizacioj, se oni volas profiti la tutan nunan entuziasmon kaj alkonduki al fruktodona rezultato la agadon de grupoj kaj laboremaj esperantistoj.

Inter aliaj kies elmontron per sekvontaj artikoloj mi intencas, reliefigas per sia graveco kaj urĝeco unu kiun nun mi elektas kiel temon, kun la deziro ke ĝi altiru la atenton de tiuj kleruloj kapablaj solvi ĝin kaj de ĉiuj esperantistoj interesiĝantaj je la plena kaj efika agado de niaj propagandaj institucioj: tiu de la *esperanta profesorado*.

Manko de profesoroj, jen la ĉefa aspekto de la problemo. Kiu ja nescias ke kontraŭ la kreskanta disvolviĝo de nia afero stariĝas kiel nesuperebla baro la neebleco trovi decajn lertajn personojn kapablajn gvidi la instruadon de Esperanto por multegaj societoj dezirantaj enkonduki ĝin en siajn rondojn? Kiom da belaj kampoj restas nekulturitaj pro manko de laboristoj! Kiom da semoj perdiĝas, tial ke la dissemadon ne postiras lerta kulturisto prilaboranta la rikoltadon! Estas sennombraj la laboristaj sindikatoj, teknikaj korporacioj, sciencaj akademioj, politikaj, religiaj kaj sociaj sferoj, kie esperantemo iam elmontriĝis, sed bedaŭrinde ne ekfloris, spite la bondeziro de la propagandistoj, pro la nura sama kaŭzo: manko de profesoroj.

Tiun mankon mi atribuas unue al laciĝo de la malnovaj pioniroj kiuj, post sia antaŭtempa vigla laborado, iom post iom kaj unu post la alia, ĉesis sian agadon kaj nun restas ankoraŭ kvaŭzaŭ dormantaj, indiferentaj al nuna revigliĝo. El ili plejparte dependas ke la problemo plisimpliĝu: se ili denove sin donos al aktiva apostolado, tute certe iliajn paŝojn sekvos arego da entuziasmaj disĉiploj, kiuj nur bezonas la garantion de ilia bonfamo

por sin ĵeti kuraĝe al konkiro de novaj kampoj kaj la instigon de ilia ekzemplo por ne ŝpari siajn energiojn kaj sindonemon.

Due tiun mankon oni devas atribui al ĝis nun ne okazigo de specialaj kursoj por aspirantoj al profesoreco. Tio ĉi estas grava punkto. Kiom da entreprenoj disfalis, kiom da promesplenaj komencitaj kursoj malsukcesis, pro nesufiĉa lerteco de siaj entreprenintoj kaj gvidantoj! Estas urĝe necesa la starigo de speciala profesora organismo kun senĉesa aranĝado de superaj kursoj kaj zorga aljuĝado de titoloj rajtigantaj la profesoradon. En nia K. E. F. ekzistas jam de antaŭlonge profesora korpuso, sed ĝi, laŭ mia opinio, bezonas reorganizadon; ĉar ne ĉiuj al ĝi apartenantaj titolitaj profesoroj, kvankam bone posedantaj la lingvon, nun kapblas gvidi kursojn kaj, kontraŭe, kelkaj spertaj kaj laboremaj kursogvidantoj ne posedas la titolan rajtigilon, kies aljuĝon, aliforte, nur supera organismo asesorata de lingvokomitatanoj devus rajti.

Aliajn diversajn kaŭzojn kaj aliajn diversajn aspektojn de la problemo mi povus ankoraŭ elmontri, sed sufiĉe, mi kredas, mi jam pruvis ke la problemo ekzistas, por ke ĉiuj konsentu kun mi pri la urĝa neceseco de ĝia tuja solvo. Ni serĉu rimedojn; ni re-vekgu la apostolemon de niaj antaŭaj pioniroj; ni altiru al niaj vicoj ĉiujn laboremulojn restantajn ankoraŭ ekster nia federacia organizaĵo; ni konsiliĝu kun niaj lingvokomitatanoj pri la reorganizado de la profesoraro de K. E. F. Nur tiel ni evitos la riskon ke iu ajn simpla grupeto iam konsistigu ne rajtigitan tribunalon uzurpantan la liveradon de profesoraj titoloj; nur tiel ni baldaŭ povos kulturi la bone sterkitajn kampojn kiujn la revigligo de esperantismo en nia lando malfermas al niaj laboroj.

ARTUR DOMÈNECH



La Urbo¹

Devizo: Sopiro



OST la Kandelfesto, ĉiujare Laŭrenco veturis Barcelonon por enspezi la renton de mono kiun li havis en akcioj de tiu fervojo trairanta lian bienon, de tiu fervojo kiu ŝajnis al li plugisto produktiganta lian karan monon. La lokomotivoj faradis sulkon sur la vojo, la vagonoj estis la semantoj, kaj li kolektis la rikolton. Domaĝe ke tiom da partohavantoj estis en tiu negoco: la obligaciistoj forĝajnis preskaŭ ĉion.

Laŭrenco sciis ja ke posedo de fervojaj akcioj plej ofte signifas esti mastro de tio kio estas pagota, kaj certe li ne lasus sin fuŝlogi per paperaĉoj de iu ajn alia fervoja entrepreno; sed tiu fervojo estis la lia, ĉiumatene la lokomotivoj diris al li bonantagon, la veturantoj kiujn la vagonaro kondukis oni ne scias kien elkliniĝis al la fenestroj de la vagonoj por rigardadi tiujn kampojn tiel bone kulturitajn pri kiuj fieris Laŭrenco, kaj li sentis inklinon al la vagonaroj, kiujn li konsideris kvazaŭ hejmkonatoj kaj dankis al la veturantoj ke ili eligis siajn kapojn el la fenestro.

Kiu scias ĉu tiuj viroj kaj virinoj kiuj forveturis enkaĝigite, finalveninte, parolis — al parencoj kaj konatoj — pri la bieno de Laŭrenco...

Ĝi estis granda bieno kaj la mastro ŝparis nenion por ĝi. Ĉiujare, kiam li iris Barcelonon por enspezi la kuponojn, li delasis en la urbo ne malgrandan kvanton da mono tie ricevita. De kiam, ĉirkaŭ Aprilo, aperis anonco pri tio kiom oni en Julio donos kiel gajnon de ĉiu akcio, li ekmeditis kiu nova maŝino estos al li plejtaŭga. Kaj li daŭre pripensis tion, kaj kiam li estis decidinta, li reipensis kaj kiam li estis tute pensinta, parolis pri ĝi al sia edzino. Kaj ŝi trovis tion ĝusta, kaj en Februaro, al Barcelono, por aĉeti la ilon.

Kaj Laŭrencon akompanis lia plej aĝa filino: Rozo.

Tiu vojaĝo al la urbo estis la revo de la riĉa kamparanineto; la revo kovita dum tuta jaro. De kiam ŝi atingis la vilaĝon, reveninte el Barcelono, ĉiutage ŝi ravigis rigardante la irojn kaj reirojn de la vagonaroj, ĉiam kun la sama dezirego ke ili forkonduku ŝin malproksimen, en tiun urbon tiel belan, kie ĉio estas movo kaj ĝojo. Ĉiun fojon kiam la vagonaro revenigis ŝin hejmen, ŝi diris «ĝis revido' n» al la urbo per la samaj vortoj: ĝis venonta jaro! Kaj ŝi diris tion tute malgaja, kaj por ŝi pasadis malgaje semajnoj kaj monatoj. Kiom longa estis por Rozo la somero! Ĉiuj barcelonanoj venintaj en la vilaĝon nur rememorigis al ŝi la sopiratan urbon, kaj ĉar ili estis tiel proksime, ŝajnis al ŝi ke Barcelono estas pli malproksime, ŝajnis al ŝi ke kiel tiuj aliurbanoj, la maŝinoj povos iri al la vilaĝo, kaj la patro de Rozo ŝparos vojaĝojn, kaj ŝi ne povos reiri tien, kie ĉiam estas plej granda festo. Kiel malfruis Kristnasko! Kia malvarmo en la vilaĝo dum la malgajaj monatoj! En Barcelono sendube neniam estis malvarme kun tiom da lampoj ĉiam brulantaj, kaj kun tiom da domoj kaj domoj haltigantaj la blovojn de okcidento:

1 Premiita en la Viaĝ Internaciaj Floraj Ludoj.

sendube neniu sidis kuntirite apud la fajro, ĉiuj promenis certe en la stratoj sub la suno, tiu suno tiel sinjora kiu ne brunigis kiel la vilaĝa.

La suno! Rozo rigardadis malafable la vintran sunon, kvazaŭ riproĉe tial ke ĝi leviĝis malfrue. Kaj kiam ĝi ekestis pli fruema, kaj Rozo lumblindigis rigardante ĝin, ŝiaj okuloj plengeojis, kaj ŝi iradis kaj reiradis al la fruktartaro kaj petis al la migdalarboj ke ili rapidu ekflori.

Kaj kiam la branĉaro de migdalujoj ŝajnis bukedo de jasmenoj greftita je rozo, la knabino pasigis multe da tempo sub la florintaj arboj; kaj dum ŝi revadis nur al la sopirata urbo, la suno ludetante, eniĝis deflue meze de l' branĉaro. Kaj sunmakulo falis sur Rozon, kaj ŝi, blindigita, fermis la okulojn. Havis la vizagon lentuga kaj la harojn ruĝaj la kamparana knabino; kun fermitaj okuloj, plenbanita de l' suno, kaj apud la florinta migdalarbo, Rozo aspektis kiel kupra idolo sub flora baldakeno.

Kaj kiam en la vagonaro, Laŭrenco kaj lia filino pasis sur tiu sulko, kiun en la bieno faris la lokomotivo, — la granda plugisto, — la knabino ne estis jam tiel kontenta kiel antaŭan tagon, ŝi pensis jam al malgajeco de la reveno. Sed, alveninte Barcelonon, ĉiu malĝojo malaperis, kaj la plezuro esti ĉe la granda urbo forviŝis eĉ la rememoron pri antaŭaj nostalgioj.

Ho, la urbo! Granda homamaso ĉie, la veturiloj kurante kvazaŭ spiritoposeditoj, muzikistoj en la stratoj, sonorilbruo ĉiuhore, surdiganta kriado, bruado kiu ne permesis aŭdi la malsilenton de la maro, de tiu senfina vico da ondoj venantaj el malproksime, tre malproksime, el tie kie la ĉielo kliniĝas por donadi al ĝi kisojn. Nenia malĝojo estis en la urbo, ĉar ĉiu ridis kaj ĉiu rapidis kun okuloj brilantaj kaj firma paŝado, ĉar oni vidis ĉie signojn de festo, kaj la promenejaj arboj larmis ligojn de rubandoj el senkolorigita papero, — ĉifonoj de antaŭjara gajeco, — kaj en stratoj kaj placoj regis nova ĝojo. Ĉiu estis riĉa en la urbo: mono abundeĝis, veluron kaj silkon oni vestis ĉiutage, kaj en la montrejoj de juvelistoj neniam oni revidis la samajn juvelojn de antaŭa jaro. Ĉiu amis en la urbo, ĉar sufiĉe diris tion la rigardoj de tiuj altrangaj virinoj promenantaj sur nekovritaj veturiloj, tirataj de du ĉevaloj kun floroj ĉe l' jungaĵoj. Ĉiu estis amata en Barcelono, eĉ la knabinoj kun lentuga vizago, eĉ tiuj kun ruĝaj haroj.

Kaj kiam vesperigis kaj oni bruligis tiun belan lumilaron, kaj la tempo reveni vilaĝon estis jam proksime, kiel belaj Rozo trovis la ridojn de la homoj kaj la juvelojn de la elmontrejoj, kaj la virinojn rigardantaj kun amaj okuloj! Ho! Se ŝi povus nur pasigi unu nokton en la urbo, en tiu urbo kie oni songis tiel belajn aferojn, kiel tiujn klarigitajn en amrakontoj! Se ŝi povus scii kiel parolas pri amo en la urbo, tiuj kiuj amas la knabinojn kun lentuga vizago kaj ruĝaj haroj!

La urboj estas bonaj nur por nelonga tempo, — Laŭrenco diris al sia filino, revenante sian vilaĝon.

ENRIC DE FUENTES

El kataluna lingvo tradukis

MARIAN SOLÀ

* * *

Devizo "Remember"

En tago printempa de hela ĉielo,
de ĝojoj vivigaj parfuma maten',
aperis sur mia vojiro sen celo
brilanta ruben'.

Belega knabino per ruĝaj koloroj
vestita ĝi estis; ne gema trezor'.

Vivanta rubeno de miaj fervoroj:
por vi mia kor'!

Logita de ŝia parfumo, mi restis,
je hela dianto de ruĝa kolor';
kaj poste, pro l' vento velkinta, ne estis
por mi tia flor'.

Kaj koro la mia kvieta ne povas
restadi, kaj flirtas tra ĉiu ĝarden';
sed floron similan neniam ĝi trovas
por mia ĉagren'!

JAUME GRAU

Nova triumfo de Esperanto



IAJ Parizaj samideanoj atingis sukceson kies estontan gravecon ni jam antaŭvidas. La Pariza Komerca Ĉambro akceptis la proponon de la Pariza Grupo enkonduki nian lingvon en siajn komercajn lernejojn.

Tiun proponon la Komerca Ĉambro transdonis por esplorado al la Komisiono por Instruado.

Tre interesaj estas la sciigoj pri la klopodoj kaj laboroj de tiu komisiono kaj ni eltiros la jenajn detalojn el la raporto prezentita de S-ro. André Baudet, en la nomo de la komisiono, kiu meritis esti unuanime akceptata. Bedaŭrinde ni ne povas doni, pro manko de loko, la tutan tekston interesegan de la komenco ĝis la fino. Niaj legantoj pardonos tion, kaj, per la resumo kiun ni faros, komprenos kiel konvinkaj estis la argumentoj prezentitaj.

La Komisiono tuj rekonante la utilecon de lingvo internacia, samtempe estis konvinkita ke tiu lingvo ne povas esti ia nacia, sed nur HELPA lingvo; plue, ke tiu lingvo devas esti klara, facila kaj riĉa je esprimoj por traduki ĉiujn nuancojn de la homa penso.

Ĉu la lingvo Esperanto plenumas tiujn ĉi kondiĉojn? — Por esplori tiun demandon la Komisiono elektis subkomisionon de kvin el siaj membroj por serioze studi la esperantan gramatikon. La subkomisiono trovis ĝin sufiĉe simpla. Por informi sin pri ĝia historio, disvastigo kaj prononcado, la subkomisiono interrilatis kun S-ro. Rollet de l'Isle, prezidanto de la Grupo Esperantista de Parizo. La informoj donitaj de tiu ĉi samideano konvinkis la komisionon, precipe tiu rakontante ke per Esperanto anoj el 42 diversaj nacioj bonege interkompreniĝis dum la Antverpena Kongreso kaj ke estis tute neeble ekkoni la naciecon de la parolantoj laŭ la prononcado.

Restis ankoraŭ esplori: ĉu Esperanto taŭgas por esprimi ĉiujn nuancojn de la homa penso?

La subkomisiono ne volante facilanime pritrakti tiel delikatan problemon, rezonis: Se franca teksto tradukita en esperanton kaj retradukita en francan ne estos deformita, oni rajtas diri ke la helpa lingvo havas realan valoron koncerne tion.

La eksperimento estis realigata ĉe la Komerca Ĉambro la lastan 30.^{an} de decembro.

Tie ĉi ni publike gratulas la samideanojn kiuj faris tiun laboron kaj de kiuj dependis la sukceso de la eksperimento; ili estis: S-ino. L. F. Cense, S-roj. George Warnier, René Dubois kaj Charles Tiard. Koran dankon al ili.

Tri tekstoj estis elektataj de la subkomisiono je tiel preciza stilo ke eĉ malgranda modifo povis tute deformi la sencon. Ili estis tradukataj esperanten antaŭ la Komisiono per du esperantistoj. Poste tiuj ĉi estis forlasataj kaj anstataŭataj per du aliaj komisiataj retraduki la esperantigitajn tekstojn en francan lingvon.

La rezultato estis preciza. La duobla traduko estis ĵugata kiel neniel alia laŭ senco de la tekstoj donitaj por pruvo.

Plue, la raporto parolas pri la Esperantaj Kongresoj, pri la haltigo de la Esperanta movado pro la milito, pri la revekiĝo kaj estonta komerca utilego, kiu jam antaŭvidiĝas.

Interesa konkludo estas tiu kiu diras ke TIUJ POPOLOJ KAJ TIUJ HOMOJ, KIUJ LA UNUJ UTILIGAS LA NOVAJN PROCEDOJN, ANKAU LA UNUJ RIKOLTOS LA PROFITOJN.

La 9.^{an} de februaro estis legata la raporto de S-ro. Baudet ĉe la Komerca Ĉambro kaj oni unuanime ĝin akceptis voĉdonante la jenajn rezoluciojn:

La Komerca Ĉambro de Parizo

- 1.—Decidas, enkonduki la fakultativan instruadon de Esperanto en la komercaj lernejoj;
- 2.—Esprimas la deziron, ke tiu ĉi instruado estu ĝeneraligata en Francujo kaj en la eksterlando, kaj ke la komercaj ĉambroj de ĉiuj landoj, zorgemaj plifaciligi la komercajn interrilatojn, favoru la rapidan disvastigadon de la internacia helplingvo.

Jen estas la kontentiga rezultato atingita de niaj Parizaj samideanoj.

Amikoj: kuraĝe antaŭen!!!

JOAN GILI NORTA

VIII^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

I.—Premio de Deputita Moŝto D-ro. Narcís Plà i Deniel, konsistanta el 100 pesetoj, al la plej bona verko priskribanta popolan tradicion.

II.—Premio de la Grupo «Semo» de «Ateneu Enciclopèdic Popular»; 25 ptoj. al plej bona traduko de la artikolo de D. Martí i Julià «La Patria Universal».

III.—Premio de la Grupo «Barcelona Stelo»; 50 ptoj. al plej bona teatraĵeto taŭga por propagando.

IV.—Premio de la Societo «Nova Sento»; 50 ptoj. al plej bona versaĵo adaptebla je muziko, inspirita laŭ la «interna ideo». Ĝi devos konsisti el 2 strofoj enhavantaj 12 liniojn ĉiu.

Aliaj temoj kaj premioj estas promesitaj; pri ili ni sciigos per venonta numero de K. E.



ENLANDA MOVADO

BARCELONA.—La 19.^{an} de Februaro okazis en la Grupo «Barcelona Stelo» belega festo, en kiu oni distribuis kelkajn premiojn al la Grupaj gelernantoj de Esperanto partoprenintaj la lastajn ekzamenojn. Estis du premioj el 50 pesetoj kaj aliaj konsistantaj el esperantaj libroj. Antaŭ la distribuo de premioj paroladis kuragige la Prezidanto de la Grupo, S-ro. Domènech, kaj S-ro. Dalmau en la nomo de la ekzamenintoj S-roj. Delfi Dalmau, Estanislau Pellicer kaj Josep Grau, profesoroj de K. E. F. Tiu lasta aliĝis telegrame al la festo, el Castelló de la Plana. Post la distribuo diris kelkajn dankajn vortojn la premiitoj F-ino. Esteba kaj S-ro. Durá. Okazis koncerto kaj deklamado de esperantaj poeziaĵoj kaj finiĝis la festo per agrabla lunĉo ĉeestata de 112 fervoraj gesamideanoj el ĉiuj Barcelonaj grupoj, kiuj volis tiamaniere honori la novajn kunbatalantojn kaj pruvi samtempe la revigligon

kaj unuecon de la Barcelona esperantistaro. Multaj eminentaj samideanoj tostis por la progreso de nia movado kaj montriĝis unuanima entuziasmo por la venontaj esperantaj kongresoj en Zaragoza kaj Girona.

En la nomo de K. E. F. salutis ankaŭ la ĉeestantaron de tiu ĉarma kaj intima festo, nia Prezidanto S-ro. Gili Norta.

—La esperanta societo «Nova Sento» en sia lasta ĝenerala kunveno elektis la jenan Direktan Komitaton: Prez.: M. Gil; Vic-Prez.: J. Bolós; Sekr.: F. Pérez; Vic-Sekr.: L. Ferreruela; Kasisto: S. Vives; Kalkulisto: J. Giménez; Bibliotekisto: V. Marín; Voĉdonantoj: M. Peiró, P. Vives, J. Capilla kaj J. Canales.

En tiu societo, la 9.^{an} de Marto faris paroladon kun lumbildoj pri «Montserrat» S-ro. J. Gili, prezidanto de «Aplec Excursionista de Catalunya» (1918). Ĉeestis la paroladon multaj gesocietanoj.

—La 20.^{an} de marto en la Esperanta Societo Paco kaj Amo paroladis esperante nia konata samideano S-ro. Marià Solà el Terrassa pri «Vivo de mikroboj». Lia flua parolado kaj interesa temo ravis la aŭdantaron, kiu miris kiel trafe oni povas priprakti medicinon.

Tiu sama Societo pliriĉigis sian bibliotekon per akiro de multaj esperantaj verkoj skribitaj laŭ la Braila sistemo por blinduloj.

—La 14.^{an} de marto oni malfermis du esperantajn kursojn ĉe «Libereco kaj Kulturo».

Unuagrada kurso estas gvidata de S-no. Valdepeñas kaj duagradan gvidas S-no. Gumà.

Antaŭ la malfermo S-no. Valdepeñas paroladis pri «Historio de Esperanto» kaj «Kial antaŭenemuloj devas scii helplingvon internacian», kies parolado meritis la aprobon de ĉiuj.

La partoprenintoj de ĵus finitaj kursoj, ekkoninte la bonecon de nia kara lingvo fariĝis ĝiaj tre bonaj propagandistoj.

SABADELL.—La 27.^{an} de Februaro, komitatanoj de K. E. F. S-roj. Gili, Claramunt kaj Grau faris paroladojn ĉe «Aplec Esperanta Grupo» celantajn la multnombran aliĝon de la anoj de tiu grava societo al nia Federacio. Oni interparolis amike pri la plej konvenaj rimedoj por nia sukceso kaj subskribis la aliĝilon al nia organizaĵo multaj valoraj kaj karakterizaj membroj de la malnova kaj vigla «Aplec Esperanta Grupo».

GIRONA.—La Grupo «Ĝirona Espero» fervore komencis la unuajn aranĝojn por nia venonta Kongreso, kiuj jam de nun permesas antaŭvidi la grandegan sukceson de tiu esperanta solenaĵo. Tre lerte kaj oportune publikigas artikolojn por propagando de Esperanto en la ĵurnaloj de tiu urbo, nia estimata amiko S-ro. Conrad Domènech, juna kaj inteligenta ĵurnalistoj.

EKSTERLANDA MOVADO

Germanujo.—En Munchen, dum lasta Februaro, estis aranĝata esperanta ekspozicio en salono disponigita de la postministerio kaj oni faris kelkajn propagandajn paroladojn. Komenciĝis kursoj, kiujn ĉeestas pli ol 300 gepostoficistoj.

Svislando.—La registaro de la Ĝeneva Kantono enkondukis Esperanton en la unuagradajn lernejojn. Esperanto estas instruata kiel deviga instrufako. Aliaj kantonoj espereble baldaŭ sekvos la ekzemplon de Ĝenevo.

Bulgarujo.—En Karlovo formiĝis la unua oficiala Esperanta Societo de lernantoj, aprobita de la Ministerio de Publika Instruado kaj de la gimnazia profesora konsilantaro. Lernas nian lingvon 150 gimnazianoj. Aliaj kursoj en Deevlen, Postera, Pirdop kaj Varna.

Franclando.—La Komerca Ĉambro de Parizo, en kunsido okazinta dum Februaro 1921, decidis enkonduki fakultativan instruon de Esperanto en siajn komercajn lernejojn. Novaj kursoj en Colombes, Le Creusot (en la Urbodomo), Beziers (3 specialaj kursoj por virinoj), Marseille (ĉe la Laborborso), aranĝitaj de la Intersindikata Grupo) kaj en Saint-Omer.

Siberio.—La Societo «Espero», en Vladivostok, fondita en 1897, preparis novajn kursojn kaj estas atinginta la nombron da 2.000 verkoj en Esperanto por sia Biblioteko. Tiu societo ludis gravan rolon dum la mondmilita tempo kiel ĉiurilata centra helpilo por la diversnaciaj Esperantistaj militkapituloj en Siberio.

Portugalujo.—La 1^a Internacia Foiro de Specimenoj, okazanta en Lisbono, akceptis kiel oficialajn lingvojn la Portugalan kaj Esperanton. La grava revuo «Portugal Comercial e Industrial» enhavas Esperantan Fakon el kvar grandaj paĝoj, precipe dediĉitan al la propaganda de la Foiro. La Lisbonaj grupoj Verda Stelo, Antaŭen, Fratiga Stelo, Esperantista Flegisto kaj Novaj Horizontoj vikle laboradas.

Britujo.—Pruvo de la graveco de nia movado en Britujo estas la fondiĝo de novaj Grupoj en: Coatbridge, Fleet, Hotfield, Ipswich, South London, Merthyr, Tydfil, Northampton, Shipley, St. Helen's, St. Rollox kaj Torquay. Dum Pentekosto okazos en Harrogate la XII^a Brita Esperanta Kongreso.

Rusujo.—La lasta Tutruslanda Kongreso de Arto akceptis unuvoĉe Esperanton. Dum la II^a Kongreso de Komunista Internaciano en Moskvo, la hispana delegito Pestaña, subtenita de kelkaj alilandaj delegitoj, faris al Prezidanto de la Kongreso skriban proponon pridiskuti la problemon pri Internacia Lingvo. La lasta respondis ke la problemo estos diskutita en Plenumkomitato de Internaciano kaj estos metita en tagordon de proksima kongreso.

La antaŭajn sciigojn ni eliris de la numero Novembro 1920 de «Esperantista Movado», monata organo de Kronstadta Esperantista Societo. Adreso de la Redakcio: Prosp. de Lenin, 30. Kronstadt. Ruslando. Monata abono: 50 rubloj.

Italujo.—Kursoj de Esperanto komenciĝis en Florencia, Roma, Trieste, Bologna kaj Verona. Dum venonta Aŭgusto okazos la VI^a Kongreso de Italaj Esperantistoj en Trento.

Austrujo.—Ankaŭ dum venonta Aŭgusto okazos, en Graz, Internacia Katolika Kongreso. En tiu ĉi urbo funkcias la agada centrejo de Internacio Katolika, uzanta Esperanton kiel oficialan internacian lingvon. En pli ol 20 ŝtatoj I. K. havas naciajn direktorojn aŭ reprezentantojn. Informojn pri la katolika esperanta movado petu al la centrejo en Graz, Karmeliterplatz, 5.

Finnlando.—VII^a Kongreso de Esperanta Asocio Finnlanda estas okazonta en Tampere. Kursoj de nia lingvo en Humpila, Kymi, Mikkel kaj Sortvala.

— Aliaj novaj kursoj ankaŭ okazas en : Deventer, Wormerweer, Zaan-dam, Rotterdam, Haag, Helder kaj Leiden (Nederlando); Gallipoli (Grekujo); Antwerpen kaj Liege (Belgujo).

Oficiala Parto

La deziro esprimita de nia kara federaciano Sro. J. Serrat dum nia lasta ĝenerala kunsido, ke la Konsulta Komitato de K. E. F. organizigu, havis plenan efektiviĝon la 20.^{an} de marto kaj definitive estis elektitaj ties prezidanto kaj sekretario, al kiuj de nun bonvolos sin turni la federacianiĝintaj grupoj, kiuj deziros kunvoki novan kunsidon por atentigi aŭ konsili la Direktan Komitaton pri neĝustaj labormetodoj entreprenitaj aŭ averti ĝin en okazo de bezono.

Estas al ni tre agrable konstati, ke la vikleco troviĝanta ĉe niaj ĉirkaŭantaj samideanoj, povos instrui nin, kaj samtempe ni estas certaj, ke tiu frata kunlaboranta kaj sankcianta Komitato enradikiĝos la certecon, ke la laboro farata estas ĉies kaj ne flanka.

Kiel prezidanton oni elektis S-ron. Manel Gil, el Esp. Soc. Nova Sento (str. Enna n.^o 156) kaj kiel sekretarion S-ron. K. Segura, el Esp. Soc. Paco kaj Amo (str. Asturias n.^o 1).

Danke ni ricevis de Societo Nova Sento, 10 pesetojn, por helpi la propagandon entreprenitan rilate la II.^{an} Specimenan Foi-ron.—LA SEKRETARIO, S. ALBERICH JOFRE.

La nuna numero de «Kataluna Esperantisto», tiel same kiel la pasintaj, estis submetita al la ŝtata cenzuro. Helpis la aranĝon de tiu afero la ŝtata ofieisto S-ro. Luis Santamarina, malnova kaj entuziasma samideano.

ESPERANTAJ GAZETOJ

ricevitaj en nia Redakcio, publike legeblaj ĉe la legočambro de «Enciklopedia Popola Ateneo», Carme, 30, sidejo de K. E. F.

Franca Esperantisto.

Le Monde Espérantiste.

Esperanto-Praktiko.

Itala Esperantisto.

La Marto.

La Semisto.

Germana Esperantisto.

Hispana Esperantisto

Internacia Komerca Revuo.

Esperantista Laboristo.

Kristana Espero.

Vegetarano.

Espero Katolika.

Homaro.

La Esperantisto.

La Laborista Esperantisto.

Portugal Commercial e Industrial (Esperanta Fako).

Ni dankos sendadon de la ceteraj esperantaj gazetoj.

ANONCETOJ PRI KORESPONDADO

— S-ro. Fausto Mendiri, Cabras, 7, 2.^o, Barcelona (Hispanujo) p. k. ilustritajn.

— S-ro. Francisco Mesa, Igualdad, 14, tda., Barcelona (Hispanujo) p. k. kaj gazetojn.

— S-ro. Estanislau Pellicer, Gran-Via Diagonal, 367, 1.^{er}, 2.^a, Barcelona (Katalunlando) deziras interŝanĝi popolajn kantojn.

POŝVORTARETO

ESPERANTO-CATALÀ

CATALÀ-ESPERANTO

Lukse bindita libreto, presita sur bonega papero, enhavanta la esperantan gramatikon kun vortaro Esperanta-Kataluna kaj Kataluna Esperanta.

La K. E. F. aĉetis ĉiujn restantajn ekzemplerojn (600) de la grava eldono farita antaŭ jaroj, kio permesas havigi ilin por la malalta prezo de Ptoj. 0'50. (Al la Grupoj ni faras 20 % da rabato). Oni sin turnu al nia Administristo, Carme, 30, Barcelona.

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

DUA EPOKO - JARO 1^a : MAJO 1921

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

OFICIALA ORGANO DE "KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO"

JARKOTIZO: 5 PESETOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: CARME, 30 - BARCELONA

REDAKTOROJ

JAUME GRAU, ĈEF-REDAKTORO

S. ALBERICH JOFRÈ

ARTUR DOMÈNECH

ROMÀ GUARDIET

ĈIUJN VENDREDOJN, JE LA 10^a VESPERE, OKAZAS REDAKCIA KUNVENO.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administracio :
Carme, 30 : BARCELONA

Nia devizo: *Maro estas gutaro*

Dua Diskuta Kunveno de Esperantistoj de Iberiaj Landoj

Zaragoza : 26-29 Majo 1921.

Ni pretiĝu al la ĉeesto de la Zaragoza Kunveno. Tie ni frate interrilatiĝos kun samideanoj el la diversaj Iberiaj Landoj, por laboradi je la starigo de Iberia Esperanta Konfederacio.

Rilate tion ĉi, la Direkta Komitato de *Kataluna Esperantista Federacio* prezentos proponon al la Kunveno en Zaragoza, antaŭe submetitan al la aprobo de la Konsulta Komitato de K. E. F., konsistanta el la Prezidantoj de ĉiuj aliĝintaj Grupoj. La celo de nia propono estas ke la starigota Iberia Esperanta Konfederacio konsistu el la nunaj Federacioj en Iberio kaj el la izolitaj Grupoj en la regionoj kie Federacioj ne ekzistas, respektante entute la sendependon de siaj anoj en la ne ĝeneralaj aferoj.

Por ke la propono de la Kataluna Federacio estu tre klara kaj difinita, ni aldonos al ĝi projekton de bazoj por la regularo de la estonta Iberia organismo.

El la dokumento aprobota de nia Konsulta Komitato kaj prezentota al la Dua Diskuta Kunveno, ni eltiras la jenan paragrafon:

«La regularo kiun ni prezentas ne estas arbitre elpensita. Ĝi estas elĉerpita el la protokolo de la jam antaŭe intencita Konfederacio, konsistanta el 131 dokumentoj, konservata en la arĥivo de K. E. F. Tiuj dokumentoj klare elmontras la gravan taskon kiun niaj pioniroj elektitaj dum la Olota Kongreso faris, kaj ĝi estas la rezultato de la konkludoj plejparte akceptitaj de ĉiuj kiuj partoprenis la unuajn laborojn. Inter tiuj dokumentoj ni trovis leterojn, presaĵojn, k. a., verkitajn de niaj samideanoj Piñó el Valencia, Trinidad Soriano kaj Carlos Martínez el Sevilla, J. Garzón Ruiz el San Fernando (Cádiz), Víctor Allende el Bilbao, Vicente Inglada el Toledo, J. Perogordo kaj J. Mangada el Madrid, Benigno de Luna kaj Manuel Maynar el Zaragoza, Narcís Bofill el Palma de Mallorca, Balsells, Pujulà kaj Josep Grau el Barcelona. Sur tiuj dokumentoj estas bazita la laboro kiun ni prezentas hodiaŭ al vi».

Esperinde estas ke multaj federaciaĵoj ĉeestu tiun baldaŭ okazontan Kunvenon, por montri nian sinceran helpon al la Konfederacia afero kaj pruvi la denovan viglecon de K. E. F.

PROVIZORA PROGRAMO DE LA KUNVENO

26^{an} de Majo : Je la 11^a . Akcepto de la ĉeestantoj de la Kunveno, en la sidejo de «Frateco», str. Luna, 11.

Je la 15^a : Prepara kunsido, ĉeestata de reprezentantoj de la Grupoj.

27^{an} de Majo : Je la 11^a ; Solena malferma kunsido.

Je la 16^a : Ekskurso al «Cabezo de Buena Vista».

Je la 19^a : Parolado de S-ro Julio Mangada, ĉe la Ateneo.

28^{an} de Majo : Je la 10^a : Labora kunsido, ĉe Ateneo.

Je la 16^a : Vizito al la Esperanta Ekspozicio, ĉe la Palaco de Muzeoj.

Je la 17^a : Labora kunsido. Konkludoj. Ĉe «Salón de Conferencias de la Facultad de Medicina y Ciencias».

Je la 19^a : Parolado de S-ro Ricardo Royo Vilanova, ĉe la sama loko.

29^{an} de Majo : Matene : Apartaj kunvenoj de filatelistoj, UEA-anoj, katolikoj, laboristoj, k. a. ĉe «Frateco».

Je la 16^a : Ferma kunsido en la Festosalono de «Facultad de Medicina y Ciencias».

Krom tio, okazos vizitoj al Zaragozaj vidindaĵoj, eble aliaj paroladoj, k. t. p.

Oni devas sendi sian aliĝon al S-ro David Maynar (Cerdán, 19, Zaragoza), Vic-sekretario de «Aragona Esperantista Federacio». Bonvolu ankaŭ sendi al S-ro David Maynar ĉiuspecajn esperantaĵojn por kontribui al la sukceso de la organizata Ekspozicio.

Fine, ni rekomendas denove ke ĉiuj veturu al Zaragoza, por la bono de niaj organizaĵoj kaj progresado de Esperanto. Ni danku per multnombra ĉeesto kaj kunlaboro la klopodadon de la Aragonaj samideanoj.

Vivu Zaragoza! Vivu Esperanto!



IX^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio

Girona : 15 - 16 - 17 Oktobro 1921.



RE ĝoje ni sciigas hodiaŭ ke la Organiza Komitato de nia IX^a Kongreso estas jam konstituiginta kaj komencis sian laboradon tre sukcese.

El la diversaj aferoj kiujn oni intencas efektivigi por la plej granda brilo de la Kongreso, forte reliefigas la celaranĝi grandegan Esperantan ekspozicion kaj tial la citita Organiza Komitato petas ĉiujn samideanojn bonvolu jam de nun montri sian helpon al tio.

Por honorigi kaj danki la fervorajn organizantojn de nia nunjara Kongreso, ni publikigas iliajn nomojn ĉi-sube:

ORGANIZA KOMITATO

Prezidanto: Doktoro Josep Casanovas, Ptro.

Vic-prezidanto: S-ro Casià Costal.

Kasisto: S-ro Gerónimo Boris.

Kalkulistino: F-ino Carme Maymí.

Sekretario: S-ro Ramón Casademont.

Vic-sekretario: S-ro Francisco Hil.

FAKOJ

PROPAGANDO

- S-ro C. Costal
 > J. M. Dalmau
 > C. Domènech
 > N. Sitges
 > F. Saliné
 > J. Vilà

EKSPOZICIO

- S-ro F. Hil
 > J. Macián
 > A. Peris
 F-ino T. Colls
 > D. Maymí
 > M. Suñer

FINANCOJ

- S-ro G. Boris
 > J. Ferrer
 > J. Costa
 > J. Cuatrecasas
 > A. Pericay
 > S. Pla
 > T. Meléndez

- F-ino C. Maymí
 > A. Coll
 > J. Xirgu
 > D. Turbau
 > M. Masgrau
 > T. Bartina
 > D. de la Mano

LOĜADO, FESTOJ, EKSURSOJ

- S-ro R. Casademont
 > A. Vallmajor
 > R. Fontàs
 > J. Guitart
 > E. Dalmau
 > F. Colominas

- S-ino A. Cortina
 F-ino P. Bernadas
 > T. Torres
 > C. Simon
 > T. Suñer
 > M. Bordas

SOLENA DIMANĈA DISERVO

Pastro Josep Casanovas kaj Grupo «Studenta Juneco».

VIII^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

V.—De «Unió Deportiva», el Girona. Premio: 100 pesetoj. Temo: «Sporto». (La premiita verko iĝos propraĵo de «Unió Deportiva»).

VI.—De S-ro Casà Costal, Direktoro de la «Normala Lernejo por Instruistoj» el Girona. Premio: 25 ptoj. Temo: Verko pri la infana psikologio.

VII.—De Lia Moŝto Markizo de Camps. Premio: Artobjekto. Temo: Laŭvola.

VIII.—De la Grupo «Ĝirona Espero». Premio: 50 ptoj. Temo: Versaĵo al la arbaro «La Devesa» el Girona.

IX.—De la Societo «Marte», el Girona. Premio: Artobjekto. Temo: Laŭvola.

X.—De Lia Moŝto Vicari Capitular de Girona. Premio: 50 ptoj. Temo: Kolekto de fidindaj sciigoj pri la Katolika esperanta movado en la mondo.

XI.—De la Moŝta Katedrala Kanonikaro, el Girona. Premio: 50 ptoj. Temo: Ritma traduko de la latina himno de Pentekosto «Beata nobis gaudia», laŭ Breviarium Romanum.

XII.—De la Rektora Moŝto kaj Klaŭstro de la Tridentina Seminario de Girona. Premio: 50 ptoj. Temo: Enkonduko de Esperanto en la pastrajn seminariojn.

XIII.—De «Grupo Escolar», el Girona. Premio: 25 ptoj. Temo: Esperanto kiel rilatigilo ĉe la internacia studentaro.

XIV.—De la «Unión Gremial y Patronal», el Girona. Premio: 30 ptoj. Temo: Grava utileco de Esperanto por la Komerco.

XV.—De «Coliseo Imperial», el Girona. Premio: 25 ptoj. Temo: Laŭvola.

XVI.—De «Schola Orpheonica», el Girona. Premio: Artobjekto. Temo: Laŭvola.

La listo de eksterordinaraj temoj kaj premioj estas ankoraŭ daŭrigota. Baldaŭ ni represos sur aparta folio la alvokon pri la VIII^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj aperintan en la Marta numero de «Kataluna Esperantisto». Ni enhavos la tutan liston de ordinaraj kaj eksterordinaraj temoj, kondiĉojn plennotajn de la partoprenantoj, k. t. p.

Oni sendu la verkojn al la Sekretario de la VIII^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj, S-ro Estanislau Pellicer, Carme, 30, Barcelona.

Beno de la manĝotablo

Al mia amiko Gili Norta

Benu la manĝotablon, ho Sinjor',
kiun provizis ni kun helpo via,
kaj kiel nevidebla kunmangant'
restu ĉe nia rondo familia;
ĉar tiujn dolĉajn fruktojn ŝuldas ni
al viaj kampoj sub lazur' ĉiela,
kies vasteco igas antaŭ si
nian figuron eta kaj malhela.

Se l' panon igis karn' kaj vinon sang',
Vi igu amo ĉiujn niajn vortojn,
kaj al ni donu ĉiam, ie ajn,
vian gvidon sur voj' kaj viajn fortojn;
ĉar atingi nur estas nia cel',
post ĉia provo kaj klopod' malpova,
nin vidi kunigitaj kiel nun
en via Pac' eterna, ĉiam nova.

RAMON SURIÑACH SENTIES

El kataluna lingvo tradukis

JAUME GRAU

Laŭdajo

El la libro "Terra de Gestes
i de Beutat. Girona".

STAS urboj senprecizaj, amorfaj, kiel la plejmulto el la nuntempaj urboj, sen ia specifa karaktero en sia vidigo monumenta. Aliajn, kontraŭe, ni renkontas kun sigelo forte persona kaj nekonfuzebla (Bruges la Mortinta, Toledo, Girona) en kiuj ĉiu ŝtono ŝajnas esti ĝustemetita de la eterneco, kaj kies koloron kaj aspekton vane ni serĉus en malsama urbo.

Gloraj urboj tiu de Girona: ĝi gardas, eĉ dum ĉi tiu kapturiga centjaro—kiu forigas ĉiajn karakterizojn el la malgrandaj patrujoj kaj kvietemaj urboj—sian kortuŝantan aspekton de urbo maljuna kaj potenca kaj samtempe ian mienon delikatan kaj virinan. Ĝi estas potenca kaj ĝi estas virina: sur tiu ĉi ŝajna paradokso kuŝas la tuta ĉarmo de tia grandeco kaj de tia beleco.

Ĉe tiaj deklivaj stratoj, pavimitaj per angulaj riverŝtonoj tra kies kuniĝoj kreskas la herbeto folioplena, estas ankoraŭ konservata anakronisma spirito de gloro kaj forteco. Ili estas mallargaj, tiuj ĉi stratoj; ili estas malsekaj kvazaŭ putoj; kaj super la kornicoj ridetas la luma blueco de ĉielo sennuba, aŭ platmoviĝas peze kaj plumbokolorite la fulmotondraj nubegoj; ili estas la nekonfuzebaj kaj grizaj stratoj Gironaj.

Ravaj solecoj de la strato de la Força kaj de Alemany, kaj tiuj de la mildaj lokoj ĉirkaŭantaj la Katedralon; pordoj enigaj; luksaj ŝtuparoj de palacoj disbatitaj; fenestroj de broditaj kapitejoj... ŝtonoj miljaraj poluritaj de la centjaroj kaj orkoloritaj de la suno: ĉio ĉi estas Girona; ĉio ĉi estas la ĉarmo de Girona.

Ĉefpreĝejo de Sankta Maria, sidanta kiel Reĝino supre de la grandioza ŝtuparo: vi estas la vigla observisto de la urbo; kaj la domoj kuŝas konfide-me kaj amase malsupre de viaj piedoj, tute humilaj antaŭ viaj altegaj muroj starigitaj de la troriĉeco kaj de la fido.

Gloraj sonorilejoj de Sant Feliu, de broditaj krestaĵoj graciekreskaj kiel cipreso kaj levigita kiel religia ofero. Belega monaĥejo de Sant Pere, de respektinda maljuneco. Fruktozona valo de Sant Daniel, bordita de la senfruktaj montdeklivoj de Montjuic kaj de la profundaĵoj de l' Calvari, kaj traŝita kvazaŭ de grandega tranĉaĵo de la roka kuŝejo de l' Galligans. Vi ĉiuj faras ankaŭ Girona'n: iun Girona'n kiu, malgraŭ la elpasintaj centjaroj kaj la malbonaĵoj elsuferitaj, estas restinta senmove kiel ensorĉitaĵo.

Gloraj ruboj de la turo Gironella; nobelaj domoj ruinaj de Alemany; muregoj detruitaj de l' Calvari: viaj dispecigaĵoj, mutaj, rigidaj, similas san-

gan rondon super la urbo kvietema; vi estas vivantaj atestoj de la forteco centfoje evidentigita de la urbo, kiu neniam rifuzis elverŝi malavare sian sangon por certigi sian personecon tute katalunan: ŝajnas ke inter ĉi tiuj rubaj kaj gloraj muroj svarmas ankoraŭ la spiro de cent bataloj, kaj eĉ ke la ĝrilaj fendadoj de la tero elvokas sangverŝajn viziojn de detruado kaj morto.

Ruinoj respektindaj de tiu forteco: vi estas la rememoro kaj konstanta elvokado de la Girono heroa.

Rivero, kiu serpentiras tra la urbo; domoj rigardantaj en la tremado de ĝia fluo la disŝirojn de viaj torditaj balkonoj, de la fenestroj pentrindaj kaj florhavaj, de viaj muroj ĉu enigitaj ĉu dikventraj; lumetoj de la balkonoj, kiuj dum la nokto reflektas la punktojn flavajn, rugajn, dubblankajn de viaj lumradiadoj en la trema frizado de la akvoj. Vi ankaŭ estas Girona, la Girona poezia, pentrinda, veniza.


Urbo: estas sur la amboso de tiuj ĉi tri aspektoj kie viaj filoj forĝis siajn spiritojn. Estas tiu ĉi triaĵo kiu formis vian urban animon, tiel noblan, tiel morseveran, tiel kavalirecan.

Ke tiuj tri sentoj de forteco, heroeco kaj beleco estu levigitaj ankaŭ ĉiam en la estontecon, kiel viaj batalaj standardoj en la gloraj bataladoj de ĝentileco kaj beleco.

XAVIER MONSALVATJE I JOAQUIM PLA

Ĉi kataluna lingvo tradukis

JOSEP M. DALMAU



ENLANDA MOVADO



UM la tagoj 26.^a, 27.^a kaj 28.^a de Marto ekskursis al la urboj Girona, Palafrugell, Palamós kaj Sant Feliu de Guixols, por propagando de Esperanto kaj revivigo de la enlanda movado, samideanoj Joan Gili Norta, Prezidanto de «Kataluna Esperantista Federacio», kaj Jaume Grau Casas, ĉef-redaktoro de «Kataluna Esperantisto», al kiuj kunigis en Girona S-roj Ramón Casademont kaj Francisco Hil, Sekretario kaj Vic-sekretario de «Gerona Espero». Ili povis konstati la denovan fervoron de ĉiuj samideanoj en la vizititaj urboj kaj ilian ĝojon pro la okazigo en Girona de la venonta Kongreso de K. E. F.

GIRONA. — La tieaj samideanoj senlace laboradas por nia IX.^a Kongreso (aliloke ni raportas pri tio) kaj estas tute certe ke ĝi

daŭrigos la brilan serion de niaj sukcesaj jarkunvenoj. La vivado de la grupo «Ĝerona Espero» estas tre vigla kaj apud ĝi kunigas, iom post iom, multaj enurbanoj ĵus interesigintaj pri la esperantista movado.

PALAFRUGELL.—Dum Pasko la samideanoj de Palafrugell estis vizitataj de S-roj Gili kaj Grau, el Barcelona, kaj S-roj Casademont kaj Hil el Girona. Amikaj kunvenoj kaj interparoladoj okazis ĉe «Centre Fraternal» kaj «Casal Popular», el kiuj oni el-tiris la certecon ke la Palafrugell' a Grupo restariĝos kaj laborados tiel fervore kaj efike kiel antaŭe. S-ro Francesc Sagera gvidos novan kurson, kaj promesis energie helpi la revekigon de Esperanto en Palafrugell S-roj Anicet Carreras, Climent Caseras, Arcadi Girona, Juli Llavà kaj Pere Kal, al kiuj ni dankas pro la kora akcepto dezirante al ili tujan sukceson.

SANT FELIU DE GUIXOLS.—Ankaŭ ĝoje akceptis la cititajn vizitantojn la samideanoj el Sant Feliu, kiuj montrigis same pretaj al la ĝenerala revigligo kaj entuziasmaj por entrepreni la revivigon de la iam gravega Grupo «Frateco». Kunveno estas jam okazinta tiucele kaj espereble ni povos baldaŭ doni al niaj legantoj bonan novaĵon pri tio, dank' al la laboremo de la fervoraj samideanoj J. Blanch Vendrell, Reixach, Vilaret kaj Presas. S-ro Presas estos la instruanto de nia lingvo al la novaj adeptoj.

BARCELONA.—La 5.^{an} de Aprilo, en la Esp. Soc. «Nova Sento» okazis festo por solenigi la malfermon de novaj kursoj de nia lingvo, kiuj nun disvolviĝas kun granda sukceso. Faris paroladon katalunlingve, pri la anoncita temo «Diversaj aspektoj de la praktika aplikado de Esperanto», S-ro Jaume Grau, ĉef-redaktoro de «Kataluna Esperantisto». La novaj venkoj de Esperanto vekis profundan entuziasmon ĉe la multenombra ĉeestantaro.

—Komentariante la decidon de la Pariza Komerca Ĉambro rilate la instruadon de Esperanto en la komercaj lernejoj, aperis tri gravaj artikoloj en la Barcelonaj ĵurnaloj «El Diluvio», «La Veu de Catalunya» kaj «La Vanguardia». Tiuj artikoloj, kiuj vidigis al miloj da legantoj la nunajn progresojn de nia kara afero kaj bonege efikis por turni unu fojon ankoraŭ la publikan atenton al la internacilingva problemo, estis lerte verkitaj de nia kara samideano Joan Gili Norta, Prezidanto de K. E. F.

—En la «Kiosko Barcelonés», ĉe la Ramblo, estas aĉetebla la fama kaj bonega ĉiusemajna ĵurnalo «Esperanto Triumfonta», kiu estas nur esperante redaktita kaj enhavas interesajn sciigojn pri nia movado en la tuta mondo. La nomo «Esperanto Triumfonta» per dikaj literoj vidigis meze de la diversnacia gazetaro; jen bona pruvo de la disvastigo de nia ideo. La Grupo «Semo» (A. E. P.) estas la aranĝinto de la publika vendado de E. T.

— En Esperanta Societo Paco kaj Amo okazis la 16.^{an} de aprilo literatura vesperfesto dum kiu oni legis diversajn paroladojn de la Majstro kaj kelkajn fragmentojn el la verko Vivo de Zamenhof. Ĝi ankaŭ okazigas de tempo al tempo ekskursojn por ekskluzive praktiki Esperanton kaj tiel akiri plilertigon en ĝia uzado.

— Oficiale invitata de la Barcelona Urbestro kaj de la Komitato organizinta la II.^{an} Foiro de Specimenoj, la Prezidanto de K. E. F. ĉeestis la inaŭguran kunsidon de tiu grava elmontro de nia komerco kaj industrio okazinta la 20.^{an} de Aprilo.

Paroladis la Urbestro kaj nome de la Hispana Registaro malfermis la foirtaskojn la Ministro de l' Laboro. La solena festo estis ĉeestata de ĉiuj Barcelonaj aŭtoritatoj.

— Ke la Komitato de la Foiro fervore interesiĝis pri nia lingvo montriĝas per la fakto ke, krom la eldonado de propagandiloj kaj reklamiloj dum la organizado de la Foiro, nun ĝi metis sur la fasado de la Foirofiĉejo grandajn pentritajn afiŝojn anoncantajn la Foiro, en kelkaj lingvoj redaktitajn kaj ankaŭ en Esperanto.

Sed sendube la plej interesa noto kiun donas al nia propagando la II.^a Oficiala Foiro de Barcelona estas la jena, kiu kompreneble tre bone impresis nin: En la diversaj enir-kaj elirpordoj de la foirejo estis pendigitaj grandaj afiŝoj redaktitaj nur katalune, hispane kaj esperante.

Ĉiuj vizitantoj de la Foiro nepre devas rimarki la vortojn: «ENIREJO kaj ELIREJO» kiuj vidiĝas sur ĉiuj pordoj.

Ni gratulas kaj dankas la Komitaton de la Foiro pro la helpo kiun ĝi donis al la disvastigo de Esperanto.

Dum la kompostado de la nuna numero la Foiro daŭras kaj niaj impresoj estas ke ĝi estas granda sukceso por ĉiuj: organizintoj kaj partoprenintoj.

EKSTERLANDA MOVADO

Italujo.—En Milano, dank' al la subteno de la urbestro Fillipetti, prezidanto de la Milana «Esperanta Domo», lernas Esperanton pli ol 1000 geknaboj kaj 100 geinstruistoj. Ankaŭ kurso por geinstruistoj okazas en Trento, kies gvidanto estas la Direktoro de la urbaj lernejoj. Aliaj kursoj funkcias en Padova, ĉe la Teknika Instituto, kun 110 gelernantoj; ĉe Liceo Tito Livio, kun 45 g.; ĉe la Normalaj Lernejoj Virinaj, kun 58 lernantinoj en la unua fakto kaj 57 en la dua; ĉe la Teknika Instituto de Bologna kaj en la urboj Genova, Roma, Venezia kaj Verona.

Finnlando.—La Finnlanda Parlamento voĉdonis subvencion da 25.000 finnaj markoj al la nacia Esperanto-Asocio; pro tio okazis grava debato en la Parlamento, favora al nia afero. La evangeliaj lernejoj de Makipaa ka

Kadansun akceptis Esperanton; 74 lernantoj. Aperis artikoloj pri nia movado en 23 nacilingvaj gazetoj.

Svedujo.—En Malmö, samideano G. H. Backman faris propagandan paroladon antaŭ 1200 personoj kaj enskribiĝis en la malfermotaj klasoj 130 personoj. En la sama urbo estas instruata Esperanto ĉe societoj de junuloj. Novaj kursoj en Brunnsвик kaj Ludvika.

Germanujo.—Depost Pasko, Esperanto estas devige instruata de profesiaj instruistinoj en tri triaj klasoj de la popollernejo ĉe Kaethnerkamp en Hamburg. En München, nun lernas nian lingvon 500 oficistoj. Aliaj kursoj en Münster, Freiburg, Helmstedt, Hildesheim kaj Schweinfurt.

Polujo.—En Bialystok, naskiĝloko de nia Majstro, fondiĝis Zamenhofa Esperanta Societo kaj komenciĝis kursoj ĉe la Studenta Societo kaj ĉe la hebrea popollernejo «Perec». En Varsovio estas fondita nova Grupo «Konkordo».

Estonio.—En Tallinn, oni aranĝis kurson ĉeestatan de 300 lernantoj el la superaj klasoj de la mezlernejoj. En Narwa, fondiĝis esperanta societo.

Franclando.—En Avignon, ĉe la Komerca Ĉambro, okazis grava kaj sukcesa propaganda parolado. Novaj kursoj estas en Chalons s. Marne, Lyon, Nice kaj Saint-Etienne. Publikigis artikolojn kaj raportojn pri la Esperanta afero, la jenaj francaj ĵurnaloj: L'Avenir, L'Ami des Aveugles, Le Libéré, Négoce, L'Ordre Naturel, La Petite Gironde, Le Petit Niçois, Le Syndicaliste des P. T. T., La République, Le Moniteur, Le Travail kaj La Liberté.



XIII^a Universala Kongreso de Esperanto en Praha (Ĉeĥoslovakujo)

31 Julio - 6 Aŭgusto

RESUMO DE LA 2^a ĜIS 7^a KOMUNIKOJ

KONGRESEJO: Solena malferma kunsido okazos en la «Smetana» halo de la Reprezentanta domo. Laboraj kunsidoj kaj akceptejoj troviĝos en la Kazino sur insulo «Zofin».

FAKAJ KUNVENOJ: Dum la Kongreso okazos diversaj fakaj Kunvenoj: Katolikoj, Kristanoj, Framasonoj, Vegetaranoj, Blinduloj, Hebreaj naciianoj, Komercestoj, Anoj de malgrandaj nacioj, Psikistoj, Sportistoj, k. a.

KOTIZAĴO: 25 frankoj oro (antaŭmilita valoro) = 5 dolaroj,

12 nederlandaj guldenoj, 20 ŝilingoj, 25 pesetoj, liroj, dinaroj, drakmoj, k. t. p. (1 peseto egalvaloras 11 ĉeĥoslovakajn kronojn).

Pluaj samfamilianoj pagas nur 60 % de la kotizaĵo. Post la 1.^a Junio 1921 altiĝos la kotizaĵoj je 50 %.

Ĉiu pagas en sia ŝtata valuto!

La sumon sendu en rekomendita letero rekte al la ĝenerala sekretario!

GARANTIA FUNDO: Samideanoj, precipe el landoj kun bona valuto, helpu la sukceson de la Kongreso kaj enskribu almenaŭ unu enskribon po 100 ĉeĥoslovakaj kronoj!

VOJAĜ-AFEROJ: (Biletojn, transporton de la valizoj, informojn ĉiurilatajn) prizorgadas al la kongresanoj «Čs. Cestovní a dropavni kancelar» (oficejo fondita de ministerio por Komerco kaj fervojoj) en Praha II, Mikulandska 7.

PREZOJ (hodiaŭaj) EN PRAHA:

1.—de la noktoĉambroj:

I.^a kategorio: a) unulita 10-37 k., b) dua provizora lito 10-20 k., c) dulita 25-77 k.

II.^a kategorio: a) 10-29 k., b) 10 k., c) 26-50 k.

Oni intencas ankaŭ prizorgi loĝadon en privataj familioj kaj komunaj loĝejoj (por neriĉaj esperantistoj).

Notu viajn ĉiurilatajn dezirojn en la de la Loka Kongresa Komitato sendota aliĝilo!

2.—de la manĝaĵoj:

I.^a kategorio: a) matenmanĝo 10-15 k., b) tagmanĝo 45-75 k., c) vespermanĝo 25-65 k.

II.^a kategorio: a) 5-7 k., b) 33-37 k., c) 25 k.

Krom tio trinkmono almenaŭ 10 %.

En restoracioj bonaj tag- kaj vespermanĝoj po 10-20 k.

TEATRA PREZENTADO: Oni ludos esperantlingven tradukitan ĉeĥan komedion «Noc na Karlsštejne» (Nokto en Karlštejne) de Jaroslav Vrchlický ĉefa ĉeĥa poeto kaj verkisto.

ALIĜINTOJ ĜIS 7.^a KOMUNIKO: 179 esperantistoj apartenantaj al 15 diversaj landoj.

ADRESO: Por nur prikongresaj korespondaĵoj kaj aliĝoj. S-ro. Aug. Pitlik—Praha III, Nerudova 40.

Ankaŭ ni povas sciigi ke en Dresdeno, la urbo de la IV.^a, oni organizas Antaŭ-Kongreson kaj en Budapest oni aranĝas Post-Kongreson.

Por la Katolikoj kaj post la Praha Kongreso, okazos internacia kongreso en Graz.

ESPERANTAJ GAZETOJ

ricevitaj en nia Redakcio, publike legeblaj ĉe la legoĉambro de «Enciklopedia Popola Ateneo», Carme, 30, sidejo de K. E. F.

Franca Esperantisto
Le Monde Espérantiste
Esperanto-Praktiko
Itala Esperantisto
La Marto
La Semisto
Germana Esperantisto
Hispana Esperantisto
Internacia Komerca Revuo
Esperantista Laboristo
Kristana Espero
Verda Utopio

Vegetarano
Espero Katolika
Homaro
La Esperantisto
La Laborista Esperantisto
Esperanto
Hungara Esperantisto
Esperanto Triumfonta
Nova Tempo
Literaturo
Portugal Comercial e Industrial (Esperanta Fako)

Ni dankos sendadon de la ceteraj esperantaj gazetoj.

ANONCETOJ PRI KORESPONDADO

S-ro Manuel Monrós, Pl. S. Agustín Viejo, 3, Barcelona. - P. K. kaj L. pri drogoj kaj mangajoj.

S-ro Manuel Palomera, St. Pacía, 17, 2.^o, 2.^a, Barcelona, il. pk.

S-ro Antonio Buxaderas, Pasatje Montjuich del Bisbe, 4, 4.^{art}, 1.^a, Barcelona, il. pk.

Toméjo Alberich, Asturias, 1, Barcelona, kun geknaboj ĉiulandaj.

S-ro Vicente Garcés, Sans, 34 bis, 1.^o, 1.^a, Barcelona, il. pk.

S-ro Viktoriano Sala, Galileo, 287 pral., 1.^a, Barcelona, il. pk.

S-ro Artur Doménech, Cabanyes, 81, 1.^{er}, 1.^a, Barcelona, 1. kaj pk. kun ĉiulandaj revoluciemuloj pri anarĥiismo kaj komunismo.

S-ro Isidre Torrents, Fakestro librotenisto de Intervención y Estadística de la fervoja Kompanio M. Z. A., Marquesa, 2 bis, 3.^o, Barcelona, il. pk.

S-ro Fausto Mendiá, Cabras, 7, 2.^{on}, Barcelona, il. pk.

S-ro Erich Lämmerhirt, Hirzel Strasse, 27, Leipzig - K. L. Germanujo, korespondado kun antaŭemaj kamaradoj pri ĉiuj temoj aktualaj kaj interesaj esp. gazetojn.

S-ro Mariano Vilardell, Huerta, 5, Manlleu-Barcelona (Hispanujo), il. pk. nur kun gefremduloj.

POŝVORTARETO

ESPERANTO-CATALÀ
CATALÀ-ESPERANTO

Lukse bindita libreto, presita sur bona papero, enhavanta la esperantan gramatikon kun vortaro Esperanta-Kataluna kaj Kataluna-Esperanta.

Restas ankoraŭ 300 ekzempleroj de la grava eldono farita antaŭ kelkaj jaroj kaj nun aĉetita de K. E. F. Prezo : Ptoj. 0'50. (Al la Grupoj 20 % da rabato).

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

DUA EPOKO - JARO I^a : JUNIO 1921

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

OFICIALA ORGANO DE "KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO"

JARKOTIZO: 5 PESETOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: CARMÉ, 30 - BARCELONA

REDAKTOROJ

JAUME GRAU, ĈEF-REDAKTORO

S. ALBERICH JOFRÉ

ARTUR DOMÈNECH

ROMÀ GUARDIET

ĈIUJN VENDREDOJN, JE LA 10^a VESPERE, OKAZAS REDAKCIA KUNVENO.



Nia devizo: *Maro estas gutaro*

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administracio :
Carme, 30 : BARCELONA

Grava dokumento

21 Membroj de la Franca Akademio de l' Sciencoj
subskribas Rezolucion por Esperanto



RE altsignifa estas la decido de tiuj famaj kaj kompetentaj sciencistoj, favora al la uzado de Esperanto ĉe la sciencaj rilatoj, kaj ĝi certe helpos altiri la atenton de ĉiaj intelektuloj al nia lingvo.

Ni represas ĉi sube la interesan dokumenton :

La subsignintoj, membroj de la Akademio de l' Sciencoj, konvinkitaj, ke la alprenado de la helplingvo Esperanto en la internaciaj rilatoj havus konsekvencojn de nemezurebla graveco vidpunkte de la progreso de l' sciencoj kaj de iliaj aplikoj; ke ĝi permesus etendi la elradiadon de la franca scienco eksteren kaj, per tio, la intelektan influon de nia lando,

esprimas la deziron :

1. ke la instruado de tiu ĉi lingvo, ĉefverko de logiko kaj simpleco, estu enkondukata, almenaŭ kiel nedeviga, en la oficialaj programoj de la sciencaj klasoj de ĉiuj instruejoj;

2. ke, en la internaciaj kongresoj, ĝi estu akceptata kiel oficiala lingvo, egalrajte al naciaj lingvoj ĝis la momento, kiam la sperto pruvos, ke ĝi kapablas fariĝi ilia sola oficiala lingvo;

3. ke la atento de la direktoroj de sciencaj aŭ teknikaj eldonejoj estu altirata al la intereso, kiun prezentus al ili la uzado de tiu ĉi lingvo en iliaj publikaĵoj destinitaj por la eksterlando;

4. ke de nun la sciencistoj kaj teknikistoj preparu sin por uzi ĝin en siaj rilatoj kun siaj eksterlandaj kolegoj kaj konigu poste al ili, ke ili estas pretaj uzi ĝin;

5. ke komisiono estu nomata por prepari kaj ellabori la vortarojn de la puraj sciencoj en Esperanto, kaj ke la teknikaj societoj estu invitataj fari la samon koncerne ilian specialecon.

D'Arsonval, Professeur de physiologie au Collège de France.

Daniel Berthelot, Président de la Ligue française de l'Enseignement et de la Société de Navigation aérienne.

Bigourdan, Astronome à l'Observatoire de Paris, Président de la Commission internationale de l'Heure, membre du Bureau des Longitudes.

Gaston Bonnier, Professeur de botanique à la Sorbonne.

Général Bourgeois, Sénateur, Ancien Directeur du Service Géographique de l'Armée, membre du Bureau des Longitudes.

C. Breton, Député, Ancien Ministre.

J. Carpentier, Fabricant d'instruments de précision, membre du Bureau des Longitudes.

Charpy, Directeur général adjoint de la Société des Forges et Aciéries de la Marine à Homécourt.

Costantin, Professeur de botanique au Muséum d'histoire naturelle.

Deslandres, Directeur de l'Observatoire d'Astronomie Physique de Meudon, membre du Bureau des Longitudes.

Amiral Fournier, Président de la Société d'Océanographie de France, membre du Bureau des Longitudes.

P. Janet, Directeur du Laboratoire Central d'Electricité, Président de la Société française de Physique.

C. Lallemant, Inspecteur général des Mines, Directeur du Service du Nivellement général de la France, membre du Bureau des Longitudes.

Maurice Leblanc, Président du Comité Electro-Technique international, Ancien Président de la Société internationale des Electriciens.

Lecornu, Inspecteur général des Mines, Professeur à l'Ecole Polytechnique.

Lindet, Professeur à l'Institut Agronomique, Ancien Président de la Société d'Encouragement à l'Industrie nationale.

Lumière, Administrateur de la Société des Etablissements Lumière, à Lyon.

Prince de Monaco, Président de la Section d'Océanographie de l'Union internationale de Géodésie et de Géophysique.

Charles Richet, Professeur à la Faculté de Médecine, membre de l'Académie de Médecine.

Général Sebert, Président du Conseil d'Administration des Forges et Chantiers de la Méditerranée.

Fernand Vidal, Professeur à la Faculté de Médecine, membre de l'Académie de Médecine.

Pri la morto de hundeto



Ĝi perdis malgrandan buldogon. Ĝi estis apenaŭ plenuminta la sesan monaton de sia mallonga ekzistado. Ĝi tute ne havas historion. Ĝiaj inteligentaj okuloj malfermiĝis por rigardi la mondon kaj por ami la homojn; tuj poste ili refermiĝis kun la maljustaj sekretoj de la morto.

La amiko kiu ĝin donacis al mi donis al ĝi eble kiel antifrazon la tre neantaŭviditan nomon PELLÉAS. Kial mi estus ĝin malbaptinta? Ĉu malfeliĉa, amanta, karesema kaj lojala hundo senhonorigas nomon de homo aŭ de fantazia heroo?

PELLÉAS havis grandan frunton largan kaj potencon, similan al tiu de Sokrato aŭ de Verlaine; kaj sub nazeto nigra kaj kuntirita kvazaŭ malkontentiga jeso, largaj oreloj pendantaj kaj simetriaj faris el ĝia kapo specon de minaco masiva, obstina, pensema kaj triangula. Ĝi estis bela kiel bela natura monstro severe alkonformiĝinta al leĝoj de sia speco. Kaj kia rideto de atenta rigardo, de nekoruptebla naiveco, de sindona subigo, de senlima dankemo kaj de tuta forgeso lumigis, je plej malgranda kareso, tiun adorindan maskon de malbeleco! El kie devenis, ja, tiu rideto? Ĉu el okuloj naivaj kaj kortuŝitaj? Ĉu el oreloj levitaj al paroloj de la homo? Ĉu el frunto kiu largiĝis por kompreni kaj ami, el kvar etaj dentoj, blankaj kaj elbordigantaj, kiuj gaje radiis sur la nigraj lipoj, aŭ el mallonga vosto rapide balanciĝanta por atesti la intiman kaj varman gojon kiu plenigis malgrandan estaĵon feliĉan renkonti ankoraŭ unu fojon manon kaj rigardon de la dio al kiu ĝi sin donis?

PELLÉAS naskiĝis en Parizo, kaj mi portis lin en la kamparon. Dikaj, grasaj kruroj, senformaj kaj nesolidaj ankoraŭ, kondukis malfirme tra la nesploritaj vojoj de ĝia nova ekzistado ĝian kapon grandegan kaj gravan, platan kaj kvazaŭ surŝargitan de pensoj.

Ĝi aspektis tiel, ĉar ĝi komencis—tiu kapo sendanka kaj iom malgaja, simila al tiu de troŝargita infano—la premegantan laboron kiu pezas sur ĉiu cerbo en komenco de l' vivo. Ĝi bezonis, dum malpli ol kvin aŭ ses semajnoj, penetrigi kaj organizi en si kontentigan reprezentadon kaj konsciadon de la universo. La homo, kun helpo de tuta scienco de siaj prauloj kaj de siaj fratoj, uzas tridek aŭ kvardek jarojn por skizi tiun ekkomprenon aŭ pli ĝuste por amasigi ĉirkaŭ ĝi, kvazaŭ ĉirkaŭ palaco de nuboj, la konscion de nescienco leviganta; sed la humila hundo devas ĝin elklarigi en kelke da tagoj, kaj tamen antaŭ okuloj de dio ĉionscianta; ĉu ĝi ne havas preskaŭ saman pezon kaj saman valoron kiel la nia?

Decis, do, studi la teron kiun oni povas grati kaj fosi, kaj kiu foje kaŝas surprizajn: terajn kaj blankajn vermojn, talpojn, musojn, grilojn; decis ĵeti kontraŭ la ĉielon, kiu tute ne interesas ĉar nenio en ĝi estas manĝebla, unu solan rigardon kiu nuligos ĝin unu fojon por ĉiam; koni la herbon, la admi-

rindan kaj verdan herbon, la elastan kaj freŝan herbon, kampo por kuradoj kaj ludoj, kuŝejo bonvola kaj senlima.

Decis ankoraŭ fari, konfuze, milojn da konstatoj urĝaj kaj kuriozaj. Decis, ekzemple, sen alia gvido ol doloro, taksi altecon de objektoj de kiuj oni povas sin ĵeti en la malplenon, konvinkigi ke estas vane persekuti preterflugantajn birdojn kaj ke oni ne povas surgrimpigi arbojn por atingi la katojn kiuj vin malsatas; distingi sunbanatajn pecojn kie dormo estas agrablega el tiuj ombraj kie oni frostotremas; rimarki kun miro ke pluvo ne falas interne en la domojn; ke akvo estas malvarma, nelegebla kaj danĝera, dum fajro estas de malproksime bonefika, sed de proksime terura; observi ke herbejoj, farmaj kortoj kaj foje vojoj estas loĝataj de gigantaj estaĵoj kun minacantaj kornoj, monstroj eble bonpensaj, certe silentemaj, kiujn oni povas flari sufiĉe nediskrete, sed kiuj, tamen, ne montras sian kaŝintencon; elpruvi, sekve de humiligaj kaj penigaj spertoj, ke nepermesate estas obei sendistinge ĉiujn leĝojn de naturo en loĝejo de la dioj; kompreni ke kuirejo estas la privilegiita kaj plej agrabla loko en tiu ĉi restadejo, kvankam oni ne povas tie loĝi kaŭze de la kuiristino, rimarkinda sed ĵaluza potenco; certigi ke pordoj estas gravaj kaj kapricaj voloĵoj kiuj foje feliĉigas, sed kiuj pli ofte hermetike fermitaj, mutaj kaj rigidaj, fieraj kaj senkoraj, restas surdaj al ĉiuj petoj akcepti, unu fojon por ĉiam, ke la esencaĵoj de l'ekzistado, la nekontesteblaj feliĉoj, ĝenerale entenataj en marmitoj kaj kaseroloj, estas ne atingeblaj; scii ilin rigardi kun indiferenteco pene akirita, sin ekzercigi en ilia ignorado dirante al si ke ili estas sendube sakraj objektoj, ĉar sufiĉas nur tuŝeti ilin per pinto de lango respektplena por elĉenigi, magie, la unuaniman koleron de ĉiuj hejmaj dioj....

Kaj kion, do, pensi pri la tablo kie tiom da nekompreneblaj aferoj okazas? pri ironiaj brakseĝoj kie malpermesate estas dormi, pri pladoj kaj teleoroj kiuj enhavas jam nenion kiam oni konfidis ilin al vi? pri lampo forĉasanta la mallumon kaj pri fajrujo fortimiganta la malvarmajn tagojn?... Kiom da ordonoj, kiom da danĝeroj, kiom da malpermesoj, kiom da problemoj, kiom da enigmoj kiujn oni devas klasigi en la surŝargita memoro!... Kaj kiel akordigi ĉion ĉi kun aliaj leĝoj, aliaj enigmoj pli vastaj kaj pli imperiaj, kiujn oni portas kun si, en sia instinkto, kiuj aperas kaj malvolvigas de horo al horo, kiuj venas el fundo de la tempo kaj de la raso, invadas la sangon, la muskolojn kaj la nervojn, kaj fariĝas subite pli nerezisteblaj kaj pli potencaj ol doloro, ol ordono mem de la mastro kaj la timo al morto? Tiel, citante nur unu ekzemplon, kiam la horo dormi estas soninta por la homoj, ĉiu estas retiriĝinta en sian niĉon, ĉirkaŭita de mallumoj, de silento kaj de la timiganta soleco de la nokto. Ĉio dormas en domo de la mastro. Oni sentas sin tre malgranda kaj tre malforta antaŭ la ĉeesto de mistero. Oni scias ke la ombro estas plena de malamikoj kiuj ŝoviĝas kaj atendas. Oni suspektas arbojn, venton kiu pasas, kaj lunajn radiojn. Oni volus kaŝi kaj forgesigi sin

VIII^a Internaciaj Floraj Ludoj



A originoj de la Floraj Ludoj devas esti serĉataj en la mezepoko, kiam la kataluna lingvo atingis sian plej altan brilon. Tiam tiu ĉi festo estis partoprenata de la trobadoroj kaj ĝi okazis kun granda soleneco en la reĝaj palacoj meze de la tutlanda nobelaro.

Pro diversaj politikaj kaŭzoj malsupreniris iom post iom la kataluna lingvo kaj kompreneble la Floraj Ludoj sekvis saman vojon ĝis malapero, ĉar vere oni povas diri ke tiom defalis la kataluna lingvo ke ĝi ne plu estis deca esprimilo por spiritaj aferoj. Post kelkaj centjaroj dum kiuj fakte ĝi estas nur parolata, komencas iu poeto balbuti per ĝi siajn kantojn, sed la lingvo restas ankoraŭ plena de neperfektaĵoj.

Tiam, je la duono de la XIX.^a centjaro, kelkaj entuziasmoj de la patra lingvo restarigas sur novaj reguloj la antikvajn Florajn Ludojn kaj ĉiujare estas alvokitaj la poetoj al tiu festo. La rezultatoj de tiu entrepreno estas mirigaj: lingvo de ĉiuj forlasita renaskiĝas plena de vivo; ĝian purigadon komencas la literaturistoj kaj ĝin finas gramatikistoj, ĉar ĉiuj intelektaj homoj estas trenataj al tiu movado, kiu ebligis hodiaŭ la uzon de la kataluna lingvo por ĉiuj elmontraĵoj de la homa scio.

La organizintoj de la V.^a Internacia Kongreso de Esperanto en Barcelono (1909) prave opiniis ke kvankam la stato de Esperanto ne estis feliĉe la sama, ĝi multe povus gajni se oni enkondukus tiun feston en nia movado kaj ili tion faris okaze de la supredirita kongreso. Bedaŭrinde, la festo ne tute enradikiĝis en la esperanta vivo, eble ĉar oni konsideris ĝin kiel plian literaturan konkurson kaj ĝia interna ideo estis nekomprenata de multaj.

«Oni ne komprenis—diris nia kara amiko S-ro Pujulà en sia parolado dum la II.^a Floraj Ludoj—ke en tiu festo la boneco de la verkoj estas konsiderinda, sed ne la ĉefa afero; ke la pli-malpli granda riĉeco de la premioj estas tute flanka detalo, kiu ne povas aŭ ne devas naski emociion; oni ne komprenis ke la objekto de ĝia celo estas la komunio de Popolo kaj Poeto ĉirkaŭ la altaro de Beleco kaj Poezio».

Efektive, tia estas la festo kataluna. Oraj kaj argentaĵaj floroj estas la ordinaraĵaj premioj; el tio devenas la antikva nomo de FLORAJ LUDOJ. Tamen la plej grava el la premioj estas natura floro kiu rajtigas la gajninton elekti Reĝinon de la Festo. Ni konservis tiun ĉi premion en la esperantaj Ludoj ĉar oni ne povas donaci premion pli valoran por la spirito ol floro oferota al fraŭlino kaj ŝin iganta simbolo de la Beleco en festo de Poezio.

Imagu nun la feston. La plej bela salono de la urbo ornamita per flagoj kaj girlandoj. La enurbaj aŭtoritatuloj kaj la juĝintaro eniras en ĝin por prezidi la feston kiun malfermas la urbestro. La nomo de la laŭreato per la na-

Junio 1921 Zinchen Seite 64/65
Kataluna Esperantisto

tura floro estas laŭte sciigata kaj la gajninto, akompanata de ĉiuj eminentuloj, eliras por alkonduki la Reĝinon elektitan. Ŝi eniras de la brako de la poeto, sekvata de Kortego de Amo konsistanta el kelkaj fraŭlinoj same kondukataj de la aŭtoritataj moŝtoj, dum ludas marŝon muzikistaro kaj aplaŭde salutas la publiko. La Reĝino okupas sian tronon kaj la poeto legas la premian verkon. Siavice estas alvokataj ĉiuj gajnintoj kiuj ricevas la premiojn de la manoj de la Reĝino kaj la festo finiĝas per altsenca parolado de la Prezidanto. Kun la sama soleneco kiel por la eniro la Reĝino kaj Kortego forlasas la salonon.

Jen rapide priskribitaj la festo kaj ĝia celo. La «Kataluna Esperantista Federacio» kredis ke estus domage ke tiu festo malaperu el la esperanta movado kaj prenis sur sin la taskon organizi jam sep konkursojn. Ili donis al ni sufiĉe bonajn verkojn por nin konvinki ke ni estas sur bona vojo.

La nunan jaron, ĝi organizas la VIII.^{an} Florajn Ludojn laŭ la sekvantaj reguloj. Ni esperas ke la sukceso estos pli granda ol la antaŭaj tial ke la malhelpaĵoj de la militaj tempoj malaperis kaj tio permesos ke nia festo estu partoprenata, krom de la katalunaj, de multnombraj eksterlandaj samideanoj, kio igos la nunajn Florajn Ludojn plene internaciaj.

Al la esperantistaj verkistoj:

La Komitato de la VIII.^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj vin salutas kaj invitas partopreni en la jenaj konkursoj:

ORDINARAJ TEMOJ

ORIGINALAJ TEKSTOJ:

I.—Originala versaĵo kantanta *Amon*.

II.—Originala *Ama* verko en prozo.

TRADUKITAJ TEKSTOJ:

I.—Traduko de la kataluna versaĵo «El Misteri de la Prada» originale verkita de Joan M.^a Guasch (Vidu la Martan numeron de K. E.)

II.—Traduko de la kataluna prozaĵo «L'Escarment» originale verkita de Josep Carner (Vidu la Martan numeron de K. E.)

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

I.—Premio de Deputita Moŝto D-ro Narcís Pla i Deniel, konsistanta el 100 pesetoj, al la plej bona verko priskribanta popolan tradicion.

II.—Premio de la Grupo «Semo» de «Ateneu Enciclopèdic Popular»: 25 ptoj. al plej bona traduko de la artikolo de D. Martí i Julià «La Patria Universal».

III.—Premio de la Grupo «Barcelona Stelo»: 50 ptoj. al plej bona teatraĵeto taŭga por propagando.

IV.—Premio de la Societo «Nova Sento»: 50 ptoj. al la plej bona versaĵo adaptebla je muziko, inspirita laŭ la «interna ideo», taŭga kiel himno de la Societo «Nova Sento». Ĝi devos konsisti el 2 strofoj enhavantaj 12 liniojn ĉiu.

V.—De «Unió Deportiva», el Girona. Premio: 100 pesetoj. Temo: «Sporto». (La premiita verko iĝos propraĵo de «Unió Deportiva»).

VI.—De S-ro Casià Costal, Direktoro de la «Normala Lernejo por Instruistoj» el Girona. Premio: 25 ptoj. Temo: Verko pri la infana psikologio.

VII.—De Lia Moŝto Markizo de Camps. Premio: Artobjekto. Temo: Laŭvola.

VIII.—De la Grupo «Ĝirona Espero». Premio: 50 ptoj. Temo: Versaĵo al la arbaro «La Devesa» el Girona.

IX.—De la Societo «Marte», el Girona. Premio: Artobjekto. Temo: Laŭvola.

X.—De Lia Moŝto Vicari Capitar de Girona. Premio: 50 ptoj. Temo: Kolekto de fidindaj sciigoj pri la Katolika esperanta movado en la mondo.

XI.—De la Moŝta Katedrala Kanonikaro, el Girona. Premio: 50 ptoj. Temo: Ritma traduko de la latina himno de Pentekosto «Beata nobis gaudia», laŭ Breviarium Romanum.

XII.—De la Rektora Moŝto kaj Klaŭstro de la Tridentina Seminario de Girona. Premio: 50 ptoj. Temo: Enkonduko de Esperanto en la pastrajn seminariojn.

XIII.—De «Grupo Escolar», el Girona. Premio: 25 ptoj. Temo: Esperanto kiel rilatigilo ĉe la internacia studentaro.

XIV.—De la «Unión Gremial y Patronal», el Girona. Premio: 30 ptoj. Temo: Grava utileco de Esperanto por la Komerco.

XV.—De «Coliseo Imperial», el Girona. Premio: 25 ptoj. Temo: Laŭvola.

XVI.—De «Schola Orpheonica», el Girona. Premio: Artobjekto. Temo: Laŭvola.

XVII.—De «Instituto General y Técnico», el Girona. Premio:

50 ptoj. Temo: Radikoj greko-latinaj kiujn enhavas la Esperanta vortaro.

XVIII.—De la Komerca Ĉambro de Girona. Premio: 25 ptoj. Temo: Laŭvola.

XIX.—De Lia Moŝto la Provincestro de Girona. Premio: Artobjekto. Temo: Esperanto kiel spirita rimedo por la solvo de la internaciaj konfliktoj.

XX.—De la Ekscelenca Urbeŝtraro de Girona. Premio: 50 ptoj. Temo: Laŭvola.

Pli da eksterordinaraj premioj eble estos ankoraŭ, aljuĝotaj al laŭvolaj temoj.

Inspiron al ĉiuj por la gloro de nia Literaturo!

Eduard KÜHNEL, *prezidanto*.—D-ro Josep CASANOVAS.—Josep GRAU.—Teo JUNG.—Julio MANGADA.—Estanislau PELLICER, *sekretario*.

Barcelona, Majo 1921.

NOTOJ

I.—La aŭtoro de la plej bona originala versaĵo (*originalaj tekstoj I*) ricevos la volumon pri «Albrecht Dürer» eldonitan de D-ro Nuchter enhavanta 53 bildojn de la famkonata desegnisto. La aŭtoroj de la ceteraj premiitaj verkoj (*originalaj tekstoj II, tradukitaj tekstoj I, II*) ricevos binditan ekzempleron de la verko «Sinjoro Tadeo» pola epopeo de Adam Mickiewicz, majstre tradukita de Antoni Grabowski.

Krome estos donata al ĉiu laŭreato bela atesta diplomo.

II.—Al la aŭtoro de la plej bona teksto (versaĵo aŭ prozaĵo) el la kvar ordinaraj premiitaj verkoj, la Komitato aljuĝos la *Naturan Floron* kaj la rajton elekti Reĝinon de la Festo.

III.—La verkoj prezentotaj devas esti verkitaj en Esperanto.

IV.—La Festo de la VIII.^a Floraj Ludoj okazos en Girona dum la IX.^a Kongreso de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO la proksiman Oktobron.

V.—Al la manuskriptoj, — kiuj devas esti ricevitaj antaŭ la 15.^a de Aŭgusto 1921 de la Sekretario S-ro Estanislau Pellicer en la sidejo de la Kataluna Esperantista Federacio (str. Carme, 30, Barcelona) — oni devas aldoni devizon, kaj sendi en koverto fermita, kiu portos la saman devizon, la nomon kaj adreson de la verkinto.

VI.—Manuskriptoj ne estos resendataj, eĉ se ili alvenis post la datolimo por akcepto de verkoj.

VII.—La membroj de la Juĝontaro partoprenos en neniuj konkursoj.

VIII.—La Komitato publikigos la verdikton per KATALUNA ESPERANTISTO kaj per la esperantaj kaj enlandaj gazetoj kiuj bonvolos ĝin represigi.

sin detenante de spiro. Tamen necese estas vigli; necese estas, ĉe la plej malgranda ekbruo, eliri el sia retirigejo, kontraŭstari nevideblon kaj akre rompi la imponantan silenton de stelaro eĉ kun risko nur sur sin altiri la malfeliĉon aŭ la krimon mallaŭtan. Kiu ajn estas la malamiko, eĉ se ĝi estas homo, tio estas frato mem de la dio kiun oni devas defendi; necesas ataki lin blinde, sursalti lin sur gorgon, planti dentojn, eble sakrilegiajn, en la homan karnon, forgesi prestiĝojn de mano kaj voĉo similajn al tiuj de la mastro, neniam silenti, neniam allasi sin al tento, kaj, perdiĝinte en la nokto senhelpe, plilongigi heroan alarmon ĝis lasta sopiro. Jen la granda devo heredita de prauloj, devo esenca kaj pli forta ol morto, kiun la volo mem kaj kolero de la homo ne povas detrui. Ĝi estas tuta nia humila historio ligita al tiu de la hundo dum niaj unuaj luktoj kontraŭ ĉio spiranta, ĝi estas tuta tiu humila kaj tremiganta historio kiu renaskiĝas ĉiun nokton en la primitiva memoro de nia amiko en la malbonaj tagoj. Kaj kiam, en niaj pli sekuraj loĝejoj, okazas al ni kun nekonvena fervoro ĝin puni, ĝi direktas al ni rigardon kun miranta riproĉo, kvazaŭ esprimante al ni ke ni eraras, kaj ke, se ni malatentas la ĉefan kondiĉon de la interligo kiun ĝi faris kun ni en la tempo kiam ni loĝis en kaverno, arbaroj kaj marĉoj, ĝi restas al ĝi fidela malgraŭ ni staras pli proksime al eterna vero de la vivo kiu estas tiel plena de loĝiloj kaj de malamikaj fortoj.

Sed kiom da zorgoj kaj kiom da studoj por atingi saĝan plenumadon de tiu devo! Kaj kiel ĝi komplikigis de post la tempo de silentaj grotoj kaj de grandaj dezertaj lagoj! Ĝi estis tiel simple, tiam, tiel klare kaj facile! La soleca kaverno malfermigis ĉe flanko de monto kaj ĉio proksimiganta, ĉio moviganta ĉe la horizonto sur ebenaĵoj aŭ arbaroj, estis la ne pridubebla malamiko!... Sed hodiaŭ, oni ne povas scii.... Necesas akordiĝi al civilizacio kiun oni malaprobas, aĝi kvazaŭ komprenante milon da nekompreneblaj aferoj.... Tiel, ŝajnas evidente ke de nun tuta mondo ne plu apartenas al la mastro, ke lia propraĵo konsentas al neklarigeblaj limigoj.... Estas, do, absolute necese ekzakte koni kie komenciĝas kaj kie finiĝas la sakra posedaĵo. Kion oni devas toleri, kion oni devas malhelpi? — Jen vojo kie ĉiu, eĉ malriĉulo, havas rajton trapasi. Kial? — Oni ne scias; ĝi estas bedaŭrinda fakto sed kiun oni devas akcepti. Feliĉe, jen estas kontraŭe, bela vojeto, kaŝita vojeto, kiun povas neniu surpaŝi. Tiu vojeto estas fidela al sanaj tradicioj; grave estas ne malatenti pri ĝi; tra ĝi eniras la malfacilaj problemoj en ĉiutagan vivadon. Ĉu vi volas ekzemplon? — Oni dormas trankvile ĉe suna radio kiu kovras per perloj movigantaj kaj ludetemaj sojlon de l'kuirejo. Porcelanaj potoj amuziĝas sin puŝante kaj renversante reĉproke sur bordo de bretoj ornamitaj per paperaj denttondaĵoj. Kupraj kaseroloj ludas dismovante lummakulojn sur muroj blankaj kaj glataj. Kantetas patrino forno dolĉe lulante

tri marmitojn dancantajn kun feliĉego, kaj tra malgranda truo heliganta ĝian ventron, por moki la bonan hundon kiu ne povas alproksimiĝi, eligas tro ofte fajran langon. Horloĝo kiu tediĝas en sia kverkoligna ŝranko atendant-te ke ĝi sonorigu solenan horon de manĝo, balancigas sian grandan orumitan umbilikon kaj muŝoj kvazaŭ senatente pikas orelojn. Sur brilanta tablo kuŝas kokido, leporo, tri perdrikoj, apud aliaj aĵoj nomataj fruktoj aŭ legomoj: verdaj pizoj, fazeoloj, melonoj, vinberoj, kaj kiuj nenion valoras. La kuiristino malplenigas argentan fiŝegon kaj ĵetas la internaĵojn (anstataŭ ilin fordoni!) en balaajan kestegon. — Oh! la balaaja kesto! neelĉerpebla trezoro, juvelo de la hejmo! Oni havos sian parton delikatan kaj kaŝakiritan, sed ne konvenas elmontri sciadon pri ĝia loko. Estas severe malpermesite iel ĝin tuŝi. Homo tiel malpermesas multajn agrablajn aferojn, kaj vivo estus malgaja kaj tagoj neelporteblaj se necese estus obei ĉiujn ordonojn pri ŝrankoj, pri kelo kaj manĝoĉambro. Feliĉe li estas malatenta kaj ne longe rememoras pri ordonoj de li fordonitaj. Oni trompas lin facile. Oni atingas sian celon kaj oni faras kion oni volas, kondiĉe ke oni scias paciencce atendi la horon. Oni estas submetita al homo kaj li estas sola dio; sed tamen oni havas ja ankaŭ sian moralon personan, precizan, neperturbegblan, kiu laŭte proklamas ke malpermesitaj agoj iĝas justaj se oni efektivigis ilin sen scio de la mastro. Tial, do, fermu ni atentan okulon kiu vidis. Ni ŝajniĝu nin dormantaj kaj revantaj pri la luno. — Jen! oni frapas milde sur bluan fenestron kiu rigardas al ĝardeno. — Kio do estas? — Nenio, krataga branĉo venanta rigardi kion oni faras en kuirejo. — Arboj estas scivolaj kaj ofte agititaj; sed oni ne kalkulas sur ilin, oni povas al ili nenion riproĉi, ili estas nerespondaj, ili obeas al vento kiu tute ne havas principojn. — Sed kio? — Mi aŭdas paŝojn!.... Vigle, orelo levita kaj nazo antaŭen!.... Nel ĝi estas panisto proksimiĝanta al palisaro, dum leteristo malfermas pordeton antaŭ la tilia vico. — Ili estas konitaj, bone.... Ili alportas ion, oni povas saluti ilin; kaj vosto, singardema, balancigas du aŭ tri fojojn, kun protektanta rideto. Alian fojon! Kio ankoraŭ? — Veturilo haltas antaŭ perono. Ha, tio estas pli grava!.... La problemo estas komplika. — Decas antaŭ ĉio insultegi la ĉevalojn, malhumilajn bestegojn, ĉiam dimanĉe vestitajn kaj ĉiam ŝvitantajn, kiuj neniam respondas. Dume oni observas strabe desaltantajn personojn. Ili estas bele vestitaj kaj ŝajnas plenaj de certeco. Sendube ili estas sidiĝontaj ĉe tablo de la dioj. Decas boji sen akreco, kun nuanco de respekto, por montri ke oni plenumas sian devon, sed ke tion oni faras kun inteligenteco. Tamen oni havas ĉiam ian suspekton, kaj dorse de gastoj, kaŝe, oni flaras kun obstino kaj inteligentula mieno, kun celo malkovri kaŝatajn intencojn.

(Daŭrigota)

MAURICE MAETERLINCK

El franca lingvo tradukis

MARIAN SOLĂ

* * *

Eterna Di', Sinjor' de mirindaĵoj:
por ĉi tiuj gracioj delikataj
de Vi verŝitaj sur miljaran teron
per nur unu rigard' de kontentiĝo,
por la steloj helvivaj, malgrandetaj,
por la neĝo sur supr', rozkoloriĝa,
por l'akvo de laget', iĝinta blua,
por la arbeto, kiu ŝajnas tremi,
por la floroj ĉe herbo, tiel timaj,
por la ĉarmo de pomoj vintrotempaj,
por sonor' de novaĵoj roznuancaj,
por la vojetoj preskaŭ nevideblaj,
por la fumovualo de vespero,
faru, Sinjor', ke l'amatino estu
mistera, bela, delikata, milda,
ke ne forkuru, kiam mi ŝin kisos,
ke la kapon ŝi turnu hontbedaŭre
esti lasinta la patrinan sinon,
ke estu blanka kaj estiĝu ruĝa,
ke, timigita de folibrueto,
ankoraŭ pli enbraken ŝi rifuĝu
de la amanto, kiun ŝi evitis.

JOSEP CARNER

El kataluna lingvo tradukis

JOSEP GRAU CASAS

Oficiala Parto



KUNVOKITA de la Direkta Komitato de K. E. F., la 8.^{an} de majo, kunsidis la Konsulta Komitato por pritrakti la projekton de bazoj por la Iberia Esperantista Konfederacio, kiun ni aludis en nia lasta numero, kaj studi diversajn aspektojn de tiu problemo, al kiu la Dua Diskuta Kunveno de Esperantistoj en Zaragoza dediĉos sian plej grandan atenton.

La projekto, kiun por studo ni dissendis al ĉiuj grupoj, estis ŝanĝita ĉe diversaj paragrafoj kaj enkonduko konforme al la deziro de la ĉeestintaj delegitoj kaj leteroj ricevitaĵ de diversaj grupoj, kiuj trafe konsciante la gravecon de la starigota kunliganta organizaĵo, montris tre atentindajn konsilojn, kiuj certe fariĝos realaĵo ĉe la nomita kunveno.

Ni varme rekomendas al grupoj, kiuj ne respondis nek sendis delegiton al tiu kunsido, ke ĉiujfoje kiam ili ricevos demandon pri la problemo, bonvolu ne forgesi esprimi almenaŭ letere sian opinion por ke la rezultato estu ĉiam kiel eble plej konforma al la penso de la plimulto.—LA SEKRETARIO, S. ALBERICH JOFRÈ.

VIII^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

XVII.—De «Instituto General y Técnico», el Girona. Premio: 50 ptoj. Temo: Radikoj greko-latinaj kiujn enhavas la Esperanta vortaro.

XVIII.—De la Komerca Ĉambro de Girona. Premio: 25 ptoj. Temo: Laŭvola.

XIX.—De Lia Moŝto la Provincestro de Girona. Premio: Artobjekto. Temo: Esperanto kiel spirita rimedo por la solvo de la internaciaj konfliktoj.

XX.—De la Ekscelenca Urbeŝtraro de Girona. Premio: 50 ptoj. Temo: Laŭvola.

Pli da eksterordinaraj premioj eble estos ankoraŭ, aljuĝotaj al laŭvolaj temoj. Oni sendu la verkojn al la Sekretario de la VIII^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj, S-ro Eŝtanislau Pellicer, Carme, 30, Barcelona.

Ni aperigas suplementon al tiu ĉi numero de «Kataluna Esperantisto», enhavantan ĉiajn detalojn pri la nunaj Floraj Ludoj. El ĝi ni presigis grandan kvanton da ekzempleroj, abunde dissendotaj al ĉiuj landoj por igi nian Literaturan Feston plene internacia.

ENLANDA MOVADO

BARCELONA.—La Komerca Ĉambro de la kataluna ĉefurbo, sciigata de K. E. F. pri la decido de la Komerca Ĉambro de Parizo rilate la instruadon de nia lingvo, decidis en sia kunsido okazinta la 5.^{an} de Majo esprimi ankaŭ la deziron ke Esperanto estu disvastigata, ĉar ĝi povas faciligi la internaciajn komercajn rilatojn. Tia decido estis afable komunikata al la Sekretario de «Kataluna Esperantista Federacio» kaj publikigata sur la Barcelonaj ĵurnaloj.

—La 1.^{an} de Majo, la anoj de «Aplec Esperanta Grupo» el Sabadell, akompanataj de multaj Barcelonaj esperantistoj, efektivigis interesplenan viziton al nia II^a Specimena Foiro. Vizitinte ĉiujn instalaĵojn, la ĉeestantoj iris saluti la Sekretarion de la Foiro, S-ro Frederic Pujulà, dum multaj jaroj ĉefa pioniro de la kataluna esperantista movado, al kiu oni dankis lian helpon por akceptigi Esperanton de la Foiro kaj lian komplezemon kaj ĝentilecon rilate la nunan viziton. Tre kuraĝigaj vortoj estis interŝanĝataj, precipe pri la tasko farota dum la venonta Foiro kiu eble fariĝos internacia, kaj la samideanoj sin adiaŭis de S-ro Pujulà kun granda entuziasmo, ĝojaj pro la bona akcepto. Dum longa tempo aŭdiĝis tra ĉiuj lokoj de la Foiro nia kara lingvo, ĉar en tiu tago estis permesata la eniro al ĉiu kunportanto de la verda stelo, taŭga kiel invitilo.

MANLLEU.—La Grupo «Esperantista Amikeco» elektis en sia lasta kunsido la jenan Komitaton: Prezidanto: S-ro Jaume Flavià; Kasisto: S-ro E. Castellnou; Sekretario: S-ro J. Terricabras. La nuna sidejo de la Grupo estas: Pl. Bernardí, 10, ĉe la «Societo de Fiŝkaptistoj», kiu tre ĝentile akceptis la samideanojn. Gvidas kursojn S-roj Ramón Espel kaj Bonaventura Noguer. Belega literatura kaj muzika vesperfestado okazis la 17.^{an} de Aprilo, ĉeestata de distingindaj personoj el la loka loĝantaro kiuj tre agrable konstatis la belecon de Esperanto. Finiĝis la festo per propagandaj paroladoj de S-roj B. Noguer kaj Joan Campdelacreu. Nia kara samideano Campdelacreu, kiel urbkonsilanto, esprimis la aliĝon de la Urbestro al la esperantista agado kaj proponis ĝian koran helpon.

PALAFRUGELL.—Sur la ĵurnalo «Baix Empordà» aperis grava kaj lerte verkita artikolo de samideano F. Viver, pri Esperanto kaj ĝia nuna stato en la mondo. Certe tiu artikolo estis tre efika por nia propagando.

—Ĉe «Ateneu Palafrugellenc» oni faras preparajn laborojn por la starigo de nova Esperantista Grupo.

MATARÓ.—Sur «Pensament Marià» aperis ankaŭ bela artikolo por propagando de Esperanto. En la «Piaj Lernejoj» komenciĝis speciala kurso de nia lingvo, ĉeestata de multnombraj lernantoj, sub la gvidado de R. P. Miquel Soy, Skolapiulo.

GIRONA.—Sur la ĵurnalo «El Autonomista» daŭrigas la serion de siaj propagandaj artikoloj nia amiko S-ro Conrad Domènech. Ili atentigas ankaŭ la enurban publikon pri la okazo en Girona, dum venonta Oktobro, de la IX.^a Kongreso de Katalunaj Esperantistoj. Grupo «Ĝirona Espero» daŭrigas sian gravan laboradon. En kiosko el la «Rambla Alvarez» oni vendas la ĉiusemajnan ĵurnalon «Esperanto Triumfonta».

VALENCIA.—En la «Vegetarana Societo» gvidas novan kurson nia kara samideano Fernando Soler. Li kaj aliaj penas por restarigi ankaŭ en Valencia la esperantajn societojn.

VILANOVA I GELTRÚ.—La 15.^{an} de Majo alveturis tiun urbon samideanoj Gili, Pellicer, Amades kaj Grau. Ili intervidiĝis kun S-ro Gustau Galceràn kaj F-inoj Eulalia kaj Teresa Rosell, kiuj fervore celos revivigi la lokan Grupon kaj varbi novajn federacianojn. Ni esperas ke niaj eminentaj geamikoj el Vilanova baldaŭ sukcesos.

EKSTERLANDA MOVADO

La X^a Internacia Konferenco de la Ruĝa Kruco en Genève alprenis en sia plenkunsido de 7 aprilo jenan rezolucion, laŭ propono de la ĉina delegito S-ro D-ro Wong :

Konsiderante, ke la malfacileco de la lingvoj malhelpas sufiĉamaniere la realigon de la internacia idealo de l' Ruĝa Kruco, ĉu en la verko de helpo sur la batalkampoj, ĉu en tiu de la militkaptitoj, ĉu eĉ en la kongresoj de la Ruĝa Kruco, —

la X^a Konferenco invitas ĉiujn organizaciojn de la Ruĝa Kruco kuragigi al la lernado de la helpa lingvo Esperanto inter siaj membroj, precipe inter

la junulaj sekcioj, kiel unu el la plej potencaj rimedoj de internacia interkonsento kaj kunlaboro en la sfero de l' Ruĝa Kruco.

La propono de la ĉina delegito estis subtenata de la serba, germana, pola kaj svisa delegitoj.

Jen nova venko, pri kiu ni povas vere ĝoji.

—La Ĝenerala Asocio de Inĝenieroj de Publikaj Laboroj kaj de la Ŝtato, kaj tiu de Inĝenieroj de la Pariza Urbestro, ĵus decidis:

«Ni estas konvinkitaj, ke akcepto de helpa lingvo Esperanto por la internaciaj rilatoj havos gravegajn sekvojn, speciale de la vidpunkto de la progreso de la tekniko, permesante vastigi la konon pri la franca tekniko ekster Francujo, kaj sekve, vastigi la agadkampon de la francaj teknikistoj alilande.

Ni voĉdonas:

1.^e Ke oni enkonduku instruon de ĉi tiu lingvo, majstra verko pro logiko kaj simpleco, almenaŭ fakultative, en la programoj de la publikaj lernejoj kaj en tiu de la teknikaj kaj specialaj lernejoj;

2.^e Ke, por la internaciaj Kongresoj, ĝi estu adoptata kiel oficiala lingvo, samrajte kiel naciaj lingvoj, ĝis kiam la sperto konfirmu ke ĝi estas kapabla esti la sola oficiala lingvo;

3.^e Ke la direktoroj de teknikaj kaj sciencaj eldonejoj kaj Revuoj atentu pri la profito de ili atingota per uzo de ĉi tiu lingvo por siaj eldonataĵoj destinitaj al aliaj landoj;

4.^e Ke, dume, la teknikistoj sin metu en kondiĉoj utiligi ĉi tiun lingvon por siaj rilatoj kun fremdaj kolegoj, kaj konigu al ĉi tiuj tuj, ke ili estas pretaj uzadi ĝin;

5.^e Ke la Asocioj de teknikistoj entreprenu formadon de vortaroj pri siaj specialaj fakoj teknikaj esperante.

Pro ĉi tiu lasta punkto, la du Asocioj nomis Komisionojn por fari ĉi tiun laboron.

—La 10^{an} de aprilo la Kremona Esperantista Grupo organizis solenan kunvenon en Teatro Ponchielli (la plej vasta de la urbo).

Ĉeestis kelke da miloj da Kremonanoj el ĉiuj klasoj kaj partioj kiuj varme aplaudis A. Mandelli, prez. de Kremona Esp. Grupo, D-ron A. Filippetti, urbestron de Milano, komandanton A. Alessio kaj pastran moŝton prof. Carolli.

Oni voĉdonis unuanime jenan tagordon: «La popolo de Kremona sole ne kunveninta en Teatro Ponchielli aligas Esperantismon kaj bondeziras baldaŭan enkondukon de Esperanto-instruado en la publikaj lernejoj». Tre favora estas la urbestro.

Detalan informadon pri eksterlanda movado ni daŭrigos en la venonta numero.

Bibliografio

VIVO DE ZAMENHOF, aŭtoro Edmond Privat, eldonita de Brita Esperanto-Asocio, 1920. — Kvankam multajn belegajn verkojn ĝue mi legis, kiujn oni povas citi kiel pruvojn de la brila vivo de nia lingvo, mi devas deklari ke neniuj impresis min tiel profunde kiel VIVO DE ZAMENHOF de Edmond Privat. Pli indan fundamentan ŝtonon ne povus esti elektinta la Brita Esperanto-Asocio, sur kiu bazi la gloran monumenton al Bolingbroke-Mudie entreprenitan de la Brita Esperantistaro per eldono de serio da bonaj esperantaj verkoj.

La reliefa signifo de Edmond Privat en la literatura kampo de nia lingvo liberigas min el la devo recenzi la verkon laŭ la lingva, stila kaj literatura vidpunktoj. Ĉiu esperantisto ja scias ke Edmond Privat estas unu el niaj plej gloraj literaturistoj kaj tial VIVO DE ZAMENHOF, ĉar lia, nepre devas esti verko literature belega, stile ĉarma kaj alloga, lingve perfekta. Tiela ĝi estas.

Sed ne tiom ĝia literatureco estas alloga kiom la fervora fideleco kun kiu la talenta aŭtoro ame skizas la genian figuron de la Majstro kaj la kortuŝanta esprimmaniero per kiu li penas supermontri la ĉefan Zamenhofan vivcelon, kies estas lingvo internacia nura pero, kaj sukcesas atentigi la leganton pri la *interna ideo de Esperanto*. Leginte tiun verkon, oni sin sentas ne nur esperantisto sed ankaŭ homarano.

Ĉiu esperantisto devus legi kaj relegi la VIVO DE ZAMENHOF: literaturamantoj por la plezuro ĝui ĝian fluan, brilan, belstilan Esperanton, kaj la propagandistoj por sin saturi je l' fervoro, konstanteco kaj sindonemo de Zamenhof, tiel majstre elmontritaj de Edmond Privat, kiujn postulas ilia apostolado.

KATONO



Dum la kompostado de tiu ĉi numero okazas en Zaragoza la Dua Diskuta Kunveno de Esperantistoj de Iberiaj Landoj pri kiu ni raportos en venonta numero.



ESPERANTAJ GAZETOJ

ricevitaj en nia Redakcio, publike legeblaj ĉe la legoĉambro de «Enciklopedia Popola Ateneo», Carme, 30, sidejo de K. E. F.

Franca Esperantisto

Le Monde Espérantiste

Esperanto-Praktiko

Itala Esperantisto

La Marto

La Semisto

Germana Esperantisto

Hispana Esperantisto

Internacia Komerca Revuo

Esperantista Laboristo

Kristana Espero

Verda Utopio

Vegetarano

Espero Katolika

Homaro

La Esperantisto

La Laborista Esperantisto

Esperanto

Hungara Esperantisto

Esperanto Triumfonta

Nova Tempo

Literaturo

Portugal Comercial e Industrial (Esperanta Fako)

The British Esperantist

Nederlanda Esperanto

La Verda Ombro

Amerika Esperantisto

Ni dankos sendadon de la ceteraj esperantaj gazetoj.

ANONCETOJ PRI KORESPONDADO

S-ro Fausto Mendiri, Cabras, 7, 2.^{on}, Barcelona, il. pk.

S-ro Isidre Torrents, Mallorca, 558, 3.^{er}, 2^a, Barcelona, l. kaj il. pk.

S-ro Artur Domènech, Cabanyes, 81, 1.^{er}, 1.^a, Barcelona, leterojn kaj pk. kun rusaj ruĝuloj.

Ĉiu esperantisto devas posedi la faman verkon de D-ro Edmond Privat,

VIVO DE ZAMENHOF

AGENTO POR KATALUNUJO:

Esperanta Societo "PACO KAJ AMO"

STRATO ASTURIAS, 1 — BARCELONA

PREZOJ	{	Broŝurita. . . .	Ptoj.	4'00	—	Afrankite	4'50
		Lukse bindita.	>	6'50	—	>	7'00

Speciala rabato al Grupoj kiuj mendos almenaŭ dek ekzemplerojn.

Poŝtmandatojn oni adresu al S-ro

LLUIS DOMÈNECH, strato Laforja, n.º 51 — BARCELONA

ESPERANTO TRIUMFONTA

ĈIUSEMAJNA ĴURNALO

nur esperante redaktata, kun interesaj
sciigoj pri la esperantista movado.

Eldonanto TEO JUNG

KÖLN - HORREM

Germanujo

POŜVORTARETO

ESPERANTO-CATALÀ
CATALÀ-ESPERANTO

Restas nur 100 ekzempleroj.

Se vi ne ĝin havas ankoraŭ, mendu
ĝin tuj al K. E. F.

PREZO: PTOJ. 0'50

(Al la Grupoj 20 % da rabato).

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

DUA EPOKO - JARO 1^a : JULIO 1921

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

OFICIALA ORGANO DE "KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO"

JARKOTIZO: 5 PESETOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: CARMÉ, 30 - BARCELONA

REDAKTOROJ

JAUME GRAU, ĈEF-REDAKTORO

S. ALBERICH JOFRÉ

ARTUR DOMÈNECH

ROMÀ GUARDIET

ĈIUJN VENDREDOJN, JE LA 10^a VESPERE, OKAZAS REDAKCIA KUNVENO.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administracio :
Carme, 30 : BARCELONA

Nia devizo: *Maro estas guto*

Optimismo



GRABLAN ŝciigon ni kredas doni al la legantoj de KATALUNA ESPERANTISTO, anoncante ke jam de la nuna numero nia kara gazeto estos, kiel antaŭe, dekspaga. Post nur duonjaro de ĝia nova vivo, estas ĝoje konstati ke tia plibonigo estis ebla.

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO preskaŭ reatinigis sian antaŭan brilon kaj forton. La nuna nombro da federaciaj grupoj estas 392, loĝantaj en 46 urboj kaj vilaĝoj tra la tuta Katalunujo. Estas aliĝintaj al la Federacio 16 vivoplenaj Grupoj, el Barcelono, Sabadell, Terrassa, Girona, Reus, Tarragona, Vendrell, Manlleu, Santa Coloma de Farnés kaj Vilanova i Geltrú.

Post kelkaj monatoj, en Girona, la sukcesego de nia IX.^a Kongreso, kun la hela festo de la Floraj Ludoj, estos impona pruvo de la valoro de nia lingvo kaj de la intenseco de nia enlanda movado.

Tiaj faktoj kuraĝigu nin al persista laboro. Ĉiu varbu al Esperantismo novajn adeptojn kaj al nia organizaĵo novajn subtenantojn. Kaj ni agu ĉiam kun plena certeco ke ni venkos, per senlaca laboro, per obstina fido, per la forto de nia entuziasmo.

J. G.

Nur ni estas pravaj!



UM la pasintaj monatoj Marto kaj Aprilo, okazis en Barcelono «Konferenco pri Transportoj» organizita de la «Ligo de Nacioj» kaj celanta trovi rimedojn al la komplikitaj problemoj pri transportoj; ĉar ĝi estis oficiala kunsido, delegitoj de ĉiuj Nacioj alvenis de la tuta tero kaj dum tagoj kaj tagoj oni diskutadis la problemojn en iliaj diversaj aspektoj. La oficialaj lingvoj de la Konferenco estis la samaj elektitaj de la «Paca Konferenco» t. e. la angla kaj franca, du lingvoj kiuj por esti bone parolataj kaj komprenataj en superaj teknikaj aferoj, bezonas la tutan vivon de individuo.

Kiu tion skribas, dediĉis grandan parton de sia studado al la kono de la cititaj idiomoj, kaj malgraŭ tio, ne kuraĝus fari teknikan paroladon esprimante sin per franca aŭ angla idiomo.

La ĉeestantoj de la Konferenco, delegitoj de diversaj registaroj kaj reprezentantoj de pli malpli 40 malsamaj nacioj, devis paroli la lingvon de 2, kaj en la lastaj kunsidoj la delegito de la hispana ŝtato proponis ke «ĉar la nacioj de hispana lingvo ĉeestantaj la Konferencon estis grandanombre (16 aŭ 18) estu akceptita ankaŭ la hispana lingvo kiel oficiala»—3 lingvoj—. La ĝentileco de la prezidanto akceptis provizore tiun decidon, ĝis definitiva alpleno de la «Ligo de Nacioj», plej supera organizaĵo, en Ĝenevo, kie la italaj reprezentantoj prezentos denove la jam unufoje prezentitan peton «ke ĉar la hispana lingvo estis akceptita, ne ekzistas motivo por rifuzi la italan»—4 lingvoj.—

Tiu rapida memorigo de faktoj, kion pravas? ke nur ni esperantistoj estas pravaj; nur akceptante *neutran* lingvon la popoloj ne sentos la malbone sentitan vipfrapon de patriotismo. La hispanaj delegitoj prezentante sian proponon faris agon tute kontraŭan al la leĝoj de internacia kompreniĝo kaj samtempe pravigis nin..... Ĉu la hispana lingvo havas pli da meritoj ol aliaj pro tio ke ĝi estas la oficiala idiomo de 16 aŭ 18 sendependaj nacioj? Rilate la interesojn de la homaro tio ne estas ja merito: Kiom da loĝantoj estas en la mondo? mil milionoj? Do, la ĥinoj kiuj estas grandnombra popolo rajtas elekti; cetere ekzistas ja pli da vivantoj en ia ĥina provinceto ol en Costa Rica aŭ Guatemala aŭ la tuta Sud-Ameriko.

Ne; ne estas tiu la vojo sekvinda; nek la hispanoj pro la merito de multnacia parolata lingvo; nek la francoj pro la diplomatio paroliteco; nek la angloj pro la ĝeneralkono de sia lingvo; nek

ĥinoj, nek italoj, nek iu ajn, povos neniam akceptigi sian propran lingvon al aliaj popoloj. Nur neŭtrala lingvo estos akceptita; nur ni esperantistoj estas pravaj!!!

J. BREMÓN MASGRAU



IX^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio

Girona : 15 - 16 - 17 Oktobro 1921.



Aŭ oficiala komuniko ricevita de la Organiza Komitato de nia IX.^a Kongreso, aŭtable akceptis esti ĝia

Honora Prezidanto
Lia Reĝa Moŝto Alfonso XIII.

Ni danku tiun honoron, konsiderante ke la alta prezido de la Reĝo signifas la helpon de ĉiaj aŭtoritatoj al la sukceso kaj soleco de nia festo.

Estas jam eldonitaj belegaj glumarkoj de la Kongreso kaj Floraj Ludoj, kun alegorioj pri la historia urbo Girona. Diverskoloraj serioj de tiuj markoj, arte desegnitaj kaj tre taŭgaj por propagando, estas aĉeteblaj ĉe la O. K.

Oni komencis la unuajn laborojn por la presado de esperanta gvidlibro, kun riĉaj ilustraĵoj kaj detalaj informoj pri la Kongresurbo.

Por la aranĝota Ekspozicio de ĉiuspecaj esperantaĵoj, per kies graveco oni intencas efike impresi la publikon, ĉiuj helpemaj samideanoj estas petataj sendi tuj la plej grandan kvanton da materialo. Al la helpantoj oni donacos diplomon ateston pri partopreno.

Pri ĉio rilatanta la Kongreson, adresu al: S-ro Francisco Hil, Parque Divisionario n-ro 7, Girona.

Pri la morto de hundeto

(Fino)



SED paŝoj timemaj nun sonas ĉirkaŭ kuirejo. Tiun ĉi fojon estas malriĉulo trenanta sian korpon: esenca malamiko, rekta ido de tiu vaganta ĉirkaŭ la kaverno plena de ostoj kiun oni revidas subite en la memoro de la raso. Ebria pro indignado, la bojado raŭka, dentoj multobligitaj de malamo kaj furiozo, oni ekiras mordi la nerepacigeblan malamikon, kiam kuiristino, armita per sia balailo, sceptro antikva kaj sorĉa, ekprotektas la peridulon; kaj oni estas devigata reeniri en sian niĉon, kie, okulo plena de flamoj senpovaj kaj profundaj, oni grumbblas terurajn sed vanajn malbenojn, samtempe pensante ke estas fino de ĉio, ke ne plu estas leĝoj kaj ke homa speco perdis komprenon pri justo kaj maljusto.....

Ĉu tio estas ĉio? — Ne ankoraŭ, ĉar plej malgranda vivo kunmetigas el sennombraj devoj, kaj estas longa laboro organizi al si feliĉan ekzistadon ĉe limoj de du mondoj tiel malsamaj kiel mondo de bestoj kaj mondo de homoj. Kiel ni farus se ni devus servi, restante tamen en nia sfero, diaĵon ne plu imagan kaj similan al ni mem ĉar ĝi estas naskita de niaj pensoj, sed dion bone videblan, ĉiam ĉeestantan, ĉiam aktivan kaj tiel fremdan, tiel superan al nia estajo kiel ni estas tiaj antaŭ hundo?

Nun, revenante al PELLÉAS, ĝi scias preskaŭ kion oni devas fari kaj kiel kondukti en hejmo de la mastro. Sed la mondo ne finiĝas apud la pordoj de domoj, kaj trans muroj kaj palisaro ekzistas universo kies gardon oni ne havas sur sin, kie ne plu estas hejme, kie la rilatoj estas ŝanĝitaj. Kiel kondukti en la strato, en la kamparo, en la vendohalo, en la magazenoj? Sekve de malfacilaj kaj delikataj observadoj, ĝi komprenas ke oni ne devas obei la fremdulajn alvokojn, ke oni devas esti ĝentila kun indiferenteco kontraŭ nekonatuloj vin karesantaj. Necese estas ankaŭ konscie plenumi iajn devojn de mistera ĝentileco kontraŭ siaj fratoj la ceteraj hundoj, respekti la kokinojn kaj anserojn, kvazaŭ ne rimarki la kukojn de la sukerajisto kiuj lokiĝas insulteme tro proksime de la lango, atesti antaŭ la katoj, kiuj, sur pordaj sojloj, vin provokas per malbelaj grimacoj, malŝaton silentan sed rememorantan, kaj ne forgesi ke estas permesite kaj eĉ laŭdinde persekuti kaj sufoki musojn, ratojn, sovaĝajn kuniklojn kaj ĝenerale ĉiujn bestojn (oni devas ilin rekonii laŭ sekretaj signoj) ankoraŭ ne paciĝintajn kun la homo.

Ĉio ĉi tio kaj tiom da aferoj ankoraŭ!... Ĉu mirige estas ke PELLÉAS ŝajnis ofte meditema kontraŭ tiuj sennombraj problemoj, kaj ke ĝia humila kaj milda rigardo estis foje tiel profunda kaj grava, tiel peza de zorgoj kaj tiel plena de nelegeblaj demandoj?

Vel ĝi ne havis la sufiĉan tempon fini la pezan kaj longan taskon kiun la naturo postulas al instinkto leviganta por apudigi al pli hela regiono..... Malsano tre mistera kaj kiu ŝajnis speciale puni la solan beston sukcesintan eligi el sia naskiĝo-sfero, nedifinita malsano kiu detruas po centoj la inteligentajn hundetojn, metis finon al destinoj kaj feliĉa edukado de PELLÉAS. Mi vidis ĝin, dum du aŭ tri tagoj, kaj jam ŝanceligantan sub grandega pezo de morto, ĝojigi ankoraŭ je plej malgranda kareso..... Kaj nun tiom da penoj por iom pli da lumo, tiom da ardo por ami, da kuraĝo por kompreni, tiom da bonvola ĝojo, tiom da bonaj kortuŝantaj rigardoj turnitaj al homo por peti helpon kontraŭ maljustaj kaj neklarigeblaj suferoj, tiom da malfortaj bri-
loj venantaj el profunda abismo de mondo kiu tute ne estas la nia, tiom da malgrandaj kutimoj preskaŭ homaj malĝoje ripozas sub larĝa sambuko kaj en malvarma tero, en angulo de ĝardeno.....

La homo amas la hundon sed kiom pli li amus ĝin-se li konsiderus, ke en refleksebla amaso da leĝoj de l' naturo, estas tiu amo la ŝola escepto kiu sukcesas transiri, por proksimiĝi al ni, la murojn cetere nepenetreblajn, kiuj apartigas la specojn! Ni estas solaj, absolute solaj sur tiu hazarda planedo, kaj inter ĉiuj formoj de la vivo nin ĉirkaŭantaj, eĉ ne unu, escepte la hundon, estas aliginta al ni. Iuj estaĵoj nin timas, plej granda parto ignoras nin, kaj neniun nin amas. Ni havas, en mondo de plantoj, sklavojn mutajn kaj senmovajn, sed ili servas al ni kontraŭvole. Ili submetiĝas simple al niaj leĝoj kaj nia jugo. Ili estas senpovaj malliberuloj, viktimoj nekapablaj forkuri sed silente ribelaj, kaj tuj kiam estas ellasitaj ili rapidas nin perfidi kaj reiras al sia iama libereco sovaĝa kaj malbonfara. Se ili havus flugilojn, la rozo kaj tritiko forflugus je nia apudiro kiel forflugas la birdoj. Inter bestoj, ni kalkulas kelkajn servistojn nur subigintajn pro indiferenteco, pro malkuraĝeco aŭ pro malsaĝo: ĉevalo nesindona kaj maldiligenta obeanta nur al doloro; anaso pasiva kaj malgaja kiu restas apud ni nur ĉar ne scias kion fari aŭ kien iri, sed kiu tamen gardas, sub vilaĝana aspekto, sian subintencon; bovino kaj bovo, feliĉaj ĉar ili manĝas kaj obeemaj tial ke de post jarcentoj ili ne havas propran pensajon; ŝafo konfuzita kiu nur la timon havas kiel mastron; kokino fidela al la korto ĉar oni trovas tie pli da maizo kaj tritiko ol en la proksima arbaro. Mi ne parolas pri kato por kiu ni estas nur kaptajo tro granda kaj nemangebla, pri sovaĝa kato kies oblikva malŝato toleras nin nur kiel embarasantajn parazitojn en nia propra loĝejo. Ĝi, almenaŭ, malbenas nin en sia mistera koro, sed ĉiuj aliaj vivas apud ni kiel ili vivus apud rokaro aŭ apud iu ajn arbo. Ili tute ne amas nin, ne konas nin, apenaŭ nin rimarkas. Ili ignoras nian vivon, nian morton, nian foriron, nian revenon, nian malgajon, nian ĝojon, nian rideton. Ili tute ne komprenas eĉ sonon de nia propra voĉo de la momento kiam ĝi ne plu minacas, kaj kiam ili rigardas nin, tio estas kun la malkonfida timo de ĉevalo, tra kies okulo pasas ankoraŭ la

bildo de la vipo, aŭ kun la melankolia stulteco de remaĉuloj kiuj nin konsideras nur kiel momentan kaj senutilan akcidenton de l' herbejo.

De post miloj da jaroj ili estas apud ni tiel fremdaj al niaj pensoj, al nia amikeco, al niaj moroj, kvazaŭ la malplej frata el steloj nur de hieraŭ estus lasinta ilin fali sur nian globon. En la spaco sen limoj apartiganta la homon el ĉiuj ceteraj estaĵoj, ni sukcesis efektiviĝi al ili per penado kaj pacienco, nur du aŭ tri iluziajn paŝojn. Kaj se morgaŭ, ne aliĝante iliaj sentoj koncerne nin, naturo donus al ili la inteligenton kaj armilojn necesajn por nin venki, mi konfesus ke mi malfidus la koleran vengemon de ĉevalo, la obstinan revengon de la anaso kaj la rabian malamon de ŝafo. Mi forkurus el kato kiel mi forkurus el tigro; kaj eĉ bona bovino, solena kaj revema, inspirus al mi nur singardan konfidon. Kaj pri kokino, la okulronda kaj rapida, kvazaŭ ĉe malkovro de limako aŭ vermo, mi estas certa ke ĝi min formangus senhezite.

Nu, en tiu indiferenteco kaj tiu tuta malkompreniĝo en kiuj vivas ĉio nin ĉirkaŭanta, en tiu ĉi mondo nekomunikebla kie ĉio havas sian celon hermetike fermitan en si mem, kie ĉiu destino estas limigita en si, kie inter estaĵoj ne ekzistas aliaj rilatoj ol tiuj de ekzekutistoj al viktimoj, de manganĵoj al mangatoj, kie nenio povas eliri el sia fermita sfero, kie nur morto starigas kruelajn rilatojn de kaŭzo al efekto inter vivoj najbaraj, kie plej facila simpatio neniam faris konscian salton de unu speco al alia, sole, inter ĉio spiranta sur tiu ĉi tero, unu besto sukcesis rompi la fatalan baron, elŝteliĝi el si por alsalti al ni, tratanĉi definitive la grandegan zonon el mallumoj, el glacio kaj silento izolantan ĉiun kategorion de ekzistaĵoj en la nekomprenebla plano de naturo. Tiu besto, nia bona familia hundo, kvankam simpla kaj malmulte miriganta ŝajnas al ni hodiaŭ ĝia faro, proksimiĝante tiel videble al mondo en kiu ĝi ne naskiĝis kaj por kiu ĝi tute ne estas destinita, estas tamen plenuminta unu el plej ne oftaj kaj plej neverŝajnaj agoj troveblaj en la ĝenerala historio de la vivo. Kiam tiu ekkono de la besto pri la homo, kiam tiu eksterordinara transpaso de ombro al lumo efektiviĝis? Ĉu ni elserĉis la pudelon aŭ la leporhundon ĉe lupoj aŭ ŝakaloj aŭ ĝi propramove venis al ni? Ni pri tio scias nenion. Tiel longe kiel etendiĝas homaj analoj, ĝi estas apud ni kiel nun; sed kio estas homaj analoj antaŭ la tempo sen atestantoj? Jen oni renkontas ĝin ĉiam en niaj loĝejoj tiel malnovan, tiel perfekte alkonformiĝintan al niaj moroj, kvazaŭ ĝi estus aperinta en tiu tero kaj tiel kiel ĝi nun estas, samtempe kun ni. Ni tute ne devas akiri ĝian konfidon nek ĝian amikecon, ĝi naskiĝas nia amiko; okuloj ankoraŭ fermitaj, ĝi kredas jam al ni; de antaŭ sia naskiĝo ĝi sin donis al homo. Sed vorto *amiko* ne ĝuste pentras ĝian fervoran kulton. Ĝi amas kaj adoras nin kvazaŭ ni eltiris ĝin el la neniaĵo. Ĝi estas antaŭ ĉio nia kreaĵo plena de dankemo kaj pli sindona ol la pupilo de niaj okuloj. Ĝi estas nia sklavo intima kaj pasia,

kiun nenio malkuraĝigas, al kiu nenio malplaĉas, en kiu nenio detruas la ardantan fidon nek la amon. Ĝi estas solvinta per admirinda kaj frapanta maniero la timigan problemon kiun devus solvi la homa saĝeco se dia raso ekokupus nian globon. Ĝi lojale, honeste, nerevokeble, rekonis superecon de la homo kaj liveris sin al li korpe kaj anime, sen subintenco, sen bedaŭro, nur rezervante el sia sendependeco, el sia instinkto kaj sia karaktero, la parteton nepre necesan por daŭrigi la vivon antaŭfiksitan de naturo al ĝia speco. Kun certeco, kun senĝeneco kaj simpleco iom surprizantaj nin, juĝante nin pli bonaj kaj pli potencaj ol ĉio ekzistanta, ĝi perfidas, por nia profito, tutan bestan regnon, al kiu ĝi apartenas, kaj neas sen skrupuloj sian rason, siajn proksimulojn, sian patrinon kaj eĉ siajn idojn mem.

Certe estas ke inter ĉiuj inteligentaj kreaĵoj kiuj havas rajtojn, devojn, celon kaj destinton, hundo estas besto vere privilegiita. Ĝi okupas en tiu ĉi mondo unikan kaj enviindan situacion. Ĝi estas sola vivanta estaĵo kiu trovis kaj akceptas dion nedubeblan, tuŝeblan, neforlaseblan kaj definitivan. Ĝi scias al kio sin dediĉi kaj al kio sin doni. Ĝi ne devas serĉi povon perfektan, superan kaj senfinan en mallumo, sinsekvaj mensogoj, hipotezoj kaj revoj. Tiu staras tie, antaŭ ĝi kaj ĝi moviĝas en ties lumo. Ĝi konas la superegajn devojn de ni nekonatajn. Ĝi havas moralon preterirantan ĉion kion ĝi malkovras en si mem, kaj kiun ĝi povas praktiki sen skrupulo kaj timo. Ĝi posedas la veron en ĝia pleneco. Ĝi havas idealon pozitivan kaj certan.

Kaj jen kiel, antaŭ kelkaj tagoj, antaŭ ĝia malsano, mi vidadis mian malgrandan PELLÉAS, sidantan apud mia labortablo, la vosto zorge faldita sub kruroj, la kapo iom klinita por pli bone min demandi, samtempe atenta kaj trankvila, kvazaŭ sanktulo en ĉeesto de Dio. Ĝi estis feliĉa per feliĉeco kiun ni eble neniam konos, ĉar tiu feliĉeco naskiĝis el rideto kaj aprobo de vivo nekompareble pli alta ol ĝia. Ĝi tie kuŝis studante, absorbante ĉiujn miajn rigardojn kaj grave respondante, kvazaŭ egalulo, por instrui al mi sendube ke almenaŭ per okulo, la organo preskaŭ nemateria kiu transformis en bonvolad inteligentecon la lumon kiun ni ĝuis, ĝi sciis bone diri al mi ĉion kion amo devas diri. Kaj ĝin vidante tiel, juna, ardanta, kaj kredanta, alportanta al mi, iel, el fundo de senlaca naturo, novaĵojn tute freŝajn el la vivo, konfida, mirigita kvazaŭ ĝi estus el sia raso la unua ĵus ekpaŝinta la teron kaj ke oni estus ankoraŭ en la virgaj tagoj de mondo, mi enviis la gajecon de ĝia certeco kaj diris al mi ke hundo kiu trovis bonan mastron estas pli feliĉa ol tiu kies destino flosas ankoraŭ ĉie en la ombro.

MAURICE MAETERLINK

El franca lingvo tradukis

MARIAN SOLÀ

La mila jaro

Estis la tempo, kiam sur la flavaj
montflankoj neĝon la veter' delasis;
rapidflugante, en multopoj ravaj,
senlandaj birdoj super mar' transpasis.

Pastroj, monaĥoj, en kunec' rapidis
urbojn, preĝante de ĉiel' absolvojn;
ilin infanoj malaperi vidis
de la kasteloj sub la nigrajn volbojn.

Pura disbrulis en fumnub' incenso
tagojn post tagoj antaŭ sanktaltaroj;
nokte abatojn maldormigis penso
pri minacantaj diroj de psalmaroj.

Per voĉo plora sonoriloj plendis;
oro plenigis monaĥejojn vastajn;
kaj la malgaja servutul' atendis
apud kameno fuma tagojn lastajn.

El sur la muro pendigej' lasita
korvojn ne vidis en la nokt' malhela;
kaj ĝis la urbo ĉirkaŭmuregita
sin paŝti venis la anar' gazela.

En hejm' ŝlosita virgulin' fidela
jam ne forbrulis je l' alsopirado
de la paĝio, kies voĉ' miela
amon glosadis apud alta krado.

Dungosoldatoj la armilojn ĵetis,
el la kasteloj malproksimiĝante;
parazitaro sur kampar' vegetis,
la senkulturajn fruktojn sekigante.

Tolo de sako kavalirojn vestis;
polvo kuŝadis sur trofe' batala;
kaj ambrozi' kaj vin' miela restis
en fundo ventra de la kruĉ' kristala.

Urboj, vilaĝoj, kun solec' aspektis;
iloj defalis el la homaj manoj;
vane hebrea la bazar' efektis
per plum', brokat', ermen' kaj filigranoj.

En la haveno—kvazaŭ kota lago—
sulkojn ne lasis sur la akv' veseloj:
lign-raŭpo rodas dum la tuta tago,
ĉarpiojn faris la birdar' el veloj.

Sen pan', sen ŝtipoj hejme, burĝoj, kiujn
je malsatado lunofaz' timigis,
por finkuiri lastan pecon, ĉiujn
la laborilojn en kamen' bruligis.

Alvenis fine tago de teruro:
kaj de nebuloj nigraj ĉirkaŭita
traflugis fajroastro tra lazuro,
lasante la Homaron timigita.

Atingis Okcidenton: ĝia brulo
tra l' kverkaj trunkoj en la supro monta
aspektis kvazaŭ, sub palpebr', okulo
malbrila, por eterne fermiĝonta.

Poste, per ombroj vestkovriĝis spaco;
brilis stelaroj meze de vaporoj;
kaj el kastelo, farmodom', palaco,
forkuris homoj kun singultaj ploroj.

Kun blankiĝintaj laŭ marmor' vizaĝoj,
apud vasaloj en amas', nobeloj
kune miksitaj restis ĉe l' vilaĝoj,
en viv' vestitaj per kadavr-manteloj.

Patrino ĉirkaŭ filetar' etendis
brakojn ameme en la senkonsolo;
dolore ĝeme malsanuloj plendis;
de l' fil' sin kroĉis kadukul' sur kolo.

Popolamasoj en marŝad' malcertaj
fale, leviĝe, sin al temploj puŝis;
nek ia lum' en hejmoj la dezertaj;
kaj siblis vent' kaj pordoj frap-ektuŝis.

Jen fina hor'. Trumpetoj de la juĝo
trifoje nun sonoros por la homoj;
monaĥoj levas sur l' ofero-kruco
Justulon inter nubo de aromoj.

Ripoz' glacia. Kovras per manteloj
 homoj la vidon lumon-rifuzantan;
 kaj pulson sian, kvazaŭ du marteloj
 ambosen frapaj, sentas fortbatantan.

La ruĝaj flamoj de l' kandeloj tremas;
 birdaro nigra sub la templarkaĵoj
 kun bru' sovaĝa dum flugad' sin premas
 kontraŭ la riĉaj de bildar' vitraĵoj.

Kaj al la vivo kun esper' subita
 el ter' leviĝas la amas' timema,
 diskuras,—haltas,—krias terurita,
 —silentas poste—kaj aŭskultas, trema...

Pasis la hor'. Silenton de l' mistero
 nokta malpeze nur venteto ĝenas:
 paco en mond' kaj en ĉiela sfero:
 novjaro estas: ektagiĝo venas.

La spaco bluas; la stelar' fandiĝas;
 kaŭtojn de koko kokkantad' respondas;
 milde nebul' en Okcident' kuniĝas;
 jen Oriente or',—fajr',—sun' jam blondas.

Homar'! Reiru al la viv' volonte:
 vi vidis nur fantomojn de vizio:
 per kruco vin denove ŝarĝu honte,
 ĉar staras malproksime Kalvario.

Malforta kverkarbet' de ĵus verdanta,
 el polv' eligu vian trunkon ĵunan!
 Se vi ne scias pri veter' fulmanta,
 kial jam timi la dehakon nunan?

Se iam kontraŭ Dio vi ribelis,
 sufiĉe vin jam punas nescieco;
 Dio pekinton el la mond' ne pelis;
 konservi lin, Li volas, al virteco.

Ĉar nur la amo estas dia vero,
 pri estontec' terura ne deliru:
 jarcentoj estas sole sur la tero
 ŝtuparo de Jakob'. Homar': Vojiru!

ANGEL GUIMERA

El kataluna lingvo tradukis
 JOSEP GRAU CASAS

Dua Kunveno de Iberaj Esperantistoj — Zaragoza



RE sukcese ĝi okazis de la 26.^a ĝis la 29.^a de Majo pasinta. Samideanoj el preskaŭ ĉiuj Iberaj Landoj ĉeestis, vere kaj harmonie kunigitaj per la frateco de nia esperanta idealo.

La 26.^{an}, matene, efektiviĝis prepara kunsido kaj vespere alvenis la plej granda aro da ĉeestantoj. Ĝojan akcepton faris al la alvenantoj la samideanoj kiuj jam troviĝis en Zaragoza. Nokte, ĉe «Café Ambos Mundos», estis intima kaj agrabla rendevuo.

La 27.^{an}, vendredon, je la 10.^a matene, okazis ĉe «Ateneo» la Malferma Kunsido. La Prezidanto de la Kunveno, nia estimata samideano S-ro Maynar, salutis kun granda emocio la esperantistaron, dezirante al la Kunveno plenan sukceson, kaj aludis pri bedaŭrinda grava malsano de sia filo David, malgraŭ kio li ĝis lasta momento vigle laboris por la okazanta Kunveno. Unuanima aplaŭdo kronis tiujn vortojn, elokventa esprimo de la ĝenerala deziro pri resaniĝo de nia juna kaj inteligenta amiko David Maynar.

Esprimis poste siajn salutojn kaj aliĝon: S-ro Julio Mangada, Direktoro de «Hispana Esperantisto», Komandanto kaj reprezentanto de la Milita Ministro; Joan Gili Norta, Prezidanto de «Kataluna Esperantista Federacio»; Roberto Maraury, el la Komerca Ĉambro de Huesca; Sebastia Chaler, el la Grupoj «Lumon» kaj «Esperanta Junularo» de Terrassa; Pastro Casanovas, Prezidanto de «Ĝerona Espero» kiu invitas ĉiujn al la venonta Kataluna Kongreso en Girona; Benigno de Luna, el la Madrida Grupo, «Zamenhofa Federacio» kaj «Frateco» de El Pardo; Joan Campdelacreu, el «Esperantista Amikeco» kaj Urbeŝtaro de Manlleu; Artur Domènech, el «Barcelona Stelo»; Victor O. de Allende; Vojingenero el la Provinca Deputacio de Biscaia; Francisco Máñez, el la Grupoj de Cheste kaj Valencia; Jaume Grau, el *Kataluna Esperantisto*; Jaume Claramunt, el la Societo «Nova Sento» de Barcelona; Patricio Llano, el la «Grupo de Baracaldo»; Jacinto Comella, el «Vika Esperantistaro»; reprezentanto de «Andaluzia Federacio» kaj Grupoj de Jerez kaj Sevilla; Karl Bartel, Sekretario de Esperanta Societo por Stirio kaj delegito de la Sliria Guberniestro, kiu dankas pro la gastigo de aŭstraj infanoj; Juan Serrano, el la Grupo de Córdoba; Vilardell, Sobré kaj Soler, el Sabadell, reprezentantoj de la Urbkonsilantaro, Komerca Ĉambro kaj

«Aplec Esperanta Grupo»; Manuel Balsells, reprezentanto de «Esperanta Orfeono» el Barcelona; Rômulo S. Rocamora, Prezidanto de «Barcelona Esperanta Societo»; Enric Oliver, Sekretario de «Academia de Jurisprudència i Legislació» el Barcelona.

La Sekretarioj, S-roj Gorgues kaj Llano, legis ankoraŭ pli da aliĝoj de diversaj urbestroj, societoj kaj samideanoj, el kiuj estas citinda tiu de S-ro Saldanha Carreira el Portugalujo. Fine parolis hispanlingve la Urbestro de Zaragoza, kiu esprimis fratan bonvenon al la esperantistoj kaj montriĝis fervora simpatianto kun nia paca idealo, kies esencon li trafe diris. Responde al Sinjoro Urbestro parolis samideanoj Maynar, Allende kaj Bartel kiuj dediĉis al li kaj al la urbo kelkajn ĝentilajn kaj dankajn vortojn. Meze de ĝenerala aplaŭdado la Urbestro forlasis la salonon.

Post kelkaj minutoj komenciĝis la unua Labora Kunsido. Laŭ propono de la Prezidanto, iris okupi ankaŭ la prezidan stradon, F-ino Araceli Artigas, el Huesca; Pastro Josep Casanovas, el Girona, Prezidanto de la Organiza Komitato de la nunjara Kataluna Kongreso, kaj S-ro Gili Norta, Prezidanto de «Kataluna Esperantista Federacio», honore al la ĉarmaj esperantistinoj kaj al la katalunaj samideanoj, tiel grandnombre ĉeestantaj.

Estas diskutataj kelkaj proponoj, el kiuj distingiĝas tiu de S-ro José Artigas, el Huesca, celanta la nedevigan instruon de Esperanto ĉe la «Normalaj Lernejoj», «Institutoj», «Universitatoj», k. t. p. Ĉar jam ekzistas en Hispanujo du Reĝaj Ordonoj rilate tion, kvankam en nesufiĉa grado, la afero estos detale studata kaj oni klopodos realigi la celon esprimitan de S-ro Artigas. Je la 1.^a posttagmeze finiĝis la unua laborkunsido.

Je la 4.^a, estis malfermata ĉe «Palaco de Muzeoj» bela Esperanta Ekspozicio, tre multe vizitata de la enurbaj loĝantoj. Je la 5.^a, okazis ekskurso al «Cabezo de Buena Vista» kie la Zaragoza samideanaro regalis la kunvenanojn per agrabla lunĉo. Nia kara amiko S-ro Allende, el Bilbao, anstataŭis tie la kutimajn vortojn de la nepraj tostantoj, parolante ŝerce tre sprite pri imaga deveno de kelkaj esperantaj radikoj. Post la agrablega ekskurso, paroladis S-ro Julio Mangada ĉe Ateneo pri la interesa temo «Rilatoj inter popoloj», kiun li disvolvis longe kaj bele, kun la supozebla fina konkludo. Varna aplaŭdo premiis lian disertacion.

La 28.^{an}, matene, okazis la lasta Labora Kunsido. Dum ĝi, ĉefe, oni pritraktis la starigon de Ibera Esperanta organizaĵo. S-ro Mangada, el «Zamenhofa Federacio», retiris sian prezentitan proponon kaj anoncis novan, por kies redakto li petis kelkajn minutojn. Dum la intertempo estis legata kaj atente aŭskultata la propono de K. E. F. pri Ibera Esperanta Konfederacio. Preta la teksto de la vona propono de S-ro Mangada, oni pritraktis ĝin kaj

ĝi estis fine unuanime aprokata. Per tio, la Kunveno decidis: Unue: Organizi por la jaro 1922 en Madrid - El Pardo la Unuan Kongreson de Ibero Esperanta Konfederacio, dum kiu estos tiu organizaĵo definitive starigata. Due: Ke la Organiza Komitato de la Konfederacio konsistu el la Komitato de la nuna Kunveno kaj unu reprezentanto de ĉiu Federacio aŭ izola Grupo jam nun ekzistantaj. Ĉar la propono de K. E. F. havis preskaŭ saman celon kiel tiu de S-ro Mangada, iĝas nenecesa ĝia diskutado, sed tamen, laŭ peto de nia prezidanto, la Kunveno rekomendas al la elektita Komitato la studadon de ĝiaj detalaj proponoj. Poste S-ro Rocamora legas interesan verkon pri «Esperanto kaj Pedagogio», kiu estas aplaŭde aprokata. Finiĝas la kunsido per belega kaj saĝa parolado de Vic-prezidanto S-ro Gastón, dankanta ĉies kunlaboradon.

Posttagmeze la Kunvenanoj faris solenan viziton al la Esperanta Ekspozicio kaj admiris la vidindaĵojn de la «Palaco de Muzeoj», kie ĝi estis instalata. Vespere faris paroladon S-ro Miguel Sancho Izquierdo, Profesoro ĉe la Zaragoza Universitato, pri «Esperanto kaj la Internacia Juro», kiun oni aplaŭdis multege.

La 29^{an}, matene, okazis ĉe Ateneo la solena Ferma Kunsido. Ĉeestis ĝin la Rektoro de la Universitato, S-ro Ricardo Royo Vilanova, kiu, glosante la altajn kvalitojn de nia kara lingvo kaj idealan valoron de Esperantismo, faris longan kaj interesplenan paroladon interrompitan tre ofte per entuziasmaj aplaŭdoj. Aŭdiĝis impona ovacio kiam li parolis pri la respekto al ĉiuj lingvoj kiun la spirito de Esperanto plene posedas. Kelkaj samideanoj parolis ankaŭ, inter ili S-ro Allende, kiu tion faris per flua Esperanto kaŭzante tiamaniere fortan impreson ĉe la neesperantaj aŭtoritatuloj. Per koraj vortoj la Prezidanto S-ro Maynar deklaris finita la Kunvenon.

Posttagmeze ĉe la Grupo «Frateco» okazis lasta rendevuo kaj ĉiuj gesamideanoj sin adiaŭis reciproke, promesante rekomenci en siaj lokoj viglan propagandon kaj ĉeesti en venonta jaro la Unuan Iberan Kongreson.

Ni esperas ke ĝi estos ankoraŭ pli granda sukceso kaj ke por tio ĉiuj samideanoj oferos sian tutan helpon.



Oficiala Parto



ONSCIANTE la gravecon de la problemo kiun nia samideano A. Domènech prezentis per sia artikolo aperinta sur la numero de Aprilo, ni kun granda atento studis la aferon laŭ ĝiaj diversaj aspektoj, ĉiuj eksterordinare atentindaj, kaj sukcesis alkonduki niajn celojn al baldaŭa efektiviĝo.

Kiom da fojoj prezentiĝis al ni ĉiuj okazo por malfermi kurson en Ateneoj aŭ kulturaj rondoj, kiujn interesas nia internacia lingvo, kaj kiom da fojoj pro manko de samideanoj kompetentaj ni ne povis liveri al Esperanto novajn adeptojn, kiuj naskiĝus el tiu kulturado ĉiam sukcesplena!

Antaŭ ĉio, nia klopodado turniĝas al la reorganizado de la jam ekzistanta profesoraro, kiu multon povas alporti al nia afero, kaj starigi el la samideanoj, kiuj sin sentas kun energio por plue teni la verdan standardon, vastan kaj taŭgan aron da instruistoj por povi daŭrigi sen timo la entreprenitan propagandon kaj eviti estonte la spertitan fakton, ke eĉ esperantistaj grupoj iafoje ne povis malfermi kursojn pro manko de ties gvidantoj.

Transirante el la grupaj kursoj en la neesperantistajn mediojn, ni volas ke la instruado plivastiĝu kaj havu la eblon libere disvolviĝadi en la rondoj, kiuj sin sentas altirataj al la grava problemo de lingvo internacia kaj kiujn ĝis nun ni nur tre supraĵe povis tenadi ĉe nia flanko pro la konstanta foresto de profesoroj, la solaj kapablantoj por fari el semado frukton veran kaj nutran por la arbo tutmonda.

Krom tio ni organizas por baldaŭa tempo superan kurseton, gvidotan de kelkaj el niaj plej spertaj samideanoj, por prepari tiujn, kiuj deziros prezentiĝi kiel kandidatoj por la profesora titolo en la ekzamenoj okazontaj ĉirkaŭ Septembro kaj pri kiuj ni detale raportos en la venonta numero.

Tiamaniere ni povos scii, kiel potenca estas nia forto rilate la preparolatan sencon, kaj kun pli da kuraĝo estonte ni sendanĝere kaj sentime klopodos enkonduki Esperanton en multajn fakojn kaj povos komenci kursojn en multaj lokoj, kiuj jam diversfoje sin

turnis al ni kun la deziro akcepti la internacilingvan instruadon.

Eksterurbaj samideanoj akcelu vian ellernadon por partopreni la ekzamenojn kaj tiuj enurbaj, kiuj sin sentas studemaj, ne manku en la kelkseĵajna komencota kurso.

De vi ĉiuj dependas la sukceso de niaj deziroj, kiuj samtempe estas ĉies.

S. ALBERICH JOFRÉ, SEKRETARIO

ENLANDA MOVADO

TERRASSA.—Ĵus fondiĝis grupeto «Esperantista Junularo», infana fako de esperanta grupo «Lumon». Post kvarmonata lernado 20 geinfanoj jam korespondas kun eksterlandanoj. Komenciĝis nova kurso por fraŭlinoj.

RIPOLLET.—La 19^{an} de Junio, la grupanoj de «Barcelona Stelo» vizitis la esperantistojn el Ripollet, kiuj frate akceptis ilin akompanataj de la Urbestro, tre favora al nia movado. Estis vizitata la sidejo de la Grupo, kie oni mallonge propagande paroladis kaj oni sin turnis poste al la romarta paroĥa preĝejo, kies vidindaĵojn detale montris la paroĥestro, nia fervora samideano Pastro Planas. Altiris la atenton malgranda altaro al la Virgulino de l' Espero, patronino de la Katolikaj esperantistoj. Fine, oni oferis al la vizitantoj belan lunĉon sub la branĉaro, en la ĉirkaŭaĵoj de Ripollet.

GIRONA.—La 15.^{an} de Junio ĉe Grupo «Ĝerona Espero» oni finis la kursojn brile kaj sukcesplene gviditajn de nia kara samideano Pastro Josep Casanovas. La dimanĉon 19.^{an} oni fotografis la gelernintojn en la ŝtuparoj de la preĝejo Sant Felix kaj antaŭ la romepoka pordo de Sant Pere de Galligans. Poste parolis al la ĉeestantoj Pastro Casanovas kaj la Prezidanto de K. E. F. kiu varme gratulis la gelernantojn pro la feliĉa fino de la kurso ĉiam ĉeestita de pli ol 40 lernantoj. Oni kantis nian himnon kaj akompanis la grupan standardon ĝis la societa sidejo kie denove parolis ambaŭ cititaj samideanoj rekomendante persistemon en la Esperanta laborado. Posttagmeze kunsidis la Komitato de la Kongreso kun la Prezidanto de K. E. F. por pritrakti kelkajn gravajn aferojn pri la venonta Kataluna Kongreso.

XIII^a Universala Kongreso de Esperanto en Praha

31 Julio - 6 Aŭgusto

Resumo de la 8.^a kaj 9.^a Komunikoj

PASPORTOJ: Por la veturo al Praha kaj reveno estas necesa pasporto, pretigita de la poliestrejo aŭ de alia kompetenta ŝtata oficisto, vizita de la ĉeĥoslovaka ambasadejo aŭ konsulejo kaj de la konsuloj de ĉiuj traveturotaj ŝtatoj.

En Hispanujo nur troviĝas ĝenerala konsulejo en Madrido (strato Orfila, 5).

Laŭ decido de la ĉeĥoslovaka ministerio por eksterlandaj aferoj, oni ordonis ĉiujn ĉeĥoslovakajn oficejojn helpi ĉiuokaze la kongresontojn kaj ankaŭ rabati 50 % de la vizpago.

VOJAĜRABATO: Laŭ decido de la fervoj-ministerio oni rabatos 50 % sur la prezo de la ĉeĥoslovakaj fervojoj. Speciala fervoj-legitimacio estos sendata al la pagintoj de la kongres-kotizaĵo.

ALIĜINTOJ: Ĝis lastaj sciigoj de la ĝenerala sekretario de la XIII.^a la nombro da aliĝintoj ĝis la 8.^a de Junio estas 1700, el Eŭropo, Azio, Afriko, Ameriko kaj Aŭstralio.

ADRESO: Por nur prikongresaj korespondaĵoj kaj aliĝoj: S-ro Aug. Pitlik, Nerudova 40, Praha III. (Ĉeĥoslovakujo).

La Prezidanto de Kataluna Esperantista Federacio, S-ro Joan Gili Norta, sin pretigas ĉeesti la internaciajn esperantajn kunvenojn: DRESDEN-PRAHA-BUDAPEST, kie li reprezentos nian katalunan organizaĵon kaj konsekvence la katalunan esperantistaron.

Por «Kataluna Esperantisto» li promesis verki specialajn raportojn pritraktantajn tiujn Kongresojn.

Pro troa materialo, ni estis devigataj prokrasti por la venonta numero la interesajn fakojn «Eksterlanda movado» kaj «Bibliografio».

ESPERANTAJ GAZETOJ

ricevitaj en nia Redakcio, publike legeblaj ĉe la legoĉambro de «Enciklopedia Popola Ateneo», Carme, 30, sidejo de K. E. F.

Franca Esperantisto
Le Monde Espérantiste
Esperanto-Praktiko
Itala Esperantisto
La Marto
La Semisto
Germana Esperantisto
Hispana Esperantisto
Internacia Komerca Revuo
Esperantista Laboristo
Kristana Espero
Verda Utopio
Vegetarano
Espero Katolika
La Esperantisto
La Laborista Esperantisto

Esperanto
Hungara Esperantisto
Esperanto Triumfonta
Nova Tempo
Literaturo
Portugal Comercial e Industrial (Esperanta Fakoj)
The British Esperantist
Nederlanda Esperanto
La Verda Ombro
Amerika Esperantisto
Libero
L'Esperanto
La Revuo Orienta
El Esperanto
Lingvo Internacia

Ni dankos sendadon de la ceteraj esperantaj gazetoj.

ANONCETOJ PRI KORESPONDADO

S-ro Miquel Miralles, Les Fonts de Terrassa, Terrassa - (Hispanujo), deziras interŝanĝi il. p. k. kaj esp. gazetojn.

S-ro Arno Scholze, Haydnstrasse, 10, Dresden — A 16, (Germanujo), deziras interŝanĝi p. m. Respondos tuj.

AVÍS D'ADMINISTRACIÓ

Preguem als senyors delegats se serveixin remetre l'import de les quotes cobrades. Als nostres federats de llocs on no tenim encara delegat, els agraïrem ens remetin la quota directament.

IX^a Kongreso de la

Kataluna Esperantista Federacio

Girona : 15 - 16 - 17 Oktobro 1921

Propagandu nian Kongreson per la glumarkoj eldonitaj en 10 koloroj.

Folio kun 20 malsamaj markoj kostas 0'40 ptojn.

VIN TURNU AL:

S - RO FRANCISCO HIL

PARQUE DIVISIONARIO N.º 7 - GIRONA

ESPERANTO TRIUMFONTO

Ĵurnalo internacia, universala, sendependa. Aperas regule ĉiusemajne en granda gazet-formato.

Teksto nur en Esperanto.

Aĉetebla ĉe kioskoj en Barcelona kaj Girona.

Petu specimenajn numerojn de la eldonanto TEO JUNG - Köln-Horrem (Germanujo).

Internacia

Komerca

Revuo



Monata ilustrita revuo por la tutmonda komerco. Esperanto en la praktika vivo!

Mendu specimenan numeron kontraŭ duobla poŝtkarto (kun pagita respondo)! Jara abono Fr. sv. 7.-

«Internacia Komerca Revuo»,
Zürich (Svisujo) Centra Poŝtfako, 6104.

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

DUA EPOKO - JARO 1^a : AUGUSTO 1921

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

Jarkotizo : 5 Pesetoj

CLAU ESPERANTO

(KATALUNA ŜLOSILO)

reeldonita de K. E. F.

Verdaj kovriloj kun nova propaganda teksto pri la lastaj venkoj de Esperanto.

100 EKZEMPLEROJ

KOSTAS 7'50 PTOJN.

Vin turnu al nia Administristo.

IX^a KONGRESO DE K. E. F.

PROPAGANDAJ GLUMARKOJ

arte desegnitaj, kun belaj alegorioj pri la historia urbo Girona.

Folioj en 10 koloroj
kun 20 malsamaj markoj
Ĉiu folio kostas 0'40 ptojn.

Vin turnu al S-ro F. Hil

Parque Divisionario, n.º 7 - GIRONA

ESPERANTO TRIUMFONTA

Ĵurnalo internacia, universala, sendependa. Aperas regule ĉiusemajne en granda gazet-formato.

Teksto nur en Esperanto.

Aĉetebla ĉe kioskoj en Barcelona kaj Girona.

Petu specimenajn numerojn de la eldonanto TEO JUNG - Köln-Horrem (Germanujo).

Ni rekomendas la verkon de

EDMOND PRIVAT

Vivo de Zamenhof

Volumo I

de la

Libraro Bolingbroke-Mudie
eldonata de

BRITA ESPERANTO - ASOCIO

Petu detalojn al K. E. F.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administracio:

Carme, 30 : BARCELONA

Nia devizo: Maro estas gutaro

Redaktoro: Jaume Grau Casas

Fideleco al la Fundamento



UNTEMPE oni multe legas pri diversaj reformetoj de nia lingvo, kiujn kelkaj samideanoj pretendas enkonduki kvazaŭ ili rajtus ĝeni la ceterajn samideanojn per konstanta proponado de ŝanĝoj kiuj tute ne estas plibonigo.

Estus tre bone se ĉiuj samideanoj ellernus nian lingvon, anstataŭ ol proponi eĉ la plej malgrandan reformon, kaj se ĉiuj relegus atente la Fundamentan Krestomation, kiu tute ne enhavas kvarcent malkorektaĵojn malgraŭ la diro de samideano kuraĝinta aserti tion sur esperanta gazeto.

Oni konsideru ke la ĉefa kondiĉo por nia venko estas plena, absoluta fideleco al la Fundamento de D-ro Zamenhof. Oni ne enkonduku novajn vortojn aŭ esprimmanierojn senutile kaj senbezone. Kaj oni ne forgesu ke la rajto krei vorton estas tute escepta kaj ke tiu ĉi sola ĝin havas, kiu funde scipovas kaj posedas la lingvon.

IX^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio Girona : 15 - 16 - 17 Oktobro 1921.

SENINTERROMPE laboras la Organiza Komitato de nia Kongreso por ĝia soleno kaj brilo. Ni povas antaŭdiri ke ĝi estos grava sukceso el ĉiuj vidpunktoj, ĉefe el tiu de la oficiala apogo kaj partopreno, kiel oni konstatos legante la eminentajn nomojn de ĝia

HONORA KOMITATO Lia Reĝa Moŝto Alfonso XIII, *Prezidanto*.

Lia Ekscelenca Moŝto la Ministro de Publika Instruado.

» » » Sinjoro J. Puig i Cadafalch, prezidanto de «Mancomunitat de Catalunya».

Lia Ekscelenca Moŝto la Civila Provincestro de Girona.

» » » Sinjoro Valenti Carulla, Rektoro de la Barcelona Universitato.

Lia Moŝto la Prezidanto de la Provinca Deputitaro de Girona.

Lia Moŝto Sinjoro Markizo de Camps, senatano.

» » » Francesc d'A. Bartrina, senatano.

» » » Carles Cusi, senatano.

» » » Narcís Pla i Deniel, parlamenta deputito.

» » » Salvador Albert, parlamenta deputito.

Sinjoro Urbestro prezidanto de la Konstitucia Urbkonsilantaro de Girona.

Sinjora Moŝto Direktoro de la Ĝenerala Teknika Instituto de Girona.

Sinjoro Generalo, Militista ĉefo de Girona.

Reverenda Sinjoro Vicari Capitular de Girona.

» » » Rektoro de la Seminario de Girona.

Sinjoro Direktoro de la Normala Lernejo por Instruistoj, de Girona.

Sinjorino Direktorino de la Normala Lernejo por Instruistinoj, de Girona.

Sinjinorino Direktorino de «Escola Graduada».

Sinjoro Direktoro de «Grup Escolar».

La loĝantaro de la kongresurbo interesigas al nia movado kaj la urbaj ĵurnaloj tre ofte raportas pri ĝi, precipe «El Autonomista».

Oni povas certigi ke la literatura festo de la Floraj Ludoj oka-

zos en la bela «Teatre Principal» kaj ke la Urbeŝtraro havigos ankaŭ grandan salonon por instali la Esperantan Ekspozicion.

Ni petas denove la samideanojn bonvolu sendi por ĝi ĉiuspecajn esperantaĵojn al S-ro Francisco Hil, Parque Divisionario, n-ro 7, Girona.



VIII^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj

LISTO DE RICEVITAJ VERKOJ

1.—Secundum Scripturas. 2.—Estontulo. 3.—Ruskinano. 4.—Al senmorta Gerona (*subskribita!*). 5.—Al senmorta Gerona (*subskribita!*). 6.—Konstanteco. 7.—Eduko kaj Kulturo. 8.—La falsa aŭ vera puritanismo de la nuna esperanta literaturo malhelpas ĝian beletristikan disvolviĝon. 9.—Ni amu la pacon de l' Naturo. 10.—Magnificat. 11.—La unua fojo. 12.—Les reines vestien tûniques blanques .. 13.—Sub la verda stelo, ni antaŭen iru. 14.—Nubo mistera. 15.—Gloron al nia Majstro. 16.—En Kristo por la fratoj. 17.—Por Dio kaj eklezio. 18.—Individuo. 19.—Tradicio. 20.—Hortus conclusus pura fons es... 21.—Sunt qui cuvrículo suo... 22.—Homeco : Heroeco :: Infaneco : Viktimeco. 23.—Festina lente. 24.—Festina lente. 25.—Sinite parvulos venire ad me. 26.—La Aeroplano. 27.—Ut omnes unum. 28.—Veni sancte Spiritus. 29.—Karulin' atendu min. 30.—Progreso. 31.—Momo. 32.—Pretigu vian valizon. 33.—Ama elreviĝo. 34.—En sonĝo festenon, mi vidis...

Ni rememorigas ke la 15^a de Aŭgusto estas la datolimo por akcepto de verkoj.

Karakteroj

PAROLULOJ KAJ PENSULOJ



STAS parolartistoj, kiel estas pensartistoj: la oratoroj kaj la pensistoj.

La oratoroj pensas obee al la parolo. La pensistoj parolas obee al la penso.

Ĉe la esprimitaj pensoj la oratoroj facile kaj ŝate kaj plaĉe lernas la parolojn, la esprimojn, dum la pensistoj avide kaptas profunde la pensojn.

La dirbeleco, la esprimfacileco, la parolriĉeco brilas, floras de la oratoroj je malgranda ia penso, kaj eĉ emociiĝas tiuj artistoj konstatante la mirindaĵon ke la parolado igas ilin pensi kaj diri pensojn pli profundajn ol ilia penskapablo povus, antaŭparole. Tamen la pensuloj suferas ke la paroloj malfacile esprimas la profundon de iliaj pensoj, kaj penas diri per paroloj plej ĝuste kaj sincere la pensojn.

Afabla leganto, kiu honoras min per via atento; se vi legis nur la vortojn, bonvolu legi nun la pensojn, ĉar mi ne pensis por aŭ pro la vortoj, sed mi verkis por kaj pro la pensoj, kaj pardonu la postulemon de

DELFI DALMAU



La kataluna ŝlosilo

La fakto ke dum malpli ol tri monatoj estis vendataj 600 ekzempleroj de la Poŝvortareto Kataluna-Esperanta, elmontris la tujan neceson reeldoni la katalunajn propagandilojn.

Konforme al tio, ĵus estas farita de K. E. F. nova eldono de la malgranda kataluna ŝlosilo, kun propaganda teksto sur la kovriloj pri la nunaj sukcesoj de Esperanto, kaj baldaŭ oni entreprenos la eldonon de aliaj samcelaj verketoj. Helpu per aĉeto de ekzempleroj!

Ĉiutage

Sunradioj sur kampojn falas plene.

Restas ĉiel' serene,

je nub', je ĉio sene.

Jen, ŝvitante—:

kamparan'—laboradante;

bovoparo—plugadante.

En flu' verŝiĝas la ŝvit'

de la kapo de l' plugist',

kaj la tero ŝvitgutojn glute prenas

kaj viron danke benas.

Merite ja li penas:

li ŝvitante

iras, teron^u plugante.

Kampara verd' kaj bluo de ĉiel'

longdaŭre kisas sin,

longdaŭre kiel lumohel'.

La griloj kvazaŭ preĝas sen difin'.

Alvenas jam malhel',

kiun dispelos sun'.

Kampoj: ĝis morgaŭ, nun!

EMILI GUANYABENS

El kataluna lingvo tradukis

JOSEP GRAU CASAS

Laŭdo al la Parolo



A parolo estas tio plej ravanta en la mondo, ĉar en ĝi sin alpremas kaj kunfandigas la tuta ĉarmo korpa kaj la tuta spirita ĉarmo de nia naturo.

Ŝajnas ke la tero uzas siajn tutajn fortojn por produkti la homon, kaj ke la homo uzas la tutan forton de sia estaĵo por produktadi la parolon. Vi vidas homon ankoraŭ silentan, kaj vi lin trovas simila al animala estaĵo pli-malpli perfekta ol la aliaj; sed, iom post iom, vivo ekmontriĝas sur lia vizaĝo, ekesprimo plenigas liajn okulojn de spirita lumo, liaj lipoj moviĝas, vibras la aero kun subtila varieco, kaj ĉi tiu materia vibrado, ricevita de la sento, kunportas en sia interno tiun nematerian aĵon vekantan la spiriton: la ideo.

¡Kiel! Ĉu vi aŭdas la brueton de la vento, la bruon de l' akvo kaj la bruegon de la tondro lasantaj en via spirito tre neprecizan senton, kaj sufiĉos ke malgranda infano, kiu nur sin aŭdigas de tre proksime, diru dolĉe «Patrino» por ke—ho, mirindaĵo!—la tuta spirita mondo vibru intensege en la fundo de via koro?

Subtila moviĝo de la aero sciigas al vi la grandan variecon de la mondo, kaj starigas en vi la fortan antaŭsenton de tio nekonata kaj senfina.

¡Ho! ¡Kiel sanktega afero! Diras Sankta Johano: «Je la komenco estis la parolo, kaj la parolo estis en Dio, kaj la parolo estis Dio!»; kaj oni diris ke per ĝi ĉiaj aĵoj estis farataj; kaj ke la parolo iĝis karno kaj loĝadis en ni. ¡Kia abismo de lumo!

Kun kia sankta timo, do, ni devas paroli! Se estas en la parolo la tuta mistero kaj la tuta lumo de la mondo, ni devus paroli ĉiam ravitaj, kvazaŭ blindigitaj; ĉar ne estas vorto—kvankam al ni ĝi prezentu malgrandan signifon—ne devenanta el inspira lumo kaj ne reflektanta ion el la lumo senfina kiu naskis la mondon. Kiel ni povas paroli malvarme kaj tiom abunde? Pro tio ni aŭdas nin, unuj la aliajn, plej ofte, tiel indiferece; tial ke la kutimo troe paroladi kaj troe senti malhelpas al ni konscii la sanktecon de la parolo.

Ni devus paroli malpli multe, kaj nur pro forta deziro je esprimado; kiam la spirito ektemas maturplena kaj fluas la vortoj kiel la floroj burĝonas en Printempo, unu post unu kaj ne en ĉiuj branĉoj, sed en unu bonsorta branĉo; kiam unu branĉo ne plu povas elteni sian internan printempon, tiam meze de la abundaj folioj burĝonas la floro kiel ravanta esprimo. Ĉu vi ne vidas en la kvieto de la kreskaĵoj ilian admiron esti ekflorintaj? Tiele ni, kiam fluas el niaj lipoj la vera parolo.

Tiel parolas la poetoj. Ĉion ili rigardas ravite, poste ili febrigas, fermas la okulojn kaj parolas en la febro; tiam, similaj al Dio en la unua tago de la Genezo, ili diras iun kreantan vorton, kaj el la haoso eliĝas la lumo.

Kaj tiel la parolo de la poeto eliĝas kun ritmo de lumo kaj ritmo de so-

no samtempe, tio estas, kun la ritmo unika de la beleco kreipova: tia estas la dia ĉarmo de la verso.

Sed, forgesemaj ofte je la dieco de la mondo, ni malŝatas la malgrandan aŭ grandan poeton ekzistantan en ĉiu el ni, kaj ni parolas longege sen inspiro, sen ritmo, sen lumo, sen muziko, kaj niaj vortoj elfluas sensignifaj kaj lacigaj, kvazaŭ kreskaĵo disperdiĝanta je sennombraj folioj, nescianta la mirindecon de la floroj kiujn ĝi kunportas en si, neesprimitaj.

Ni lernu paroladi de la popolo. Ni lernu de la paŝtistoj kaj de la apudmaraj loĝantoj. ĴKiom rigardadas unuj kaj aliaj, en silento, la majestecon de la mondo, tie kie la spirito korbata kun granda ritmo! ĴKiom da senmezura grandeco estas reflektintaj iliaj okuloj; kiom da beleco de ĉieloj bluaĵ, de herbejoj verdaj kaj de maroj ofte kolorŝanĝantaj kiel virgulina vizaĝo, de ruĝaĵoj aŭroraj aŭ sunsubiraj, de nebuloj grizaj kaj pluvoj malklaraj! ĴKiom da vento aŭdis iliaj oreloj, kiom da ritmaj ondaroj, kaj la fondroj kiuj alproksimiĝas kaj reforiĝas, kaj la muĝado de la bovoj kaj krioj misteraj tra la spaco! ĴKiom da odoro je saloza akvo kaj herbo freŝa; kaj kiom iliaj sentoj estas ame tuŝitaj de ĉio pura! Iliaj mienoj aspektas kvazaŭ ravitaj de tio kaj vere parolas; sed, kiam ili parolas, iliaj vortoj estas tute sencoplenaj. Ĉu vi ne rimarkis la kant-paroladon de la montaranoj aŭ de la maristoj? Ilia parolo estas muzika, ĉar ĝi naskiĝas pli proksime de la ritma korbato de la kreitaĵo.

Mi memoras tagon ĉe la grandaj altaĵoj Pirenejaj, en plena tagmezo, dum kiu ni antaŭeniris perdiĝinte tra tiuj altaj solecoj. Sur la nuda ŝtono ondarsimila ni estis erarintaj ĉian vojon, kaj vane ni demandis per malkvieta okulo la mutan grandegecon de la montaraj senmovaj. Nur la vento tie laŭtis per nefiniĝebla krio. Subite, en la krio de la vento, ni aŭdis nevideblan tintilaron; kaj niaj timigitaj okuloj, ne kutimiĝintaj al tiaj grandecoj, tre malbaldaŭ ekvidis ĉevalinaron kiu en krutaĵo de malabunda verdeco sin paŝtis. Esperoplenaj, ni aliris tien ĝis ni renkontis la paŝtiston kuŝantan apud la fumanta marmifo, kiun la knabo paŝtist-helpanto, genuoj surtere, kun atento zorgadis. Ni demandis pri vojo, kaj la viro, kiu ŝajnis el ŝtono, turnis la okulojn en sia kvieta vizaĝo, levis malrapide la brakon montrante nedifinitan vojon, kaj movis la lipojn. En la tondranta bruvo de la vento, kiu ĉian voĉon englutis, flosadis nur du vortoj kiujn la paŝtisto ripetadis kun insisto: «Tiu kanalo...» kaj montradis tien, neprecize, en la supron de la montoj. «ĴTiu kanalo!...» ĴKiel belaj estis la du vortoj, en la vento majeste dirataj; kiom plenaj de senco, de poezio! La kanalo estis la savanta vojo, la akvoŭluejo tra kiu defluas la akvoj de la degelintaj neĝoj... Kaj ĝi estis, ne iu ajn, sed «tiu» kanalo, tiu kiun li perfekte distingis el la aliaj; ĝi estis io, ĝi havis animon, ĝi estis *tiu kanalo*... Ĉu vi rimarkas? Por mi, tio estas paroli...

Mi memoras nokton trans la Pireneoj, kiam eliris el la mallumo infanino kantanta per feina voĉo. Mi petis ŝin ke ŝi diru al mi ian vorton en sia propra lingvo, kaj ŝi, tute mirigita, montris la stelbrilantan ĉielon, kaj parolis nur tiel: «La steloj». Kaj ŝajnis al mi ankaŭ ke tio estas paroli.

Mi memoras vesperon sur pinto de la Kantabra marbordo, kie la sunsubiroj estas belaj. Oni iradis tien rigardi la sunon subigantan en la maron; ĉiuj venis parolante; sed, alveninte tien, ĉiu silentadis antaŭ la maro varianta je koloroj. Alvenis du maristoj, ili sin metis antaŭ la senfina marbordo kaj dum longa tempo, unu apud la alia, silentis. Poste, unu el ili, ne moviĝante nek sin turnante al la kunulo, diris al li: «Rigardu». Kaj ĉiuj aŭdintaj tion rigardis antaŭen, vidante ĉiu mirindaĵon propran. Ankaŭ, tio estas paroli: kaj ĉio alia, malplenaj vortoj.

«Tiu kanalo»... «La steloj»... «Rigardu»... Vortoj kiuj kunportas kanton en si, ĉar ili naskiĝas en la ritma korbato de la Universo... Nur la naiva popolo povas ilin eldiri, kaj la poetoj rediri kun naiveco pli intensa kaj pli laŭta kanto: kun lumo pli hele malkovra. Ĉar la poeto estas la homo plej naiva kaj plej scianta el la tero.

Kaj, kiam la poetoj scios, ĝin ellerninte, sian lingvon superbelan, kaj forgesigos al ni ĉiun alian post ol tiu ĉi estos jam forgesita de ili, tiam alvenos ilia regno, kaj ni ĉiuj parolos tiel, ravitaj de la muziko kiu kreas. Ni ĉiuj parolos preskaŭ kantante, per voĉo elirinta el la interno de ĉiu mem, malŝatante la artifikon de la interkonsentitaj lingvoj, kaj ĉiu nur estos komprenata de tiuj kun kiuj li bezonos interkompreniĝi; sed, kiam li parolos, el la fundo de l'animo, kun amo, li komprenigos sin de ĉiuj kiuj kun rava amo lin aŭskultos; ĉar en amo okazas tio, ke duonkompreni vorton estas pli bona kompreno ol kompreni ĝin tute: kaj tiu ĉi estas la sola universala lingvo.

Ne estas la ekstera harmonio la plej dezirinda, sed la interna; ĉar ne estas pro la bruoj de la vortoj kial ni ĉiuj homoj estas fratoj, sed pro la spirito unika kiu ilin naskas diversaj en la mistera varieco de la mondo. Kaj tiun spiriton ni devas serĉi tra tiu varieco mistera, rigardante la parolon kiel sanktegan neprofaneblan aĵon, kaj parolante ĉiu, kun sankta timo, la lingvon de la popolo en kiu Dio naskis lin, al li donante per ĝi lian kreantan parolon.

JOAN MARAGALL

El kataluna lingvo tradukis
JAUME GRAU CASAS



Ekzamenoj por Profesoroj



EN la Barcelonaj esperantistoj havas antaŭ si okazon okupiĝi pri la pliriĝo de sia scio de Esperanto kaj samtempe ĉiuj samideanoj en Katalunujo la eblecon atingi la titolon de Profesoro.

Ni ne bezonas pritrakti longe la aferon por konstati kiom necesaj estas la ekzamenoj kaj precipe specialaj kursoj por ebligi al ĉiuj la ellernadon de la lingvo, kiun bedaŭrinde nur tre malgranda nombro da personoj konas profunde. Kial? Ĉu la lingvo per si mem estas tiel malfacila kaj prezentas tian netransireblan balaston, ke multaj, multaj kunbatalantoj restas nur en supraĵa kono kaj por ili Esperanto estas peza kaj malfacile uzebla? Ne: la tuta konstruaĵo de nia internacia lingvo estas farita el tiel pura kaj travidebla materialo, ke oni nur devas *voli* por ĝin tute detale kompreni; ĉiuj ĝiaj ŝtonoj sidas sur sia difinita loko kaj unu sola rigardo estas sufiĉa por ĝuste uzi la meĥanikismon de la belega komprenilo.

Kial do oni tiel ofte ricevas kaj vidas skribaĵojn, kies sencon oni nur tre malfacile povas deĉifri kaj kiuj minacas korupti la stilon de kontinueco kaj internacia komprenebleco? Pro tio ke unuflanke la gvidantoj ne multe atentigas pri la instruado de la lingvo kaj ĝenerale lasas la novajn varbitojn en elementa kono kaj fidas al tio, ke per si mem ili perfektigos iom post iom. Ĝuste tio ĉi naskas malbonajn alkutimiĝojn, kiuj poste degeneras ĝis tute netolerebla frazkonstruo, malbonsoneco en elparolado, k. t. p., k. t. p.

Aliflanke ni vidas kiom da gazetoj konstante entrudas superflujajn neologismojn, kiuj malbeligas nian Esperanton ĝis tia grado, ke baldaŭ oni ne plu rekonos la iaman gracion belecon, kiu faris la lingvon ĉarma, malpeza kaj facile komprenebla. Al ĉio tio ĉi oni aldonu la lingvan polemikadon regantan ĉie kaj kun bedaŭro ni konstatos kiom da tempo senbezone foruziĝas en laboroj tute malpraktikaj, celantaj neniun profiton: kontraŭe, per tio ni nur sukcesos krei malordon kaj personan atakemon inter spertuloj, kies senpripensa individua agado dolore frapos la movadon.

Ni ŝangu la ĝisnunan sistemon de instruado. Ni bone taksu la valoron, kiun havas didaktiko por plej rapida lernigado kaj ni atingos efikan rezulton. Ni instigu la komencantojn daŭrigi la studojn ĝis la fino kaj tiam ĉirkaŭ ni multobligos la amantoj de la Zamenhofa verko, kiun des pli oni ŝatas, ju pli oni ĝin lernas.

La gvidantoj de kursoj estas la unuaj, la ĉefaj subtenantoj de la afero. Pro tio la tuta klopodado de grupoj precipe devas esti dediĉata al konstante kontrolata funkciado de siaj kursoj, per kiuj ellaboriĝas la estontaj samideanoj.

Pro la elmetitaj kaŭzoj kaj pro tiuj aluditaj en la Oficiala Parto de la lasta numero, ŝajnas al ni necesa la organizado de profesorado, kiu, plene konvinkita pri sia alta celo, zorgos pri la fundamenta instruado kaj klopod-

dos, ke la lernantoj penetru la lingvon ĝis ĝia spirito kaj koro, tiamaniere ke ili fariĝu perfektaj premantoj de la lingva klavaro, kies sonoj estas tiel harmoniaj, tiel ravaj... se oni ne deflankiĝas de la unu fojon por ĉiam akceptita fundamento.

La unuan ŝtupon de la priinstrua reorganizo ni firme starigis kaj esprime ĉiuj atentis pri ĝia graveco kaj ĉeestos la publikajn paroladojn de profesoroj A. Domènech, D. Dalmau kaj Josep Grau, kiuj honoris nin akceptante la gvidon de la antaŭekzamena kurso, kiun povas ĉeesti absolute ĉiuj fervoruloj.

La klarigadoj okazos en nia sidejo (Ateneu Enciclopèdic Popular, Carme, 30, pral.) la 10-12-17-19-22-24-26-29 kaj 31.^{an} de 1^a kuranta monato je la 10.^a nokte.

La ekzamenoj, kies juĝantaro konsistos el Sroj. Frederic Pujolà, J. Bremon Masgrau kaj la nomitaj profesoroj, okazos ankaŭ en nia sidejo la 4.^{an} de Septembro je la 10.^a matene.

Ke ĉiuj per sia entuziasmo helpu al la sukceso de nia entrepreno, kies esperinda sukcesa rezultato grave helpos la pluan disvastigadon de Esperanto en Katalunujo.

Ni fosu nian sulkon, sed ni faru tion laŭ plano!

S. ALBERICH JOFRÈ, SEKRETARIO DE K. E. F.

Antoni Grabowski

La tutmonda esperantistaro funebras pro la perdo de la fama poeto kaj malnova samideano Antoni Grabowski, mortinta la 4.^{an} de Julio 1921.

Grabowski naskiĝis la 11.^{an} de Junio 1857 ĉe Chelmno apud Vistulo, vizitis la gimnazion de Torun (Thorn), studis ĉe Universitato Breslau filozofion, lingvojn, natursciencojn kaj ĥemian teknologion.

Li estis direktoro en la Lingva Akademio (Gramatiko), aŭtoro de multaj esperantaj verkoj kaj Honora Prezidanto de Pola Esperanta Societo.

El liaj verkoj distingiĝas la traduko de pola epopeo «Sinjoro Tadeo» kaj la antologio «El Parnaso de 1^a Popoloj» en kiu troviĝas bonege tradukita Kanto el nia kataluna poemo «La Atlàntida» de Verdager.

Al lia familio kaj al la pola esperantistaro ni prezentas nian sinceran kondolencon.

Oficiala Parto



OM post iom proksimiĝas la tago de nia kunveno en Girona kaj pro tio ŝajnas al ni oportune rememorigi niajn laboremajn amikojn, ke por la plej bona organizo de la laborkunsidoj, kiujn tre kredeble oni devos iom limigi pro manko de tempo, estas tre konsilinde sendi al ni kiel eble plej baldaŭ ĉiun temon pritraktotan por ebligi la preponon de la tagordo, kiu, kompreneble, estas diskutota kun prefero.

Ĉiuj ekŝajnoj kaj supozoj kredigas, ke la laborkunsidoj estos supersutitaj per diversaj gravaj aferoj koncernantaj nian organizadon kaj nian propagandon.

Jen unu el ili ĵus ricevita kaj pri kiu ni rekomendas al ĉiuj federacianoj atentan studon. Ĝi koncernas nian regularon, kiun Esp. Soc. «Paco kaj Amo» proponas ŝanĝi per la jena:

KATALUNUJA ESPERANTISTA FEDERACIO (K. E. F.) FEDERACIÓ ESPERANTISTA DE CATALUNYA

ARTICLE PRIMER.—Pels presents Estatuts i amb el nom esmentat queda reorganizada colectivament l'organització individual que amb el nom de Kataluna Esperantista Federacio (Federació Catalana d'Esperantistes) hi ha constituïda a la nostra regió.

Aquesta Federació passa a ésser formada per societats, grups i seccions esperantistes existents a Catalunya.

ART. 2.^{on}—L'objecte exclusiu de la K. E. F. és l'unió de tots els esperantistes associats residents a Catalunya, per a la propaganda i divulgació de l'Esperanto i per a donar compliment a tots els acords i consells que afectin als esperantistes en general, provinents dels Congressos Universals o dels nuclis directores de l'idioma del Dr. L. L. Zamenhof.

ART. 3.^{er}—La K. E. F. serà regida per un Comitè Directiu, renovable per meitat cada any, compost de president, vice-president, secretari, vice-secretari, comptador, caixer, vice-caixer, bibliotecari, primer vocal, segon vocal i tercer vocal.

Integrarà aquest Comitè un o més socis de diferent centre, agrupació, etcétera, federats, com a propis representants o delegats.

Peroxò els càrrecs indicats al primer paràgraf s'entenen desempenyats pels organismes a que pertanyen els delegats que per a la formació d'aquell Comitè indiqui cada un d'ells i per conseqüent cap individu representant podrà fer en justícia ostentació del càrrec que en nom del organisme desempenyi.

Essent els organismes esperantistes els propietaris dels càrrecs del Comitè Directiu, podran sempre que ells ho creguin convenient, ja siga per raons de criteri, incompliment o incapacitat, canviar llurs delegats que formen part del mateix.

ART. 4.^{rt} — Els diversos organismes pertanyents a la K. E. F. contribuiran al sosteniment de la mateixa amb la quota trimestral pagada per endavant de ptes. minim per cada un dels socis que'ls integrin.

ART. 5.^e — Pel millor compliment de l'article segon la K. E. F. publicarà una revista, orgue d'informació i propaganda esperantista, redactada en les llengües Esperanto, català i castellà indistintament, la organització de la qual serà determinada per un reglament especial interior, publicat pel cos de redacció i prèvia acceptació del Comitè Directiu, qui a la vegada serà censor de la mateixa.

ART. 6.^e — La revista serà repartida gratis a les organitzacions federades i, mitjançant el pagament per endavant de la meitat del abonament que per a la revista més avall s'estableix, a llurs membres.

Els membres d'entitats federades que desitgin abonar-se a la revista ho faran per mitjà de llurs entitats.

Tota entitat, grup, secció o individu no federats podran també rebre la revista satisfent en la mateixa forma expressada en el primer paràgraf l'abonament de ptes. Aquests es dirigiran directament al Comitè de la K. E. F.

ART. 7.^e — Els vice-presidents d'aquelles organitzacions esperantistes federades i domiciliades a fora del punt de residència de la Direcció de la K. E. F. constituïran Consells Consultius de la mateixa, que es formaran un apart en cada localitat o entre dues o més, segons l'importància de les poblacions on radiquin i del nombre d'organitzacions en elles establertes.

ART. 8.^e — A cada un dels Consells Consultius podrà dirigir-se el President o Secretari de la Federació per a conèixer la seva opinió en els casos en que ho creguin convenient. Per mitjà d'un individu component que designaran pels treballs de secretaria, aquells informaran al Comitè sobre afers esperantistes, fixant especial atenció en ço que fóra de desitjar per a la millor marxa de la Federació i del moviment esperantista, particularment dintre de les respectives localitats.

ART. 9.^e — El Comitè de la K. E. F. cridarà una vegada l'any, en diferent lloc, durant la primavera i en dia festiu, a tots els seus federats en assemblea general, en la qual, prèvia ordre del dia, es donarà compte als assistents del estat econòmic de la Federació i dels treballs i gestions fetes pel referit Comitè durant son exercici; es discutiran les proposicions que per llur importància hagin sigut presentades temps abans de la data de la celebració de l'assemblea per a ésser incloses a l'ordre del dia i exposades a la revista, com també les de caràcter general i menys interès que es presentin momentàniament; es nomenarà les organitzacions que hagin de formar la meitat del Comitè a renovar pel següent exercici, i s'acordarà el lloc on hagi de celebrar-se l'assemblea vinent. Pels debats dels assumptes pertanyents

a les assemblees, es nomenarà la mesa de discussió en el moment de la constitució de les mateixes.

ART. 10.—Tots els esperantistes pertanyents a organitzacions federades tindran veu a les sessions de les assemblees anyals, però sols podran votar les delegacions enviades expressament per cada una d'elles com a representants directes.

Les votacions seran corporatives, de manera que cada delegat tindrà tants vots com agrupaments de cinc socis formin la col·lectivitat organitzada i representada, o siga un vot per cada cinc socis. Les fraccions que puguin resultar s'englobaran entre totes les d'un mateix criteri i formaran un vot per cada enter que resulti. Pel millor compliment de la condició anterior totes les col·lectivitats enviaran an el Comitè un certificat trimestral de llur moviment. Tals col·lectivitats procuraran revestir llurs delegacions, compostes d'un o dos delegats, d'amplia confiança per tal de fer eficaces els acords que recaiguin.

ART. 11.—El Comitè estarà facultat per a crear les seccions que cregui més convenients per a la prosperitat de la K. E. F. i de l'Esperanto, quines comissions seran renovades per cada Comitè entrant.

Serà president nat de cada secció un individu del Comitè designat per aquest.

ART. 12.—Sempre que el Comitè Directiu cregui que per l'importància i nombre de temes a discutir, o les circumstàncies que atravesi el moviment esperantista a Catalunya, hi ha ocasió de fer-ho, convocarà totes aquelles col·lectivitats que componen la Federació o els esperantistes en general, aquests siguen o no federats, a un Congrés on es resoldran els temes o assumptes que els motivin.

ART. 13.—La llengua oficial de la Federació serà l'Esperanto, podent ésser també usada a les assemblees i congressos la catalana i la castellana en cas necessari.

ART. 14.—Les esmenes que es vulguin fer en aquest reglament hauran d'ésser presentades amb temps convenient per a ésser incloses a l'ordre del dia i publicades en llur totalitat, car únicament podran ésser discutides i aprovades a les assemblees generals.

ART. 15.—Aquesta Federació podrà actuar mentres compti amb quatre col·lectivitats organitzades i convenientment federades.

En cas de dissolució, previ acord de la mateixa, l'actiu que existeixi serà repartit entre les col·lectivitats federades.

ARTICLE TRANSITORI.—La K. E. F. estarà domiciliada a Barcelona, carrer del Carme, 30, pral.—ESPERANTA SOCIETO «PACO KAJ AMO»

Speciale ni atentigas pri tiu ĉi temo la Konsultan Komitato, kiu jam de nun povus interŝanĝi vidpunktojn kaj se eble iri al la kongresurbo kun pli-malpli difinitaj celoj.

S. ALBERICH JOFRÈ, SEKRETARIO

La opinio

Ho ve, mia kara Karonj!

Neniam forgesos vin mi!

La mondo jen diris vidante

Pasantan la ĉerkon kun ŝi.

La pastro. — Komencu la kanton.

Doktoro. — Jam ĉesis dolor'!

La patro. — Sufokas min ploro!

Patrin'. — Morti volas la kor'..!

Knabeto. — Tre zorgornamita!

Junulo. — Belega post mort'!

Fraulino. — Ho ve, malfeliĉal

Maljuna virin'. — Bela sort'!

Bonuloj. — En paco ripozu!

Aliaj. — Adiaŭ al vi!

Saĝulo. — Jen unu malplie!

Poeto. — Anĝel' unu plil!

R. DE CAMPOAMOR

El hispana lingvo tradukis

VICENTE INGLADA

Nova Grupo en Armentera



EZE de la Empordana regiono, konata kiel unu el la plej belaj el Katalunujo, en la simpatia vilaĝo Armentera, ĵus estas fondita nova Grupo de entuziasmaj junuloj, ĉiuj lertaj kaj laboremaj esperantistoj.

Por solenigi la starigon de la nova Grupo «Empordana Ebe-naĵo», ĝiaj anoj aranĝis propagandan paroladon por la 25.^a de Julio, tago de Sankta Jakó, kiun la vilaĝo kutime festas ĉiujare kun eksterordinara brilo, kaj ĝi okazis tre sukcese ĉe «Teatre Catalunya», ĉeestata de popolamaso el la tuta regiono.

Je la 11.^a matene, okupis prezidan lokon sur la scenejo la Urbestro kaj la Paroĥestro, akompanataj de distingindaj samideanoj inter kiuj troviĝis la aŭstraj infanoj Heinrich Günter kaj Robert Scheurer.

Pastro Josep Casanovas alparolis al la ĉeestantoj pri la fondiĝo de la Grupo, citante la gastigon de aŭstraj infanoj kiel pruvon de la bono kaj komprenebleco de Esperanto, kaj prezentis la parolanton, S-ron Jaume Grau, Redaktoron de «*Kataluna Esperantisto*».

Dum tri horkvaronoj S-ro Grau disvolvis sian paroladon, klarigante la celon, neceson kaj perfektecon de Esperanto, ĝian praktikan aplikon, edukan valoron kaj nunan disvolviĝon, kaj aludis la baldaŭan realigon de la XIII.^a Kongreso en Praha, pri kiu antaŭvidiĝas grava sukceso. Li finis per kelkaj esperantaj vortoj de kuraĝigo al la Grupanoj.

Per forta aplaŭdado la publiko montris sian aprobon al la es-primataj ideoj kaj finé oni kantis nian himnon, ĉirkaŭ la verda standardo.

Multaj reale interesiĝis al nia afero, inter ili, S-ro Pere Armengol, Supera Instruisto el Figueres; ĉeestis kelkaj esperantistoj el la malnova Grupo «Norda Stelo» de La Escala, kiuj promesis revigliĝi; ĉiuj sin montris pretaj ĉeesti la katalunan Kongreson en Girona; resume, la festo atingis veran sukceson, kion oni precipe ŝuldas al samideanoj Pastro Casanovas kaj Josep Armengol.

Bibliografio

DOKUMENTOJ DE ESPERANTO.—Informilo pri la historio kaj organizo de la Esperanta movado, kunmetita de Dro A. Möbusz, Lübeck. Eldonis Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek, Berlin.—Jen grava libro kiu venas plenigi la malplendon ĝis nun ekzistintan en la esperanta libraro.

Ja multaj propagandistoj kaj instruantoj de nia lingvo povis multfoje sperti tiun malplendon kiam por propagandaj celoj necesis informiĝi pri iu fakto aŭ demando rilatanta la historion aŭ la organizon de esperantismo. Tiam ili devis traserĉi la deziratan sciotaĵon tra la paĝoj de malnovaj gazetoj ne ĉiam facile akireblaj, kun perdo de tempo kaj granda ĝenigo. Prahistorio de la lingvo internacia, biografio de D-ro Zamenhof, deveno de Esperanto, Universalaj kongresoj kun ĉiuj kongresparoloj de la Majstro, oficialaj institucioj, kaj multaj aliaj konindaĵoj pri organizado, institucioj, k. t. p. konsistigas la riĉan enhavon de la libro, kiun mi varme rekomendas al ĉiuj entuziasmuloj, propagandistoj kaj instruantoj.

PERLOJ EL LA ORIENTO.—Tradukoj el japanaj kaj ĥinaj klasikaj verkoj, de K. Ossaka. Eldonis *Nippon Esperanto-Sya*, Tokio.—La orientaj literaturaroj, tiel malmulte diskonigitaj inter la eŭropanoj (ja ili, pro profunda lingva diferenco, malofte estas tradukitaj en eŭropajn lingvojn, tial ke la tradukoj neeble konservas la originalan ĉarmon) danke al Esperanto komencas esti konataj en Okcidento. En tiu ĉi libro, la leganto povas ĝui la tutan ĉarmon de kelkaj ĥinaj kaj japanaj poemoj, en kiuj ludas la rolojn dioj kaj diinoj, spiritoj, herooj, drakoj kaj mitbestoj.

Eble pro laŭvorta fideleco al la originaloj, la versaĵoj strange sonas, ritmo tute malestas kaj, pli bedaŭrinde ankoraŭ, kelkaj preseraroj estas dissemataj tra la diversaj paĝoj. Krom tio, la stilo estas tute ne rekomendinda.

KANTARETO.—Kolekto de esperantaj kantoj kunmetita de Vale kaj eldonita de Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek, Berlin 1921.—Ĉar en ĝi oni legas krom kelkaj majstraj kantpoeziaĵoj jam de longe konataj de la esperantistaro (*La Espero* de la Majstro, *La Tagigo* de A. Grabowski) aliajn bonajn tradukaĵojn de Germanaj kantoj oni devas bedaŭri ke la kunmetinto de tiu broŝureto estu ĝin farinta tiel eta kaj malmulte enhava.

LA STRUVELPETRO.—J. D. Applebaum tradukis esperanten la ĉie konatan verkon de D-ro Heinrich Hoffman, kaj zorgeme ĝin prezentas *Literatura Instituto Rütten & Loening*, Frankfurt a. M.—Arte ilustrita, kartone bindita, tiu eldono prezentas ne nur al la infanoj, sed ankaŭ al plenaĝuloj, ŝatindan donacon, per kiu gepatroj kaj amikoj povas regali siajn karulojn.

FERDINANDO VI^a KAJ FARINELLI.—Historia novelo de Julio Mangada Rosenörn, Madrid.—La laborema hispana samideano verkis tiun noveleton eltiritan el interesa epizodo de la hispana historio. Ĝi estas bela, bonstila

verketo kiun plezure mi legis kaj sendube tian saman plezuron ĝuos ĉiuj ĝin legantaj. Oni tamen devas bedaŭri la oftajn preserarojn en ĝi enfalintajn.

FUNDAMENTA GRAMATIKO DE ESPERANTO. Verkis: D-ro Pier Carlo Monti. Eldonis: Itala Katedro de Esperanto.—Pro sia bonega didaktika metodo, zorge kunmetita ekzercaro kaj precipe pro tio ke ĝi estas tute en esperanto verkita, tiu ĉi verko estas tre taŭga kiel lernolibro por superaj kursoj. Tamen oni devas prizorgi por estontaj eldonoj ke la oftaj preseraroj en tiu ĉi rimarkeblaj malaperu.

DAS DEUTSCHE LIED IN ESPERANTO (GERMANAJ KANTOJ ESPERANTIGITAJ). Kompilis Friedrich Pillath, eldonis Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek.—Imitindan ekzemplon prezentas la kompilinto de tiu kantaro al aliaj ĉiulandaj samideanoj. Ĉiu popolo havas siajn kantojn kaj nedubeble estas ke por la propaganda celo estus bona rimedo se la esperantistoj dum siaj kunvenoj kaj ekskursoj aŭdigus la popolkantojn en Esperanto per la sama muziko per kiu ilin oni kantas en la nacia lingvo. Rekomendinda libro kun bona Esperanto, bele prezentita kun arte desegnita kovrilo.—KATONO.

EKSTERLANDA MOVADO

S-ro Henri La Fontaine, senatano belga, dufoje gajninto de la «Nobel» premio por paco, dum parolado de li farita okaze de la Centjara Datrevena Festo de la «Societo por Paco», deklaris ke Esperanto estas la sole taŭga lingvo internacia. Tiu deklaro estis aplaŭde ricevata de la aŭskultantaro.

—La urba parlamento de Offembach enkondukis oficiale Esperanton en la urbaj lernejoj. Funkcias 12 kursoj kun 350 lernantoj. La instruistoj gvidantaj esperantajn kursojn ricevas salajron; al la lernantoj la urbo liveras senkoste la lernolibrojn.

—En Graz (Aŭstrujo) okazos la 10-14.^{an} de Aŭgusto internacia katolika kunveno al kiu anoncis ĉeeston partoprenontoj el preskaŭ ĉiuj eŭropaj ŝtatoj.

—En Fürth (Bavario) 25 geinstruistoj partoprenas esperantan kurson. En tiu urbo Esperanto estas fakultative enkondukita en la progresigan lernejon.

—Esperanta Asocio de Nord-Ameriko okazigos sian 14.^{an} Jaran Kunvenon en Boston la 12-16.^{an} Julio 1921.

—En Nürnberg 80 poŝtovicistoj lernas Esperanton en 4 kursoj okazantaj en unu el la salonoj de la supera poŝtdirekcio. Ankaŭ

la fervoja direkcio de tiu sama urbo komunikis ke 92 fervojoficistoj komencos la lernadon de Esperanto la 1.^{an} de Septembro.

—La Laborista Federacio de ŝtato Ceara (Brazilujo), laŭ rezolucio akceptita la 19.^{an} de Aprilo, utiligos Esperanton en siaj internaciaj interrilatoj, kaj konsilas la lernadon de Esperanto al ĉiuj federaciaj asocioj.

—La Komerca Ĉambro de Olomouc (Ĉeĥoslovakujo) voĉdonis laŭdon al tiu de Parizo pro ĝia rezolucio favora al Esperanto kaj aliĝis al la movado.

—En la Realaj Gimnazioj de Bulgarujo la fakultativa instruado de Esperanto estas oficiale enkondukita.

—La grava Societo de Geografio de Rio de Janeiro en sia Kunsido de la 14.^a de Aprilo rezoluciis jene:

«Konsiderante ke Esperanto estas realaĵo kaj ke la kvar antaŭaj Brazilaj geografiaj kongresoj aprobis deziresprimojn de laŭdo al tiu ĉi internacia lingvo, decidas aliĝi al la 6.^a Brazila Kongreso kaj sendi tri reprezentantojn.

—En la tria Tutruslanda Kongreso Esperantista okazinta en Petrogrado la 1-5.^{an} de Junio estis akceptata la jena rezolucio:

«Atentante la nunan precipan disvastiĝon de Esperanto en proletariaj kaj laboremaj rondoĵoj kaj la esencan utilon, kiun internacia lingvo devas kaj povas alporti por la unuigo de la laboremaj klasoj de la homaro kaj por la triumfo de la principoj de Sovjeta Regosistemo, la tria Tutruslanda Kongreso Esperantista opinias, ke fundamenta tasko de la rusa esperanta movado estas laŭpova subtenado al la Sovjeta Registaro per la lingvo Esperanto kaj helpo al ĝi en aferoj de efektivigo de ĝiaj internaciaj taskoj. Kiel plej bonan formon de la esperanta movado, la Kongreso konfesas la organizon de esperantaj filioj kaj rondetoj ĉe ĉiuj proletariaj, profesiaj kaj klerigaj organizaĵoj de la Respubliko».

Tiu kongreso partoprenita de 163 delegitoj, el 73 diversaj urboj de sovjetaj landoj, montris ke pli ol iam antaŭe estas vigla kaj intensa la movado esperantista en Ruslando, kaj la fakto ke estis eble al la delegitoj vojaĝi al Petrogrado de tre malproksimaj regionoj (ĵa kelkaj devis veturi 3000-5000 kilometrojn) evidencigas la grandan pliboniĝon de la ĝenerala situacio en la nuna Rusujo.

—Niaj samideanoj de Kioto, okaze de granda atletika festo en Ŝoken-Kan, aranĝis grandan propagandan ekspozicion, kiun vizitis 6000 personoj.

—Kun kontentiga rezultato finiĝis kvar kursoj de Esperanto aranĝitaj en komercaj lernejoj konforme al la gravega decido de la Pariza Komerca Ĉambro. En Oktobro la kursoj rekomenciĝos, espereble, eĉ kun pli da sukceso.

—En Sézannes (Francujo) 40 membroj de la Ruĝa Kruco partoprenas esperantan kurson.

—En Wood Green (Britujo) estas malfermita kurso por 50 studentoj de la Supera Komerca Lernejo.

—La Komercaj Ĉambroj de Grenoble, Calais, St. Omer, Moulin kaj Mâcon aliĝis al la decido favora al Esperanto de la Pariza Komerca Ĉambro pri kiu niaj legantoj estas jam sciigitaj.

—La ĉeĥoslovaka Ministerio de Instruado, per cirkulero dissendita al la direktoroj de ĉiuj duagradaj lernejoj, permesas kaj konsilas la instruadon de Esperanto en tiuj ŝtataj lernejoj.

—En Liège okazis kun granda sukceso dum lastepasinta Majo la Dekna Nacia Kongreso de Belgaj Esperantistoj.

—La Kongreso de Francaj Komunistoj okazinta en Parizo dum Pentekosto voĉdonis rezolucion por Esperanto.

—La 18.^{an} Aprilo en Praha okazis la unua ŝtata ekzameno de esperantaj instruistoj.

—Kun 350 enskribitoj kaj 225 ĉeestantoj okazis en Harrogate, dum Pentekosto, la Dekdua Kongreso de Britaj Esperantistoj.

—La plej maljuna esperantisto estas Pastro John Anderson. Li naskiĝis la jaron 1821.^{an}, do nun estas centjarulo; li komencis la lernadon de Esperanto je sepdekjara aĝo.



XIII^a Universala Kongreso de Esperanto en Praha

31 Julio - 6 Aŭgusto

10^a KOMUNIKO

Ĝi aperis kun la detala Programo de la Kongreso kaj lastaj sciigoj.

En la akceptejo deĵoros ŝtata letera kaj telegrafa poŝtoŝefo *kun esperanta stampilo*. Ankaŭ estos monŝanĝejo, vojaĝinformejo kaj pasportsekcio.

Ĝis la 12.^a de Julio aliĝis 2197 partoprenantoj, el 39 nacioj kaj 33 ŝtatoj. Laŭ profesio la kongresanoj estas: 356 oficistoj, 201 instruistoj kaj -estroj, 189 laboristoj kaj metiistoj, 126 komercistoj, 103 studentoj, 36 profesoroj, 30 inĝenieroj, 22 advokatoj kaj juĝistoj, 19 kuracistoj, 14 redaktoroj kaj ĵurnalistoj, 12 artistoj, 10 pastroj; 155 havas diversajn profesiojn, 215 estas sen difinita profesio.

Kiam ĉi tiuj linioj aperos, la Universala Kongreso estos okazanta. Ni esperu ke ĝi forte sukcesos kaj ke niaj superaj organizaĵoj estos efike helpataj de ĝiaj laboroj.

La 21.^{an} de Julio forveturis al Praha nia estimata amiko S-ro Joan Gili Norta, Prezidanto de «Kataluna Esperantista Federacio», kiu reprezentos en la Kongreso la katalunlingvajn samideanojn.



ESPERANTAJ GAZETOJ

ricevitaj en nia Redakcio, publike legeblaj ĉe la legočambro de «Enciklopedia Popola Ateneo», Carme, 30, sidejo de K. E. F.

Franca Esperantisto
Le Monde Espérantiste
Esperanto-Praktiko
Itala Esperantisto
La Marto
La Semisto
Germana Esperantisto
Hispana Esperantisto
Internacia Komerca Revuo
Esperantista Laboristo
Kristana Espero
Verda Utopio
Vegetarano
Espero Katolika
La Esperantisto
La Laborista Esperantisto
Esperanto

Hungara Esperantisto
Esperanto Triumfonta
Nova Tempo
Literaturo
Portugal Comercial e Industrial (Esperanta Fako)
The British Esperantist
Nederlanda Esperanto
La Verda Ombro
Amerika Esperantisto
Libero
L'Esperanto
La Revuo Orienta
El Esperanto
Brazila Esperantisto
Oficiala Gazeto Esperantista

Ni dankos sendadon de la ceteraj esperantaj gazetoj.

IX^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio

Girona : 15 - 16 - 17 Oktobro 1921

Ĉeestu nian Kongreson por pruvi la plenan revigliĝon de la Kataluna Esperantistaro!

Revivigu la antaŭajn Grupojn kaj helpu la propagandon!



LEIPZIG-A SPECIMENFOIRO

FOIRO

POR TEKNIKO KAJ KONSTRUFAKO

Aŭtuna Foiro 1921 de la 28^a de aŭgusto ĝis 3^a de septembro

Printempa Foiro 1922 de la 5^a ĝis 11^a de marto

*La centra merkato por la internacia
komerco kaj ofertado*

Same grava por ekspozantoj kaj por aĉetantoj

Informojn donas kaj aliĝojn akceptas

MESSAMT FÜR DIE MUSTERMESSEN
IN LEIPZIG

(Foiroŝeĵo por la Specimenfoiroj en Leipzig)

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

DUA EPOKO - JARO 1^a : SEPTEMBRO 1921

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

Jarkotizo : 5 Pesetoj

CLAU ESPERANTO

(KATALUNA ŜLOSILO)

reeldonita de K. E. F.

Verdaj kovriloj kun nova propaganda teksto pri la lastaj venkoj de Esperanto.

100 EKZEMPLEROJ

KOSTAS 7'50 PTOJN.

Vin turnu al nia Administristo.

IX^a KONGRESO

DE K. E. F.

PROPAGANDAJ GLUMARKOJ

arte desegnitaj, kun belaj alegorioj pri la historia urbo Girona.

Folioj en 10 koloroj
kun 20 malsamaj markoj
Ĉiu folio kostas 0'40 ptojn.

Vin turnu al S-ro F. Hil

Parque Divisionario, n.^o 7 - GIRONA

ESPERANTO TRIUMFONTA

Ĵurnalo internacia, universala, sendependa. Aperas regule ĉiusemajne en granda gazet-formato.

Teksto nur en Esperanto.

Aĉetebla ĉe kioskoj en Barcelona kaj Girona.

Petu specimenajn numerojn de la eldonanto TEO JUNG - Köln-Horrem (Germanujo).

Ni rekomendas la verkon de

EDMOND PRIVAT

Vivo de Zamenhof

Volumo I

de la

Libraro Bolingbroke-Mudie
eldonata de

BRITA ESPERANTO - ASOCIO

Petu detalojn al K. E. F.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administracio:

Carme, 30 : BARCELONA

Nia devizo: *Maro estas guto*

Redaktoro : Jaume Grau Casas

Nia XIII^a en Praha Antaŭ kaj Postkongresaj festoj

KELKAJ ENKONDUKAJ VORTOJ

Kiel mi promesis, nun mi verkos la raporton pri niaj sukcesplenaj nunjaraj kongresoj, pri tiuj festoj kies rememoro estos ĉiam tiel agrabla al mi, kiu feliĉe povis ilin ĝui. Mi esperas ke nia kara ĉefredaktoro estos sufiĉe bonvolema kaj ke li pardonos se eble la raporto okupos pli da loko ol li intencis difini por la priskribado de la XIII.^a kaj antaŭaj kaj postaj festoj, sed nur per la scio ke mi libere povos diri ĉion kion mi vidis mi kapablos rakonti la sukcesajn tagojn de niaj kunvenoj.

Ankaŭ al vi, kara leganto, mi petas vian pardonon se la raporto ne estos tiel bona kiel mi deziras kaj vi meritas; mi esperas ke la temo estos sufiĉe interesa al vi kaj tial vi legos kun agrabla mieno kion mi klopodos pri-trakti.

Per ĉi tiuj vortoj mi finas la enkondukon kaj tuj transiras al la temo:

RENDEVUO EN FRANKFURT

Niaj samideanoj el Frankfurto invitis la samideanaron traveturontan ilian urbon halti tie kaj ripozi inter ili antaŭ ol repreni la vojaĝon ĉu al Praha ĉu al Dresden. Mi decidis iri tien kaj akcepti la inviton de la Frank-

furtanoj kaj certe mi ne bedaŭras tion. Kun kelkaj francaj samideanoj mi veturis de Parizo ĝis Frankfurto. Jam en la belega stacidomo atendis nin kelkaj samideanoj kiuj afable nin helpis. Mia kara amiko S-ro Rob. Kreuz, Direktoro de la Esperanta Fako de la Frankfurta Foiro, afable gastigis min ĉe parencoj de sia fianĉino (nun jam edzino) kie oni regalis min. Akompanataj la eksterlandaj samideanoj de la enurbaj, ni vizitis la belan Frankfurton, vera Park-urbo, kaj sekvantan tagon antaŭ nia forveturo ili aranĝis publikan feston kie ni ankaŭ partoprenis. Krom la Prezidanto de la tiea Grupo kaj S-ro Kreuz, kiuj salutis kaj dankis nian ĉeeston kaj viziton, parolis kelkaj aliaj samideanoj el Nederlando, Francujo, D-ro Privat el Svisujo kaj mi. La festo rapide kaj agrable pasis kaj ni havis la okazon aŭdi belajn pecojn de germana muziko kaj popolajn kantojn. De tie ni iris al la stacidomo kie ni envagoniĝis rekte al Dresdono.

ANTAU-KONGRESO EN DRESDENO

La 28.^{an} de Julio matene ni alvenis en la urbon de nia antaŭ-kongreso. Mirindan ekzemplon de bona organizado donis al ni la kongresa komitato. Ĉe la stacidomo enestis policanoj esperantistaj kiuj solvis al ni ĉiujn demandojn kaj gvidis nin ĝis la Akceptejo, kie nove ni estis surprizataj de la modela organizo. Oni disdonis al ĉiuj la Kongresajn dokumentojn kaj difinis la hotelon kie ni devos loĝi dum nia restado en la bela urbo de nia IV.^a

Posttagmeze okazis komuna tagmanĝo kun bongustaj manĝaĵoj kaj tre malmultekostaj. Je la 5.^a okazis prova instruado al la infanoj kun granda sukceso. Je la 6.^a, meze de granda entuziasmo, oni malfermis la antaŭ-kongreson kaj parolis ĉiuj delegitoj de la diversaj nacioj ĉeestantaj. Ĉiujn paroladojn de la fremdaj gastoj samideano von Frenckel tradukis germanlingven kaj faris spritajn ŝercojn kiuj ridigis la grandnombran ĉeestantaron ne esperantistan. Mi notis la paroladintojn kaj jen la landoj tie reprezentataj: Urugvajo, Aŭstralio, Finnlando, Francujo, Japanujo, Danujo, Nederlando, Norvegujo, Bulgarujo, Svedujo, Ĉeĥoslovakujo (ĉeĥoj kaj germanoj), Svisujo, Anglujo, Katalunujo (en kies nomo mi parolis), oficiala delegito de la Polico en Braunschweig kaj de la libera urbo Dantzig. Nenece estas diri kiel bonege sukcesis la festo kaj kiel bone ĝi impresis la publikon.

Sekvantan tagon 29.^{an}, matene, akurate je la naŭa ni ŝipe veturis al Pillnitz. Per du bele ornamitaj riversipoj ni faris la vojaĝon ĝis tie kie detale ni vizitis la admirindajn belajojn de la reĝa kastelo. En Blasewitz ni tagmanĝis meze de granda bruo kaj entuziasmo, kaŭzita sendube de la granda varmo kiun ni suferis.

Vespere je la 7.^a okazis granda festo finita de internacia kostumbalo. Dum la festo oni kantis, deklamis kaj ludis la burleskajn unuaktan «La Glavo de Damokles» tre lerte prezentitan. La balo daŭris ĝis 2.^a matene kaj tie la fervoraj amantoj de Terpsikoro havis okazon ĝui multe.

La 30^{an} de Julio matene kun bedaŭro ni forlasis Dresdenon, pro la ĝuplenaj tagoj tie pasitaj, kaj per speciala vagonaro ni veturis al la ĉefa celo de ĉies vojaĝo: Praha.

Adiaŭis la 837 partoprenantojn de la antaŭkongreso la Dresdena samideanaro kiu ne povis akompani nin. Ĉe la stacidomo grupiĝis ĉiuj kaj ĉie oni nur vidis kisojn, man- kaj brakpremojn... Kiam la vagonaro ekveturis ĉiuj kantis nian himnon kaj mi vidis elfali larmojn sur belaj virinaj vizagoj. Kial?...

PRAHA

Posttagmeze ni alvenis Prahon. Ni atingis la urbon de nia XIII^a, la sopiratan ĉefurbon de Ĉeĥoslovakujo kies nomo de antaŭ kelkaj monatoj tiel ofte estis legata sur ĉiuj esperantaj ĵurnaloj.

Ĉe la stacidomo estis instalita la Akceptejo. Post longa atendado mi fine atingis mian vicon kaj oni donis al mi la kongresajn dokumentojn, la programon kaj ceterajn sciigojn pri hoteloj k. t. p.

Nokte ĉe insulo Zofin oni rendevuis. Ĉie amikajn salutojn, gajajn vizagojn kaj mienojn oni vidis. Agrable oni babilis ĝis la tempo iri dormi kaj ripozi.

LA KONGRESAJ TAGOJ

31^a Julio. Matene kunsidis la Konstanta Komitato de la Kongresoj kaj Lingva Komitato. Ankaŭ oni elektis la naciajn delegitojn kiuj dum la malferma kunsido parolos al la ĉeestantoj.

Ĉe Smetana Halo je la 3.^a posttagmeze S-ro Isbrücker, prezidanto de la XII.^a en Hago, malfermis la Kongreson kaj tuj oni elektis la honorajn membrojn de la Kongreso kaj ankaŭ la efektivan prezidanton kaj membrojn. Jen la nomoj: Prezidanto, S-ro Kamaryt; Vic-Prezidantoj, S-roj Warden kaj Arnold; Sekretario, S-ro Pitlik; Vic-Sekretariinoj, S-ino Cense kaj F-ino Supičova. S-ro Kamaryt parolas varme kaj entuziasme salutis la gekongresanojn. Kiam li aludis la ĉeston de S-ino Vidvino Zamenhof la publiko ekstaris kaj emocie akklamis ŝin. Neniam mi memoras esti aŭdinta tiel grandan kaj emocian aplaŭdadon. S-ino Zamenhof, kiu okupis kaŝitan loĝion, plorante salutis la ĉeestantojn.

Poste parolis ĉefe la ministro de Publika Instruado kaj la Urbestro de Praha, ankaŭ kore aplaŭdataj.

S-ro Isbrücker legas la raporton de la K. K. K.

D-ro Privat salutas nome de U. E. A.

S-ro Nitobé (japano) ankaŭ salutas angle ĉar li diras ke kun bedaŭro ne povas paroli nian lingvon. Li estas oficiale sendita de la Ligo de Nacioj kaj diras ke la Ligo interesiĝas tre multe por nia homama movado.

Post mallonga paŭzo salutas la Kongreson la oficialaj delegitoj de la Registaroj kaj la diversnaciaj ĉeestantoj.

Jen la listo:

- S-ro Frans Schoofs, nome de la belga Ministro de Sciencoj kaj Arto.
- » Vilho Setala, » » » finnlanda Ministro de Instruado.
 - » Julio Mangada, » » » hispana milita Ministro.
 - » Alb. Alessio, » » » itala Ministro de Maraferoj.
 - » Sevenhuysen, » » » nederlanda Ministro de financaj, komercaj kaj industriaj aferoj.
 - » Fritz Wiegler, » » » saksa Registaro.
 - » H. Boczkowski, » » » ukraina diplomata Misio.
 - » Fujisaŭa, » » » sekretario de Ligo de Nacioj.
 - » Dieterle, » » » saksa Esperanto Instituto.
 - » Bzavko Wiegler » » » jugoslava Delegacio.

Poste alparolis al la publiko la naciaj delegitoj laŭ jena ordo: Alĝerio; Belĝujo; Bulgarujo; Ĉeĥoslovakujo (ĉeĥa lingvo kaj germana lingvo); Danujo; Dantzig; Estonio; Finnlando; Francujo; Germanujo; nome de la hebreoj de la tuta mondo; Hispanujo; Hungarujo; Italujo; Japanujo; Jugoslavio (por serboj kaj por kroatoj); Kanado; Litovujo; Nederlando; Norvegujo; Polujo; Rumanujo; Svedujo; Svisujo; Usono; Urugvajo; Aŭstralio; Aŭstrujo; Britujo; angloj, skotoj, kimroj, kaj iroj; Blinduloj; kaj la oficiala reprezentanto de la Frankfurta Foiro.

Poste, meze de granda entuziasmo kaj per la kanto de la Espero oni fermis la kunsidon.

Eble la katalunaj legantoj restos surprizitaj pri tio ke mi ne salutis la Kongreson en ilia nomo kaj en tiu de nia ĉefa organizaĵo «Kataluna Esperantista Federacio», kies prezidento mi estas; sed la spirita nekomprenejo de la oficiala reprezentanto de la Hispana registaro, S-ro Mangada, malpermesis al mi tion fari, kaj eĉ li minacis fari skandalon se mi intencos paroli en alia nomo ol en tiu de la hispana ŝtato. Post diskutado kaj malkonsento pro tia nekvalfikebla minaco, por esperantismo kaj por eviti malagrablaĵojn mi rezignis mian volon. Por ne malbeligi tiun ĉi raporton, nenion plu mi aldonos ĉi tie, rilate tiun aferon.

1.^a Augusto: Matene kunsidis U. E. A. Posttagmeze I.^a laborkunsido de la XIII^a. Oni aprobas la starigon de komisiono por ebligi la tutmondan monokolekton por la tombo al D-ro Zamenhof.

Vespere ni ĉeestis koncerton de ĉeĥaj kantoj kaj muzikoj.

2.^a Augusto: Fakajn kunvenojn oni organizis matene. Mi partoprenis la komercistan kunvenon. Ĝi bone sukcesis kaj espereble oni eliros bonan rezulton por la komerca enkonduko de nia lingvo.

Posttagmeze vizito al la vidindaĵoj de la bela urbo. Vespere sendube okazis la plej agrabla festo: la internacia kostumbalo. Granda amaso da

ĉiuspecaj kostumoj svarmis tie kaj reen de unu parto al la alia de la granda salono kaj la dancantoj iris de brako al brako; resume, vera fratiga festo.

3.^a *Augusto*: Matene, laborkunsido de la XIII^a. Posttagmeze, kunveno de U. E. A. Vespere mi ĉeestis le teatran prezentadon. Oni ludis «Nokto en Karluv Tyn». La ĉeĥoslovakaj samideanoj petis al la fremdaj gastoj esti bonvolemaj pri ĝi. Nur mi diros ke ĝi ŝajnis al mi iomete naiva. Cetere, la roloj estis ludataj de esperantistaj amatoroj.

4.^a *Augusto*: Dum tiu ĉi tago ni ekskursis al la Moravia Kras (stalaktita kaj stalakmita grotaro). Mi ĝojas ke la organiza komitato de la Kongreso organizis tiun ekskurson, ebligante la viziton al tiu grotaro, kiu tre multe impresis min. Pri la organizo de la ekskurso, bedaŭrinde mi devas diri ke ĝi ne estis sufiĉe zorgata. Pro la malbona servo de vagonaroj kaj aŭtomobiloj la ekskurso rezultis iom ĝena, tamen por mi tre bela kaj interesa.

5.^a *Augusto*: Matene laste kunsidis U. E. A. Posttagmeze 3^a kunsido de nia XIII^a. Vespere ĉe Zofin la blindaj esperantistoj ĉeestantaj faris koncerton. Ĝi brile sukcesis precipe kiam ludis la gitaron nia samlandano S-ro Zapater.

6.^a *Augusto*: Matene okazis la ferma kunsido de nia granda Kongreso. Kiam ni pritraktis la aferon elekti la lokon por nia XIV^a la finnaj samideanoj petis por ili la taskon organizi ĝin kaj oni aplaŭde akceptis Helsinki kiel urbon por la XIV^a. Ankaŭ samideano Narita el Japanujo petis la XV^{an} por Tokio kaj oni aplaŭde ankaŭ principe esprimis la konsenton.

Meze de grandega entuziasmo la laboroj de la XIII^a estis finataj per kantado de nia himno.

Vespere mi forvojaĝis al Budapeŝto, kaj vere malĝoje mi lasis la urbon kie dum tuta semajno ni ĝuis veran internacian fratecon.

Entute enskribiĝis 2561 kaj ĉeestis ĉirkaŭ 2300 samideanoj; per tiuj nombroj vi povos imagi la grandecon de la XIII^a.

POSTKONGRESAJ FESTOJ

BUDAPEST: Post bela vojaĝo per ŝipo sur la Danubo, la 8^{an} de Aŭgusto nokte ni alvenis Budapeŝton.

Bone organizatajn ĉarmajn festojn, neforgeseblajn tagojn ni ĝuis en Budapeŝto.

En la safutkunveno de la 9^a de Aŭgusto parolis samideanoj el Anglujo, Belgujo, Aŭstralio, Svedujo, Francujo, Finnlando, Svisujo, Danujo, Italujo, Holando, Germanujo kaj Katalunujo.

Ni vizitis la urbon, ni ĉeestis belegan teatran prezentadon kaj ĉiuspecajn festojn por ni organizatajn.

VIENO: De Budapeŝto ni veturis Vienon kie mi ankoraŭ ĝuis la lastajn tagojn de la esperanto-semajno kiun oni organizis por la esperantistaro traveturanta la urbon post la XIII^a.

Nia ĉeesto estis por la Viena esperantistaro vera kuraĝigilo.

Dankon al ĉiuj!!

LASTAJ VORTOJ : Ne priskribeblaj estas la feliĉaj tagoj de niaj brilaj festoj. Neniam mi forgesos la koran akcepton kiun ĉie mi trovis. Kiel lasta konkludo mi diras ke eĉ la plej malvarmaj kaj skeptikaj samideanoj eltiris forton kaj entuziasmon por labori ĝis la fina triumfo, vere ne malproksima.

JOAN GILI NORTA

Rimarko de la Redakcio.—La 13^{an} de Aŭgusto, el Vieno, S-ro Gili Norta sendis longan kaj detalan raporton pri la XIII^a Kongreso, sed kvankam la sendaĵo estis rekomendata ĝi ne ankoraŭ alvenis ĉe ni. Nia amiko revenis Barcelonon el sia vojaĝo tra Italujo nur je la lastaj tagoj de la monato, kaj, sciiginte pri la ĝena afero, li bonvolis pretigi tiun ĉi novan raporton, nerve kaj rapide verkitan, la 30^{an} de Aŭgusto.

Pro tio oni pardonu ankaŭ ke la nuna numero ne aperis tute akurate la 1^{an} de Septembro, sed kelkajn tagojn poste.

Ni protestas

La netoleremo de S-ro Julio Mangada, Komandanto de la hispana armeo kaj reprezentanto de la hispana registaro en la Praha kongreso, altiris la indignon de la katalunoj kaj estis denova pruvo ke Esperantismo kaj Homaranismo troviĝas nur sur la lipoj de kelkaj samideanoj kaj ne sukcesis eniri en ilian kordon.

Dum la malferma kunsido de la Kongreso, S-ro Mangada prezentis sin al S-ro Gili Norta, Prezidanto de «Kataluna Esperantista Federacio», dirante: «Mi malpermesas al vi saluti la Kongreson nome de la katalunoj, ĉar mi estas reprezentanto de la hispana registaro kaj nur en la nomo de Hispanujo oni povas paroli tie ĉi». Post tio li minacis «fari skandalon» kaj nur pro la prudento de nia amiko Gili Norta malagrablaĵo estis evitata al la Kongresanoj.

Pri la prudento kaj esperantisteco de Komandanto Mangada ĉiu ja povos juĝi.

Ni ne volas pritrakti funde la aferon, ĉar ni ne bezonas pruvon ajn pri la rajto de la katalunoj. Sed ni volas rememorigi, ke en la rilatoj inter esperantistoj devas regi nur: *neutraleco kaj toleremo*.

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

IX^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio

Girona : 15 - 16 - 17 Oktobro 1921.



ALDAŭ alvenos la dato de nia jarfesto kaj necese estas uzi la tempon restantan ankoraŭ por pligrandigi ĝian certan sukceson.

Jam sciigis sian ĉeeston multaj geesperantistoj el ĉiuj lokoj de nia lando kaj eĉ eble ni estos honorigataj per la ĉeesto de iu eksterlanda samideano.

La Kongresa Komitato firme laboras en ĉiuspecaj aranĝoj. Nia nunjara Kongreso estos plej interesa kaj alloga. Ĝi certe estos signo de la renaskiĝo de Esperantismo en tuta Katalunujo!

Por la Ekspozicio ĉiuj bonvolemuloj estas denove petataj sendi tuj siajn esperantaĵojn. Oni plene zorgos pri ili.

En la venonta numero aperos la programo de la Kongreso kun ĉiuj detaloj, hortabelo de la vagonaroj, prezaro de hoteloj, verdikto de la VIII.^a Internaciaj Floraj Ludoj, bilanco de K. E. F. ĝis Oktobro, proponoj ricevitaj, kaj al ĝi estos aldonata «suplemento kun bildoj de la Kongresurbo».

Ankaŭ oni enmetos en ĝi la fervojan rabatilon kaj la kongresinsignon.

Por ĉiuj prikongresaj aferoj vin turnu al S-ro Francisco Hil, Parque Divisionario n-ro 7, Girona.

La oficiala alveno de la Kongresanoj en Girona kaj akcepto ĉe la Urbdomo okazos la 15^{an}, sabaton, je la 6.^a vespere.

Dimanĉon matene okazos la laborkunsido, posttagmeze la belega festo de la Floraj Ludoj kaj nokte la oficiala Festeno kun ĉeesto de la aŭtoritatuloj. Lundon oni faros du ekskursojn al Castelló d'Empúries kaj al Banyoles.

Por tiuj ĉi ekskursoj, same kiel por la oficiala festeno, estos necesa la antaŭa enskribiĝo.

VIII^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj

LISTO DE RICEVITAJ VERKOJ

35.—La unua paŝo. 36.—Quis fuit, horrendos primus qui protulit enses? Quam ferus et vere ferreus fuit! 37.—Nova metodo. 38.—Pli forta ol la Morto. 39.—Madrigalo. 40.—Kompatinda Lleó. 41.—Ne tentes, ant perface. 42.—Kankro. 43.—Sen la akvo, la Homaro kaj vegetaĵaro ne ekzistus. 44.—Minimus. 45.—Neniam! 46.—La Majo alvenis. 47.—Ha, malbeninda ŝipo! 48.—Pentekost' 49.—Ne fari malbonon estas nia devo. 50.—Pripensu... 51.—Aglo blanka. 52.—Sweet, sweet. sweet... 53.—Nojo. 54.—Infano. 55.—Travivinto. 56.—Andante. 57.—Flugintaj revoj. 58.—En la nom' de Dio. 59.—Bela naiveco. 60.—En sonĝo Patrujon mi vidis. 61.—La naturo ĉarmas la poeton. 62.—Ne ŝovu la nazon... 63.—Kantu kun ĝojego! 64.—Ama malkvieto. 65.—Diada senyalada. 66.—Nunca fuera caballero de damas tan bien servido. 67.—Nia deziro estas... 68.—Sangaj larmoj. 69.—Nur unufoje amas la kor'. 70.—Amo kreas la pacon. 71.—Tradicio ne estas rakonto. 72.—Ruĝa floro. 73.—Homar': vojiru! 74.—En la mondon venis nova sento. 75.—Ironio. 76.—La Devesa. 77.—Katalunujo kaj antaŭen.

36 tagoj en Esperantujo.—Parolado de S-ro Joan Gili Norta, Prez. de K. E. F., pri la XIII.^a Universala Kongreso en Praha kaj vojaĝaj impresoj.

Koncerto de Gitaro,—de S-ro B. Zapater, blinda samideano el Barcelono, loĝanta en Germanujo, kiu, okaze de sia restado en nia urbo, afable akceptis dediĉi al la esperantistaro elmontron de sia arto. Post la koncerto oni faros monkolekton por la revuo por blinduloj «Esperanta Ligilo».

15 Septembro 1921, je la 10^a vespere en la sidejo de K. E. F.

L' edzin' parolas

Kiam senaŭde, kion mi aldiras
aŭskultas vi, vagante per rigard';
kiam via spirito ekvojiras
foriĝante de mi laŭ vent-hazard',

mi vidas, ke ŝip-penso vin enporta
veturas jam de horizont' ĉe l' fin:
estas puŝo de am' sufiĉe forta
por konduki min tien apud vin.

Apud vi mi veturas ensorĉita,
alpuŝata de mia am-fervor';
mi nur scias, sur vojo nekonita,
ke mi estas l' edzino enamita,
kiu kune kun vi veturas for.

La Poeto

Sed nur vi—gvidantino, nur vi—forta,
ĉar ĉiam, en kviet' aŭ furioz',
vi scias, ke ŝip-penso min enporta
al via am' revenos por ripoz'.

JOAN MARAGALL

El kataluna lingvo tradukis

JOSEP GRAU CASAS

Terurigo



Vojirante al kampdomo de la Selva, kie restadis mia familio, mi malfruis pro nenecese rakontotaj kaŭzoj. La suno estis malalta kiam mi alvenis ĉe la muelejo de l'Ulmo, tri horojn ankoraŭ malproksima de la fino de mia vojaĝo; sed malgraŭ la malfruo, mi devis halti por trinki kaj mi sidigis sur ŝtono apud la rivero por ripozi momenton, fumante cigaredon. La muelejo de l'Ulmo ne laboras jam de antaŭ multaj jaroj. Ĝi estas nelogata domego aŭ pli bone nelogebla ruino, ĉar granda parto el ĝiaj muroj falis kaj ĝiaj tegmentoj kaj plafonoj staras nur parte. Interne kreskas monta arbustaro kaj la sovaĝvito elmontras sian foliaron tra la fenestroj. La kluzo submovita kaj gratita lasas kun maŝato libere flui la murmurantajn akvojn. La granda turbino putriĝas senmova sur la seka kanalo kie la araneoj ĝin plenigas per teksaj retoj kaj la dornarbustaro de la ŝtonmuroj superŝutas ĝin per vergetoj kaj sekfoliaro. Kaj pensinte ke en aliaj tempoj tiu rado donis movon al komplikita maŝinaro kaj imaginte la ronkojn de la muelŝtonoj, rimenoj kaj dentradoj, la irvenojn de la muelistoj, la vicon de ĉaroj kiuj certe amasiĝis en la kortoj, la sonadon de la tintiloj, la klakojn de la vipoj kaj la kriojn de la ĉaristoj vivplenigantaj la tutan valon, oni rajtas almenaŭ sin plendi pro la disfalo kaj pro la kvieto nunaj. Nun la regiono estas senhoma kaj arbo-plena. La vojoj herbpreniĝis kaj la radsignoj malaperis. Neniu trairas; nur iu malofte, de tempo al tempo. La suno rigardas tien tagojn post tagoj kaj monatoj ne malkovrante homan figuron kaj la vespero surfalas meze de morta kvieto.

Mallongan tempon mi dediĉis al ripozo. Mi volis profiti laŭeble por mia marŝado la tagan lumon kiu jam ekrugiĝis. Mi eniris, do, en la arbaron per rapida paŝado; sed baldaŭ mi komprenis ke mi penis senutile ĉar antaŭ ne multe la nokto min atingus en plena arbaro. Certe la suno devis esti jam subirinta. Malgraŭ la altega betularo kiu okcidente kaŝis al mi la vidaĵon, la duonheloj, kiuj sin filtrante tra la maldensaĵoj de la foliaro dismakulis la arbaron, sufiĉe montris per siaj koloro kaj malforteco la staton de la fajrujo de kie devenis. Ili estis perdintaj sian oran brilon; ili ruĝis, palpebrumis, ne povis daŭri. Subite sin etendis kvazaŭ ombra ondo kaj ili estingiĝis ĉie.—Adiaŭ, bonfaranta krepuska rigardo; ĉi ne plu min akompanos—mi ekkriis. Sed mi eraris. La morta taga flamo reviviĝis ankoraŭ kaj ĝiaj reflektaj ree disvastiĝis sur la montaro; kaj malfortaj, violkoloraj, ondantaj kiel lumaj fumvualoj, ili vagis de loko al loko; ili estingiĝis, reaparis kaj denove malaperis multe da fojoj, tiom ke mi perdis la fidon revidi ilin nur post longa tempo de vana espero. Fine mi komprenis ke ili ne revenos kaj tiam mia koro premiĝis. Mankis al mi ankoraŭ duhora vojirado tra regiono tute senhoma.

Kiam mi pasis la ponton de la Mustelo, ŝtona ponto mallarĝega kaj nur el unu arkaĵo, tiom simpla ke oni dirus ke ĝi estas la osto de ripego, la nokto plene regis. Trans la ponto, la arbaro estis impone nigra. Certe timo min kaptis. Sed... pro kio? Ĉu pro rabistoj? mi eĉ ne songis pri ili. Ĉu pro mortfalo? Mi sciis ke mia vojo bordiris nenian abismon. Nu... tio estas senkaŭza timo—mi murmuris—timo pro nenio propra de virinoj kaj infanoj. Estas necese ĝin ne atenti. Filozofio kaj antaŭen! Sed la filozofio kiu antaŭenirigis min ne sukcesis min trankviligi.

Takta flutkanto de bufoj, kiu sonis malproksime en valprofundaĵo, kuraĝigis min pli ol la plej bonaj rezonadoj. Mi metis tutan mian atenton en tiu dormiga kanto kaj dum mi ĝin aŭskultis ŝajnis al mi ke mia soleco ne estis kompleta. Estis estaĵoj kiuj sin movis, kiuj kunigis por viva ago, kiuj komunikigis kun mi per sia voĉo. Ili iel akompanis.

Lumeto kiu aperis pli poste meze de malklara maso de monto, ankaŭ kunhelpis kuraĝigi min. Tie estis domo kun familio. Mi imagis la kamparanojn kribranta farunon sub la helo de tiu lumeto, la knabojn aranĝantaj la furagon por la nokto kaj la terlaboristojn, kubute apogitaj sur la preparita tablo, atendantaj la horon de la vespermango. La bonaj homoj havis la fenestron malfermita, ne pensante pri la almozo farata al la vojaĝanto nur permesante al li ekvidi la lokon de ilia restejo. Ne ĉio estis dezerta, ne. Mi sentis la akompanion de tiuj malproksimaj homoj kaj mi ja ne povis dubi pri ilia ekzisto.

Distrita tiele mia imago, mi faris longan vojiron kun ia kuraĝo; sed kiam mi perdis el la okuloj la lumeton, kiam postlasinte vojkurbon mi ne plu aŭdis la bufan flutkanton kaj perceptebla, teruriga silento vibris ĉirkaŭ mi en la senlimo, ŝajnis al mi ke la nokto min surfalis.

Mi haltis konfuzita, plena de ia ĝeno simila al tiu kiun ni foje spertas kiam persono ŝtelire alproksimiĝas malantaŭ ni. Mi volis min turni kaj ne kuraĝis. Fine mi atingis fari tion kaj mi sentis pasi sur mia haŭto malvarman frostotremigan spiron. Sed mi vidis nenion... nur la arbaron, la valprofundaĵojn, la mallumon.

Mi ree marŝis kaj alian fojon estis devigata halti post kelkaj paŝoj. Mi ne povis min liberigi el la trudpenso ke iu min sekvis kaj observis. Korbatante emocie denove mi rigardis, aŭskultis... La silento estis absoluta. Nur la bruo de mia honta spiro kuraĝis ĝin profani. La nokto estis plejnobla, diafana: dubeblua, senlima abismo punktita per steloj kiuj montris konfuzajn distancojn en la nefinebla profundaĵo. Kaj malsupre, la ombra tero restis muta, kun sankta silento, kvazaŭ kolektante kun religia respekto la disradiadojn de la senlimeco. Tio estis kion perceptis la okuloj kaj la oreloj... Sed plie... Kiel esprimi tiun profundan, haŭtotreman senton kiu min persekutis? Mi nur sciis kompari mian staton kun tiu de persono sin sentanta ĝenata ĝis suferlimo pro la insista rigardo de alia fikse lin observanta en silento. Mia spirita streĉo iĝis ja neelportebla. Mi ne povis plu rezisti. San-

goglace mi falis sur la genuojn. Ho senlimo, ho nekonateco, ho sankteco... mi vin adoras! Min helpu, min ŝirmu!—mi ekkriis per nevola krio kiu timige resonis en mia koro. Kaj terbuŝe etendita mi daŭris preĝante, delire preĝadante, kuntiriĝinta, trema, ĝis kiam min kaptis kormoligo, ploro, konsolo.

Mi min levis fine revigliginta, posedita de mistika dolĉeco. La teruro ne tute forlasis min, sed ĝi estis tolerebla. Kun humila teniĝo kaj la palpebroj malaltaj mi daŭrigis la marŝadon tra la solecaj vojetoj, murmurante preĝojn duonlaŭte; kaj tiel mi sukcesis alveni al la kampdomo.

Tie atendis min la familio plena kaj la fajrujo brulanta. Ĉiuj estis jam antaŭtimantaj pri mi. Ili adresis al mi kelkajn demandojn, kiujn lakone mi respondis. Kaj mi kredis observi ke neniu atentis pri miaj respondoj. Eble tio estis ĉar mi diris seninteresajn aferojn kaj ĉies okuloj malkovradis sur mia vizaĝo ion gravan kaj nedeĉifreblan, kio pli ol miaj vortoj altiris la atenton. Kia honesta honto aŭ spirita embaraso silentigis min pri tio plej grava el mia tagtempo? Mi ne scias. Certe estas ke mi evitis konversaciojn, mi sidigis antaŭ la fajrujo sub preteksto de laciĝo kaj min donis al miaj meditadoj.

Neniam kiel dum tiu nokto mi konis tiun timon pro la senfino, pro la nekonateco, tiun intensan suferon kiun ĉiuj spertis iufoje kaj kiun neniam oni studis kun la dezirata trankvileco. De kio devenas tiu terurigo? Ĉu la soleco, la senlimo kaj la mallumo agas per si mem kun malbonfara influo sur la homaj kapabloj, freneze malordigante ilin? Aŭ ĉu estas ke en tiaj cirkonstancoj vekigas en ni kapablo preskaŭ ĉiam forigita de maldelikataj sentoj, intima sento, kiu permesas al ni ricevi la sugestion de supersentebaj povoj nin perturbantaj kaj frostotremigantaj? Ho mia Dio! kiel dubi pri tiu profunda sento, per kiu mi vin palpis kun sankta teruro meze de la nokta malplenejo? Ĝi estas nepreciza, malklara, kvazaŭ vekiganta sento kiu, se mi ne estus ricevinta aliajn lumojn, povus min porti al adorado de io abomeninda, kiel tiel multajn popolojn, kiuj eble ne havis en religio aliajn majstrojn ol la teruro; sed, eĉ tiel nepreciza kaj malklara, necese estas rekoni ĝian ekziston.

JOAQUIM RUYRA

El kataluna lingvo tradukis

ESTANISLAU PELLICER



Karakteroj

DIRULOJ KAJ AGULOJ



RISTOKRATE, solene, alte estas la paroluloj kaj la pensuloj la artistoj de la parolo kaj de la penso, ekzemple Vázquez de Mella kaj Balmes.

Demokrate, silente estas la diruloj kaj la aguloj.

La dirulo ĉiam rakontas projektojn kaj eksterordinarajn okazojn. Plej malgranda propono aŭ okazaĵo ĉe li estas granda projekto aŭ gravaĵo. La tempon li pasigas grandige rakonti malgravaĵojn. Kompreneble tiel li ne havas tempon fari ion gravan. Sed ĉion li gravigas per la diro, ĉion li diras grava. Ju pli li diras, des malpli li agas.

La agulo ne havas tempon diri siajn agojn. Ju pli li agas, des malpli li diras. Li vivas por agi kaj agas por vivi. La agulo kredas je la merito. La dirulo kredas je la ŝanco.

DELFI DALMAU



Bibliografio

ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY.—Aŭtoroj: Fleming Fulcher kaj Bernard Long. Eldonistoj: E. Marlborough Co., London. Bonega kaj bele prezentita angla-esperanta vortaro, kun kelkaj klarigaj notoj pri nia lingvo. Aĉetebla ĉe Brita Esperantista Asocio. Prezo: 8 ŝilingoj.

LA KOBOLDO ONDRA.—Aŭtoro: Jiri Mahen. El ĉeĥa lingvo tradukis «Esperantista Rondeto» kaj eldonis «Moraviaj Esperanto-Pioniroj». Tre belaspekta libreto, kun ĉarma rakonto pri la faroj de malbona koboldo Ondra al la fine malfeliĉa knabeto Matiaĉjo. Tiu ĉi traduko, vere ŝatinda kaj graci plena, estas tre dece dediĉata al amantoj de la delikata animo infana.

BUTLETÍ DE LA BIBLIOTECA DE CATALUNYA.—N-ro 8. Bulteno de la fama Biblioteko de Katalunujo, lukse presita, kun plej interesa enhavo kaj

multnombraj gravuraĵoj. Artikoloj aparte citindaj pri la Barcelonaj prelistoj dum la XVI^a jarcento, pri antikvaj dokumentoj de katalunaj hebreoj, skribitaj en kataluna lingvo per hebreaj literoj, pri katalogo de manuskriptoj de la Biblioteko, kaj aliaj.

DEKDUA UNIVERSALA KONGRESO, HAGO 1920. -- Kajero tridek-unua de la Esperantista Dokumentaro eldonata de la Centra Oficejo. Ĝi enhavas la preparajn dokumentojn kaj komunikojn, nomaron de la Honora Komitato, raporton de la prezidanto de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, proponojn ricevitajn, raportojn pri la kunveno de la Lingva Komitato kaj pri ĝeneralaj kunsidoj de la Kongreso, Paroladon de la Kongresa Prezidanto, alprenitajn decidojn, liston de la kongresanoj, raportadon pri kunvenoj de specialistoj kaj pri festoj kaj ekskursoj.

ESPERANTO. DIE GRAMMATIK VON DR. ZAMENHOF MIT ERLAUTERUNGEN, de Prof. P. Christaller. Eldonis: Verlag von Wilhelm Violett, el Stuttgart. En lingvoj germana kaj Esperanto enhavas tiu ĉi libro la grammatikon de D-ro Zamenhof, kun komentario. La aŭtoro klarigas kelkajn malfacilajn demandojn per tre konciza maniero.

ORIENTO. — Libro bele eldonita de «Liceu Dalmau», dediĉata al la kultura kaj profesia edukado de la virino. Ĝi enhavas ĉarmajn kaj interesajn leterojn kaj malgrandajn artikolojn pri la virina vivo, verkitajn en diversaj lingvoj. Ĉe «Liceu Dalmau» (Valencia, 245, Barcelona) oni instruas Esperanton, ankaŭ per korespondado, kaj sur ĉiuj ĝiaj propagandaj presaĵoj oni vidas la nomon de nia lingvo meze de la lingvoj instruataj en tiu konata Liceo. Ĝia fondinto estas la klera instruisto kaj malnova samideano Delfi Dalmau.

LA PESTO EN MILANO DUM 1630. — Ĉapitroj XXXI^a-XXXII^a el «La Gefianĉoj» de A. Manzoni, tradukitaj de Dokt. Pier Carlo Monti. Kajero 24-paĝa el la Kolekto de la Revuo «L'Esperanto», eldonata de A. Paolet, S. Vito al Tagliamento (Italujo) 1921. Historia studo pri la pesto inter la Milanaj loĝantoj, kun interesaj rakontoj pri la opinio de la popolamaso rilate la pestan malsanon kaj pri tiamaj okazintaĵoj. Tre ŝate oni legas tiun verkon enhavantan amason da historiaj sciigoj. La esperanta traduko estas pli ol rekomendinda, perfekta.

DIAGRAMO DE LA ESPERANTAJ KUNRILATAJ VORTOJ, elpensita de D-ro John W. Goetz, Avenida Rio Branco, 131, Rio de Janeiro. Verda stelo sur poŝtkarto, kies kvin pintoj signifitaj per I, Ki, Ti, Ĉi, Neni, turniĝantaj en rondo kun naŭ partoj signifitaj per a, u, o, es, e, am, al, el, om, montras la portugalan tradukon de la kunrilataj vortoj.

QUADERNS D'ESTUDI, n-ro 46. Kataluna gazeto por instruisto, eldonata de «Consell de Pedagogia», Urgell, 187, Barcelona. Artikoloj pri Arĥeologio, Lingvistiko, popolaj dancoj, kaj aliaj. — J. G. C.

Oficiala Parto.

RUN kuraĝiga sukceso okazis la anoncitaj paroladoj de profesoroj S-roj A. Domènech, D. Dalmau kaj Josep Grau, kiel prepara kurso por la partoprenontoj en la ekzamenoj por profesoroj.

Nun ni esperas, ke la ekzamenoj okazontaj la 4.^{an} de la kurranta monato estos tiel same sukcesaj kaj kronos la sindoneman laboron de la paroladintoj, kiuj tiel kompetente disvolvis siajn temojn, liverante al la partoprenintoj atentindajn konsilojn por sukcese gvidi kursojn, fari la lernantojn fruktodonaj esperantistoj kaj profunde enradikigi la konon pri Esperanto.

Ni ricevis de federaciano S-ro A. Ferrer la jenajn kontraŭreformojn al la projekto de nova regularo prezentita de Esperanta Societo Paco kaj Amo:

Titolo; Katalunia Esperanta Federacio (K. E. F.)

Regulo 3-a. K. E. F. estos gvidata de Aganta komitato, kiu estos reelektebla po duono ĉiujare, formita el unu delegito aŭ reprezentanto de ĉiu esperanta societo, grupo aŭ sekcio federacianigintaj kaj ekzistantaj en la urbo-sidejo de la Federacio.

La membroj de ĉi tiu Aganta Komitato estos: ĝenerala sekretario, sekretario unua, sekretario dua, kasisto, kalkulisto, bibliotekisto kaj voĉdonantoj.

(La tria paragrafo taŭgas).

Regulo 5-a. Por plenumi pli bone la duan artikolon de tiu ĉi regularo, K. E. F. eldonos monatan oficialan organon, kies titolo estos «Katalunia Esperantisto» kaj ĝi ĉiam estos ekskluzive verkita en Esperanto.

Por la fakoj kaj propagandaj celoj inter la neesperantistoj, K. E. F. rajtas eldoni gazetojn k. t. p. verkitajn laŭbezone en kataluna aŭ kastila idiomoj, sed kondiĉe ke tiaj gazetoj estu aldonoj al la Oficiala Organo de K. E. F.

(La sekvantaj linioj de la projekto taŭgas).

Regulo 16-a. K. E. F. estos nur esperanta organizaĵo: pro tio ĝi estas tute neŭtrala rilate politikon, religion, socion, k. t. p., sed ne la fondotaj fakoj en K. E. F. laŭ regulo 11-a. de tiu ĉi Regularo.

Pro eraro en la manuskripto, kiun ni ricevis de Esp. Soc. «Paco kaj Amo», en la projekto presita sur nia lasta numero mankas la vorto «supèrflua», kiun oni bonvolu aldoni al la 3-a. regulo tria paragrafo, post la vorto «ostentació».

S. ALBERICH JOFRÈ, SEKRETARIO

ENLANDA MOVADO

RIPOLL. —Sinjorino Petra Domènech, ŝtata instruistino de publika lernejo por infaninoj, enkondukis la instruadon de Esperanto en sia lernejo antaŭ kvar monatoj, post ol ŝi tute sola memlernis nian lingvon. Areto da dek fervoraj lernantinoj sekvas la kurson gvidatan de S-ino Domènech kaj el ilia entuziasmo pri nia ideo oni povas konjekti ke ili estas esperiga semo por estonta grupo en Ripoll. Ni kore gratulas la profesorinon kaj la lernantinojn dezirante ke ilia rondeto rapide kresku.

SALT. —La 6^{an} de Aŭgusto, ĉe la Laborista Kultura Societo «Floreal», faris propagandan paroladon antaŭ amaso da ĉeestantoj nia kara amiko Conrad Domènech, el Girona. Pri la temo «Esperanto, lingvo internacia» la parolanto esprimis konvinkajn argumentojn, tre atente aŭskultatajn kaj entuziasme aplaŭdatajn je la fino de la parolado. Dum Oktobro komenciĝos nova kurso de Esperanto, gvidata de tiu sama laborema samideano.

BARCELONA. —La sidejo de ĉiuj Barcelonaj Grupoj kaj tiu de K. E. F. estis vizitata de la policianoj, laŭ ordono de la aŭtoritato. Ni supozas ke tia vizito efikis montri al la policianoj la facilecon de nia lingvo kaj la intensecon de la movado, post ilia atenta trarigardo de tiom da esperantaj presaĵoj, libroj, broŝuroj kaj gazetoj.

— La pasintan Julion, post longa kaj dolora malsano, mortis en Zaragoza nia juna amiko David Maynar, tre afabla kaj inteligenta esperantisto. Ni esprimas nian profundan kondolencon al lia familio, speciale al lia patro la konata pioniro aragona Manuel Maynar, kiu, vizitinte kun sia mortinta filo kelkajn katalunajn Kongresojn, havas inter la katalunaj samideanoj multnombrajn amikojn kaj ĝeneralan simpatian.

ESPERANTAJ GAZETOJ

ricevitaj en nia Redakcio, publike legeblaj ĉe la legoĉambro de «Enciklopedia Popola Ateneo», Carme, 30, sidejo de K. E. F.

Franca Esperantisto
Le Monde Espérantiste
Esperanto-Praktiko
Itala Esperantisto
La Marto
La Semisto
Germana Esperantisto
Hispana Esperantisto
Internacia Komerca Revuo
Esperantista Laboristo
Kristana Espero
Verda Utopio
Vegetarano
Espero Katolika
La Esperantisto
La Laborista Esperantisto
Esperanto
Hungara Esperantisto
Esperanto Triumfonta

Nova Tempo
Literaturo
Portugal Comercial e Industrial (Esperanta Fako)
The British Esperantist
Nederlanda Esperanto
La Verda Ombro
Amerika Esperantisto
Libero
L'Esperanto
La Revuo Orienta
El Esperanto
Brazila Esperantisto
Oficiala Gazeto Esperantista
Ĉeĥoslovaka Movado
Nova Eŭropo
La XIII^a
Agitanto
Bizantio

Ni dankos sendadon de la ceteraj esperantaj gazetoj.

ANONCETOJ PRI KORESPONDADO

S-ro Aleksandro Pilev, Fontanka 17, Petrogrado (Rusujo), deziras interŝangi il. pk. kaj leterojn.

S-ro Aleksandro Samojlov, Sbornaja 9^a, Simbirsk (Rusujo), deziras interŝanĝi p. k. kaj p. m.

Franca gazeto de leda industrio «Le Cuir» («La Ledo»), dezirante enkonduki en sia eksporta eldono «La Indekso de Ledaj Industrioj» fakon en Esperanto, petas ĉiujn esperantistojn interesiĝantajn al la leda komerco aŭ industrio, kiel teknikistojn, komercistojn aŭ oficistojn, sendi ilian adreson kun la indiko de la profesio al: S-ro Redaktoro de «Le Cuir», 54, rue de Bondy, Paris.

Internacia

Komerca

Revuo

Monata ilustrita revuo por la tutmonda komerco. Esperanto en la praktika vivo!

Mendu specimenan numeron kontraŭ duobla poŝtkarto (kun pagita respondo)! Jara abono Fr. sv. 7.-

«Internacia Komerca Revuo»,
Zürich (Svisujo) Centra Poŝtfako, 6104.

“L'ESPERANTO”

MONATA ILUSTRITA

INTERNACIA REVUO

sub patronado de

«ITALA KATEDRO DE ESPERANTO»

Abono : 15 lirojn

Adreso:

S. VITO AL TAGLIAMENTO

(Italujo)

Esperantistaj sigelmarmoj



Kolekto de 215, tre artaj kaj belaj, ĉiuj eldonitaj de mi. Prezo : 3 pesetoj afrankite.

Aliaj fremdaj esperantistaj sigelmarmoj pli ol 500 diversaj; neesperantaj sigelmarmoj, memorigaj de ekspozicioj, konkursoj, k. t. p. pli ol 2000 diversaj; ĉiujn mi vendos en bonaj kondiĉoj.

Esperantistaj gazetoj

Kolekto de 50 - 100 aŭ - 150 diversaj titoloj; kolekto de 500 gazetoj en malmultaj titoloj sed en diversaj ekzempleroj; tre malalta prezo!



JOAN AMADES

PEU DE LA CREU, 15, 1.^{er}, 2.^a

BARCELONA

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

DUA EPOKO - JARO 1^a : OKTOBRO 1921

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

Jarkotizo : 5 Pesetoj

CLAU ESPERANTO

(KATALUNA ŜLOSILO)

reeldonita de K. E. F.

Verdaj kovriroj kun nova propaganda teksto pri la lastaj venkoj de Esperanto.

100 EKZEMPLEROJ

KOSTAS 7'50 PTOJN.

Vin turnu al nia Administristo.

IX^a KONGRESO

DE K. E. F.

PROPAGANDAJ GLUMARKOJ

arte desegnitaj, kun belaj alegorioj pri la historia urbo Girona.

Folioj en 10 koloroj
kun 20 malsamaj markoj
Ĉiu folio kostas 0'40 ptojn.

Vin turnu al S-ro F. Hil

Parque Divisionario, n.^o 7 - GIRONA

GVIDLIBRO DE GIRONA

VERKITA DE JOSEP MARIA DALMAU

KAJ

ELDONITA DE « GIRONA ESPERO »

OKAZE DE LA

IX^a KONGRESO DE « KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO »

Kun belegaj gravuraĵoj kaj detala arĥeologia kaj historia priskribo de la urbo. — Ĉiuspecaj sciigoj.

Estos donacata 1 ekzemplero al ĉiu federaciano ĉeestanta la Kongreson.

Pliajn ekzemplerojn aĉetu po 1 peseto.



Nia devizo: *Maro estas gutaro*

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administracio :
Carme, 30 : BARCELONA

Redaktoro : Jaume Grau Casas

Nia Kongreso en Girona

MIRIGA estas la sukceso kiun atingis la revivigo de «Kataluna Esperantista Federacio», de antaŭ unu jaro. Tio pruvas la ekzistadon en nia lando de multaj fervoraj samideanoj, ĉiam pretaj oferi sian moralan apogon kaj materialan helpon. Vere nur estis sentata la neceso ke kelkaj sindonemaj batalantoj, plej agemaj kaj plej kuraĝaj, entreprenu la gvidadon de la afero kaj senlace, obstine, konstante laboru por ĝi.

La kvanton da entuziasmo kaj energio kiun postulis la atingitaj rezultatoj oni povos konstati nur en la Girona Kongreso. Ĝia hela sukceso kronos la grandiozan taskon de rekonstruo de la kataluna esperantista organizaĵo.

Sed, post tiu unua jaro de rearanĝo kaj ordigo, estas necese ke ni plifirmigu la bazon de nia Federacio tiamaniere ke ĝi povu batali por Esperanto plej vaste kaj plej efike. Ke tiu ĉi dua epoko estu inda je la antaŭa!

Kaj estu certaj ke la unuan paŝon en tiu direkto ni faros, se ĉiuj senescepte klopodos ĉeesti la IX^{an} Katalunan Kongreson kaj refreŝigas per tio sian esperantan senton. Almenaŭ por danki la laboron de la Organiza Komitato kaj la afablecon de la geesperantistoj el Girona, veturu tien amase, grandare!

Vi ĝuos la senmortan spiriton de antikva urbo, miksitán kun la viva animo de idealo nova.

IX^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio

Girona : 15 - 16 - 17 Oktobro 1921.

P R O G R A M O

SABATO, 15

- 18^a Oficiala alveno de la Kongresanoj.
 Akcepto ĉe la Urbdomo.
 Malferma kunsido de la Kongreso.
 Salutado de la delegitoj.
- 21'30 Inaŭguro de la Propaganda Ekspozicio ĉe la Urbdomo.
- 22^a Koncerto de piano, violono kaj violonĉelo, ludata de la fama «Trio
 Barcelona», ĉe Teatre Principal, dediĉata al la Kongresanoj.

DIMANĈO, 16

- 8^a Solena Diservo kun esperanta prediko en la antikva romarta pre-
 ĝejo de Sant Pere de Galligans. La Schola Cantorum de la Semi-
 nario kantas la Meson de la Virgulino de Nŭria (Romeu), kaj
 aliajn kantojn en Esperanto. Faros la predikon Pastro F. Viver,
 malnova samideano.
- 9^a Vizito al la Preĝejo kaj Arĥeologia Muzeo de Sant Pere de Galli-
 gans.
- 10^a Labora Kunsido ĉe «Grup Escolar», laŭ jena tagordo:
 Sekretaria raporto.
 Aprobo de la bilanco ĝis 1^a de Oktobro.
 Diskuto de prezentitaj proponoj.
 Eventualaj petoj kaj proponoj, se tempo sufiĉos.
 Elekto de nova Komitato de K. E. F. kaj de venonta Kongresurbo.
- 12^a Solena malkovro de la marmora tabulo ŝanganta la nomon de unu
 el la urbaj promenejoj per tiu de D-ro Zamenhof.
- 13^a Festo de la okulvitruloj ĉe «Café Vila» (ŝerca vermuttrinkado)
- 16^a Ferma Kunsido.
- 17^a Festo de la Floraj Ludoj en la Teatro Principal.
- 20^a Oficiala Festeno.
- 22^a Dancado de Sardanoj ĉe Plaça de la Constitució (Cobla Art Gironí).

LUNDO, 17

- 8^a Ekskurso al Empŭries kaj La Escala.
- 9^a Ekskurso al Banyoles.
- 19^a Reveno de la ekskursoj kaj adiaŭa kunveno.

Hortabelo de vagonaroj inter Barcelona kaj Girona

Forveturo de Barcelona	}	5'40	—	7'30	—	10'48	—	14'25	—	17'50
Alveturo al Girona	}	8'52	—	10'28	—	13'50	—	17'41	—	21'11
Forveturo de Girona	}	6'—	—	6'55	—	12'10	—	15'48	—	19'10
Alveturo al Barcelona	}	9'12	—	10'20	—	15'—	—	18'56	—	22'24

PREZOJ:

Ordinaraj biletoj	2 ^a klaso	12'40	ptoj.	(iro aŭ reveno)
»	3 ^a	8'20	»	»
Rabatitaj	2 ^a	8'20	»	»
»	3 ^a	5'35	»	»
IRO KAJ REVENO-RABATITAJ BILETOJ		2 ^a klaso	16'30	ptoj.
»	»	3 ^a	10'65	»

NOTOJ: Rabatitajn biletojn oni liveras ĉiusabate kaj dimanĉe, la aliajn tagojn oni devas pagi laŭ ordinaraj prezoj.

IRO KAJ REVENO-RABATITAJ BILETOJ: Oni ilin liveras ĉiusabate kaj dimanĉe kaj taŭgas por reveni la dimanĉon aŭ eĉ la tutan lundon. Ni rekomendas do, al ĉiuj aĉeti biletojn por IRI KAJ REVENI kiuj povos esti utiligataj eĉ de tiuj kiuj partoprenos la ekskursojn.

Ni varme rekomendas al ĉiuj, bonvolu uzi la OFICIALAN VAGONARON forveturontan la sabaton 15^{an} je la 14'25.

Hoteloj

Hotel dels Italians: Taga pensiono, 15 ptoj. Vespermango kaj ĉambro, 10 ptoj.

Hotel del Comerç: Pensiono, 12 ptoj. Vespermango kaj ĉambro, 8 ptoj.

Hotel Peninsular: Pensiono, 12 ptoj. Vespermango kaj ĉambro, 7 ptoj.

Hotel Centre: Pensiono, 10 ptoj. Vespermango kaj ĉambro, 7 ptoj.

Casa Falguera: Loĝado dum la tuta Kongreso, 15 ptoj.

Casa Quima, Vda. Nuell: Loĝado dum la tuta Kongreso, 15 ptoj.

Oficiala Festeno: 12 ptoj.

(Por la Oficiala Festeno estas necese enskribiĝi antaŭ la 10^a de Oktobro)

Kongresaj sciigoj

FERVOJA RABATILO.—Malgraŭ niaj klopodoj, ne estis eble atingi kiel en la antaŭaj Kongresoj la fervojan rabaton. Tamen, ĉar dum la kongresistoj ekzistas specialaj biletoj, la rabato kiun oni estus atinginta ne estas tre grava. Tial ni ne insistis pri la afero.

GRUPAJ STANDARDOJ.—Ni rekomendas al la Grupoj kunporti sian standardon, ĉar je la alveno en la Kongresurbon tiuj de la lokaj societoj venos saluti ilin kaj oni iros al la Urbdomo en impona esperanta demonstraĵo.

SALUTADO DE DELEGITOJ.—Ĉiuj grupoj sendu rajtigitan delegiton por pli sukcesigi la malferman kunsidon.

KONGRESINSIGNO.—Ni enmetis ĝin en tiu ĉi numero. Oni bonvolu ĝin surporti dum la tuta Kongreso.

GVIDLIBRO DE GIRONA.—Dank' al la malavareco de la Grupo «Girona Espero» estos eldonata bela gvidlibro de la Kongresurbo kun multaj gravuraĵoj kaj detala priskribo de ĝiaj vidindaĵoj, lerte verkita de nia estimata samideano Josep M.^a Dalmau.

La Grupo eldonanto donacos unu ekzempleron al ĉiu federaciano ĉeestanta la Kongreson. Por tio estos necese ke ĉiu prezentu la Kongresan karton, kiun ni sendas al ĉiu federaciano kune kun la nuna numero. Pli da ekzempleroj oni povos aĉeti po 1 peseto.

NOVA STRATO DOKTORO ZAMENHOF.—Pro la kora helpo de la Urbeŝtaro de Girona, ni povos ankaŭ en tiu ĉi Kongreso emocie inaŭguri novan straton Zamenhof kaj publike honorigi la memoron de nia amata Majstro.

OFICIALA FESTENO.—Al tiuj dezirantaj ĉeesti nian solenan Festenon ni atentigas ke estas *absolute necese* enskribiĝi antaŭ la 10^a de Oktobro, per la sendado de la ĉi-kune sendata enskribilo. Prezo: 12 ptoj.

EKSKURSOJ.—Ni petas ankaŭ ke oni uzu la senditan enskribilon por anonci sian partoprenon en la ekskursoj ĉu al Empúries kaj La Escala, ĉu al Banyoles.

Prezo de la aŭtomobiloj: Al Empúries kaj La Escala, 10 ptoj. proksimume. Al Banyoles, 4 ptoj. Kompreneble, oni devas aparte kalkuli la koston de la tagmanĝo.

ESPERANTA EKSPOZICIO.—Ni rememorigas ke oni povas ankoraŭ sendi esperantaĵojn por tiu grava Ekspozicio, instalota en granda salono ĉe la urbdomo. Oni plene zorgos pri la ricevita materialo.

GLUMARKOJ DE LA KONGRESO.—Aĉetu la belan kolekton eldonitan de la Organiza Komitato por la kaso de la Kongreso.

Vin turnu pri ĉiaj aferoj al S-ro F. Hil, Parque Divisionario n-ro 7, Girona.

VIII^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj

Verdikto

ORDINARAJ TEMOJ

ORIGINALAJ TEKSTOJ

- I. — Versaĵo kantanta Amon — Oni aljuĝas la premion al la verko n-ro 72, devizita «Ruĝa Floro». *I^a Subpremio* — Al la verko n-ro 56, devizo «Andante». *II^a Subpremio* — Al la verko n-ro 64, devizo «Ama malkvieto». *III^a Subpremio* — Al la verko n-ro 39, devizo «Madrigalo». *IV^a Subpremio* — Al la verko n-ro 69, devizo «Nur unufoje amas la kor'». *V^a Subpremio* — Al la verko n-ro 14, devizo «Nubo mistera».
- II. — Ama verko en prozo — Ne aljuĝita.

TRADUKITAJ TEKSTOJ

- I. — Traduko de «El Misteri de la Prada» — Estas aljuĝita la premio al la verko n-ro 9, kun devizo «Ni amu la pacon de l' Naturo».
- II. — Traduko de «L'escarment» — Premio al la verko n-ro 1, devizo «Secundum scripturas». *I^a Subpremio* — Al la verko n-ro 52, devizo «Sweet, sweet, sweet...». *II^a Subpremio* — Al la verko n-ro 62, devizo «Ne ŝovu la nazon».

La NATURAN FLORON kaj la rajton elekti Regionon de la Festo, oni aljuĝas al la verko n-ro 72, kun devizo «Ruĝa Floro».

La Premion difinitan por la Originalaj Tekstoj II, la Juĝantaro aljuĝas kiel *I^{an} Subpremion* de la originalaj Tekstoj I, al la verko n-ro 56, devizo «Andante».

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

- I. — Premio de Lia Moŝto D-ro Narcís Plá i Deniel : Duonigita inter la verkoj n-ro 18, «Individuo» kaj n-ro 65, «Diada senyalada». *I^a Subpremio* — Al la verko n-ro 49, «Ne fari malbonon estas nia devo». *II^a Subpremio* — Al la verko n-ro 46, «La Majo alvenis». *III^a Subpremio* — Al la verko n-ro 51, «Aglo blanka». *IV^a Subpremio* — Al la verko n-ro 3, «Ruskinano».
- II. — Premio de la Grupo «Semo» de A. E. P. — Ne aljuĝita.

- III. — Premio de la Grupo «Barcelona Stelo». — Ne aljuĝita. *Subpremio*
— Al la verko n-ro 50, «Pripensu...».
- IV. — Premio de la Esperanta Societo «Nova Sento». — Ne aljuĝita.
I^a Subpremio — Al la verko n-ro 74, «En la mondon venis nova sento». *II^a Subpremio* — Al la verko n-ro 48, «Pentekost'».
- V. — Premio de «Unió Deportiva» el Girona — Al la verko n-ro 21,
«Sunt qui cuvrículo suo...».
- VI. — Premio de S-ro Casà Costal, Direktoro de la «Normala Lernejo
por Instruistoj» el Girona — Al la verko n-ro 41 «Ne tentes ant
perfiĉe».
- VII. — Premio de Lia Moŝto Markizo de Camps — Al la verko n-ro 66,
«Nunca fuera caballero de damas tan bien servido». *I^a Subpremio*
— Al la verko n-ro 35, «Quis fuit, horrendos primus qui protulit
enses? Quam ferus et vere ferreus ille fruit!»
- VII. — Premio de la Grupo «Ĝirona Espero». — Al la verko n-ro 76, «La
Devesa».
- IX. — Premio de la Societo «Marte» el Girona. — Al la verko n-ro 37,
«Nova metodo». *I^a Subpremio*. — Al la verko n-ro 8 «La falsa aŭ
vera puritanismo de la nuna esperanta literaturo malhelpas ĝian
beletristikan disvolvigon». *II^a Subpremio*. — Al la verko n-ro 60,
«En sonĝo patrujon mi vidis».
- X. — Premio de Lia Moŝto Vicari Capitular de Girona. — Duonigita in-
ter la verko n-ro 13, «Sub la verda stelo ni antaŭen iru» kaj la ver-
ko n-ro 17, «Por Dio kaj Eklezio!».
- XI. — Premio de la Moŝta Katedrala Kanonikaro el Girona. — Al la
verko n-ro 73, «...Homar', vojiru!».
- XII. — Premio de la Rektora Moŝto kaj Klaŭstro de la Tridentina Semi-
nario de Girona. — Al la verko n-ro 27, «Ut omnes unum!».
- XIII. — Premio de «Grupo Escolar» el Girona. — Ne konkursita.
- XIV. — Premio de la «Unión Gremial y Patronal» el Girona. — Ne kon-
kursita.
- XV. — Premio de «Coliseo Imperial» el Girona. — Al la verko n-ro 68,
«Sangaj larmoj». *I^a Subpremio*. — Al la verko n-ro 70 «Amo kreas
la pacon». *II^a Subpremio*. — Al la verko n-ro 54, «Infano».
- XVI. — Premio de «Schola Orpheonica» el Girona. — Al la verko n-ro 24,
«Festina lente».
- XVII. — Premio de «Instituto General y Técnico» el Girona. — Al la verko
n-ro 53, «Nojo».
- XVIII. — Premio de la Komerca Ĉambro de Girona. — Al la verko n-ro 10
«Magnificat».
- XIX. — Premio de Lia Moŝto la Provincestro de Girona. — Ne konkursita.

IX KONGRESO DE KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

Girona 15 - 16 - 17 Oktobro 1921

ENSKRIBIĜO POR LA OFICIALA FESTENO

S - ino el
S - ro

mendas lokojn ĉe la Oficiala Festeno, garantiante al la Organiza Konitato la pagon de la menditaj lokoj po 12 ptoj. ĉiu.

POSTKONGRESAJ EKSURSOJ AL EMPURIES KAJ LA ESCALA

S - ino mendas lokojn en
S - ro

la specialaj aŭtomobiloj por tiu ĉi ekskurso.

(Prezo de la aŭtomobilo proksimume 10 ptoj.)

AL BANYOLES

S - ino mendas lokojn en
S - ro

la specialaj aŭtomobiloj por tiu ĉi ekskurso.

(Prezo de la aŭtomobilo proksimume 4 ptoj.)

(dato) 1921

(subskribo)

NOTO: Bonvolu sendi tiun ĉi enskribilon al S-ro Francisco Hil, Parque Divisio-
nario, n.º 7 - Girona. - NEPRE antaŭ la 10ª de Oktobro.

*Oktobro 1921 sendita per letero 130/131
Kataluna Esperantista*

Octubre 15 - 16 - 17 Octubre 1951

ESCRIBIR POR LA OFICIALA FESTIVO

2 - no
10 -

El precio de la automotriz por el día de escritura
El precio de la automotriz por el día de escritura

POSTKONGRESAL ESCRIBIR
AL ESCRIBIR EN LA ESCALA

2 - no
10 -

El precio de la automotriz por el día de escritura
El precio de la automotriz por el día de escritura

AL ESCRIBIR

2 - no
10 -

El precio de la automotriz por el día de escritura
El precio de la automotriz por el día de escritura

(dato) 1951

(escribo)

NOTA: Debe ser escrito en el cuaderno al 5to. Francisco M. Pardo División
de la 1ra. - Oficina - NEPRE antes de 10 de Octubre

XX. — Premio de la Ekscelenca Urbeŝtraro de Girona. — Al la verko n-ro 15, «Gloron al nia Majstro!».

La Premion difinitan al la Eksterordinara Temo II, la Juĝantaro, kun konsento de la donacinto, aljuĝas kiel I^{an} Subpremion al la Eksterordinara temo I, al la verko n-ro 49 «Ne fari malbonon estas nia devo».

Laŭ la regulo II de la Regularo de la Konservantaro de Floraj Ludoj, la verkoj premiitaj fariĝas propraĵo de la Konservantaro kiu zorgos pri ilia publikigo. Permeson por reprodukto oni petu de la Redakcio de *Kataluna Esperantisto*.

Oktobro 1921. — Eduard KÜHNEL, prezidanto. — D-ro Josep CASANOVAS. — Josep GRAU. — Teo JUNG. — Estanislau PELLICER, sekretario.



BILANCO DE LA 10^a DE OKTOBRO 1920 ĜIS LA 1^a DE OKTOBRO 1921

ENSPEZOJ	Pesetoj
Donacoj por Kapitalo de K. E. F.	550'—
» » propagando	50'—
Anoncoj aperintaj sur Kataluna Esperantisto.	188'50
Vendado de poŝvortaretoj kaj katalunaj ŝlosiloj.	358'65
» ponumero de Kataluna Esperantisto	7'—
Kotizaĵoj enspezitaj	1729'50
Ekzamenaj matrikuloj	47'—
	2930'65

ELSPEZOJ	Pesetoj
Deficito de la antaŭa jaro	78'—
Ĝeneralaj presaĵoj	304'—
Presado de 9 numeroj de Kataluna Esperantisto.	1390'—
Aĉetado de poŝvortaretoj kaj eldono de Katalunaj ŝlosiloj	324'80
Ĝeneralaj elspezoj, korespondado, poŝtmarkoj, k. a.	313'85
	2410'65

RESUMO	
Enspezoj	Ptoj. 2930'65
Elspezoj	» 2410'65
Restas en kaso	» 520'—

Barcelona, 1 Oktobro 1921.

La Prezidanto: JOAN GILI NORTA

La Administristo: PERE NAVAS

La Kasisto: JAUME PRUNA

Girona



IRONA, Girona nemortema! Nun estas nokte kaj viaj ruinaĵoj timigas. Malantaŭ la Katedralo estas sabato de sorĉistoj, aliformigitaj en arkitekturaj strukturoj. Estas nigra abismo apud la nuda rando de altega muro. La akutaj steloj vivas tre supre kaj la strigoj tre malsupre. Kaj en la placo solena kaj terura — kie laŭfantoma ŝtuparego konfuze elvokas en la penso de la vojaĝanto rememoron je stranga revo de antaŭ dudek jaroj — nevideblaj infanoj, kiujn eĉ je iliaj malbonagadoj la urbo genio inspiras, ludas teruran ludon; kaj en la silento de la alta vespero pordfrapilo batas, ĝi sola, la domon de retordita maljunulineto.

Sed, jen estas tagiĝo. Kantas la kokoj, kaj la Devesa, apud la rivero, mildiĝas kaj paradiziĝas, kvazaŭ la bosko kie Beatrico montriĝis.

Jes, Girona. Vi aspektas ordarangita de febro el Dante. La muregoj, la Infero. La preĝejoj, la Purgatorio. La arbaroj, la Ĉielo.

Viaj artistoj skribas akrajn rakontojn timigajn aŭ desegnas skeletojn kun ĉapelaĉo duonkovranta la senharaĵon kaj pipo inter la makzeloj.

Sed vi kaŝas en via interno, Girona, la junan aman Arkitekturiston. Tiun kiu havas la animon tiel nova, pulsbatanta, suka kaj plena de estonteco kiel unu el tiuj primitivaj organismoj en la fundo de la maro, kiuj sin movis malkviete ĉar ili gardis, laŭ la zoologoj, en sia patrino gelateno la plasmon de ĉiuj estontaj organismoj, de ĉiuj animaloj kaj plantoj kiuj estas plenigitaj la mondon de varieco.

Girona, vi estas kvazaŭ maljuna militisto invalida kaj eksterbruligita de la fajro el la timegindaj bataloj, kaj en kiu aperas, de tempo al tempo, ĉe la hirta lipharo, hela boneco de infano.

Vi estas, Urbo, malmola nukso, kun ŝelo ŝtona kaj sulka, sed blanka interne, mola, lakta, dolĉega.

EUGENI D'ORS

El kataluna lingvo tradukis

JOSEP MARIA DALMAU

IX^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio

Girona : 15 - 16 - 17 Oktobro 1921



Vidaĵo kun la Katedralo kaj Preĝejo de Sant Feliu.




St. Pere de Galligans: Pordo.



Malnova rimarkinda strato.




Pentrinda rivero Onyar fluanta tra la urbo.



Urbdomo



Ĝardenoj de «La Devesa»



Placo de la Katedralo.



Sant Pere de Galligans : Klaŭstro.



Katedralo: detalo de la klaŭstro.



Pregejo Sant Feliu : Romana-Kristana sarkofago.

Kanzono



MANĈON matene, sub la varmega suno falanta en la placon de Sarrià, mi vidis maljunulon el tiuj kantante trairantaj la mondon, kiu solene staris kaj kantis meze de rondeto de infanoj lin aŭskultantaj kun malfermita buŝo.

Li kantis per plena voĉo, kun tia fremda akcento elvokanta vizon pri longaj marŝadoj tra nedifinitaj vojoj al malproksimaj horizontoj, trairante kampojn kaj urbojn, solecajn montojn kaj vastajn ebenaĵojn plenajn de dissemataj vilaĝoj, elportante sunon kaj roson, pluvojn kaj ventojn, ĉiam antaŭen, ĉiam malproksimen, kantante — malarangata la barbo kaj la longa griza hararo libere fluganta — fremdajn kanzonojn per akcento ĉie fremda, kaj ĉie trovante rondeton de geknaboj pretaj ĉirkaŭi lin kaj lin aŭskulti kun buŝo malfermita.

Mi tuj sentis ion moviĝi en mi, kvazaŭ degelo, kaj forlasante malrapide la promenejon mi ekreis tute dolĉe. — Se mi estus poeto — mi pensis — en la aĝo de dudek jaroj, havanta la amatinon malproksime, mi vokus tiun viron kaj venigus lin sidadi kun mi en iun ajn angulon de kvietita beleco, kaj diktus al li la kanzonon de mia amo; kaj post ol li estus ĝin ellerninta, petante al li ĝian neforgeson, mi montrus al li la punkton de la horizonto en la direkto al la malproksima feliĉa loko.

La maljunulo foriris kantante, kantante mian kanzonon por ĝin ne forgesi, kaj al ĝi tuj aldonus sian akcenton, akordante ĝin al la ĝojo de l' momento pro la denova marŝado kaj mondonaco ricevita.

Kaj antaŭen iradus la kanzono. La sunradioj orumus ĝin kaj la roso donus al ĝi misteran ĉarmon; ĝi fariĝus forta pro la ventoj kaj dolĉa pro la matenaj odoroj; la maljunulo ĝin kantus larmoplena meze de la plej grandaj mizeroj, etendante la manojn al peco da pano; kaj en bonsorta tago li ĝin kantus bakusa ŝanceliĝante post la eliro el vintrinkejo; la morgaŭon matene, dum li marŝus tute sola tra la arbaroj, ĝi estus pura kiel birda frilo; kaj vespere, je lia alveno al la urbo ĵam tute lumoplena, ĝi tordiĝus volupte. Kaj ĉie oni lernus ĝin, ĉiu siamaniere. Eĉ la maljunulo mem, aŭdante ĝin ĥore rekantata ĉirkaŭe, vidus ĝin transformita, li ĝin ree lernus, malnova ĉiam kaj ĉiam nova.

Kaj ian tagon — ian tagon! — alvenus la maljunulo en belan vilaĝon dum granda festo; ĉiuj troviĝus sur la stratoj, tra la stratoj meze de muzikoj, kaj en la aero estus sonorila bruego. Bela tago, bela suno gajigus tiun matenon. Kaj la viro starigus en la mezo de la placo kaj aŭdigus mian aman kanzonon kiel kanton de festo. Kaj ĝi estus tia, ĉar ĉiu en ĝi sentus la spiradon de l' longa marŝado, la sunon kaj la roson, la postsignojn de ĝojoj kaj mizeroj, la froton de l' popolamasoj: ĉion ĉi kreskigatan de mia kovinta amo.

Kiam li estus fininta, grandaj laŭdoj resonus ĉirkaŭ li kaj multan monon

li kolektus, tre ĝoje donacitan. Kaj meze de la popola bruo li aŭdis klaran kaj delikatan voĉon, dirantan: — Mi ne scias kion enhavas tiu ĉi kanzono, tiele al mi plaĉas. — Kaj li, sin turnante, respondus: — Nur povas esti tio, ke por vi ĝi estis verkata. — Kaj tiam li rakontus al la knabino kiel kaj kie ĝi estis al li instruata.

Tiam ŝi ĝojege respondus: — Diru al li, do, ke mi en la interno de mia koro tiel same parolis. —

Nu, kion plu mi rakontos? Ke tiele finiĝis mia revo. Sed ĝi ne tute finiĝis; ĉar tio okazis dimanĉon kaj alian dimanĉon, kiam mi jam ne rememoris pri tio, mi vekigis en mia lito, matenfrue, ankoraŭ mallume, kaj sur mia soleca strato mi aŭdis pezan kaj malrapidan paŝadon alproksimiĝantan kun kanzono mallaŭte sonanta el la lipoj. Kaj tiu kanto estis al mi tiel dolĉa, ke ĝi ŝajnis kantata en mi mem, kaj havis tian misteran ravon, ke mi ne sciis ĉu mi dormas aŭ ne. La malrapida paŝado kaj la kanto malpeza pasis kaj baldaŭ foriĝis, kaj la strato restis denove kvieta kaj soleca. Ektagiĝis en mia fenestro kaj mi denove dormiĝis; sed la kanzono restis en mia memoro. Kaj iu, al kiu mi ĝin ripetis, diris al mi ĉu ĝi estas popola kanto el Rosselló.

Sed mi kredas ke ĝi estas la revita kanzono de la reva amo juneca, kiu revenis al mi transformita. Kaj mi pensas ke ni ĉiuj vivas, pli ol ni supozas, en misteraj realaĵoj.

JOAN MARAGALL

El kataluna lingvo tradukis

ROMÁ GUARDIET



Oficiala Parto

La Direkta Komitato de K. E. F., en sia kunsido de la 21^a de Septembro, decidis esprimi publike sian bedaŭron kaj malaprobbon pri kelkaj konceptoj enhavataj en la antaŭparolo al la propono farita de Esperanta Societo «Paco kaj Amo», diskutota en nia venonta IX Kongreso.

LA VIC-SEKRETARIO: JAKO CLARAMUNT

Novaj Profesoroj de Esperanto



IATEMPE okazis la naŭ paroladoj celantaj altiri la atenton de la estontaj Profesoroj sur tion, kio estas necesa ĉe bona instruanto de nia kara lingvo el diversaj vidpunktoj.

La tri unuaj paroladoj estis pri gramatiko. En ili S-ro Artur Domènech klarigis per interesa maniero la gramatikan strukturon de Esperanto, konstatante la gravan helpon por ĝia lernado devenantan de gramatikaj konoj.

En aliaj tri, S-ro Delfi Dalmau montris kiamaniere Esperanto povas esti instruata, ne tiel gramatike, kaj vidigis tutan planon laŭ kiu oni povas instrui la internacian lingvon, same kiel la naciajn. Saĝaj didaktikaj rimarkoj valorigis ankoraŭ liajn disertaĵojn.

En la tri lastaj paroladoj S-ro Josep Grau pritraktis la esperantan literaturon kaj faris amason da interesaj rimarkoj pri korekta esperanta stilo. Li faris komenton pri la Fundamenta Krestomatio, legante kelkajn el ĝiaj perfektaj prozaĵoj, atente studis la esperantan versfaradon kaj diris trafajn konsilojn pri ĉiuj pecaj literaturaj tradukoj.

La 4^{an} de Septembro okazis la ekzamenoj, ĉeestataj de distingindaj geesperantistoj. Tutan matenon daŭris la skribaj kaj parolaj provoj. Fine la Tribunalo, konsistanta el la tri paroladintoj, sciigis ke estas novaj Profesoroj la jenaj samideanoj: S. Alberich Jofrè, Jaume Claramunt, Antoni Durà, Joan Font Giralt, Jaume Grau Casas, Romà Guardiet, Salvador Gumà kaj Luis Santamarina.

Atingis la diplomojn pri Kapableco: Sinjoroj Josep Alberich kaj Vicens Andrés, kaj Fraŭlinoj Pilar Molins kaj Anjo Vilaró.

La ekzameninto S-ro Grau laste parolis, rekomendante al ĉiuj fervoron kaj persistemon en la instruado de nia lingvo por la bono de la movado.

Kanto: De l' Poeto al Amatino

Kredu min, amatin' ĉarma,
 kaj forigu viajn timojn;
 miajn sincerajn esprimojn
 tute fidu via kor';
 kvankam forte min altiras
 de Natur' la Poezio,
 de mia ama pasio
 por vi estas la fervor'.

Ne bedaŭru mian amon
 je l' Naturaj emocioj,
 ĉar, kvazaŭ viaj gracioj,
 vekas sentojn de l' Poet';
 kaj li glorajn similecojn
 en vi trovas, kun plezuro,
 je la ĉarmoj de Naturo,
 de viaj ĉarmoj portret'.

Estas via ruĝa buŝo,
 por mi, kvazaŭ bela floro
 heliĝinta, dum aŭroro,
 pro la kiso de la sun';
 kaj estas viaj okuloj
 tiel helaj kiel lago
 montranta, post luma tago,
 blujajn rebrilojn de lun'.

La bruo de l' foliaro,
 pro la venteta kareso,
 ŝajnas diri pri amjeso
 mallaŭta, kun ĉarma tim';
 kaj mi tiam rememoras
 la dolĉajn, gajajn momentojn,
 dum ni esprimas la sentojn
 de nia amo sen lim'.

Kiam, ĉe fino de tago
 ĉielblua, dum somero,
 min ĉirkaŭas la mistero
 de la glora sunsubir',
 mi kredas ke min influas
 via rigardo magia,
 kies ĝoj' melankolia
 min pretigas al sopir'.

La triloj de la birdaro,
 kiu ĝojege sin movas
 sur la branĉoj, ĉar ĝi trovas
 en ili lokon por nest',
 estas similaj al viaj
 ĝojaj, belsonaj ekkrioj,
 kiam miaj ampasioj
 elmontriĝas sen atest'.

Kaj en tiaj emocioj
 trovas anim' de Poeto
 dolĉan fonton de kvieto,
 dum je vi li restas for;
 ĉio kio lin kortuŝas
 kaj antaŭ li belaspektas,
 el viaj ĉarmoj nur estas
 ĝojiganta rememor'.

.....
 Amu min, amatin' ĉarma,
 kaj la varm' de miaj rimoj
 estu por niaj animoj
 ama kuniga fervor';
 nur apud vi mi deziras
 vin rigardi kun envio,
 ĉar mia ama pasio
 estas mia sola glor'.

JAUME GRAU CASAS

Por la blindaj esperantistoj



ESTON tre ŝatatan ni ĝuis en la sidejo de K. E. F., la 15^{an} de Septembro, okaze de la parolado pri Praha de S-ro Gili Norta kaj la koncerto de gitaro de S-ro B. Zapater.

La granda salono de «Enciklopedia Popola Ateneo» estis plena de distingindaj samideanoj kaj belegaj samideaninoj, ĝojaj pro tiu agrabla rendevuo en kiu faris sian reaparon inter ni kelkaj malnovaj esperantistoj el Barcelono.

S-ro Gili Norta entuziasmigis la atentan aŭskultantaron per la rakonto de tiom da emociaĵoj de li travivitaj dum longa restado en Esperantujo. La denova firma antaŭeniĝo de nia movado sendube impresas ĉiujn kiuj iam laboris por ĝi kaj espereble multaj el niaj samideanoj revekiĝos por la bono de nia sankta afero.

Nia tre estimata samideano S-ro B. Zapater, blindulo, veninta el la urbo de la XIII^a viziti sian familion kaj baldaŭ forveturonta Germanujon kie nun li loĝas, majstre ludis per la gitaro variaĵojn sur temo de Mozart, valson kaj fantazion, kaj poste ludis kaj kantis kelkajn germanajn kantojn esperantigitajn de li mem, kies teksto estis presata sur la disdonitaj invitiloj.

Monkolekto farita je la fino de la koncerto havigis la sumon da 82 pesetoj por la eldono de la revuo «Esperanta Ligilo» por blinduloj, kiu ĉiumonate alportas al ili lumradion en la nokto de ilia ekzistado.

Ni danke akceptos tiucele monhelpon de aliaj bonvolemluloj. Al la alvoko farita al la esperantaj organizaĵoj respondos tiamaniere, laŭ siaj fortoj, nia kara «Kataluna Esperantista Federacio».



Niaj Lingvaj Institucioj



ricevis Raporton de la Prezidanto de la Lingva Komitato kaj Akademio, kiun ni ŝatus represi se ni havus por tio sufiĉan lokon.

Estas en ĝi resumata la historio de niaj Lingvaj Institucioj depost Julio 1914. En Julio 1920 oni komencis ilian reorganizon kaj oni esperas plene atingi tion post nelonge.

La agado de la Lingva Akademio estas tute laŭdinda. Estas nepre necese ke oni defendu la lingvon kontraŭ la reformemo de malsaĝuloj.

Ni kopias ĉi-sube la lastan paragrafon de la raporto de S-ro Cart, kiu tiel elokvente montras la neceson de la lingva unueco.

Permesu, karaĵ samideanoj, ke, finante tiun ĉi jam tro longan raporton, — kiu montras, ke, se ni ne tiel multe laboris, kiel mi esperis: rapide fluas la monato! ni tamen ne estis maldiligentaj, — mi rediru kun insisteco, ke nia interna unueco estas la ĉefa kondiĉo de nia sukceso. Se tiel energie, tiel obstine ni defendas la pure Zamenhofan lingvon, tio ne estas, ĉar ni opinias ĝin en ĉiuj detaloj la plej bona: ne fanatikeco estas nia fideleco, sed ĉar ni scias, ke nur per tia sintenado ni povas konservi la unuecon ĉu internacian, ĉu interklasan, ĉu interaĝan. Et lingva vidpunkto ne ekzistas, ne devas ekzisti inter ni diversnaciaĵoj, diversklasaj homoj, diversaĝuloj: ni ĉiuj estas Esperantistoj, nur Esperantistoj. Ni neniam starigu nacion kontraŭ nacio, klason kontraŭ klaso, aĝon kontraŭ aĝo, sed unuanime, manon en mano, ni laboru por la venko de la kara lingvo, kiun donis al ni nia neforgesebla Majstro, D-ro Zamenhof!



Bibliografio

Al la Esperantistoj!—Propaganda folio kun difino de Vegetarismo eldonita de I. U. E. V.

Unua Helpe.—Bele prezentita broŝureto per kiu la firmo Burroughs Wellcome & Co. — Londono (Anglujo) per bona esperanto propagandas siajn farmaciajn specialaĵojn, precipe la ekipojn por unua helpe en okazo de akcidentoj.

«*Mondjunularo Katolika*» (Moka). Alvoko al ĉiuj katolikaj gejunuloj, kun provizora statuto, aliĝilo, regulaĵo por la «Moka»-delegitoj kaj listo de ili en kelkaj landoj. Sidejo de Moka : Graz (Aŭstrujo), Karmeliterplatz, 5.

Faka Vortareto No. 2.—Terminoj uzataj en la komerco pri peltoj. = Eldonaĵo de Brita Literatura kaj Debata Societo. = Post la n^o 1, jen la n^o 2 de tiuj laŭdindaj fakvortaroj kiuj tiel efike faciligas la de ĉiuj esperantistoj deziran aperon de plena, universala vortaro de la lingvo. Esperinde estas ke fakoj de bot - kaj ŝuindustrio baldaŭ aperu, laŭ anonco de la eldonintoj.

Tarptantines kalbos Esperanto vadovélis (Lernolibro de Esperanto por litovoj). — Aŭtoro A. Klimas.

Neeble estas al mi juĝi pri la didaktika valoro de tiu malgranda gramatiko ĉar mi tute ne konas litovan lingvon. Mi nur povis konstati ke la esperantaj tekstoj estis zorge elektitaj el verkoj de niaj klasikuloj, ĉefe el tiuj de la Majstro. El tio mi konjektas ke la verko estas bona kaj, esperinde, ĝi estos taŭga varbilo por litovoj.

Legolibro, unua volumo : *Internacia anekdotaro*. — Aŭtoro P. William. — Ĝi estas la n^o 7 de Nova Esperanto-Biblioteko, prezentita de Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek, Berlin. Modela stilo, zorgema kompostado, interesa teksto : jen estas la valoraj kvalitoj de tiu anekdotaro kiu povas efike utili dum ekzercaj interparoladoj.

Bes-a Adresaro de esperantistoj el ĉiuj landoj — Tria eldono, somero 1921, eldonita de Bohema Esperanto-Servo, Moravany (Ĉeĥoslovakujo). — Tiu nova eldono de la ĉie konata adresaro prezentigas pli valora ol la du antaŭaj. Tamen mi kun bedaŭro rimarkas ke la nombro da adresoj, ĉu de unuopuloj ĉu de esperantaj entreprenoj ne respondas al la graveco de nia movado en ĉiuj landoj. Dezirinde estas ke la venontaj eldonoj de tiu rekomendinda informilo estu pli enhavaj. Tion devas klopodi ĉiulandaj esperantistoj. Siavice, Bohema Esperanto-Servo agos bone se ĝi-revizos kun atenta zorgemeco la adresojn. Hazarde mi legas (paĝ. 68) ke S-ro D. Maynar loĝas en Zaragoza, Portugalujo (anstataŭ Hispanujo). — KATONO.



NIA VENONTA NUMERO

dediĉata al la Kongreso kaj Floraj Ludoj, kun detalaj raportoj kaj

SUPLEMENTO KUN BILDOJ

estos 32 paĝa (dumonata) kaj aperos nur je la fino de Novembro.



Nova Grupo en Salt



ROKSIME de Girona, en la vilaĝo Salt, fondiĝis nova grupo «Regeneracio» ĉe la Laborista Kultura Societo «Floreal» kaj estas komencita kurso de Esperanto, amase kaj fervore ĉeestata.

La 18^{an} de Septembro, je la 10^a vespere, okazis la solena inaŭguro de la Grupo per propaganda mitingo. Okupis la scenejon la parolantoj akompanataj de kelkaj samideanoj el Salt kaj Girona, kaj plenigis la tutan teatron publiko avida konatigi intime kun nia idealo.

S-ro Conrad Domènech, el Girona, kies laboremo vekis la esperantan fervoron en Salt, prezentis la parolantojn dirante ke ili plene elmontros kion li ekdiris en siaj antaŭaj paroladoj pri Esperantismo, kaj ĝoje konstatas la sukceson atingitan de ili, ĉar post nur kelke da semajnoj estas jam fakto la aranĝo de kursoj kaj la fondiĝo de la Grupo.

S-ro Delfi Dalmau, el Barcelona, konata intelektulo kaj malnova pioniro, faris belan kaj mildan paroladon pri la perfekteco de Esperanto kaj ĝia plena taŭgeco kiel lingvo internacia; S-ro Jaume Grau, Redaktoro de *Kataluna Esperantisto*, paroladis pri la profito kiun speciale la laboristoj povas elfiri el Esperanto, faciligante per ĝi la rektan interrilaton de la internacia laboristaro kaj pligrandigante sian kulturon kaj ĉiuspecajn kapablojn; kaj S-ro Joan Gili Norta, Prezidanto de «Kataluna Esperantista Federacio», rakontis la impresojn de sia vojaĝo tra Eŭropo okaze de la Praha Kongreso, pruvante per emociaj vortoj la fratecon de nia samideanaro kaj la certecon de nia fina venko, kaj rekomendis ke ĉiu laboru nun plej intense per tiu agema kaj senlaca entuziasmo jam montrita de la nova aro da kunbatalantoj. Li finis sian varman paroladon per invito al la IX^a Kataluna Kongreso.

Per kora aplaŭdo la tuta ĉeestantaro esprimis sian fidon je nia ideo, post la fino de ĉiu parolado.

La Prezidanto de la Grupo resume parolis fine, dankante ĉies helpon, kaj kronis la belan feston vigla kantado de nia esperanta himno.

ESPERANTAJ GAZETOJ

ricevitaj en nia Redakcio, publike legeblaj ĉe la legočambro de «Enciklopedia Popola Ateneo», Carme, 30, sidejo de K. E. F.

Franca Esperantisto
Le Monde Espérantiste
Esperanto-Praktiko
Itala Esperantisto
La Marto
La Semisto
Germana Esperantisto
Hispana Esperantisto
Internacia Komerca Revuo
Esperantista Laboristo
Kristana Espero
Verda Utopio
Vegetarano
Espero Katolika
La Esperantisto
La Laborista Esperantisto
Esperanto
Hungara Esperantisto
Esperanto Triumfonta

Nova Tempo
Literaturo
Portugal Comercial e Industrial (Esperanta Fako)
The British Esperantist
Nederlanda Esperanto
La Verda Ombro
Amerika Esperantisto
Libero
L'Esperanto
La Revuo Orienta
El Esperanto
Brazila Esperantisto
Oficiala Gazeto Esperantista
Ĉeĥoslovaka Movado
Nova Eŭropo
La XIII^a
Agitanto
Bizantio

Ni dankos sendadon de la ceteraj esperantaj gazetoj.

ANONCETOJ PRI KORESPONDADO

S-ro Berthold Heinrich - Steinstr. 46 p^{tr}. Breslau, 23, (Germanujo), p. k. kaj interŝanĝi gazetojn kaj papermonon.

S-ro Kurt Höfer, Topfmarkt 11, Plauen c. Vogtl (Germanujo), p. k. kun ĉiuj landoj. Ĉiam respondas.



POR PRUVI LA NUNAN FORTON DE ESPERANTO EN NIA
LANDO, VETURU AL GIRONA!

POR LA PLENA REVIGLIGO DE "KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO", PARTOPRENU LA IX^{AN} KATALUNAN
KONGRESO!



KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

DUA EPOKO - JARO 1^a : NOVEMBRO-DECEMBRO 1921

11-12

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

Jarkotizo : 5 Pesetoj

CLAU ESPERANTO

(KATALUNA ŜLOSILO)

reeldonita de K. E. F.

Verdaj kovriloj kun nova propaganda teksto pri la lastaj venkoj de Esperanto.

100 EKZEMPLEROJ

KOSTAS 7'50 PTOJN.

Vin turnu al nia Administristo.

Gvidlibro de Girona

VERKITA DE JOSEP MARIA DALMAU

K A J

ELDONITA DE «ĜERONA ESPERO»

OKAZE DE LA

IX^a KONGRESO DE «KATALUNA
ESPERANTISTA FEDERACIO»

Kun belegaj gravuraĵoj kaj detala arĥeologia kaj historia priskribo de la urbo. — Ĉiuspecaj sciigoj.

PREZO : 1 peseto.

ESPERANTO TRIUMFONTO

Ĵurnalo internacia, universala, sendependa. Aperas regule ĉiusemajne en granda gazet-formato.

Teksto nur en Esperanto.

Aĉetebla ĉe kioskoj en Barcelona kaj Girona.

Petu specimenajn numerojn de la eldonanto TEO JUNG - Köln-Horrem (Germanujo).

“L'ESPERANTO”

MONATA ILUSTRITA

INTERNACIA REVUO

sub patronado de

«ITALA KATEDRO DE ESPERANTO»

Abono : 15 lirojn

Adreso:

S. VITO AL TAGLIAMENTO

(Italujo)



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administracio :

Carme, 30 : BARCELONA

Nia devizo: *Maro estas gutaro*

Redaktoro : Jaume Grau Casas

IX^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio

Girona : 15 - 16 - 17 Oktobro 1921.

INTERESPLENE atendis la Girona urbo la okazon de nia Kongreso, post tiom da tempo de ĉiuspekaj propagandoj pri Esperanto. De antaŭ longe loĝadas tie multaj aŭstraj geinfanoj pli-malpli bone parolantaj nian lingvon, sed venigitaj tien de Esperantismo kaj montrantaj ĝin al ĉiuj; la loka ĵurnalaro helpadis fervore la disvastigon de nia ideo kaj aperigis lastmomente du ĉefajn artikolojn kun varmoplena saluto al la Kongreso; la du Gironaj grupoj senĉese kaj firme laboradis; al ĉio ĉi certe ni ŝuldas la koran akcepton de la urbo al la esperantistoj, rigardataj de la enurbanoj kun videbla simpatio.

SABATO, 15

ALVENO DE LA KONGRESANOJ

Je la alveturo de la oficiala vagonaro, estis atendantaj la Kongresanojn la aŭtoritatoj, akompanataj de la urba samideanaro

kaj granda popolamaso en kiu svarmis la standardoj de la lokaj societoj, kaj la muzikistaro de la Regimento de Asia ludis salutantan marŝon, dum ĉiuj alvenintoj forlasis la vagonojn kaj la verdaj standardoj de niaj Grupoj estis aplaŭdataj meze de ĝenerala ĝojo kaj brua entuziasmo.

Oni aliris en impona demonstracio al la Urbdomo, traitante solene la ĉefajn stratojn kie ĉiuj Gironanoj surprize ekvidis kaj rigardadis bonvene la esperantistan popolon.

Ĉe la stratoj oni povis vidi grandajn murafiŝojn anoncantajn la Kongresajn festojn; meze de la placo de la Konstitucio pendis grandega flago esperantista; tie la muzikistaro ludis la esperantan himnon kaj oni eniris en la Urbdomon.

AKCEPTO ĈE LA URBDOMO

En la granda kaj belega salono, la Vic-Urbestro S-ro Rahola salutis la Kongresanojn, esprimante sian opinion ke la enkonduko de internacia lingvo estos la sola solvo al multaj malfacilaj problemoj, kaj oferis la helpon de la Urbkonsilantaro al la esperanta movado.

Nome de «Kataluna Esperantista Federacio» respondis al la Urbestro S-ro Jaume Grau, Redaktoro de K. E., dankante liajn favorajn vortojn kaj salutante la urbon kiu tiel gastame nin akceptis kaj tiel aktive partoprenas en nia idealo.

Fine parolis la Provincestro, S-ro Fleta, kiu ankaŭ diris kuraĝigajn frazojn al la esperantistoj.

Meze de adiaŭa kaj danka aplaŭdado, forlasis la salomon la Urbestro, la Provincestro, la Generalo, militista ĉefo de la urbo, kaj aliaj aŭtoritatuloj kiuj honoris la Kongreson per sia ĉeesto.

MALFERMA KUNSIDO

Pastro Josep Casanovas, Prezidanto de la Kongresa Komitato, diris kelkajn elokventajn vortojn de ĝojo pro la delonge atendata okazo de kataluna Kongreso en Girona kaj, malfermante

nian solenan jarkunvenon, transdonis la parolon al S-ro Joan Gili Norta, Prezidanto de «Kataluna Esperantista Federacio».

Jen la Prezidanta parolado:

«Karaj gefederacianoj!

Jen por la unua fojo en mia esperanta vivo, mi ekstaras antaŭ vi por plenumi kutiman devon de la prezidantoj de nia kara Federacio.

Mi ne volas kaŝi al vi kiom multe mi estis devigata streĉi mian cerbon ĝis ĝi elŝprucis la nun legotajn liniojn. Mi petas vian pardonon se ili ne estas tiel indaj je vi kiel vi ja meritas.

Jen mi venas malfermi la IX-an Kongreson de la «Kataluna Esperantista Federacio», kun ĝojo en la koro, kun tiu ĝojo kiu donas la trankvileco esti plenuminta sian devon... Ke ĉiuj sonoriloj sonadu al plej granda festo! Ke ĉiuj koroj entuziasmiĝu al tiu sama sono!

Jam de longe mi revadis al tiu ĉi festo kaj nun mi vidas tiujn revojn efektivigitaj; imagu do kial mi venis ĉi tien kontenta kaj gaja: kontenta pro la atingitaj rezultatoj, gaja ĉar denove mi vidas inter ni preskaŭ ĉiujn pionirojn de nia movado, tiujn al kiuj ni ŝuldas la tradicion, la entuziasmon, la vojon kiun ni laŭeble sekvis. Honoron kaj dankon al vi!

Ankaŭ publike mi volas kore danki miajn kunlaborantojn ĉe la Direkta Komitato; ili tiom multe helpis, ke la peza tasko reorganizi nian superan organizaĵon estis malgrandigata pro ĉies laboremo.

Plie, al vi karaj geamikoj kaj federacianoj, mi ŝuldas ankaŭ koran dankon pro via sintenado, pro via tuja aliĝo al nia «Kataluna Esperantista Federacio», pro via pli-malpli kaŝita helpemo, kiuj ebligis al ni denove meti nian ĉefan ligilon preskaŭ en la sama loko kie ĝi antaŭe estis.

Fine, mi volas esprimi speciale mian dankemecon al la Grupo «Ĝerona Espero» kiu, akceptinte la gravan kaj malfacilan taskon organizi la nun malfermatan Kongreson, pruvis la entuziasmon kiun ĝi havas kaj volis partopreni tiel efike al la plena revigligo de nia kataluna movado.

Mi ne volas paroli pri la tasko farita de la nuna estraro de K. E. F.; vi ĉiuj certe sekvis niajn paŝojn kaj via apogo dum la ĵus pasinta jaro pruvis al ni ke ni iris sur la bona vojo. Aliflanke nia Sekretario legos la raporton de niaj taskoj kaj vi juĝos ilin.

Nur mi volas pritrakti du spertitajn faktojn:

Se la atingitaj rezultatoj de nia unujara laborado estas sufiĉe kontentigaj ni ne dormu sur la laŭroj! Nia apostola posteno en nia movado nepre devigas nin ĉiam, ĉiel kaj ĉie laboradi, ĉar nur: post longa laboro, ni atingos la celon en gloro!

Ĉefa punkto estas, por ke nia Federacio havu plej gravan forton, senĉese varbi novajn federacianojn. Tuj post la dissendado de nia alvoko ni ricevis sufiĉan kvanton da aliĝoj, kaj mi diras sufiĉan kvanton, ĉar mi konsideras ke multaj katalunaj samideanoj skeptike vidis niajn unuajn

laborojn kaj eĉ kelkaj esprimis al ni vortojn kapablajn malkuraĝigi plej energiajn personojn, se tiuj ĉi ne estus sentintaj kiel ni la forton, la devon, la entuziasmon por nia sankta afero, se tiuj, kiuj frapis ĉiujn pordojn, ne estus konintaj la vortojn de la Majstro: «eĉ guto malgranda konstante frapante, traboras la monton granitan». Nia obstina penado sukcesis kaj ni atingis la aligon de 400 anoj. Sed, diru al mi: ĉu vi kredas ke en nia lando nur estas 400 samideanoj? Ĉu vi ne pensas ke se ĉiuj konus sian devon ni povus atingi la numeron du mil? Imagu la forton, la potencon de nia Federacio se ni iam atingus tiun vere ne grandan nombron! Kaj, ĉu tio ne estas ebla? Jes, mi estas certa pri tio; kaj mi dezirus ke ĉiuj prenu sur sin la taskon varbi, konvinki, anigi al K. E. F. ĉiujn amikojn esperantistajn aŭ esperantemajn.

Pensu ke ĉiu nova ano signifas novan forton, novan klopodon, novan pensmanieron, kaj ke kaŝitaj tiuj fortoj, tiuj klopodoj, tiuj pensmanieroj, ili ne utilas al nia afero kaj tamen certe povus esti gravaj iloj se oni ilin utiligus.

Ni bezonas ĉiam aron da sindonemaj samideanoj, nelacigeblaj, pretaj labori, ni devas ja pensi ke ĉiam la samaj personoj ne povas agi, ke ĉiuj rajtas kaj devas helpi subteni nian verdan standardon kaj nian «Katalunan Esperantistan Federacion».

Alia punkto pri kiu mi volas nun aludi estas la financa:

Kiam la nuna estraro de K. E. F., elektita la 10-an de oktobro 1920^a, prenis sur sin la malfacilan taskon revivigi nian dormetantan organismon, ĝi trovis aron da sindonemaj samideanoj, kiuj, plene fidantaj al ni, subskribis ĝis 550 pesetoj por la Kapitalo de K. E. F. Al ĉiuj ni ŝuldas plej koran dankon.

Per tiu mono estis al ni eble fari la unuajn laborojn kaj ni povis ekpaŝi sur la antaŭfiksita vojo kondukinta nin al la nuna sufiĉe bona stato.

La bilanco publikigita estas sendube kontentiga, sed ne tiel multe kiel ni rajtis esperi. Ĉirkaŭ 50 federaciaĵoj ankoraŭ ne pagis sian kotizaĵon, kaj jen tiu fakto instigis min fari varman rekomendon al vi, por eviti tion en la estonteco.

Mi deziras ke ĉiuj bone pripensu la urĝan necesecon pagi ĉiam kiel eble plej akurate. Se vi tiel agas, la komitatoj de K. E. F. multe vin dankos kaj vi certe faciligos la taskojn. Konsideru ke se dum la unuaj monatoj de ĉiu jaro vi pagas la jarkotizon, estos eble fari la necesan budĝeton, nuntempe afero tute neebla ĉar oni ne povas kalkuli monon se oni ne estas ĝin ricevinta. Ne akurate pagi, vere malhelpas, kaj mi dubas ke iu federaci-ano volas malhelpi!

Samideanoj, ke la taskoj de la IX^a Kongreso de la «Kataluna Esperantista Federacio» estu brilaj steloj alkondukantaj nin ĝis la fina triumfo!

JOAN GILI NORTA

Je la fino aŭdiĝis ĝenerala aplaŭdo kaj poste komenciĝis la salutado de la jenaj delegitoj, kiuj faris belajn paroladetojn dezirante sukceson al la Kongreso.

S-roj Joan Campdelacreu el «Esperantista Amikeco», Manlleu; R. Casas el «Aplec Esperanta Grupo», Sabadell; Marian Solà el «Lumon», Terrassa; Artur Domènech el «Barcelona Stelo», Barcelona; Jaume Bolós el «Nova Sento», Barcelona; Ferràn Bohigas el «Paco kaj Amo», Barcelona; J. Castells el «Esperantaj Kantistoj», Barcelona; Conrad Domènech el «Regeneracio», Salt; G. Boris el «Ĝerona Espero», Girona; J. Font el «Studenta Juneco», Girona; Jaume Grau el «Semo», Barcelona; J. Armengol el «Empordana Ebenajo», Armentera; J. Perich el «Esperanta Idealo», Santa Coloma de Farnés; J. Albagés el «Bela Espero», Manresa; P. Costa el «Ĝeronprovinca Esperantista Ligo»; Pere Domènech nome de la esperantistoj el Vilassar de Mar; Pastro Viver, el la Dimanĉa Lernejo de Torroella de Montgrí; Pastro Planas nome de la esperantistoj el Ripollet; Heinrich Günter, nome de la aŭstraj infanoj; S-ro Hudson, nome de la «Aŭstralia Esperanta Federacio».

El la salutaj paroladoj distingiĝis tiuj de S-ro Solà, kiu konstatis kun ĝojo ke nia Federacio trovis ĉiam en krizaj momentoj la ĝustajn homojn por la ĝustaj lokoj; Pastro Viver, kiu ĉeestis la Kongreson akompanata de kelkaj infanoj el Torroella kaj sin esprimis kun granda fervoro; junulo Günter, kiun ni povus nomi pioniro de «niaj» aŭstraj infanoj; kaj S-ro Hudson, aŭstralia samideano kiu vojaĝante tra Eŭropo venis honorigi nian Kongreson kaj nun, denove forveturinte, lasis en nia lando multajn geamikojn.

Fine oni emocie kantis «La Espero»n.

INAUGURO DE LA EKSPOZICIO

Oni supreniris al la unua etaĝo de la Urbdomo, kie, en du bele ornamitaj salonoj, estis instalata la Esperanta Ekspozicio, plej

konvinka pruvo de la disvastiĝo de Esperanto. Post la vizito de la Kongresanoj ĝi estis malfermata al la publiko.

Ĝi estis publike vizitebla dum tri semajnoj kaj certe la nombro de vizitantoj estis tre grava. Havigis la materialon por la Ekspozicio samideanoj el la tuta Katalunujo.

DISDONADO DE GVIDLIBROJ

Je la eliro el la Ekspozicio, estis disdonata al ĉiuj Kongresanoj la bela Gvidlibro de Girona, lerte verkita de la enurba samideano Josep Maria Dalmau kaj eldonita de la Grupo «Ĝirona Espero», okaze de la Kongreso. Per ĝi oni povas sciigi tre detale pri la multnombraj arĥeologiaj vidindaĵoj de la urbo.

La Kongresanoj dankis unuanime la delikatan donacon.

KONCERTO

Post la vespermanĝo, ĉe «Teatre Principal», okazis la Koncerto dediĉata al la Kongresanoj. Multaj verdstelanoj ĉeestis ĝin kaj admiris la arton de la «Trio Barcelona», kiun konsistigas la eminentaj muzikistoj Perelló (violono), Marés (violonĉelo) kaj Vives (piano).

DIMANĈO, 16

ESPERANTA DISERVO

En la antikvega romarta preĝejo de «Sant Pere de Galligans», unu el la arĥeologiaj juveloj de la urbo, okazis je la 8^a matene la solena Diservo, ĉeestata de preskaŭ ĉiuj Kongresanoj. Partoprenis ĝin niaj estimataj samideanoj Pastroj Josep Casanovas, el Girona, Josep Planas, el Ripollet kaj Francesc Viver, el Torroella de Montgrí. Tiu lasta predikis esperante tre bele kaj korekte. Dum la diservo, la Schola Cantorum de la Seminario kantis latine kaj esperante. Poste, oni benis novan standardon de la Grupo «Studenta Juneco», kiu disdonis belan rememorigilon pri tiu religia

esperanta festo. Hazarde la liturgia koloro estis en tiu tago verda.

Elirinte el la preĝejo oni vizitis la apudan Arĥeologian Muzeon. Dum tiu vizito alvenis ankoraŭ multaj aliaj samideanoj el Barcelona, kiuj nur dimanĉe povis ĉeesti la Kongreson.

LABORA KUNSIDO

En la bela kaj nova konstruaĵo «Grup Escolar», okazis je la 10^a la Labora Kunsido, ĉeestata de ĉiuj Kongresanoj (250 proksimume).

Prezidanto S-ro Gili Norta donis la parolon al Sekretario S-ro Alberich, kiu legis la jenan raporton :

Gefederacianoj: Jen ni troviĝas antaŭ vi post unu jaro de tiu tago, kiam kunvokitaj per la lasta numero de Oficiala Bulteno de K. E. F., ni kunsidis en Barcelona, unuj kun timo ke Federacio ne povas libere vivi en Katalunujo kaj oni devas forlasi tiun intencon; aliaj tute kontraŭe, kun plej granda optimismo kaj fido en la estonto kaj aliaj, novaj en la federacia kampo, kun deziro helpi laŭpove la reorganizon de K. E. F.

Hodiaŭ ni povas konstati kun ĝojo, ke tiu feliĉa tago trafe elektis la ĝustan vojon por la reorganizo de nia movado en Katalunujo, kaj pruvo pri tio estas la multaj venkoj atingitaj en diversaj lokoj kaj ke en la mallonga daŭro de unu jaro venis al niaj vicoj kvarcent samideanoj.

La hodiaŭa komitato de K. E. F., tuj post la elekto, sin turnis al ĉiuj Barcelonaj grupoj etendante amikan manon kaj petante ĉies kunlaboron por efike antaŭenpuŝi nian aferon. Ni atingis sincerajn respondojn de unuj kaj nekunligeblajn vidpunktojn de aliaj, kaj ni ne dirus nian tutan penson se ni ne raportus skize pri fakto, kiu pruvas ĝis kia grado ni deziris kaj deziras plenan unuecon. Mi volas aludi la Barcelonan Esperantan Societon, antaŭe Esperantanaro Fajro, kiu respondis al nia cirkulero dirante ke ĝi ne povas aliĝi al nia organizaĵo pro la eksigo, kiun oni interkonsentis pri ĝi en la kongreso de Sant Feliu de Guixols. Ni kontraŭargumentis, ke tio devas esti en forgeso unuflanke kaj ke aliflanke nun ne ekzistas la eksigita grupo, sed la nova B. E. S., kiu senhezite povas eniri niajn vicojn, se ĝi sincere deziras plenan unuecon. Sed vane ni parolis kaj klopodis ebenigi krutaĵojn: tiu societo, kiu bedaŭrinde staras kvazaŭ malamiko, postulis, ke oficiale dum kongreso oni nuligu eksigon de grupo, kiu ne ekzistas, por poste interkonsenti pri la cetero.

Mi citas tiun paĝon el nia unuajara reagado por ke vi ĉiuj konu, kion ni faris por eviti malkomprenojn kaj la duecon ekzistantan inter nia komuna organizaĵo kaj privata societo.

Nia komitato jam de la komenco ne havis apud si la valoran helpon de S-roj Josep Serrat kaj J. Vilaseca, kiuj pro privataj aferoj ne povis plenu-

mi la rolojn al ili konfidentajn en nia lasta ĝenerala kunsido. Tamen ni ne malesperis kaj jam antaŭ la reapero de «Kataluna Esperantisto» ni estis vizitintaj multajn samideanojn en plej diversaj urbetoj kaj vilaĝoj katalunaj, svingante la verdan flagon kaj alportante al ĉiu novan kuragon kaj instigon helpi nian entreprenon. Ni vizitis la grupojn de Tarragona, Reus, Vendrell, Molins de Rei, Vilanova i Geltrú, Terrassa, Sabadell, Mataró, Ripollet, Girona, Palafrugell, St. Feliu, Sta. Coloma, Armentera kaj Salt.

Ni ne laboris senfrukte, ni ne trovis ĉie silenton kaj mallumon; aliĝoj kaj kuraĝigoj venis el plej diversaj lokoj kaj jen la unua numero de K. E., kvazaŭ sunradio de tagiĝo, eklumigis la tutan katalunan samideanaron samtempe kun la unua tago de la kuranta jaro.

Estas superflue diri, ke la koro de K. E. F. estas ĝia presorgano kaj sekve ĝi komencis vivi nur kiam K. E. regule salutis ĉiunonate siajn legantojn, kiuj ŝajne el ĝi eliris forton kaj vigecon por daŭrigi entuziasme sian laboron kontraŭ la skeptiko kaj antaŭjuĝo sufiĉe grandkvante ankoraŭ ĉirkaŭanta nian movadon.

Pro tio, kun plena konscio pri kiel signifa estas nia organo, ni klopodis fari ĝin kiel eble plej interesa kaj riĉenhava. Dum la unua sesmonato ĝi estis dek-dupaĝa, depost Julio ĝi estas dek-sespaĝa kaj ni esperas ke plej proksiman jaron, se ĉiu el vi helpos en la varbado de novaj federacioj, ĝi povos fariĝi dudekpaĝa.

Tre atentinda estas la sukceso, kiun ni atingis ĉe la 2^a Specimena Foiro okazinta en Barcelona. Sur paĝoj de K. E. vi legis, ke ties komitato akceptis Esperanton kaj ke ne nur ĝi diskonigis sian foiron tiulingve en fremdlando pere de folioj kaj afiŝoj sed ke ĝi konsentis dissendi reklamilojn por nia lingvo, speciale presitajn de ni. Krom tio ĝi komisiis nian prezidanton, okaze de la XIII^a en Praha, elekti reprezentantojn en diversaj landoj kaj rekomendis, ke tiuj ĉi konu Esperanton por plifaciligi la rilatojn.

Parolante pri la XIII^a, ni devas bedaŭri, ke la oficiala reprezentanto de Hispanujo ne permesis al nia delegito saluti la kongreson en la nomo de la katalunlingvanoj, kiuj havas sian reprezenton en la Lingva Komitato kaj estas sufiĉe konataj en la esperantista kampo.

Ni reorganizis la Konsultan Komitaton, kiu diversefoje kunsidis liverante al ni utilajn konsilojn, pri kiuj ni petis ĝin, kaj ni okazigis kun sufiĉe kontentiga rezultato ekzamenojn, kaj kiel preparan kurson de tiuj ekzamenoj tri el niaj fervoraj kunbatalantoj disvolvis interesajn temojn.

Antaŭ la apero de K. E. ni skribis al nia kunfrato Aragona Esperantista Federacio kaj al la subkomitato, kiu funkciis en Barcelona, proponante nian kunlaboradon kaj la kolonojn de K. E. por sukcesigi kaj propagandi la Duan Diskutan Kunvenon de Esperantistoj de Iberiaj Landoj okazintan en Zaragoza. Kvankam iafaje oni diris, ke nia organizaĵo fosis sub la organizantoj por fari tiun Kunvenon malsukcesa, ni povas certigi ke laŭpove kaj laŭeble K. E. F. klopodis diskonigi ĝin kaj ĉiel instigis la esperantistojn en Katalunujo multope alveturi la urbon de la Kunveno, pri kies celo

t. e. organizo de Konfederacio, ni ankaŭ ne restis senagaj. Kvankam ni konscias ke konfederacio ne povas ekzisti dum la Federacioj en Iberio ne havas sufiĉan vivopovon, ni ja ne voĉis senkuragiĝi la organizantojn kaj ellaboris projekton, kiun sankciis ĉiuj katalunaj grupoj. Pri la disvolviĝo de la Kunveno mem vi sendube jam sciigis per la raporto aperinta sur nia organo kaj mi ne devas vin ĝeni per ties ripeto.

Kun sukceso ni disvendis ĉiujn ekzemplerojn de Kataluna Poŝvortareto, kiuj restis ĉe presejo Tobella; ni eldonis novajn katalunajn ŝlosilojn, kiuj elĉerpigis unu monaton post la apero, pro tio ke ni ne eraris pri ties taŭgeco por la disvastigado de nia afero, kaj tiel ni ankaŭ povus raporti pri multaj aliaj sufiĉe gravaj aferoj, kiujn mi ne priskribas tial ke nia gazeto tion faris siatempe.

Sed ni ne devas silenti pri la malavareco pruviĝinta de multaj samideanoj, kiuj malfermis sian poŝon por ebligi la reorganizon de K. E. F. Al tio ni multe ŝuldas, ke ni povis sentime travivi la unuan jaron sen malhelpoj financaj, kiujn ni estus suferintaj aliokaze. Nun ni jam faris la plej danĝeran paŝon, t. e. la unuan kaj ĝi pruvis, ke ni estas sur bona vojo. La plua progresado kaj disvolviĝado de K. E. F. estas certa kaj ni ne devas timi pri ĝia malapero. La ŝipo iom post iom pli facile fluos puŝata de favora vento, kiun naskas via fervoro kaj entuziasmo. La rikolto de nia semado estos des pli abunda, ju pli la tempo pasos. Ni ne mallevu la veloĵn, ni estu obstinaj en la batalado kontraŭ skeptiko kaj rutino de la homoj, kaj ni alportos al la granda tutmonda familio la bonon kaj belon de nia idealo.

Diversfoje ni diris, ke Kataluna Esperantista Federacio estas ĉies kaj ni devas tion ĉi ripeti antaŭ vi ĉiuj por ke vi vin sentu kiel eble plej multe en ĝi; ĉiu grupo, ĉiu izolita esperantisto devas oferi sian energion por varbi konstante novajn membrojn kaj tiamaniere potencigi la komunan organizaĵon, kiu post kelka tempo, ni estu certaj pri tio, atingos pli gravajn venkojn ol dum la finiĝinta laborjaro, en kiu tamen ja ne mankas ili. La kongresanoj en tiu ĉi laborkunsido, inspiritaj de altaj vidpunktoj, prezentu siajn opiniojn por diskuto kaj ke ili florigu nian estontan agadon.

Estus nepardonebla eraro forlasi ĉi tiun belan kaj ĉarmoplenan urbon, en kiu niaj Gironaj gesamideanoj tiel lerte kaj diligente organizis, venkante ĉiujn barojn, nian IX^{an}. Kongreson, ne duobligante nian laboremon por fari nian proksiman jaran feston pli interesa, pli multenombre partoprenata de federacianoj kaj pli sukcesa se eble.

Dek-du jaroj forpasis de la tago kiam nia neforgesebla Majstro surpaŝis tiun ĉi landon okaze de la V^a Universala Kongreso okazinta en Barcelona. Ke la sankta amo, kiun li vekis en nia koro, gvidu ĉiam niajn paŝojn. Ni ne forlasu la levitan standardon kaj konstante batalu por la triumfo de ESPERANTISMO.

S. ALBERICH JOFRE

Per forta aplaŭdo oni montris ĝian aprobon.

S-ro Claramunt legis la financon raporton, kiu ankaŭ estis aprobata.

La Sekretario legas kelkajn telegramajn salutojn de S-roj Teo Jung, eldonanto de «Esperanto Triumfonta»; Julio Mangada, Direktoro de «Hispana Esperantisto»; Frederic Pujolà i Vallès, la malnova pioniro kies pli apudan kuneston ni treege ŝatus; Delfi Dalmau, la Barcelona pedagogo; J. Comella, firma batalanto el Vich; Enric Aguadé, organizinto de la Kongreso en Reus kaj prezidinto de la antaŭa Komitato; Grupo «Ilerda Espero» el Lleida, us renaskiĝanta kaj la sola en tiu malproksima parto de Katalunujo.

Komenciĝis la diskutado pri la projekto de nova regularo prezentita de «Paco kaj Amo» kaj ĝin partoprenis multaj samideanoj. Fine la Kongreso decidis rifuzi tiun novan regularon, sed starigi reformojn sur la bazo de la regularo nun ekzistanta.

La Prezidanto petas ke oni prezentu skribajn proponojn kaj la kunsido haltas dum kvin minutoj.

S-ro Bolós en la nomo de «Nova Sento» proponas:

K. E. F. konsistu el individuoj kaj societoj:

1^e Kotizaĵoj estu: membro abonantoj 5 ptoj. (izolitaj membroj sen abono ne ekzistu).

2^e Membroj el Grupoj pagu ĉiumonate pere de ties grupoj ptojn. 0.05. Ĉiuj grupanoj nepre devas pagi tiun kotizaĵon.

3^e Abonantoj el grupoj pagu 4'50.

4^e Ĉiu izolita membro abonanto povas voĉdoni. Membroj el grupoj ankaŭ havas voĉdonrajton pere de la grupa delegito.

5^e La Komitato konsistu en ĝia plimulto el grupaj delegitoj.

S-ro Josep Grau petas ke oni legu la jenan proponon:

1^e Ke ĉar la Kongreso deklaris netuŝebla la nunan regularon en ĝia tuteco, la Kongreso transiru al diskuto de eventuale bonaj ŝanĝoj en detaloj administraciaj kaj de organizo.

2^e Ke la Kongreso memorante kiom malproksimaj povas resti praktiko kaj teorio, ne ekprenu nepripensitajn decidojn. (Subskribas la proponon S-roj Jacinto Bregon, Ramon Soler kaj Josep Grau).

Estas diskutataj ambaŭ proponoj dum sufiĉa tempo.

AGRABLA INTERROMPO

La diskutado estis interrompata per la eniro en la salonon de S-ro Narcis Pla i Deniel, Parlamenta Deputito de la urbo, kiun oni starante salutis per longa aplaŭdado.

La konata Parlamentano faris emocion paroladon plenan de simpatio al Esperanto kaj sin oferis por ĝia eventuala defendo en la hispana Parlamento. Li kvalifikis kiel plej idealistan nian movadon kaj diris ke nur idealismo povas savi la mondon.

Je lia foriro oni dankis per ovacio la indan Deputiton, kiu helpis la organizon de la Kongreso kaj donis gravan premion por la Floraj Ludoj.

REPreno de la Kunsido

S-ro Artur Domènech nome de «Barcelona Stelo» proponas ke oni elektu komisiitaron por diskuti la reformajn proponojn dum la nuna jaro, ke tiu komisiitaro prezentu en la venonta kongreso raporton por definitiva aprobo kaj ke la komisiitaro konsistigu la prezidantoj de ĉiuj grupoj kaj tiu de la Federacio kiel Prezidanto.

Demandite la kongresanoj aprobas.

La Sekretario legas leteron de S-ro P. Sanjuan el Valls, kiu proponas ke K. E. F. eldonu kalendarojn kun lecionoj pri Esperanto.

La kongresanoj trovas la proponon amuza kaj lasas al la komitato decidi pri la afero.

Oni esprimas la deziron sendi dankan leteron al Ateneu Enciclopèdic Popular el Barcelona pro ĝia gastamo pruvita al K. E. F. Per aklamo tion oni decidas tuj fari.

S-ro J. Bremón proponas: 1^e Ke la Kongreso gratulu la delegitojn de la 13 ŝtatoj subskribintaj la peton pri raporto prezentota al la Ligo de Nacioj kaj la celon enkonduki Esperanton en la respektivajn ŝtatojn.

2^e Sciigi la Ĝeneralan Sekretarion de la Ligo pri tio, ke K. E. F. volonte havigos al li ĉiujn detalojn pri la stato de la esperantista movado en Katalanujo; kaj

3^e Danki la ĝeneralan vicsekretarion de la Ligo, S-ron Nitobé, pro lia viva intereseemo pri Esperanto elpruvita okaze de la XIII^a.

S-ro Pellicer deziras ke oni atentigu la hispanan ministron de Publika Instruado pri tiu ĉi temo.

S-ro Campdelacreu proponas ke tiun ĉi atentigon oni sendu al la Ŝtata Ministrejo kaj S-ro P. Costa aldonas ke oni faru ĉi tiun paŝon pere de deputito S-ro Pla i Deniel, kiu dum tiu ĉi laborkunsido, salutante la kongreson, proponis sin por ĉiel helpi nian aferon.

Oni aprobas la proponojn de S-roj Bremon, Pellicer, Campdelacreu kaj Costa.

S-ro R. Soler, pro la neatendita okazintaĵo en la Praha Kongreso kaj por eviti estontajn similaĵojn, proponas ke la kongreso deklaru ke niaj delegitoj en la Universalaj Kongresoj reprezentas Katalunujon.

S-ro Josep Grau aldonas ke fakte ne plu ekzistas ia malamikado inter S-ro Mangada kaj K. E. F. tial ke lia saluto al la kataluna kongreso estas esprimita kun frata samideaneco.

Oni aprobas unuanime.

S-ro Jaume Grau proponas ke la Kongreso esprimu al la Akademio kaj Lingva Komitato sian ĝojon kaj gratulon pro tio ke ili subtenas nian lingvan fundamenton kontraŭ dangeraj deflankiĝoj.

Varma aplaŭdado provas ĉies konsenton.

Rekomendante ke la kongresanoj akurate ĉestu la posttagmezan kunsidon por kiu estas prokrastita la elekto de nova estraro, la Prezidanto fermas la kunsidon.

STRATO DOKTORO ZAMENHOF

Same kiel en aliaj katalunaj Kongresoj, oni intencis inaŭguri dum la nuna novan straton Doktoro Zamenhof kaj eĉ oni anoncis tion en la kongresprogramo. Malgraŭ la kora helpo de la Urbestro, lastmomente tiu intenco ne povis esti efektivigata. Oni esperas venki la malfacilaĵojn post nelonge kaj tiam estos aranĝata festo por solene malkovri la tabulon de la nomŝanĝita strato.

Se tio sukcesas, ĉu ni ne povus profiti la okazon por kolekti monon por la Zamenhofa monumento, invitante al la solenaĵo ĉiujn katalunajn samideanojn? Niaj legantoj havas la parolon.

SARDANOJ ĈE «LA DEVEsa»

Elirinte el la Laborkunsido, ĉiuj amase sin turnis al la «Devesa», vasta arbaro kaj belegaj ĝardenoj, unu el la plej grandaj ĉarmoj de Girona.

Tie la Coblá «Art Gironí» ludis tri sardanojn. El la rondoj de dancantoj de la sardano, la kataluna nacia danco, distingiĝis multaj kies partoprenantoj ĉiuj surportis la kongresinsignon.

Ni kredas ke nia ritmoplana danco estas iel esperantista, ĉar
 sur gracia, gaja fundamento,
 manpremante unu la alian,
 la dancantoj faras en konsento
 unu grandan rondon familian.

FESTO DE LA OKULVITRULOJ

Jen la sola «faka kunsido» de nia Kongreso. Kvankam multnombre ĉeestata, neniam diskuto okazis. Niaj okulvitruloj interkonsentis en ĝi pace fari vermuttrinkadon kaj iri tuj tagmanĝi, ĉar tempo mankis kaj la kongresa programo estis plenplena.

La Kongresejo de tiu V^a Okulvitrula Festo estis «Café Vila».

FERMA KUNSIDO

Ankaŭ ĉe «Grup Escolar», je la 4^a posttagmeze.

S-ro Gili, kiel prezidanto, prezentas S-ron E. Gastón el Aragona Esperantista Federacio, kiu salutas la Kongreson kaj oni lin akceptas per longa aplaŭdado.

La sekretario legas telegramon de S-ro F. Máñez el Cheste kaj leteron de S-ro E. Kühnl Prezidanto de VIII^a Internaciaj Floraj Ludoj, kiu bedaŭras ne povi veni al la literatura festo. Alvenis ankaŭ skribaj salutoj de S-roj Hanns Sappl, el Graz (Aŭstrujo) kaj F. Costa, el Lisbono (Portugalujo).

La Prezidanto petas ke oni proponu samideanojn por plenumi la direktan taskon de K. E. F.

S-ro Costa Furtià proponas ke kelkaj samideanoj de la proksima Kongresurbo estu elektitaj por la komitato.

S-ro Bolós pravas ke por plej sukcesa agado estas necese ke ĉiuj komitatanoj apartenu al sama urbo.

La Prezidanto klarigas ke la laste okazinta ĝenerala kunsido decidis ke ĉiuj komitatanoj estu el sama urbo.

S-ro Costa retiras sian proponon.

Post kelkminuta halto por ebligi la ellaboron de kandidataro, S-ro Josep Grau opinias ke la ĝis nun laborinta komitato de K. E. F. trafe plenumis sian rolon kaj pro tio proponas ke ili daŭru en la posteno kaj ke estu anstataŭataj S-roj Josep Serrat kaj J. Vilaseca, kiuj eksigis, per s-roj R. Soler kaj J. Castells.

La kongresanoj akceptas tiun ĉi proponon, sed pro tio ke S-ro Alberich ne akceptas reelekton oni proponas S-ron Romà Guardiet por la sekretaria ofico. La kongresanoj unuanime aprobas la proponon.

La Prezidanto demandas kiu urbo akceptas la organizon de nia X^a kaj S-ro Albagés el Manresa, al kiu la prezidanto donas la parolon, proponas sian urbon kondiĉe ke la Komitato de K. E. F. helpas la Manresanojn en tiu ĉi tasko.

Oni promesas al li plenan helpon kaj per ekkrio, vivu kongresurbo Manresa, la kongresanoj per plej varma aplaŭdado akceptas la sindonemon de S-ro Albagés.

S-ro M. Solà skizas kiel peza estas la redaktado de gazeto kaj proponas dankon al la Redaktoro S-ro Jaume Grau, kiu sukcesis fari «Kataluna Esperantisto»n korekta kaj belstila organo de nia Federacio.

La Kongreso aklame aprobas la proponon.

S-ro Josep Grau, esprimante la deziron de ĉiuj kongresanoj, dankas grupon «Ĝerona Espero», kiu tiel zorge kaj bele organizis nian naŭan Kongreson.

La Prezidanto dankas la kongresanojn, kiuj venis el diversaj lokoj katalunaj kaj fermas la kongreson.

La strofoj de nia himno vige sonas kiel adiaŭo al la IX^a.

VIII^aj Internaciaj Floraj Ludoj

BRILAN aspekton prezentis «Teatro Principal» momentojn antaŭ nia ravanta festo de Poezio kaj Beleco. La tuta loĝantaro de la urbo interesiĝis pri la esperantistaj Floraj Ludoj kaj ĉarmaj belulinoj, distingindaj familioj kaj scivolema popolamaso plenigis la loĝiojn, la parteron kaj la tri etaĝojn de la granda teatro.

Je la fiksita horo, eniris la Urbestro, akompanata de aliaj aŭtoritatuloj kaj urbaj eminentuloj, de la Juĝintaro kaj Konservantaro de la Floraj Ludoj, kaj oni salutis ilin per varma aplaŭdado.

Ĉe la scenejo, bele ornamita per la verdaj standardoj de la Grupoj, la aŭtoritatuloj sidiĝis maldekstre kaj la Juĝintaro dekstre de la trono pretigita por la Reĝino de la Festo.

Kiam silento fariĝis, sinjoro Urbestro prononcas la frazon: La festo komenciĝas. La Prezidanto de la Juĝintaro donas la parolon al la Sekretario S-ro Pellicer, kiu antaŭiras al tribuno kaj eklegas sian raporton.

Gesinjoroj:

Kiam la entuziasmo de kelkaj amikoj efektivigis la reorganizon de nia kara Federacio, ili tuj atentis plej zorge pri la restarigo de la literatura festo kiu sub la nomo de Floraj Ludoj estis jam okazinta plej sukcese en ĉiuj kongresoj de katalunaj esperantistoj. Tial ili nomis Juĝantaron kiu devis signifi unuflanke plenan internaciecon kaj aliflanke unuigan strekon inter la esperantistoj kiujn ni povus nomi de nia unua epoko kaj la nunaj samideanoj.

Certe nur pro mia malmulta sed fervora laboro en antaŭaj tempoj estis mi proponita por la posteno de Sekretario de la nunaj Floraj Ludoj kaj tial nemeritite mi havas nun la altan honoron adresi al vi la parolon.

Jen do ni, denove, ĉe la sojlo de nia rikolta festo, ĉar fiere ni povas tiel nomi la nunjarajn Florajn Ludojn; tiel belaj kaj gravaj estas la ricevitaj verkoj.

Tiel belaj kaj gravaj ke ni nin sentis kaptitaj de dubo elektonte la verkon kies aŭtoro devus ricevi la Naturan Floron. Ĉu oni povas tranĉi senatente la plej bonodoran rozon el rozujo? Ĉu oni povas montri sammaniere la plej belbrilan koloron el ĉielarko? Same malfacila estis nia laboro ĉar inter 77 ricevitaj manuskriptoj el aŭtoroj apartenantaj al 16 malsamaj na-

cioj, oni povus ja eltiri ne unu sed diversajn verkojn indajn esti premiitaj per tiu alta premio.

Tia abundeco de bonaj originalaj versaĵoj montras al ni klare du faktojn. Unue, ke niaj Floraj Ludoj estas pli kaj pli diskonigataj inter la tutmondaj esperantistoj kaj ke nia festo meritas de la samideanaro plenan atenton; kaj due, ke la esperanta lingvo daŭrigas sian kreskadon kaj progresadon ĉar estas nedubbele ke nur perfekta aŭ perfektiganta lingvo, ĉu natura, ĉu artefarita, povas akiri gravan literaturan verkaron.

Ni ĝoju do ke senhalte aperadas en Esperanto tiaj verkoj, sed ni ne miru pro tio, ĉar same kiel al persono ŝatanta unu Belarton, plaĉas pli-malpli ĉiuj aliaj, tiel Esperanto kiu entenas idealojn de Amo, Bono kaj Paco ne povas puŝi for de si la idealojn de Beleco kaj Arto. Sen ili, lingvo estus nur perfektigita kodekso kaj neniam oni povus peti al ĝi la efektivigon de iaj iluzioj, same kiel neniu tion postulas de la malvarma uzado de kodekso A. B. C. aŭ Lieber's. Ne nur per praktikaj uzoj de nia lingvo ni alvenos al la celo!

La Floraj Ludoj estas por ni, idealistoj, nia ĉefa jarfesto. Por aliaj, pli praktikaj homoj, eble ili ne havas tiom altan signifon. Sed kiu ne ĝojos hodiaŭ kun ni ekgustumante la fruktojn de nia rikolto? Ni levu, do, la vualon de l' templo de la Poezio kaj ni eniru en ĝin por tie revii kelkajn horojn sub la ĉarmo de la liro de niaj poetoj.

Ni malkovru la nomon de la laŭreato per la Natura Floro, tiu ĝentileca kaj honora premio, kiu havigos al ni ĉiuj la ĝojon esti vasaloj de plej rava Reĝino.

Sinjoroj: Mi havas la honoron proklami S-ron **Artur Domènech Mas** kiel gajninton de la Natura Floro.

Mia koro batas plej emocie diskonigante la nomon de nia Reĝino ĉar la gajninto donis al ni ne nur gracian sed esperantistan Reĝinon. Li petis de nia samideanaro F-ino **Teresa Bartina Marull** ke ŝi bonvolu okupi nian tronon. Ŝia regado estu de ni ĉiuj kore akceptata; per laŭta aklamo, per tondra aplaŭdo ni tion al ŝi esprimu.

La laŭreato poeto, salutata per varma aplaŭdado, iras ricevi de manoj de la Prezidanto la Naturan Floron, belega florbukedo kun silka blanka rubando kun verdaj literoj; kaj tuj kune kun la poeto forlasas la scenejon la Juĝantaro kaj Aŭtoritatuloj por proponi al Ŝia Reĝina Moŝto la prezidan lokon.

Post kelkaj momentoj la ĉeestantaro per resonanta aklamo salutas la enirantan Reĝinon, kiu je brako de la poeto kaj laŭ la akordoj de solena marŝo iras sidiĝi en sia majesta trono, sekvata de sia brila Kortego de Amo, kiun konsistigas la junaj kaj belegaj fraŭlinoj **Maria Masgrau**, **Dolors de la Mano**, **Maria Risech**,

Dolors Turbau, Carme Prats, Dolors Verdaguer kaj Paquita Boris; ilin akompanas brako ĉe brako la membroj de l' Juĝintaro kaj de la Konservantaro. La hela beleco de ĉiuj Korteganinoj vekas ĉies admiron, sed ĉio estas pala antaŭ la juna majesteco de la Reĝino Fraŭlino Teresa Bartina.

Kiam Ŝi sidiĝis sur sia alta kaj honora trono kaj la Korteganinoj, Juĝintoj kaj Aŭtoritatuloj okupis siajn respektivajn sidlokojn, ĉesas la aplaŭdoj kaj bruoj de la ĉeestantaro kaj la Sekretario alpaŝas al la tribuneno kaj per laŭta voĉo reprenas la legadon de sia raporto :

Reĝina Moŝto,
Reĝina Kortego;

Neeble estas trafi la vortojn indajn je via alta rango por dece saluti vin. Permesu ke mi klinu mian kapon antaŭ via Beleco ne pro ceremonia parado, ordinare malvarma, sed por montri al vi mian profundan dankon kaj sinceran ĝojon akcepti Vin kiel Reĝinon.

Ekscelencaj Sinjoroj,
Sinjorinoj,
Sinjoroj:

Kiel mi estas jam dirinta, distingiĝas la nunaj Floraj Ludoj per la abundeco de bonaj verkoj ricevitaj. Kompreneble, apud ili ni ricevis, kiel la antaŭajn jarojn, kelkajn manuskriptojn kies stilo montras nedubeble la novan samideanon pli naivan ol kompetenta. Sed ankaŭ en tiaj verkoj ni povas serĉi valoron, ne pro ilia literatureco sed pro la entuziasmo de iliaj aŭtoroj, entuziasmo kiu kune kun energia laboro ebligas al ili sendi al venontaj konkursoj definitivajn verkojn.

Mirinda estas la nombro de bonaj originalaj versaĵoj, kiun ni ricevis, multe pli superaj en kvalito ol la prozaĵoj. Tio ja signifas bonan paŝon antaŭen ĉar ni ĉiuj memoras ke en kelkaj el la antaŭaj konkursoj la Juĝintaro estis devigata aljuĝi la Naturan Floron al aŭtoro de tradukita versaĵo, pro la malmulta valoro de la ricevitaj originalaj versaĵoj.

Tio ne estis necesa la nunan jaron. Konkurantajn al la premio por la plej bona ama versaĵo, ni ricevis naŭ verkojn. El ili kvin almenaŭ estis ja premiindaj, sed ĉar bedaŭrinde oni nur havis unu premion por ili, la Juĝintoj estis devigataj analizi plej atente la valoron de tiuj kvin poezioj. La konkludo estis aljuĝi la premion kaj la Naturan Floron, tial ke tiu poezio superas ankaŭ la meriton de ĉiuj verkoj celantaj la aliajn ordinariajn premiojn, al la verko n-ro 72 devizita «Ruĝa Floro». Ĝi estas poezio en hispana silva formo kies trafa kombino de dekunusilabaj kaj sepsilabaj versoj faras agrabla kaj malpeza al orelo la tutan verkon malgraŭ ĝia longeco. La esprimoj kiujn ĝi enhavas estas riĉaj de koloro, kaj rimoj kaj ritmo estas ĉiam

IX^a Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio

Girona : 15 - 16 - 17 Oktobro 1921.



FRAŬLINO TERESA BARTINA MARULL

Reĝino de la VIII^a Internaciaj Floraj Ludoj.



La Reĝino Fraŭlino Teresa Bartina Marull, kun siaj Korteganinoj Fraŭlinoj Maria Masgrau, Dolors de la Mano, Maria Risech, Dolors Turbau, Carme Prats, Dolors Verdaguer kaj Paquita Boris.




S-ro Artur Domènech Mas, Gajninto de la Natura Floro.




Kongresanoj ĉeestintaj la esperantan Diservon, antaŭ la pordo de Sant
Pere de Galligans.



Partoprenantoj de la ekskurso al Empúries.



Unu el la du ĉambroj kie estis instalata la Propaganda Ekspozicio.



Organizintoj de la Kongreso: S-ro G. Boris F-ino C. Maymi, S-ro C. Costal,
S-ro R. Casademont Pastro J. Casanovas kaj S-ro F. Hil.

perfektaj. Plej rimarkinda estas la tria strofo kie la penso de l' aŭtoro flugas kun evidenta facileco kaj eleganteco. La aŭtoro de tiu verko estas S-ro Artur Domènech Mas el Barcelona.

Aplaŭdo de admiro kaj simpatio eksonas kiam la premiita poeto, jam alifoje gajninta la Naturan Floron, starigas kaj antaŭeniras por deklami sian majstran verkon; fariĝas silento kaj S-ro Domènech legas tre klare kaj harmonie :

Al Rozo

Via nom' estas Rozo; kiel prave
 tian nomon vi rajtas, knabin' bela!
 Kiel rozo — de l' floroj, vi samrave,
 pro via ĉarmo hela,
 de l' belulinoj estas reĝin' glora;
 kiel rozflor' — belega, bonodora...

* * *

Se mi estus de roso perla guto,
 je nokto de somero,
 kvazaŭ deca al vi ĉieltributo,
 jen mi, sur vin falinte el aero,
 min kaŝus inter viaj odorplenaj
 folioj ruĝkoloraj,
 dum la horoj de l' nokt' kvietserenaj,
 dum la horoj, pro vi, parfumodoraj.
 Kun kia ĝu' mi tiam
 dolĉe ripozus en kviet silento,
 dum min dorlotluladus vi ĝis kiam
 surprizus nin la sun' de oriento
 kaj ĵaluze, ebrian je parfumo
 min vaporigus ĝia fajra lumo!

* * *

Se mi estus argenta papilio
 kun la flugiloj blankaj kaj graciaj,
 mi ŝtelus plian blankon al lilio
 por la flugiloj miaj,
 kaj mi ĉirkaŭflirtadus vin kokete,
 nur vin; pro tio la ceteraj floroj

ĵaluzmurmurus kun ventet' sekrete
 ĉar ne min ravas per siaj koloroj,
 ĉar nur vi estas inda
 je l' admir' mia, nur vi min altiras,
 ĉar nur vin amas mi per amo blinda,
 ĉar nur pro vi, flor' ĉarma, mi sopiras.

Kaj kiam mi jam laca
 pro la longa flirtad' serĉus kuŝlokon,
 ruĝa kuŝejo estus vi plej paca:
 brulantaj' surtenanta neĝan flokon!
 de blanko kaj purpuro l' idilio:
 sur brusto de reĝin' blanka paĝio!

* * *

Se mi najtingal' estus delikata
 kun sonora trilado melodía,
 nestejo adekvata
 estus via rozuj' por la nest' mia.

De tie miaj triloj
 jen gaje, kvazaŭ himno glora, sonus
 kiam matene fajrsimilaj briloj
 de l' naskiĝanta sun' hele vin kronus,
 jen ĝeme, kvazaŭ plorsingultoj, plendus
 kiam la nokto, sterniĝante ĉie,
 funebtron kaj mallumon sur vin sendus
 kaj nigro kovrus vin melankolie.

Per mia tril', la valo
 kaj la mont' kaj l' arbar' kaj la rivero
 sciigis pri l' amsent' de najtingalo
 kaj plenigis de milda ammistero;
 ĉar ĉu gaja l' kant' ĉu melankolia
 eĥus ĉiam laŭ ritm' de am' pasia.

* * *

Sed, ho ve, ne rosguto,
 nek papili' nek najtingal' mi estas.
 Por vi, reĝin', kiel vasaltributo
 nur liro mia restas:
 per ĝi laŭtigu mia amsekreto;
 mi nur estas poeto.

ARTUR DOMÈNECH MAS

Per ovacio oni premias la aŭtoron de tiu bela versaĵo, kaj la Sekretario daŭrigas la legadon de la raporto :

Same bela kiel la antaŭa pritraktita verko estas la n-ro 56 kun devizo «Andante». Ĝi estas verko pro kiu, nure, ĝia aŭtoro restus konsiderita kiel tre bona esperanta poeto. Nur unu malgrandan makulon ĝi enhavas, rimo aco - aĉo. La temo kiun ĝi pritraktas ne sufiĉe enkadriĝas en la konkurso por kiu la verko estis sendata kaj tial oni aljuĝas al ĝi I^{an} subpremion. Estas ĝia aŭtoro F-ino Louise Briggs, el Leeds (Anglujo).

Tre rimarkindaj estas ankaŭ la verkoj n-ro 64 devizita «Ama malkvieto» kaj n-ro 39 «Madrigalo». La unua estas karakterizata pro sia senta vereco; la dua estas bele verkita laŭ la stilo de la malnovaj hispanaj madrigaloj. Tiuj verkoj ricevas la II^{an} kaj III^{an} subpremiojn. Ilia aŭtoro estas S-ro Jaume Grau Casas, el Barcelona.

Altiris la atenton de la juĝintoj ankaŭ la verko n-ro 69 kun devizo «Nur unufoje amas la kor'». Ĝi estas poezio tre bone versigita sed ne konservas ĝis la fino la saman intensecon. Tiu verko ricevas IV^{an} subpremion. La aŭtoro estas S-ro Julio Baghy, el Budapeŝt (Hungarujo).

Estas ankoraŭ aljuĝita V^a subpremio al la manuskripto n-ro 14 kun devizo «Nubo mistera» pro ĝiaj bonaj kvalitoj, kvankam ĝi estas sufiĉe malsupera al la antaŭaj poezioj. Estas ĝia aŭtoro S-ro Norbert Berthelmeŝs el Düsseldorf (Germanujo).

Tri verkoj celis la premion difinitan al la plej bona ama verko en prozo. Du el ili - n-roj. 57 kaj 38 - estis verkitaj per bona Esperanto, sed la temo ne estis sufiĉe interesa. Kiel estas dirite en la verdikto, la premio estos transdonata al verko n-ro 56 kiel I^a subpremio al la originalaj amaj versaĵoj.

Nur du tradukojn de «El Misteri de la Prada» ni ricevis. Tiu fakto estis iom stranga ĉar multaj enlandaj esperantistoj estas kapablaj traduki bone la diritan poezion. Feliĉe unu el la ricevitaj verkoj estas tute korekta poezio kaj samtempe bona traduko. Ĝi estas la n-ro 9 devizita «Ni amu la pacon de l' Naturo» kaj al ĝi estas aljuĝata la premio. Estas ĝia aŭtoro S-ro Jaume Grau Casas, el Barcelona.

Konkuris por la premio al la traduko de «L'Escarment» ses verkoj el kiuj ni povas konsideri tri perfektaj. En ili ĉiuj la stilo estas eleganta kaj korekta kaj nur post atenta komparo de la tri tekstoj kun la originalo, la juĝintoj decidis difini la premion al n-ro 1 kun devizo «Secundum Scripturas» tial ke en ĝi pli granda nombro de katalunaj esprimoj ricevas tradukon pli trafan ol en la aliaj. Malgraŭ tio la Juĝantaro deklaras ke la merito de la tri verkoj estas preskaŭ la sama. Estas aŭtoro de la premiita verko S-ro Josep Ventura Freixas, el Terrassa.

Ricevas la II^{an} subpremion por sia verko n-ro 52 devizita «Sweet, sweet, sweet...» S-ro Marian Solà Montserrat, el Terrassa.

Estas aljuĝata II^a subpremio al la traduko n-ro 62 devizo «Ne ŝovu la nazon» kies aŭtoro estas S-ro S. Alberich Jofrè, el Barcelona.

Por la premio proponita de Lia Moŝto D-ro Narcís Pla i Deniel al plej bona priskribo de popola tradicio, ni ricevis naŭ verkojn. Ĝenerale la aŭtoroj pritraktis la temon tro malvarme, pli kiel ĵurnalistan raporton ol kiel literaturan pecon. Nur unu el ili, la aŭtoro de la verko n-ro 18 devizita «Individuo», sciis eviti tion kaj lia verko sub la formo de malgranda romano estas tre interesa. Bedaŭrinde, la lingvo ne ĉiam estas tute korekta.

Ankaŭ en alia verko, n-ro 65 kun devizo «Diada senyalada» estas paĝoj vervoplenaj, sed tiuj kontrastas kun aliaj malvarmaj, pure priskribaj. En ĝi estas uzata tre bonstila kaj gramatika Esperanto.

Konsiderante ke ambaŭ verkoj havas rimarkindajn kvalitojn, la unua precipe el literatura vidpunkto kaj la lasta pro la eleganta stilo uzata, la Juĝantaro decidis dividi la premion inter ili.

Aŭtoro de la verko n-ro 18 estas S-ro **J. D. Applebaum**, el Liverpoo (Britujo).

De la verko n-ro 65 rezultas aŭtoro S-ro **Marian Solà Montserrat**, el Terrassa.

Ricevas I^{an} subpremion la verko n-ro 49 kun devizo «Ne fari malbonon estas nia devo», aro de interesaj bulgaraj moroj rakontitaj korekte sed malvarme. Ĝia aŭtoro, S-ro Iv. H. Krestanoff, el Karlovo (Bulgarujo).

Sekvas en merito al tiu verko, n-ro 46 «La Majo alvenis» kaj ricevas II^{an} subpremion. Estas la aŭtoro S-ro Hans Decker, el Bergstein (Germanujo).

Tria subpremio estas aljuĝata al la verko n-ro 51 kun devizo «Aglo blanka», kolekto de tri polaj tradicioj el kiuj la lasta povus fariĝi ravanta rakonto pritraktita en literatura formo. Aŭtoro: F-ino Helena Hempel, el Lwów (Polujo).

Estas ankoraŭ difinita IV^a subpremio al la verko n-ro 3 «Raskinano» kies aŭtoro estas S-ro Renaud Richez, el Génève (Svisujo).

Du verkoj alvenis celantaj la premion de la Grupo «Semo». Ilia lingvo ne estis sufiĉe korekta kaj la Juĝantaro decidis ne aljuĝi la premion. Tamen konsiderinte la valoron de la verko n-ro 49 kiu ricevis la I^{an} subpremion de la temo pri popolaj tradicioj, tiu premio, kun konsento de la donacinto, estas transdonata al la ĵus dirita verko.

Premio de la Grupo «Barcelona Stelo». Nur unu teatraĵeton ni ricevis kaj ĝi estas tute ne taŭga por propagandaj celoj. Tial ke, malgraŭ tio, ĝi estas tre korekta kaj bone verkita oni aljuĝas al ĝi subpremion. Aŭtoro de tiu verko n-ro 50 kun devizo «Pripensu...!» estas F-ino Helena Hempel, el Lwów (Polujo).

Tri himnoj celis la premion de la Grupo «Nova Sento», sed neniu el ili estis sufiĉe bona laŭ la juĝintoj por meriti la premion. Unu el ili, la poezio n-ro 74 «En la mondo venis nova sento» povus ĝin ricevi kiel literaturaĵo, sed pro siaj dekkvinsilabaj versoj fariĝus tro peza muzikigita. Tiu ĉi verko ricevas I^{an} subpremion. Estas ĝia aŭtoro S-ro Artur Domènech Mas, el Barcelona.

Oni aljuĝas II^{an} subpremion al la verko n-ro 48 kun devizo «Pentekost'» kies aŭtoro estas D-ro Kolomano de Kalocsay, el Budapeŝt (Hungarujo).

Du verkoj konkuris al la premio de «Unio Deportiva». La premio estas aljuĝata al la n-ro 21 «Sunt qui cuvrículo suo...» verketo en kiu per flua Esperanto estas bone pritraktita la temo «Sporto». Aŭtoro: D-ro **Umberto Toschi**, el Bologna (Italujo).

Por la temo proponita de S-ro Casià Costal, Direktoro de la Normala Lernejo por Instruistoj, ni ricevis kvar verkojn. El ili estas tre interesaj la n-ro 22 pro sia originaleco kaj la n-ro 20 kiu traktas la aferon nur de pedagoga vidpunkto. Sed superas ĉiujn, pro la metodo kaj disvolvigo sekvataj de l'aŭtoro, la verko n-ro 41 «Ne tentes aut perfice». La tre granda valoro de tiu verko estas ankoraŭ pliigata per aldono montranta la multjaran laboron de la aŭtoro pri tiaj demandoj. La Juĝantaro rekomendas plej varme la eldonadon de la verko. La gajninto estas F-ino **Emma L. Osmond**, el London (Anglujo).

Nur unu poezio celis la premion de «Ĝirona Espero». Tial ke tiu versaĵo kantas sufiĉe bone kaj per korekta stilo arbaron «La Devesa» oni aljuĝas la premion. Aŭtoro de la verko n-ro 76 «La devesa» estas S-ro **Jaume Grau Casas**, el Barcelona.

Premio de Lia Moŝta Eparĥiestro de Girona. Alvenis du raportoj por la dirita premio. Tial ke ambaŭ estas interesaj kaj verkitaĵ per bona Esperanto la Juĝantaro decidis dividi la premion inter ili. Estas aŭtoro de la premiita verko n-ro 13 «Sub la verda stelo ni antaŭen iru» S-ro **Frederic Martí i Albanell**, el Hospitalet. Aŭtoro de la verko n-ro 17 devizita «Por Dio kaj Eklezio!» estas S-ro **Hanns Sappl**, el Graz (Aŭstrujo).

Ses tradukoj konkuris en la temo proponita de la Moŝta Katedrala Kanonikaro. El ili distingiĝis la n-ro 73 kun devizo «...Homar', vojiru!» kiu konservas pli ol la ceteraj la ritmon kaj signifon de la latina himno «Beata nobis gaudia», kvankam per simpla reordigo de iaj elementoj povus esti plibonigataj kelkaj versoj. Tamen ĝi estas tre bela kaj fidela traduko. Aŭtoro: S-ro **Artur Domènech Mas**, el Barcelona.

Nur unu verko aspiris al la premio de la Rektora Moŝto kaj Klaŭstro de la Tridentina Seminario. Tiu verko n-ro 27 sub devizo «Ut omnes unum», pritraktas la temon montrante veran okazintaĵon per tre alloga stilo kaj tial ĝi ricevas la premion. Aŭtoro de tiu verko estas S-ro **P. Ernst Schmitz** el Haifa, St. Charles, Palestino.

La temo proponita de «Grupo Escolar» kaj tiu de la «Unión Gremial y Patronal» restis bedaŭrinde nekonkursitaj.

Konkursis la temo de la «Instituto General y Técnico» nur unu verko. En ĝi la aŭtoro studas la devenon de ĉiuj greko-latinaĵoj komencigantaj per litero A, kiujn enhavas la esperanta vortaro, sed, plie, estas ankaŭ studata la deveno de la plej gravaj elementoj de Esperanto, kiel prefiksoj, sufiksoj, k. t. p. La juĝintoj ne hezitas aljuĝi al ĝi la premion kaj konsilas al

la aŭtoro la finigon de la verko. Estas aŭtoro de la verko n-ro 53, devizo «Nojo» S-ro Nicola Jager, el Pisa (Italujo).

Neniun manuskripton ni ricevis celantan la premion de Lia Moŝta Provincestro, kion ni multe bedaŭras.

Mi lasis por la fino de la raporto la laŭvolajn temojn tial ke la juĝintoj estis devigataj kunigi ilin kaj fari specialan klasifikon de la ricevitaj verkoj por ebligi ilian juĝadon. Ĉiu bone komprenos ke estas ja tute neeble kompari, ekzemple, la meriton de scienca traktato kun tiu de originala versaĵo aŭ tiun ĉi kun tiu de tradukita prozo. Mi profitas tiun momenton por konsili al la organizontoj de la IX^a Floraj Ludoj ke ili montru la klason de la verko kiu devas ricevi premion difinitan por laŭvolaj temoj.

La juĝintoj klasifikis la 23 ricevitajn verkojn en kvin kategorioj:

- a) Originalaj versaĵoj
- b) Originalaj prozaĵoj
- c) Tradukitaj versaĵoj
- d) Tradukitaj prozaĵoj
- e) Sciencaj verkoj

kaj aliflanke ni grupigis la premiojn laŭ la jena ordo:

- 1^a Premio de la Ekscelenca Urbeŝtraro
- 2^a Premio de «Coliseo Imperial»
- 3^a Premio de la Komerca Ĉambro
- 4^a Premio de Lia Moŝto Markizo de Camps
- 5^a Premio de la Societo «Marte»
- 6^a Premio de «Schola Orpheonica»

En la grupo a) restis klasigitaj kvin verkoj. El ili tuj distingiĝis la n-ro 68 «Sangaj larmoj» pro sia perfekteco kaj la granda emocio kiun ĝi elvokas. Ĝi estis proponata por unu el la premioj. Ankaŭ la verko n-ro 70 «Amo kreas la pacon» havas tre bonajn kvalitojn sed ĝi ne estas tiel impresa kiel la antaŭa. Oni ĝin difinas por 1^a subpremio. Sekvas en merito al tiu ĉi la verko n-ro 54 «Infano» kaj 11^{an} subpremion ĝi ricevas.

Ok verkoj konsistigis la grupon b) el kiuj, kvankam ne tre interesa, distingiĝas pro la spriteco kaj flueco de la lingvo la n-ro 37 «Nova Metodo». Ĝi restis, do, premiota. Alia verko n-ro 8, kun devizo «La falsa aŭ vera puritanismo de la nuna esperanta literaturo malhelpas ĝian beletristikan disvolvigon», estas tre atentinda. Estas bedaŭrinde ke la fino de la rakonto ne estas tiel interesa kiel la komenco. Tiun verkon oni mencias per 1^a subpremio. Verko n-ro 60 «En sonĝo patrujon mi vidis» estas tre bela milita rakonto. La juĝintoj respektas la vidpunkton de la aŭtoro (kelkaj kunsentas persone kun li), sed malgraŭ la valoro de la verketo ili ne povas aljuĝi premion al ĝi pro iaj neoportunaj nuancoj. Ĝi ricevas 11^{an} subpremion.

La grupo c) kolektis kvin tradukitajn poeziojn. La verko n-ro 10 kun devizo «Magnificat» restis nedubeble en unua vico. La Juĝantaro vere ĝojas ke tiu bela poemo estas enirinta en la esperantan literaturon sub formo tiel majstra. Alia bona traduko sed ne tiel interesa estas la verko n-ro 24 «Festina lente». Restis tiu ĉi versaĵo klasigita post la antaŭa.

Kvar verkoj formis la grupon d). La verko n-ro 66 «Nunca fuera caballero de damas tan bien servido» verkita per tre bela stilo altiris la atenton de la Juĝantaro kaj ĝi estis difinita kiel premiota verko. Alia proza traduko tre interesa, sed ne tre korekta, estas la verko n-ro 36 «Quis fuit horrendos primus qui protulit enses? Quam ferus et vere ferreus ille fruit!» Ĝi ricevas I^{an} subpremion.

En la grupon e) nur unu verkon ni enmetis. Ĝi estis la n-ro 15 «Gloron al nia Majstro!». Tiu verko estas unu el la plej gravaj kiujn ni ricevis en la nunaj Floraj Ludoj. Ĝi pritraktas, per tre pripensata maniero, la lingvajn respondojn de D-ro Zamenhof kaj montras la profundan studon kiun faris pri ili la aŭtoro. La Juĝantaro povus nur montri kun malaprobo la uzon de ĝis nun neoficiala sufikso «enda».

Estis jam juĝitaj ĉiuj verkoj celantaj la premiojn por laŭvolaj temoj. Ni konsideris tiam ke el la kvin premiataj verkoj de la koncernaj grupoj, plej ŝatinda estas la n-ro 15 al kiu oni destinis la premion de la Ekscelenca Urbeŝtraro. Ĝia aŭtoro estas S-ro **Walter Lippmann**, el Zwenkau (Germanujo).

Sekvis en merito verko n-ro 68 kaj ĝi ricevas la premion de «Coliseo Imperial». Estas la aŭtoro S-ro **Julio Baghy**, el Budapeŝt (Hungarujo).

Verko n-ro 70 kiu ricevas la I^{an} subpremion estas ankaŭ verkita de S-ro **Julio Baghy**, el Budapeŝt.

Aŭtoro de la verko n-ro 54 ricevinta II^{an} subpremion estas S-ro **Nicola Jager**, el Pisa (Italujo).

Estas aljuĝata la premio de la Komerca Ĉambro al la verko n-ro 10. Rezultis esti ĝia aŭtoro F-ino **Louise Briggs**, Leeds (Britujo).

Mi reparolos poste pri la subpremiita verko n-ro 24.

La premion de Lia Moŝto Markizo de Camps oni aljuĝas al la verko n-ro 66 kies aŭtoro estas S-ro **Marian Solà Montserrat**, el Terrassa.

Ricevas I^{an} subpremion la verko n-ro 36. Ĝia aŭtoro estas S-ro **Luigi Puppo**, el Genova (Italujo).

Estas aljuĝata la premio de la Societo «Marte» al la verko n-ro 37. Aŭtoro: S-ro **Paulo Balkányi**, el Budapeŝt (Hungarujo).

Unuan subpremion oni aljuĝas al la verko n-ro 8 kies aŭtoro estas S-ro **Renaud Richez** el Gênevê (Svisujo).

Al la verko n-ro 60 estas aljuĝata II^a subpremio. Aŭtoro: S-ino **Maria Elworthy-Posenauer**, el Mariaburg-Eckeren (Belgujo).

Tial ke restis ankoraŭ aljuĝota la premio de «Schola Orpheonica» la Juĝantaro decidis ĝin doni al la plej merita el la subpremiitaj verkoj de ĉiuj grupoj de laŭvolaj temoj. Tia verko estas laŭ opinio de la juĝintoj la n-ro 24

kaj ricevas la diritan premion. Estas la gajninto: S-ro Paulo Medem, el Kovno (Litovujo).

Jen, gesinjoroj, la rezultato de niaj nunjaraj Floraj Ludoj. Tiuj literaturaj festoj certe havos atentindan gravecon en la evoluado de nia lingvo, tial ke ili instigos la samideanojn verki en arta formo per Esperanto. Mi diris evoluadon, sed, kompreneble, mi ne volis paroli pri gramatikaj ŝanĝoj dirante tion. Mi nur aludis la evoluadon de la stilo. Neniu povas diri kiel estos la venonta esperanta stilo, kiu certe ne estos la lasta, ĉar ĉiu vivanta lingvo kaj precipe juna, freŝa lingvo kiel la nia, evoluas senhalte tra la centjaroj kaj neniam estas ellaborita. Ni lasu, do, ke ekstergramatike, supergramatike, montriĝu tiu vivsigno de nia lingvo kaj ni ne baru tian vojon.

Sed rilate la versfaradon, ni opinias ke estas jam tempo ke niaj lingvaj institucioj regulu la aferon. Ni ne katenigu la inspiron de niaj poetoj per feraj ringoj, sed ni sciu bone kio estas aŭ ne korekta. Ĉu oni povas versi esperante per la liberaj hispanaj ritmoj aŭ ĉu oni devas sekvi, ekzemple, la pli mallargajn regulojn de la germana lingvo? Ĉu nur perfektajn rimojn oni povas akcepti aŭ ĉu oni povas enkonduki la radikajn kaj asonancajn rimojn? Jen kelkaj el la demandoj kiuj sin prezentas al internacia juĝantaro dum la tralegado de la konkursantaj verkoj. Ĉiu juĝanto juĝas la versaĵojn laŭ la reguloj de sia patra lingvo kaj estus preferinde tion fari laŭ oficialaj esperantaj reguloj. Oni konkretigu ilin kaj ni ne timu ke ili malhelpos la kreskadon de tiu branĉo de nia literaturo; kontraŭe ili donos solidan bazon kaj novan forton por ke la esperanta poezio, nia iama cindrulino, iĝu ĉiam pli bela, pli rava kaj pli glora.

ESTANISLAU PELLICER

Unu post la alia la premiitaj aŭtoroj aŭ iliaj reprezentantoj iris ricevi de manoj de la Reĝino siajn premiojn meze de ĝeneralaj aplaŭdoj. La versaĵoj estis preskaŭ ĉiuj legataj kaj la ĉeestantoj, el kiuj multaj ne estis esperantistaj, entuziasme aplaŭdis ilin kun miro pri nia sonora kaj harmonia lingvo. La premiojn gajnintajn de eksterlandaj samideaninoj iris ricevi fraŭlinoj esperantistaj kaj la bela poezio de F-ino Louise Briggs «Revelacio de Amo» estis milde legata de F-ino Teresa Colls, el Girona.

Je la fino de la raporto de S-ro Pellicer, oni gratulis lin per longedaŭra aplaŭdado pro lia bona plenumo de la ofico de Sekretario de la Floraj Ludoj.

Anstataŭ la Prezidanto S-ro Kühnl, kiu bedaŭrinde ne povis ĉeesti, parolis por fini la feston S-ro Josep Grau, membro de la Juĝantaro, kiu tre bele kaj elokvente klarigis per kataluna lingvo

la celon kaj signifon de la esperantistaj Floraj Ludoj. Kelkfoje interrompis lian belan paroladon bruaj aplaŭdoj de la publiko, en kiu kaŭzis fortan impreson la varmaj esprimoj, plenaj de esperanta fervoro, de la eminenta parolanto.

Jen pala resumo pri la parolado farita de S-ro Josep Grau, anstataŭante la Prezidanton de la VIII^a Internaciaj Floraj Ludoj:

Reĝina Moŝto,
Ekscelencaj Aŭtoritatuloj,
Gesamideanoj,
Ĝironcivitanoj:

Via grandara ĉeesto en la nuna festo de la esperantistaj Floraj Ludoj, kiu estas la plej hela ĝia briligo, atestas al ni la grandan intereson kiun vekis en la nobla popolo de Girona nia ideo kaj nia propagando.

Por danki vin mi prefere klarigos al vi ĉiuj, kia estas la celo de la Internaciaj Floraj Ludoj, kaj kial la Kataluna Federacio, kiu jam okfoje ilin okazigis, konsideras ilin kiel la ĉefan elmontron kaj la plej efikan manifestadon de siaj ĉiujaraj kongresoj.

En nia spirito estas ĉiam vivanta la rememoro pri la efiko de la katalunlingvaj Floraj Ludoj, kies unuaj paŝoj estis rigardataj kun ekridemo de tiu sama popolo kiu post duonjarcento ŝuldas al ili la plenan revivigon, la realtigon de sia lingvo; kaj tia rememoro estas la kaŭzo kial ni, esperantistoj kaj katalunoj, atendas de niaj internaciaj Floraj Ludoj, en kiuj la kulturado de la lingvo estas farata en la plej altaj kampoj de la intelekto kaj de la spirito, ke ili havos la povon venki la eblan ekridemon de la indifertularo, kiun certe ni timas neniel, kaj kiun ni forte pravaj kuraĝas moki.

En niaj Floraj Ludoj montriĝas ĉiujfoje, ke ne nur la interkompreno lingva inter la esperantistoj de tre apartigitaj landoj estas absoluta, sed ankaŭ ke niaj poetoj trovas en la fleksebleco kaj admirinda belsoneco de Esperanto la esprimilon plej akuratan, kiu povas, tra la interspaco kaj super la lingvaj limoj kaj diverseco de popolaj moroj, vibrigi niajn korojn akorde kun la sentoj de Poezio, kiuj al ni katalunoj sonas mirige kaj kortuŝe, tiel same kiel la verkoj de niaj naciaj poetoj, sentitaj kaj esprimitaj tra nia natura lingvo. Kaj tio okazas — konsideru tion, se vi volas, kiel veran miraklon — ĉar en la esperanta internacia lingvo povas resonori tiel same kiel en la kataluna lingvo la klasikaj kaj ĉiam vivaj agordoj grekaj kaj latinaj.

Ke ni estas sur la bona vojo, atestas klare la rezultato de la en tiu ĉi momento okazantaj Floraj Ludoj. En la areno ilia, luktis por la premioj multenombraj verkistoj de 16 malsamaj lingvoj aŭ nacioj; kaj la Juĝantaro, kiu trastudis kaj atente esploris la prezentitan verkaron, konsistis ankaŭ el samideanoj de diversaj landoj; tri el ili estas katalunoj, unu estas hispano ne kataluna, alia, la Prezidanto kiun mi havas la honoron anstataŭi, estas

bohemo, kaj alia el la juĝantoj estas germano. Ni ĉiuj ĝuis la belaĵojn de la premiitaj verkoj, kelkajn el kiuj vi ĵus aŭdis, kun tia sento de admiro kun tia ravata impresado kiel se la legataj verkoj estus verkita en la respektiva patra lingvo.

Ĉu vi imagas kian grandan forton ni povas ĉerpi en tiu spiriton altiganta konstato? Ni tial kredas ke se la Floraj Ludoj katalunlingvaj povis, venkinte rapide la unuamomentajn ekridojn, reentronigi la malnovan katalunan patran lingvon, nur tial ke ĝi parolis rekte al la koroj ĝin forgesintaj, la internaciaj esperantlingvaj Floraj Ludoj kondukos al la starigo de la nova interpopola lingvo tial ke ĝi katenigas la malproksimajn korojn per mildaj ligiloj, ne imageblaj de tiu ne kredanta ankoraŭ je la diverslingva interkompreno.

Via promesoplena juneco, bela Reĝino kaj ĉarmaj Korteganinoj, samideaninoj niaj; via protekto kaj aprobo, respektindaj aŭtoritatoj; via atento kaj scivolemo, popolo de la senmorta urbo; via konstanteco kaj entuziasmo, karaj gesamideanoj kiuj kun mi estas feliĉaj ĝui tiujn ravantajn momentojn, kuraĝigas nin tiel, ke, eĉ se ni povus ekdubi iam pri la efiko de la ĉefe spirita valoro de nia ideo, ni povus retrovi en via kunesto la apogon por res-tarigi la unu momenton eksanceliĝintan entuziasmon nian.

Vi, samideanoj, tion bone komprenas kaj en la profundo de l' koro sentas.

Vi, neesperantistoj, tion povos facile konstati, se via aprobo nuna transformiĝos per malgranda peno en samideana kunlaborado.

Venu do al ni kaj grandigu ĉirkaŭ la mondo la serenon kaj fratan rondon de la kredantoj je Amo, en kies unua rango klopodas rajte staradi la partianoj de Esperanto.

JOSEF GRAU CASAS

Ovacio aŭdiĝas post la prezidanta parolado, kaj sinjoro Urbestro prononcas la ritan frazon: La festo estas finita.

La Reĝino kaj la Ama Kortego forlasas la scenejon, kaj la samideanaro adiaŭas ilin per longa aplaŭdado kaj kantado de «La Espero», kies emociaj strofoj vibras kune kun ĉiuj koroj, hele kronante la ĉarman poezian feston.

Ĝi estis plej efika pruvo pri la taŭgeco kaj beleco de Esperanto kaj ĝia propaganda valoro estis nekalkulebla.

Ĉiuj enurbanoj longe rememoros tre agrable tiun esperantan feston, kiu neantaŭvidite montris al ili per ravanta maniero la tutan signifon de nia alta kaj nobla celo.

Oni bone rimarkis la partoprenon de multaj eksterlandaj konkursantoj, kio estas aparte kontentiga por ni, ĉar per tio montriĝas klare ke ni sukcesis iĝi plene internaciaj la Florajn Ludojn

kaj espereble en venontaj jaroj kreskos ankoraŭ la nombro de alilandaj partoprenantoj.

Vivu la Internaciaj Floraj Ludoj!

OFICIALA FESTENO

Je la 9^a vespere ĝi okazis en la ĝardeno de « Hotel del Comerç », partoprenata de pli ol cent gesamideanoj.

Sidis en la honora prezida loko la Reĝino de la Floraj Ludoj kaj ŝiaj Korteganinoj, akompanataj de la premiita poeto kaj de aliaj esperantaj eminentuloj.

Ĉe la ĉampano, oni faris multajn jen seriozajn, jen gajajn kaj spritajn tostojn, kun komentarioj kaj bondeziroj pri la esperantista movado kaj pri la organizado de niaj ĉarmaj Kongresoj, dum kiuj ĉiuj vivas tiel ĝojajn horojn.

HONORA BALO

Tiuj — mirige tre multaj — ne laciĝintaj ankoraŭ pro la longa festaro de la Kongreso, ĉeestis post la festeno la balon ĉe Teatre Principal, dediĉatan al la Kongresanoj de « Centre de Dependents de Comerç » kaj « Unió Detallista », kiu daŭris ĝis la morgaŭa frumateno.

LUNDO, 17

POSTKONGRESAJ EKSURSOJ

Du postkongresaj ekskursoj estis organizitaj kaj ambaŭ altiris la ĉeeston de multaj gesamideanoj, ĉefe tiu al Empúries kaj La Escala.

Per du specialaj aŭtomobiloj oni veturis al Empúries. Tie oni vizitis tre atente la grekajn ruinojn, pri kiuj donis detalajn klariĝojn esperantlingve Pastro Casanovas. Ankaŭ faris tion katalune la gvidanto de la elfosaĵoj S-ro Gandia, kiu bonvolis akompani la esperantistojn dum parto de la vizito. Fine estis vizitata la Muzeo kie oni konservas la tre valorajn objektojn eltrovitajn.

De tie la ekskursantoj piede iris al la belega kaj pentrinda vi-

laĝo La Escala, kie oni vizitis la tre interesan preĝejon. La ceteran tempon la samideanoj agrable promenis apud la maro, kiu plej bele montriĝas en tiu regiono.

La ekskursantoj al Banyoles ankaŭ ĝuis belan spektaklon, vizitante la tiean lagon kaj ĉirkaŭaĵojn.

Je la 7^a vespere ĉiuj estis revenintaj en Girona kaj la afablega loka samideanaro volis akompani ilin al la stacidomo, kie okazis emocia adiaŭo kun ekkrioj «Vivu Esperanto» kaj «Ĝis la venonta en Manresa».

RESUMO

Nia nunjara Kongreso estis vere sukcesa kaj inda je la antaŭaj. La urbo ĝojis pro tiom da festoj kaj solenaĵoj kaj ĝenerale ĉiuj enurbanoj elmontris sian simpatian al Esperanto. Tion oni povis ĉefe rimarki dum la festo de la Floraj Ludoj, kiu havis tiun ĉi jaron specialan reliefon. La granda flago esperantista pendanta antaŭ la urbdomo kaj la standardoj de la Grupoj ornamantaj ĝiajn balkonojn, la miloj da ĉiuspekaj presaĵoj, invitiloj, programoj kaj murafiŝoj redaktitaj parte en Esperanto, kaj la multenombraj insignoj de la Kongresanoj, kiujn oni senĉese vidis ĉie en la urbo, atestis klare pri la okazo de granda festo esperantista kaj pruvis la ekziston de intensa mondlingva movado en nia lando.

La ĉeesto de honorindaj aŭtoritatuloj kaj eminentaj personoj, kaj la favora sinteno de la ĵurnaloj, havis en tiu ĉi Kongreso atentindan valoron.

La nombro de Kongresanoj, pli ol 250, estas kuraĝiga signo de nia esperanta revigliĝo. La nombro de reprezentitaj societoj estis ankaŭ grava. Ni esperu pro tiu Kongreso novan plifortiĝon!

Raportojn pri ĝi publikigis la ĵurnaloj, ĉefe tiuj de Girona kaj Barcelona. «El Dia Gráfico» bonvolis aperigi grandajn kaj belajn gravuraĵojn pri la diversaj festoj, kun portretoj de la Reĝino kaj Korteganinoj de la Floraj Ludoj. Ankaŭ sur la ĉiusemajna ĵurnalo «Esperanto Triumfonta» aperis raporto pri la kongreso, kun vidaĵoj de Girona, portreto de la Reĝino kaj la poezio premiita per la Natura Floro.

Ni finos dankante ĉiujn kiuj helpis al nia sukceso, sed ĉefe la

membrojn de la Kongresa Komitato kaj tute speciale ĝian Prezidanton D-ron Casanovas.

La IX^a Kongreso okazis kaj la unua jaro de la revivigo de K. E. F. estas finiĝanta. Ke la nova jaro alportu progresojn al ĝi kaj la X^a Kongreso en Manresa novan entuziasmon. Vivu la Kataluna Esperantista Federacio!



Oficiala Parto

La federaciaĵoj elektitaj de la Kongreso por la nova Direkta Komitato kunsidis kaj la postenoj restis disdonitaj jene: Prezidanto: Joan Gili Norta; Vic-prezidanto: Joan Amades; Sekretario: Romà Guardiet; Vic-sekretario: Jaume Claramunt; Administristo: Pere Navas; Kasisto: Joan Castells; Voĉdonantoj: Enric Adam, Jaume Grau, Ramon Soler, Jaume Pruna.

La D. K. decidis starigi, laŭ la regularo, kelkajn Sekciojn kaj elektis por ili la jenajn membrojn:

Sekcio por propagandaj vizitoj:

S-roj Ramon Soler, Komitatano; Domingo Bruguera; Joan Castells; Jaume Claramunt; Artur Domènech; Francesc Piñol.

Sekcio por propagando sur la ĵurnaloj:

S-roj Jaume Grau, Komitatano; Jacinto Bremón; Delfi Dalmau; Conrad Domènech; Romà Guardiet; Marian Solà.

Eldona sekcio:

S-roj Joan Amades, Komitatano; Enric Aguadé; S. Alberich Jofrè; Joan Comadran; Fraŭlino Carme Maymí; Estanislau Pellicer.

La Konsulta Komitato, konsistanta el la prezidantoj de ĉiuj Grupoj kaj tiu de K. E. F., ankaŭ kunvenis kaj decidis regule kunsidi ĉiumonate, la duan dimanĉon je la 10^a kaj duono matene, en la sidejo de K. E. F., por plej bone plenumi sian taskon, ĉefe tiun al ĝi komisiitan de la lasta Kongreso rilate la studadon pri eblaj konvenaj ŝanĝoj en nia Regularo.

La Prezidantoj de la Grupoj bonvolu, do, fari atenton al ĉi tiu alvoko.

ROMÀ GUARDIET, SEKRETARIO

La Revelacio de Amo

«Ne proksimiĝu, ho popolo mia:
atendu ĝis montriĝos volo dia!»
Vizaĝojn kaŝis la popol' kaŭranta
antaŭ la sankta monto flambrulanta.
Jen tondro, fulmo, tera konvulsio,
sub la pied' de nevidebla Dio:
kaj tra la nuboj, kvazaŭ trumpetsono,
«Vi amu Dion!» venis la ordono,
«Al ĉiu obeant' fariĝos ĉia bono.»

Ho, ĉu ebligas vera kora amo
al nevidato nur pro la proklamo?
La homoj Dion timis, sed ne amis,
kvankam l' ordonon oni laŭtaklamis
en ĉiu hejmo, templo, sinagogo.
Instruis tion ĉiu pedagogo;
sed tute male pri la proksimulo —
«Denton pro dent', okulon pro okulo!»
Por hom' la dia am' restadis nur formulo.

Sed tamen ĉie regis am' natura,
en la patrinoj sindonema, pura,
en la geedzoj varma, primitiva,
en la infanoj simpla kaj naŭva,
en la junuloj arda kaj flamanta,
en maljunuloj milda kaj konstanta,
en la amikoj firma, simpatia,
en multaj koroj forte energia:
ateston faris homa am' pri amo dia.

Sed kiam, post la tempo difinita,
 en Betlehemo estis jam naskita
 la glora Fil' de Dio kiel homo —
 Ĉiam laŭdata estu Lia Nomo —
 kaj kiam, sur la monto Kalvario,
 pro homoj krucumigis Homo-Dio,
 ho! tiam eldonigis la proklamo,
 la granda vero — «Dio estas Amo,
 hieraŭ kaj hodiaŭ kaj por ĉiam Samo.»

Ho Am', juvel' plej bela en palaco!
 Ho Am', donanta lumon al domaĉo!
 Tra mia kor' trasendu la radion,
 ke mi eksentu dolĉan simpation,
 afablan paciencon, pardonemon,
 gajecon kuraĝigan, kaj servemon:
 ĉar tiuj estas la idaro bela
 de vi, ho adorinda Am' ĉiela!
 Min gvidu per la lumo via pura, hela!

LOUISE BRIGGS

Premiita en la VIIIaj Internaciaj Floraj Ludoj.



Al la Konservantaro de la Floraj Ludoj

Ĉar ne povis kunveni en Girona dum la Kongreso la membroj de la Konservantaro de la Floraj Ludoj, t. e., ĉiuj membroj de la antaŭaj Juĝantaroj, oni sciigas ilin ke la 15^{an} de Decembro okazos kunveno ĉe la sidejo de K. E. F., je la 10^a vespere, por elekti la Juĝantaron de la proksimaj IX^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj. La eksterurbaj membroj povos sendi skribe sian opinion.

LA SEKRETARIO

Bibliografio

KAŜITAJ VORTOJ. — Origine skribitaj en araba lingvo de «La Plejsupera Plumo» de Baha' U' Llah. El la angla lingvo tradukis Vasily J. Eroŝenko kun helpo de Agnes B. Aleksandro. Japanujo.

24 - paĝa verketo kun kovriloj, bindita laŭ la japana maniero. Ĝi enhavas 72 religiajn pensojn.

KAŜITAJ VORTOJ. — Japana traduko de la sama antaŭa verko, kun esperanta aldono «Dek-du Fundamentaj Bahaj Principoj».

LA KARTLUDO PRO SUPERA SILEZIO, de Prof. Walter Stahlberg. Adresata de la rifuĝintoj el Supera Silezio al la tutmonda Esperantistaro.

Berlin 1921. Nova Esperanto-Eldonejo. Prezo: 3 M. 24 - paĝa broŝuro.

PROTESTKUNVENO kontraŭ la perforto al Supera Silezio, la 22^{an} de Majo 1921, en la granda salono de «Philharmonie», Berlin. Nova Esperanto-Eldonejo. Prezo: 3 M. 32 - paĝa broŝuro.

POR NEDIVIDITA GERMANA SUPERA SILEZIO! — Alparolo de Gerhart Hauptmann. Berlin 1921. Nova Esperanto-Eldonejo. Prezo: 3 M. 32 - paĝa broŝuro.

KIEL ONI FONDAS KAJ ORGANIZAS ESPERANTAN GRUPON? — Kun aldono de Statutoj por esperantaj Grupoj. Verkis: Hans Sappl. Paulus-Eldonejo, Karmeliterplatz, 5, Graz, Aŭstrujo. 28 - paĝa broŝuro kun trafikaj konsiloj pri la organizo kaj funkciado de Grupoj.

DUA EKZERKARO DE ESPERANTO KUN ITALA TRADUKO. — 32 - paĝa broŝuro el la Kolekto de la Revuo «L'Esperanto», enhavanta la Duan Ekzerkaron de D-ro Zamenhof kun la traduko en itala lingvo. Eldonis: A. Paolet. S. Vito al Tagliamento (Italujo). Prezo: 1 L.

UNUA KAJERO. — (Nova Tempo - Libretaro) Aŭstria kolekto de legindaj rakontetoj, fabeloj k. t. p. Eldonejo Nova Tempo, Mollardgasse N-ro 55 Wien, VI. Prezo: 30 Kr.

Broŝuro 32 - paĝa, kun multaj interesaj rakontoj en tre korekta Esperanto. — J. G. C.



En la venonta jaro ni publikigos la ĉefajn verkojn premiitajn en la lastaj Internaciaj Floraj Ludoj.

Baldaŭ aperos

LA ROMANO DE MENDE NARR

originala romano de J. D. Applebaum, kaj la poemo

ROBERTO, REĜO DE SICILIO

el Longfellow, tradukita de Louise Briggs.



Presejo J. Vinyals, Plaça Constitució, 6 : SARRIÀ

ESPERANTAJ GAZETOJ

ricevitaj en nia Redakcio, publike legeblaj ĉe la legoĉambro de «Enciklopedia Popola Ateneo», Carme, 30, sidejo de K. E. F.

Franca Esperantisto

Le Monde Espérantiste

Esperanto-Praktiko

Belga Esperantisto

La Marto

La Semisto

Germana Esperantisto

Hispana Esperantisto

Katolika Mondo

Esperantista Laboristo

Kristana Espero

Verda Utopio

Vegetarano

Esperanta Finnlando

La Esperantisto

La Laborista Esperantisto

Nova Tagiĝo

Hungara Esperantisto

Esperanto Triumfonta

Nova Tempo

Literaturo

Bulgara Esperantisto

La Patrje Ladine

The British Esperantist

Nederlanda Esperanto

La Verda Ombro

Amerika Esperantisto

Espero Teozofia

L'Esperanto

La Revuo Orienta

Arguso

Brazila Esperantisto

Oficiala Gazeto Esperantista

Ĉeĥoslovaka Gazeto

Nova Eŭropo

La XIII^a

Agitanto


Bizantio

Ni dankos sendadon de la ceteraj esperantaj gazetoj.

A V Í S

En compliment de la nostra promesa, hem fet aparèixer «Kataluna Esperantisto» durant aquest any amb absoluta regularitat.

Esperem que tots els federats, corresponent als nostres esforços, voldran pagar sense cap ajornament la quota de l'any 1922, car això es la millor garantia de la puntual publicació de la Revista i facilita en general la bona marxa en l'ordre econòmic de nostra volguda «Federació Catalana d'Esperantistes».



LEIPZIG-A SPECIMENFOIRO FOIRO

POR TEKNIKO KAJ KONSTRUKTAKO

Printempa Foiro 1922 de la 5^a ĝis 11^a de marto

Aŭtuna Foiro 1922 de la 27^a de aŭgusto ĝis 2^a de septembro

La centra merkato por la internacia
komerco kaj ofertado

Same grava por ekspozantoj kaj por aĉetantoj

Informojn donas kaj aliĝojn akceptas

MESSAMT FÜR DIE MUSTERMESSEN
IN LEIPZIG

(Foiroficejo por la Specimenfoiroj en Leipzig)

JOHANNES TZECHICHOLD · LEO · 1921